

**GUIDALIBRO
POR
SUPERA
EKZAMENO**

*historio
literaturo
metodologio*

GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO

*historio
literaturo
metodologio*

Redaktis:
ALFONSO PECHAN

HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO
BUDAPEST, 1979

KUNLABORANTOJ

SKIZO DE HISTORIO DE INTERNACIA LINGVO

Verkis:

P. Balkányi

L. Kókény

A. Pechan

I. Szerdahelyi

SKIZO DE ESPERANTA LITERATURHISTORIO

Verkis:

K. Kalocsay

Kunlaboris:

P. Balkányi

H. Vatré

Por la dua eldono
kompletigis:

Á. Abonyi-Nagy

METODIKO

Verkis:

D-ro I. Szerdahelyi

ISBN 963 571 031 3

Eldonis Hungara Esperanta-Asocio

Budapest, 1979

Respondeca eldonanto: Tibor Vaskó

Respondeca redaktoro: Vilmos Benczik

Kovrilo kaj tipografio: Éva Farkas-Tatár

Főprint nyomda 79099

ANTAŬPAROLO

AL LA DUA ELDONO

Pasis jam pli ol jardeko de tiam, kiam la unua eldono de tiu ĉi utila studlibro rikoltis merititan sukceson en Esperantujo. Malgraŭ la alta eldonkvanto ĝi elĉerpiĝis dum malmultaj jaroj, kaj en la lastatempe vigliĝinta vasta interesiĝo pri la Esperanta kulturo oni ĉiam pli sentas mankon de simila populara konsultilo.

Tio estas la kaŭzo, ke Hungara Esperanto-Asocio decidis reeldoni ĝin - en formo tralaborita. Alfonso Pechan - redaktoro ankaŭ de la unua eldono - faris grandegajn fortostreĉojn por plene ĝisdatigi kaj laŭnesecese perfektigi la verkon, pro kiuj la Eldonejo ŝuldas al li profundan dankon, eĉ se ĝi ne konsentis akcepti ĉiujn kompletigojn, proponitajn de li, volante kiel eble gardi la sveltecon de la libro. Pro tio kelkloke la materialo eble povas ŝajni iom skiza, sed ni trovas, ke en populara lernilo tio ne nepre estas trajto mallaŭdinda.

Kompare al la unua eldono estas grava kompletigo la apero de Metodiko en la sama volumo. Ampleksiĝis kaj fidinde orientas la literaturhistoria parto, kiun siavice kompletigas ankaŭ tekstaro, aperanta en aparta volumo sub titolo Baza Literatura Krestomatio. Malpleje ni kontentas pri la movadhistoriaj ĉapitroj, kiuj ne ĉiam plene respegulas ĉiujn novajn atingaĵojn de la tiukampaj esploroj.

Bonaj aktivuloj de nia movado devas esti informitaj pri la pasinto kaj nuntempo de Esperanto. Per tiu ĉi studlibro ni esperas kontribui al tiu celo.

ANTAŬPAROLO

Por la dua parto de nia gvidlibro validas la rimarkoj en la Antaŭparolo de la unua volumo. Ni citas el ĝi tie ĉi nur mallonge kelkajn detalojn, kiuj rilatas ĉefe al tiu ĉi dua volumo.

En la vol. I-a Gramatika Demandaro havas ĝeneralan intereson, dum la Instrumetodo estas ekzamena materialo, respektive baza kono por estontaj kaj praktikantaj lingvoinstruistoj.

La vol. II-a entenas por ĉiu esperantisto interesan materialon de la Esperanto-movado kaj literaturo. Ĉe tiuj 3-a kaj 4-a partoj ni signas per la titolvorto „Ski-zo”, ke tiuj partoj neniel volas kaj povas esti kompletaj historioj de la Movado kaj Literaturo de Internacia Lingvo. En la listo de la fontverkoj la leganto trovas titolojn de verkoj, kies studo ebligas kompletigi la konojn sur ambaŭ teritorioj.

Por konvinki sin mem kaj aliajn pri la supereco de E kontraŭ aliaj planlingvoj, oni devas koni la historion ne nur de E, sed ankaŭ iom el la historio de ties antaŭuloj kaj ties iamaj kaj nunaj ĉefaj konkurantoj. Tial en la ĉapitroj de la Historio de Lingvo Internacia ni prezentas historiaĵojn ne nur el la E-movado, sed ni donas iom pli detalan konigon pri pazigrafioj, planlingvoj. Estas grave koni la fakton, ke ekde jarcentoj multaj provis solvi la problemon de internacia interkomprenilo — kaj ke malgraŭ pluraj centoj da planlingvoj — nur E estas disvastiĝinta tra la tuta terglobo, dum la aliaj vivas ĉefe nur sur bretoj en bibliotekoj de maloftaĵoj aŭ eĉ nur en tirkestoj de skribotabloj.

Certe ne estas postulaĵo ĉe E-ekzameno la parkera kono de multaj jam delonge forgesitaj planlingvoj (de strukturo, nomo de aŭtoro, aperjaro, ktp.). Tiuj partoj servas ĉefe por legaĵoj kaj – en okazo – por argumentado por pruvi: kiel longan, malfacilan kaj „kurban” vojon trairis la kreo de interkomprenilo en la menso de la homaro – ĝis la fina solvo, Esperanto.

Pri la taŭgeco de E por literaturaj kaj fakaj celoj estas konvinke, se ni povas prezenti faktojn de la E-literaturo kaj beletra kaj faka. Ni devas koni niajn originalajn poetojn, verkistojn, scienculojn – iliajn ĉefajn verkojn –, krome aron da mondliteraturaj ĉefverkoj, kiuj estas plejparte brile tradukitaj en Esperanton.

En literaturhistoria „Skizo” certe ankaŭ ne eblas detala konigo de ĉiuj verkistoj kaj verkoj. Tamen la kompilantoj de ĉi tiu parto klopodis – el vidpunkto de la futuro – reliefigi la plej gravajn fazojn, verkojn, nomojn. Cito de ĉiuj opaj nomoj, titoloj ankaŭ el tiu parto ne devas esti ekzamena postulaĵo.

La literaturhistoria skizo estis kunmetita de K. Kalocsay. La teksto de la historio de l'unua periodo estas ĉefe de P. Balkányi, la ĉapitrojn pri la dua periodo verkis grandparte H. Vatré.

La Historio de la Hungarlanda E-movado estas ĉefe por la hungaraj legantoj kaj ekzamenatoj. Tiuj ĉapitroj certe ne estas ekzamena postulaĵo por eksterlandaj ekzamenatoj.

Ankaŭ ĉi-loke mi dankas al ĉiuj kunlaborantoj kaj al la estraro de Hungara Esperanto-Asocio, ke ĝi ebligis la aperon de jena verko.

Budapeŝto, 15. decembro 1966.

Alfonso Pechan
redaktinto

**SKIZO DE HISTORIO
DE
INTERNACIA LINGVO**

ENKONDUKO

1. *La problemo de la multlingveco en la historio*

La diverseco de la lingvoj estas samaĝa kun la homaro. Tamen, kiel problemo, ĝi aperas nur je la komencoj de la homa kulturhistorio. Kvankam en la antikvaj tempoj la internaciaj rilatoj estis multe pli maloftaj ol en la postaj jarmiloj, — la praaj asiroj, egiptoj kaj hebreoj sentis jam la malfacilaĵojn kaŭzitajn de la diverslingveco kaj rigardis ĝin malbeno. Tion ilustras la rakonto de la Biblio pri la lingva konfuzo Babela.

Laŭ *Genezo* (11./1-9): „Sur la tuta tero estis unu lingvo... ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando *Ŝinar* kaj tie ekloĝis. Kaj ili diris unu al alia:... Venu, ni konstruu al ni urbon kaj turon, kies supro atingos la ĉielon... Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari... Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de la alia. Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero... Tial oni donis al ĝi (al la turo) la nomon *Babel*... “La vorto *Babel* (*báb-ili*) signifas: „pordego de Dio“, sed la popola etimologio kunligas la nomon kun la vortradiko: *bll*, kies signifo estas: „konfuzi“.

Rilate la lingvokonfuzon estas memkompreneble, ke en tiel granda metropolo, kia estis Babilono, loĝis

multlingva loĝantaro jam ankaŭ tial, ke intermiksiĝis tie sklavoj el multaj landoj. Tamen ne tio estas la ĉefa: kiel naskiĝis la lingvokonfuzo, sed ke tio kaŭzis obstaklojn jam antaŭ pli ol 3,5 mil jaroj! Grava *argumento* pri malfacilaĵoj kaŭzitaĵ de multlingveco:

Jam pr. 1600 jarojn a. K. la homoj rigardis dia puno la diversecon de lingvoj.

La plimulto de libroj de Biblio estis skribitaj en prahebra lingvo, sed kelkaj jam en la aramea. Ankaŭ la pergamenrulaĵoj trovitaj en *Kumran* ĉe Nigra Maro (1947-66) estis skribitaj ĉefe en tiuj du lingvoj (oni nomas *lingvoduopoj* tiajn paralele uzatajn lingvojn).

Kiam la semidaj arameaj gentoj – venintaj el la dezerto en la dua jarmilo a.K. – komencis konkeri teritoriojn de Babilono, Asirio, Sirio, Fenicio, ili disvastigis ankaŭ sian lingvon. Iom post iom la *aramaea* estis rigardebla *internacia lingvo* sur teritorioj de Lidio, Palestino ĝis Hindio.

Tamen ne ĝi estis la unua internacie uzata lingvo. Tiu malkovro estis unu el la plej grandaj sensacioj meze de la pasinta jarcento, kiam oni okupiĝis pri la solvo de la babilona-asira *kojnoskribo*. Ties grandiozeco, komplikiteco konkludigis, ke alia eĉ pli kulturita popolo, veninta verŝajne el orientaj montoj, estis la deveninto de la kojnoskribo – kvankam ĝis tiam eĉ la plej eta trovaĵo, aŭ surskribo ne atestis pri tiu popolo, eĉ pri ĝia nomo ne. La german-franca scienculo *Oppert* „baptis“ tiun mistikan popolon *sumeroj*.

Laŭ tiu supozo – kaj laŭ indikoj en la Biblio – oni direktis la esploradojn, elfosadojn, kaj oni trovis statuojn, en stilo ĝis tiam nekonata – monumentojn, ziguratojn, restaĵojn de grandiozaj urboj: *Ur, Uruk, Nipur, Ninive* (Ninevo) ... Evidentiĝis, ke preskaŭ ĉiu

kultura kreaĵo de Babilono, Asirio baziĝis sur heredaĵo sumera, kaj ke sumeroj estas la plej malnova kulturpopolo (pr. kvinmil j. a.K.), pli malnova ol la egipta. En sumera lingvo estis skribita la plej malnova epopeo de la mondliteraturo: *Gilgameŝ*.

En la tria jm. a.K. la orientsemidaj *akadoj* okupis la teritorion de Mezopotamio, subigis la sumerojn, kaj disvastigis la *akadan lingvon* en Mezoriento. Tiu lingvo estis „*interlingvo*“ de la konkeritaj kaj najbaraj landoj, sed restis kiel sankta lingvo ankaŭ la sumera.

La *akada* servis ĉefe en internaciaj kontaktiĝoj, la unuaj packontraktoj (hititaj) kaj leteroj (Amarnaj, laŭ Egipta urbo apud Nilo) estis akadlingvaj.

Kaj ambaŭ lingvoj kaj regnoj, kune kun siaj urboj kaj kulturoj malaperis, forgesiĝis por jarmiloj. *Herodoto* (480-425 a.K.), la patro de la greka historiografio, kiu ankoraŭ povis vidi Babilonon, ne trovis eĉ spurojn de Ninevo, Ur ktp. Post plurmiljara dormo nur la elfosadoj de la franca *Botta* (ekde 1843) ekirigis malkovron de tiu plej praa kulturo de la mondo...

Malgraŭ la alterna malapero de potencaj regnoj, kaj de ilia lingvo, uzita en multaj ĉirkaŭaj landoj dum jarcentoj de ilia prospero, la babela problemo mem, dank' al la malofta kaj tre limigita trafiko, estis kontentige solvita. Preskaŭ ĉiu historia periodo havas sian interkomunikatan lingvon, eĉ ni povas konstati, ke kulture funkcias paralele du interkomunikaj lingvoj: unu por la kulto, scienco kaj arto, la alia por la ĉiutaga uzo, diplomatio kaj komerco.

Ankaŭ en la postaj jarcentoj estis simila procezo sur la lingva teritorio.

Inter la Eŭropaj lingvoj la *greka* havas la plej malnovan historion. Ĝi sola estas rekondukebla ĝis tri mil

jaroj a.K. Malgraŭ la senĉesaj luktadoj, militoj inter la diversaj grekaj gentoj, ilia lingvo kaj kulturo disvastiĝis de la Nigra Maro tra Malgrand-Azio ĉirkaŭ la tuta Mediteraneo (Sud-Italio, Sicilio, Korsikio, Tripolo ĝis Sud-Francio, -Hispanio). La longega, zigzaglinia marbordo, multaj golfoj, havenoj, pli ol 500 insuloj destinis la grekaron ŝipista popolo, kaj tio faras komprenebla ankaŭ la disvastiĝon de ilia politika hegemonio. Neniu alia lingvo havis tiel grandan efikon je la postaj Hindeŭropaj lingvoj, kiel la greka, kies vortmaterialo daŭre estas uzata tutmonde (kaj tiel ankaŭ en E), kaj kies skribe postlasitaj literaturaj, historiaj, filozofiaj ktp. verkoj tiom influis kaj influas eĉ hodiaŭ la homan spiriton.

Dum la grekaj militoj, konkeradoj disvastiĝis ankaŭ ilia lingvo, komence paralele uzata kun la aramea, precipe en Malgrand-Azio, eĉ iĝis oficiala lingvo en *Sirio*, kion akcelis ankaŭ la makedonaj reĝoj *Filipo la dua* kaj *Aleksandro la Granda* (356-323) en la gloraj militiroj kontraŭ Persio.

La greka lingvo konservis sian reputacion, kulturalan valoron ankaŭ tiam, kiam la Romia imperio iom post iom, de la j. 140 a.K. ekregis en la Mediteraneo kaj okupis sudajn landojn de Eŭropo ĝis Danubo kaj Rejno, eĉ plej grandan parton de la angla insulo. Romio disvastigis la *latinan lingvon* en la tuta, tiam konata mondo. La latino iĝis internacia lingvo sur la teritorioj konkeritaj.

Resumante la lingvajn problemojn en la prahistoriaj landoj, oni devas konkludi, ke disvastigo de iu nacia lingvo sur alilingvaj teritorioj *ĉiam* estas kunligita kun politika hegemonio.

Grava *argumento* por la *neceso* de komunika lingvo inter la nacioj:

Kune kun la evoluo de la historio ĉiam pli kaj pli montriĝas, ke internacia lingvo estas bezonata, la problemo estas solvebla, — tamen: kiam nacia lingvo estas por tio uzata, tio estas efektivebla nur kune kun politika hegemonio de tiu nacio super la konkeritaj landoj.

Post la falo de la romia imperio, ĝi perdas sian lingvan unuecon. Disvastigita sur vastaj teritorioj, la latina lingvo dialektiĝas, intermiksiĝas kun la elementoj de la praloĝantaraj lingvoj kaj naskiĝas el ĝi la latinidaj aŭ romanaj lingvoj (itala, franca, hispana, portugala ktp.). En nordaj kaj orientaj partoj de Eŭropo gentoj el aliaj lingvofamilioj (ĝermanaj, slavaj ktp.) alportis kaj konservas siajn lingvojn kaj tiel la lingvokaoso montriĝas ĝenerala.

La latino, kiun daŭre savis de la forgeso la romkato-
lika eklezio, reviviĝis je ĝenerala uzado dum la renesanco kaj iĝis ĝenerala interkomprenilo en sciencaj, religiaj, ekonomiaj kaj politikaj rilatoj. Ĝi konservis sian rolon ĝis preskaŭ la 19-a jarcento.

Precipe de la 14-a jc. kun la evoluo de renesanco vekigis intereso pri lingvo, literaturo, filozofio, arto de la antikvuloj, t.e. la helen-latina klereco. De tiu tempo ĉefe la latina estis uzata ne sole kiel lingvo de instruado, sed ankaŭ kiel lingvo de komunikigo, de internacia kontaktigo, religio, literaturo, diplomatio.

Ankaŭ nuntempe multaj studentoj (el Afriko, Azio ktp.) havas la eblecon studi en Eŭropaj universitatoj— eĉ ili ricevas stipendion ekz. en Polio, Ĉeĥoslovakio, Hungario ktp., sed ili devas unue almenaŭ du-tri jarojn lerni la lingvon polan, ĉeĥan, hungaran por kom-

preni la prelegojn. Hejmenironte al Gvineo, Vjetnamio, Etiopio ktp. — kun freŝa kuracista, inĝeniera diplomo, neniue el la flegistinoj, teknikaj kunlaborantoj komprenos la ekspertajn petojn, instrukciojn en tiu — por ili strangaj — naciaj lingvoj.

Latino en tiuj jarcentoj estis neŭtrala (morta²) lingvo, jam ne apartenanta al iu distingita nacio, — kaj ĝi pruvis sian taŭgecon por servi kiel internacia lingvo. — Tamen opono: nur malmultaj povas dediĉi ok aŭ pli multajn jarojn por ĝia lernado kaj latino jam ne taŭgas en sia originala strukturo por la moderna vivo.

Sed, jen granda paradokso historia: la lingvo latina ĝuste tiam perdas sian¹ ekskluzivecon, kiam la evoluiginta internacia trafiko ĝin pleje postulas. Post la Vestfaliaj paktkontraktoj (1648) ĝian lokon okupas la franca lingvo en la diplomatio, kaj la angla, germana, hispana lingvoj en la terenoj de sciencoj, komerco ktp.

De tiam la lingva problemo pli kaj pli akriĝas, ĝia solvado estas de tago al tago ĉiam pli urĝa

2. La problemo en la nuntempo

La transoceanaj veturoj kaj la malkovro de novaj mondpartoj naskas la miksitaĵajn lingvojn por interpretilo. Tia estas ekzemple la piĝino (*pidgin-english*, elparolu: piĝin-ingliš), kiu estas simpligita angla lingvo miksita kun alilingvaj elementoj kaj uzata en Sud-Orienta Azio kaj Afriko. Similaj estas la „*lingua franca*“, uzita ĉe la Mediteraneo, kaj la negroeŭropaj aŭ kreolaj lingvoj, uzataj en la kolonioj, kiel negro-franca, negro-portugala, „*lingva géral*“ (Brazilio), aŭ la *beach-la-mar* [prononcu: biĉ-la-mar], lingvo uzata sur okcidentaj insuloj de la Pacifika Oceano kaj konsistanta el anglaj kaj malajaj elementoj.

Esence similaj miksaĵoj estas la *interbantua ŝvahili-lingvo (svahila)* la *jidiŝdialektoj*, la *cigana lingvo* ktp.

Oni nuntempe baze prilaboras la *svahilan* lingvon por unuecigi ĝin, perfektigi la gramatikon, fiksi la vortostokon. Tiu lingvo funkcias kiel interlingvo por pr. 50 milionoj da Orient-Afrikaj popoloj, inter tiuj la landoj Tanzanio (14) Kenjo (12) Uganda (11) (loĝantaro en milionoj) apud la *angla ŝtata* lingvo jam rekonas la svahilan kiel ŝtata lingvo. Tiel la svahila estos en la listo de *naciaj* lingvoj la plej nova *regiona interlingvo*. Ja ĝis nun jam servas kiel internaciaj lingvoj pluraj t.n. mondlingvoj, kiuj ĉefe per koloniizado disvastiĝis sur diversaj teritorioj. Pr. dek tiajn lingvojn ni devus nomi mondlingvoj, kiujn lingvojn pli ol po cent milionoj uzas kiel nacian, aŭ kiel solan ŝtatan, aŭ duan ŝtatan lingvon.

Laabela kaoso plu komplikiga. La popoloj, liberigintaj el koloniismo, ofte konsistas el multaj diverslingvaj triboj, kiuj luktas inter si por oficialigo de siaj etnaj lingvoj post okazonta detronigo de la angla, franca ktp. lingvoj. Nun regas eĉ la tendenco, savi de la forpaso tiujn etajn etnajn lingvojn, kreante por ili alfabeton, gramatikon, vortaron. — Strange estas, ke en pluraj landoj, kie la ŝtata lingvo estas la nacia lingvo, estas klopodo forigi el la nacia lingvo eĉ la plej internaciajn vortojn, kiujn ili transprenis el najbaraj, aŭ aliaj kulturlingvoj. Tiu „*lingvopurigo*“ estas tre aktiva ekz. en Francio (oni volas eligi la anglodevenajn vortojn), en Germanio, Hungario ktp.

UN jam ĉe sia fondiĝo ne povis konsenti pri elekto de unusola nacia lingvo, kiel praktika kaj oficiala lingvo de la traktadoj, protokoloj, dokumentado. La na-

cioj de UN interkonsentis en kvin oficialaj lingvoj (angla, franca, rusa hispana, ĉina). Poste atingis tiun rangon ankaŭ la araba kaj la germana.

LA ARTEFARITAJ LINGVOPLANOJ

Dum la historia evoluo de la interlingva ideo ni trovas inter la lingvoplanoj la plej variajn formojn. Ili estas apartigeblaj en du ĉefajn grupojn: skribaj aŭ signolingvoj kaj paroleblaj lingvoj.

3. Pazigrafioj

Multaj scienculoj eksperimentis per konstruo de skriblingvoj, ŝajne ĉar oni ne volis kredi la eblecon krei lingvon paroleblan.

Tiuj lingvoj, laŭ scienca nomo *pazigrafioj*, estas sistemoj de *a)* ciferoj, literoj kaj arbitraj signoj, aŭ *b)* desegnoj, ideogramoj, hieroglifoj.

Laŭ donita ŝlosilo ili estus legeblaj en ĉies propra lingvo.

a) *Ciferaj pazigrafioj*. La hispano P. *Digbeus* konstruis en la jaro 1653 sian skribsistemon, uzante romajn kaj arabajn ciferojn. Unu frazo en tiu „lingvo“: XXXIX. 4. XLII. 8. III. 1. (signifas: Mi kredas je Dio-patro.)

Germano *Becher* (1661) numeris en konsekvenca alfabeto la vortojn de latina vortaro. Ekz. 939 = *bibere* (trinki), 9201 = *vir* (viro). – En 1663 la ĉinologo A. *Kirchner* en sia *Poligraphia nova* uzas krom arabaj kaj romaj ciferoj majusklojn de la latina alfabeto por signi la gramatikajn kategoriojn. Ekz. por la kazoj: nominativo, genitivo ktp.: N, G, D, A. Ĉe li: II. 14 = Anglio. II. 16. = animo. – En 1797 la Peterbur-

ga lingvisto C. H. *Wolke* komunikas sian pazigrafion; en la jaro 1831. aperas la *Genigraphia* de G. *Matraya*. En ĝi li signas la vortklasojn per ciferoj kiel matematikaj potenco-signoj. 1 substantivo, 2 adjektivo, 3 pronomo, ktp. Ekz. U. I = akademio, P. 202 = lingvo, - U²I-P¹ 202 = akademia lingvo; P².202-U¹.I = Lingva Akademio. – Simile uzas potenco-signojn en 1836 *Grosselin* por gramatikaj kategorioj. Ekz. 1047 = maljuna, 9 = fariĝi; 1047⁹ = maljuniĝi. En lia sistemo la ciferoj 1-100 estas potencosignoj; 101-200 = klasoj de animaloj, 201-300 = specoj de animaloj, ktp. – En 1868. A. *Bachmaier* uzas apud la ideo-ciferoj punktojn kaj streketojn por la gramatikaĵoj. Lia sistemo cetere similas tiun de *Wolke*, kaj li aperigis ĝin por 18 lingvoj (ankaŭ por hungaroj) kaj fondis en München „Centran Societon de pazigrafiistoj”.

b) *Ideografioj*. Tiuj disvastiĝas paralele kun la ciferaj kaj cifero-literaj pazigrafioj – kaj kelkloke similas egiptajn hieroglifojn.

J. *de Ria* (1788) konstruis sistemon el literoj, ciferoj, muziknotoj kaj t. n. naturaj signoj: C Δ IO V ^

De Maimieux (1797) uzis unue la vorton pazigrafio. Por bazo de sia sistemo li formis logikan klasifikon el 12 signoj. Kombinaĵoj el 3, 4, 5 signoj formis la tutan vortaron de la lingvo. La vortoj el tri signoj prezentis la interjekciojn kaj la neŝanĝeblajn vortklasojn. La vortoj el kvar signoj prezentis la esprimojn por objektoj, agadoj kaj abstraktaj ideoj, – la ceteraj ideoj estis esprimataj per vortoj kvin-signaj.

J. Z. *Näther* (1805) uzis hieroglifsimilajn signojn. Jen kelkaj ekzemploj:

Atesto pri incendio.



Letero de murdisto, minacanta per bruligo.



Burmam en sia „Programme de la Pangraphie” (1807) ankaŭ uzas entute 12 simplajn signojn (pangramojn), dum S. de *Mas* (L’ideographie, 1863.) uzas 2600 signojn, kiuj *rememorigas muziknotojn*. – *Kiel strangajĝon* ni mencias la signosistemon de A. de *Vertus* (1863), kies „luna ideografio” uzas la kvar lunfazojn por bazaj elementoj: ☾ ☺ ☿ ☽

A. *Renzi* (Le polyglott improvisé... 1840), eldonis trilingvan verbovortaron, pli ol 900 paĝan. Sur ĉiu paĝo estas 60 verboj. Apud la signo de la verbo, cifero montras la paĝon, kie ĝi troviĝas, kaj alia signo montras la gramatikan formon.

En la sistemo de d-ro J. *Damm* (Praktische Pasigraphie... 1876) 40 ciferoj kaj 100 signoj ebligas 4000 ideografiajn signojn, diversloke metitaj punktoj montras la kazojn, kaj streketoj la vortkategorion.

Resume ni povas konstati, ke per pazigrafioj ne estas solvebla la problemo de la internacia komprenilo pro la pezeco de ilia uzado kaj la nesufiĉa esprimriĉeco. Tamen ili estas interesaj kulturhistoriaj relikvoj, kiuj montras, kiom bezone estas trovi rimedon por internacia kompreniĝo.

4. Pazilalioj

La duan grupon de internaciaj lingvoj formas la lingvoj paroleblaj: la pazilalioj.

Ili dividiĝas en du subgrupoj:

A) *lingvoj aprioraj* estas tiuj lingvoj, kiuj konsistas el elementoj elpensitaj tute arbitre, ne similantaj al la elementoj de la naturaj lingvoj;

B) *lingvoj aposterioraj* estas tiuj lingvoj, kiuj baziĝas sur elementoj de naturaj lingvoj.

Tiun klasigon ni renkontas en la interlingvistiko diversmaniere. La supran klasigon uzas *Drezen*, *Couturat* kaj *Lalande*. G. *Mounin* uzas anstataŭ „apriora” la terminon „*metalingvo*” anstataŭ „*aposteriora*” –

„*pseudolingvo*”. (Pseudo-langues, interlangue, et metalangues, Babel, vol. IV. No. 2., pp. 91-102.)

M. *Cohen* uzas la distingon: skematika kaj naturalisma, kaj A. *Martinet* nomas ĉiun aprioran lingvon „logika”.

Ni devas nepre menciĝi, ke en la plej modernaj lingvistikaj verkoj la *interlingvistiko* jam okupis sian lokon, kiel la antaŭcibernetika periodo de la matematika lingvistiko.

La matematikaj lingvistoj konscias, ke antaŭ la apero de cibernetiko la interlingvistoj jam serĉis la eblecojn de la lingvaj mikro- kaj makromodeloj. Per tio, la interlingvistiko estas jam oficiale rekonita branĉo de la lingvistiko, respektive, matematika-lingvistiko kaj lingvomodeligo!¹

5. Aprioraj lingvoj

Tiuj lingvoprojektoj havas jenajn variantojn:

a) *Sonigitaj pazigrafioj* estas tiuj pazigrafioj, kies ĉiu signo havas sonvaloron, do estas elparolebla.

La *Pasitelegraphie de Firmas Peries* (1811) formis cifersistemon uzeblan por telegrafio, kies ĉiu signo havis sonvaloron. Ekz.: 1 = baba, 2 = babe, 3 = babi,... 90 = abavi, 93 = abadoe. La esprimo „el-en-ambaval” signifas „astronomo”.

En la sistemo de M. *Paic* (1859) la ciferoj 1-999 signifas gramatikajojn, la ciferoj super 1000 konceptojn elparoleblajn. Tiuj du ciferoj estas kunligataj per + = m, aŭ per - = n. Ekz.: 3243 = feĝi = aĉeto; 3243 + 10 = feĝimano = aĉetanto; 3243 + 20 = feĝimeno = aĉetantino. – Similan sistemon ellaboris H. von *Gablentz* (1860), dum en la sistemo de F. *Reimann* „... langue internationale étimologique” (1877), la vokaloj estas i = 1, e = 10, a = 100, 0 = 1000, u = 10 000, la konsonantoj estas inter 1-9. Ekz. 333 = laleli, 35 010 = munode.

Ni aparte mencias la anglan episkopon J. *Wilkins* (1668), kiu konstruis mondkribon, similan al stenografiaj signoj aparte skribataj, en kiu ĉiuj signoj estis elparoleblaj. Ampleksa, precize ellaborita, tre sprita

¹ P. N. Djenisov: La principoj de lingvomodeligo. Moskvo, 1965. *Rusingve*.

projekto estis la muzika lingvo „Solreso!” de J. F. *Sudre* (1866). Ĉe li: doredo = tempo, doremi = tago, dorefa = semajno, ktp. Ĉi tiu lingvo estis imagebla per la sep koloroj de la ĉielarko, aŭ montrebla per fingroj, gestoj.



tempo tago semajno

b) *Filozofiaj lingvoj* baziĝas sur la descenda klasifiko de la ideoj (t. e. laŭvice ĉiu litero pli malvastigas la sferon de la nocioj).

En la sistemo de G. *Dalgarno* (1661) A = ekzistaĵoj, H = substancoj, E = fenomenoj, K = politikaĵoj, ktp.

Ĉiuj ĉi klasoj dividiĝas en subklasoj: Ka = oficaj rilatoj, Ke = afero juĝenda, Ko = agado de juĝisto, ktp.

Dum la Granda Franca Revolucio en 1795 prezentis *Delormel* al la Nacia Konvento lingvoprojekton (Projet de la langue universelle), en kiu li, inspirita de la tiam enkondukita metrosistemo, grupigis la ideojn laŭ decimala sistemo (10 vokaloj, 20 konsonantoj) kaj laŭ klasoj kaj subklasoj. En lia lingvo ekz.: ava = gramatiko, ave = litero, alve = vokalo, adve = konsonanto, avau = vorto, alvau = nomo.

Preskaŭ dumilpaĝan kvarvoluman lernolibron pretigis pri sia lingvo la hispano *Sotos-Ochando* (1852). Kelkaj ekzemploj: A = materiaĵoj neorganaj, Ab = materiaj objektoj, Ababa = hidrogeno, ktp.

D-ro M. N. *Glubokovski* (1880) denove aplikis ciferojn kiel potencsignojn. Ciferoj metitaj antaŭ la substantivoj verbigas la vorton. Ekz.: A² (prononcu: am) = birdo, a⁴ (an) = fiŝo, ktp.

c) *Skematikaj lingvoj* estas la plej evoluintaj formoj de la aprioraj lingvoj. Ties lingvoskemo – konstruita laŭ diversaj vidpunktoj – jam havas gramatikon kaj vorttrezoron proksiman al la naturaj lingvoj. Tamen pro siaj arbitraj elementoj ili estas malfacile lerneblaj, memorigeblaj.

Ni mencias la „*Logopandecteison*” de Th. *Urquhardt* (1653) kaj el la fino de la sama jarcento la lingvon de armeno *Tgransar* (verŝajne pseŭdonimo de monaĥo Petro Tenger): „*Sehlerai*”. Jen frazo el ĉi lasta: „Rum shai yran bes lerai vom, shaiz il le sam”. = En mondo estu prefere unu scienca lingvo.

Menciindaj estas: *Rede und Schriftsprache für alle Nationen* (Dr. Ch. *Berger*, 1779), *Die Pasilalie* (de A. *Burja*, 1808).

Ni prezentas kiel ekzemplon de tiaj lingvoj kelkajn bazprincipojn de la analitika lingvo: *Langue universelle et analytique* (E. F. *Vidal*, 1844): 1. Ĉiu vorto konsistanta el unu vokalo estas pronomo; 2. vorto konsistanta el unu konsonanto estas verbo; 3. trilateraj vortoj finiĝantaj per „e” estas prepozicioj, ktp. – Frazo el la lingvo „*Lugar*” (*Language Physiologique*) de S. *Herpain* (1843): „Lugar ral miga d loger” = Lugar estas imito de la lingvo de naturo, – kaj el „*Mandora*” (... universal Dolmetscher-Sprache) de A. F. *Staffler* (1869): „Sa om te Mandora? = Ĉu vi komprenas la universalan lingvon?

6. *Aposterioraj lingvoj*¹

Tiuj lingvoprojektoj provizas sian vortaron el la vorttrezoro de naturaj lingvoj kun gramatiko simpla kaj konsekvenca.

Oni povas ilin pritrakti jene grupigite: 1. Lingvoprojektoj ĝeneralaj antaŭ Volapuko kaj Esperanto; 2. Minimumlingvoj; 3. Kompromisaj lingvoj; 4. Volapuko; 5. Planlingvoj post Esperanto; 6. Esperanto.

La movadhistoriaj verkoj kutimas konsideri unua aposteriora lingvo la „lingvoprojekton” de germana abatino *Hildegardis* (1098-1179): *Lingua Ignota*. La nomo de la lingvo jam montras, ke ĝi volis servi kiel ia sekreta lingvo, do ĝi ne pretendis iĝi universala lingvo.

1. Kelkaj planlingvoj okupas mezlokon inter la apriora kaj aposterioraj. Tiuj *miksaj* projektoj estas signitaj en la Suplemento per „m”.

vo. Tiu lingvo uzis 32 literojn kaj el la 1011 vortoj, kiuj estis troveblaj en ĝi, la plejmulto estas substantivoj kaj nur kelkaj adjektivoj. Gramatikon ĝi ne havis, do oni povis ĝin uzi tiel, ke en nacilingva (aŭ latina) teksto oni anstataŭis la nacilingvan substantivon (aŭ adjektivon) per la sekretlingva vorto, uzante la nacilingvajn gramatikaĵojn, finaĵojn kaj verbojn, ktp. La teksto estis komprenebla nur por inicitoj.

Kelkaj vortoj por ekzemplo: Aigonz = Dio, Aiganz = anĝelo, Zuuenz = sankta, Vrizoil = virgulino, Limzkil = infano, ktp.

Tiu eksperimento estas tamen menciinda, ĉar ĝi estas la plej frua provo, pri kiu ni havas fidindajn dokumentojn.

a) Nur en 1832 aperis la unua aposteriora *internacia* lingvoplano de F. A. Gerber. En lia lingvo estas tri difinitaj artikoloj laŭ la tri genroj: lo, li, la. Numeraloj: en, dwoi, troi, karoj, penoi, sesoi... Frazo en tiu lingvo: Bonai virai a bonaif viraif data bonain potain e filetain tostain. (Bonaj viroj kaj bonaj virinoj donas bonajn trinkaĵojn kaj belajn tostojn.)

La aposterioraj lingvoj pruntas ĉiam pli kaj pli elementojn el la latina aŭ latinidaj lingvoj, aspekte staras ĉiam pli proksime al la hodiaŭa internacia lingvo.

Tiaj estis la lingvo de *Martinez* (1852), de *Rudelle* (1858) kaj la *Universalgloss* de *Pirro* (1868). Ĉi lasta estis la plej evoluinta kun gramatiko simpla kaj vortaro baze latina, kompletigita per vortoj el franca, angla, germana kaj hispana lingvoj.

Ĝi sonas jam tute nature: „Men senior! I sende evos un gramatik e un verbbibel de un nuovo glot nomed Universal-glot.”

b) *La minimumlingvoj* simpligis la gramatikon kaj reduktas (provizore) la vortaron de la unuopaj naturaj lingvoj. Oni povas ĉi tie klasigi ankaŭ la provadojn revivigi la latinan lingvon.

Kiel konate, la latina lingvo estis la unua internacie uzata interkomprenilo, dum la internacia trafiko limiĝis je malmultanombra elito. Sed kun la ĝeneraliĝo de la grandamasa internacia trafiko, la latino jam ne plu taŭgis por la larĝaj popoltavoloj — estante tro komplika kaj ne povanta esprimi la ĉiutage aperintajn novajn nociojn. La interlingvistoj jam frue rimarkis ĉi mankojn de la latino kaj penis solvi la problemon per ĝia simpligo kaj modernigo.

Ph. Labbé (1709) limigis la komplikan latinan gramatikon je 12 fundamentaj reguloj. — *Carpophophilus* (1732) reduktis la latinan alfabeton je 16 literoj. En lia gramatiko la adjektivoj kaj adverboj estas neŝanĝeblaj, la verboj ŝanĝiĝas nur laŭ la tempoj (ego amo = mi amas; nos amo...). En lia gramatiko troviĝas neniam esceptoj.

Je la fino de XIX-a kaj komenco de XX-a jarcentoj projektoj de simpligita latino aperas unu post alia, pli ol 30. (V. Supl.)

La grekan lingvon simpligitan ni renkontas malofte (ekz. *Grasserie: Apoléma*), sed kiam la franca lingvo fariĝis „universala”, pro la samaj motivoj, unu post la alia aperas projektoj de *simpligita franca* lingvo, ekz. 1839. J. *Schipfer*:... Allgemeine Communications-Sprache 1892. J. *Giro*: Le français simplifié, ktp. (V. Supl.)

Similaj Eŭropaj minimumlingvoj aperis por la lingvoj hispana, itala, germana; krome oni pretigis interslavajn (komunslavajn) lingvojn, kaj multaj projektis simpligi la anglan lingvon: 1711. d-ro Swift, 1787. Lawth, 1847. J. Bredshaw, 1889. A. V. Starcevski, ktp. (V. Supl.)

Aparte ni mencias la minimum-anglan lingvon, oficiale apogitan: *Basic English* (legu: besik ingliš) el la jaro 1930, de C. K. *Ogden*. (Ĝia nomo estas mallongigo el la komencaj literoj de British — American — Scientific — International — Commercial). Li limigis la vortprovizon je 850 anglaj vortoj, inter ili nur 18 verboj. La aliajn vortojn netroveblajn en la vortaro, oni devas esprimi ĉirkaŭfaze kaj tio ege komplikas la esprimeblecon kaj faras pezega la parolon kaj kom-

prenon. Mem Ogden prezentas jenan ekzemplon: angle: „I know, what war means.” (Mi scias, kion milito signifas.) en Basic English: „That gave me a knowledge of the effects of the war.” (Kvazaŭ en Esp. oni devus tiun frazon esprimi jene: Tio donas al mi sciigon pri la efektoj de la milito).

c) *La kompromisaj lingvoj* baziĝas sur du simpligitaj lingvoj.

Ekz.: Anglo-franca de *Henderson* (sub pseŭdonimo P. Hoinix) el j. 1889 kaj latinigita angla: *Latinesce* el j. 1901. Anglo-germana lingvo: *Tutonish* de E. *Molee* el j. 1902.

7. *Volapük*

Volapuko estas la unua internacia, artefarita lingvo, kiu atingis konsiderindan sukceson. Ĝia aŭtoro, la prelato Johann Martin *Schleyer*, komencis publikigi ĝin en la katolika gazeteto *Sionsharfe* (Ciona Harpo) en la urbeto Litzelstein (Bavario) en 1878. Libroforme aperis la gramatiko en 1880 kun titolo „*Volapük, die Weltsprache*”.

Per tio komenciĝis nova epoko en la historio de la mondlingva ideo. Dum la antaŭaj lingvoprojektoj neniam estis uzataj praktike, *Volapuko* disvastiĝis tra la tuta mondo, akiris milojn da adeptoj, kiuj uzis la lingvon. Ekde 1881 regule aperadis ĝia gazeto „*Volapük-abled*” (Volapukaj folioj). En la jaro 1889 la movado kulminis; tiam ekzistis 283 societoj, 25 gazetoj, pli ol 1000 diplomitaj instruistoj, lernolibroj en 25 lingvoj, ĝis tiam aperis entute 384 libroj. En tiu jaro la volapukistoj kunvenis jam en sia III-a mondkongreso. Tamen interese, ke plej multe la volapukistoj – kaj mem

la aŭtoro — parolis dum la kongreso germane. Evidentiĝis, ke la facileco de la lingvo estas nur ŝajna, malgraŭ ke la gramatiko estas tre facila, mallonga, kaj havas rimarkindajn ĝustajn principojn, afiksaron ktp. Ekz.: tidel = instruisto, of-tidel = instruistino, ji-tidel (legu: ŝitidel) = instruistedzino, gok = koko, ji-gok = kokino, vom = virino, vomil = virineto, flen = amiko, neflen = malamiko. Deklinacio: fat = patro, fata = de la patro, fate = al la patro, fati = la patron. Konjugacio: oni almetas la personan pronomon al la fino de la verbradiko. Ekz. logön = vidi, ob = mi; logob = mi vidas, logol = vi vidas, logom = li vidas, logof = ŝi vidas, logos = ĝi vidas, logon = oni vidas, logobs = ni vidas, ktp. (s = signo de pluralo).

Kvankam la gramatiko kaj vortfarada sistemo estis simplaj, tamen tute arbitraj, — kaj eĉ pli arbitra estis la vortmaterialo. Oni povas ĝin rigardi apriora, eĉ se Schleyer uzis multajn vorterojn de vortoj el naciaj lingvoj. Kelkaj ekzemploj: el franca vorto „compliment” iĝis volapuka plim (= komplimento), el „construction” stuk (= konstruaĵo), el Maschine cin (legu: ĉin = maŝino). Kelkaj aliaj vortoj: klülük = pura, flifik = freŝa, tied = teo; kelkaj aposterioraj vortoj: klub = klubo, sal = salo, famül = familio, vin = vino. Frazoj: Li-abons pötüti? = Ĉu vi havas apetiton? Stom kimik binom? = Kia vetero estas? Gödeli gudik, o söl oba! Bonan matenon, sinjoro! — Mem la nomo Volapük devenas el anglaj vortoj: World = vol = mondo, speak = pük = parolo, lingvo, Volapük = mond-lingvo.

La jaro 1889-a estis ne nur la kulmino de la volapuka movado, sed ankaŭ la komenca tempo de ĝia disfalo. Kaŭzoj de la malsukceso estis, krom la malfacila lernebleco, ĉefe ĝiaj strukturaj mankoj, la manko de evoluebleco, organizaj eraroj, la dependo de la lingvo de unu sola homo: de ĝia aŭtoro, ktp. Inter la gvidantoj de la Volapuka Akademio kaj la aŭtoro eksplodis miskomprenoj, malkonsentoj. La progresemaj aka-

demianoj postulis lingvajn reformojn, sed Schleyer rifuzis ĉiujn reformojn.

Post tiu jaro unu post la alia ĉesis la gazetoj, la societoj.

Zamenhof mem tre honoris la pioniran laboron de Schleyer, sed li klare vidis ankaŭ la erarojn kondukan-tajn al malsukceso. En lia kongresa parolado (Sepa Kongreso, Antverpen, 1911) li diris:

„La prelato Johann Martin Schleyer... estas vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj, senkorpaj fantomoj el la regiono de la revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: Por lingvo internacia mi volas ne nur revii, sed labori; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan movadon. Volapük ne estis venkita de E., kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis per si mem en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki... Volapük pereis ĉefe pro unu grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: ĝi devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta anaro. Kiel sur bastono, plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povas nature kreski, — sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj...”

Tiel la direkton kaj kadron de la evoluo difinis la bontrovo de unu sola homo kaj tio malhelpis la normalan disvolviĝon kaj pliriĉiĝon. Schleyer rigardis sian lingvon sia propraĵo: ankaŭ rilate la organizajn demandojn, — eĉ li pretendis diktatori en personaj demandoj de societoj. Tiu manko de demokratienco kaj neg-

lekto de naturaj lingvoevoluaĵoj leĝoj kaŭzis la disfalon de la tuta movado.

8. *Planlingvoj post Esperanto*

A) Ankaŭ dum la proksimume dekjara florado de Volapuko ankoraŭ ĉiam eliradis novaj kaj novaj projektoj kaj tiu planlingva kreado ne ĉesis post la apero de Esperanto. Eĉ, malgraŭ la nediskuteblaj faktoj montrantaj, ke per ĝi la problemoj estas solvitaj, ĝis la hodiaŭaj tagoj preskaŭ ĉiu jaro alportas sian novan planlingvon. Tiel ilia nombro, kune kun la jam menciitaj, superas la milon.

El tiuj lingvoprojektoj apenaŭ 4-5 atingis, ke kelkaj centoj aŭ miloj da homoj ĝin eklernu kaj uzu. La plej multaj vivis sian vivon nur sur paĝoj de libroj aŭ de manuskriptoj.

Du jarojn antaŭ la III-a mondkongreso de la volapukistoj, en 1887 aperis la nova *Lingvo Internacia* de *Zamenhof*, do ĝi, kiel *Zamenhof* diris en sia kongresa parolado, ne povis tiutempe ankoraŭ kontribui al la disfalo de la volapuka movado. Tamen post la disfalo, kaŭzita de internaj malsanoj de Volapuko, multaj volapukistoj ekatentis pri Esperanto, kaj iĝis ĝiaj adeptoj, dum aliaj provis reformi Volapukon, nun jam sen partopreno de Schleyer. Kelkaj el ili opiniis, ke Volapuko malsukcesis, ĉar ĝi estas tro simila al la naturaj lingvoj kaj tial ne taŭgas kiel internacia lingvo. Laŭ ili plej bona internacia lingvo estas tiu, kiu plej multe diferencas de la naturaj lingvoj! Krom tiuj volapukistoj, aro da scienculoj okupiĝis pri planlingvo, priatentante nek la instruon de la volapuka malsuk-

ceso, nek la sanajn principojn de E. Ankaŭ poste oni planis novajn pazigrafiojn, apriorajn lingvojn, mik-sajn lingvojn kaj aposteriorajn lingvojn. (Vidu liston de kelkaj pli gravaj en *Suplemento*.)

Grupo de volapukistoj gvidata de V. *Rosenberger* daŭrigis la reformon de Volapuko en la kadro de *Volapuka Akademio*. Fine ili ellaboris tute novan lingvon *Idiom Neutral* (1901), kiu lingvo jam estis tute naturalisma, t. e. similanta al la naturaj lingvoj. Tamen *Rosenberger* baldaŭ seniluziiĝis, ekŝiĝis kaj lian lokon en la prezidanteco de la Akademio transprenis G. *Peano*, kiu estis la aŭtoro de la simpligita latino: *Latino sine flexione* (1903). Sub lia gvido oni daŭrigis la reformlaboron, kies rezulto estis nova lingvo: *Interlingva* (1909, – ne la sama lingvo kiel tiu de I. A. L. A. el 1950, kun la simila nomo Interlingua).

B) El la plurcentoj da planlingvoj nur kelkaj estis aŭ estas menciindaj kontraŭuloj de Esperanto.

El tiuj kronologie la unua estis *Ido*, kies apero en 1907 kaŭzis skismon en la movado. (Pri ĝi v. en ĉapitro 16-a).

Por *Ido* signifis mortigan baton la apero de planlingvo *Occidental* (1922) de estona profesoro *Edgar von Wahl*. *Wahl* (nask. en 1867) estis pioniro de E, sed li forlasis la movadon en 1894 post la voĉdono pri ŝanĝoj en E. (La voĉdono rezultigis, ke la plimulto ne deziras ŝanĝojn en Esperanto.)

Occidental estas naturalisma projekto, t. e. ĝia principo estas laŭeble simili la naturajn lingvojn. Jam ĝia nomo aludas, ke ĝi baziĝas sur okcidentaj lingvoj kaj kulturo. Pro sia strukturo, por orienteŭropanoj kaj por la aziaj popoloj ĝi estas multe pli malfacila ol Esperanto. La ĉefaj vortkategorioj ne havas karakteri-

zajn finaĵojn, akuzativo ne ekzistas. Mem Wahl sincere diris, ke lia lingvo ne havas la principon esti facila por ĉiuj, sed nur por la plimulto de la homoj, kiuj „havas internaciajn rilatojn”.

La naturalisma lingvo de la fama dana lingvisto Otto Jespersen: *Novial* (1928) kaj ĝia tralaboro en 1937: *Novial reformita*, multe similis (en la tralaborita formo) al Occidental, sed ankaŭ la strukturo de tiu lingvo ne estis stabila, kaj ne postvivis la morton de ĝia aŭtoro (1944).

Nova krizo ekflamis ĉe la restintaj adeptoj de Ido, Occidental kaj Novial, kiam aperis la lingvo de la germandevena usonano, d-ro Aleksandro Gode. Tiu lingvo: *Interlingua* aperis en 1950, kiel lingvo farita de I. A. L. A. (*International Auxiliary Language Association*). Tiu lingvoprojekto dankas sian ekziston kaj siajn unuajn sukcesojn al ĝis nun neatendita financa subteno (riĉega heredaĵo). Mem la lingvo je unua vido ne multe diferencas de Occidental, sed ĝi estas eĉ pli malfacila. En ĝi tute ne ekzistas afiksa derivado, ĝi havas tri konjugaciojn kun oftaj esceptoj, kaj tiu principo, ke la vortoj havu nur naturajn formojn, devigas aparte lerni la bazajn formojn de ĉiu verbo. Ankaŭ la ortografio kaj sintakso estas kritikindaj, facilaj nur por tiuj, kies patrolingvo estas latinida. (V. Supl.)

Cetere oni povas konstati, ke ĉiuj tiuj planlingvoj kune havas adeptojn ne pli nombrajn ol 1% de la esperantistaro. Estas ankaŭ interese, ke ĉiu nova plano konkeris anojn el tiuj reformemuloj, kiuj de post la kreo de Ido migradas de unu nova lingvo al alia nova projekto.

9. Hungaraj pioniroj de internacia lingvo (Hungaraj planlingvistoj)

Hungaroj jam frue enviciĝis inter la pionirojn de planlingvistoj.

Jam en 1772 aperis libro de Georgo *Kalmár*, en kiu li prezentas projekton de originala pazigrafio. Li uzas pr. 400 arbitre elpensitajn bazajn signojn, miksitajn kun literoj. Ekz. My = homo, b = beno, t = tempo r = skribo, ktp. (v. Supl.) La signojn ĉiu devas legi en sia propra lingvo.

Ankaŭ *Farkas Kempelen* (1734-1804), la mondfama scienculo kaj inventisto (plej konata estas lia ŝakaŭtomato), okupiĝis pri artefarita lingvo.

Stefano *Gáti* (1749-1843), kreinto de la unua hungara stenografia sistemo, eldonis en 1820 projekton de apriora lingvo skematika, en „kiu per certaj sonoj oni povus komuniki ideojn eĉ kun tiuj homoj, kiuj ne komprenas la lingvon de aliaj homoj.” Jen frazo en lia lingvo: „Tof sa Zagy tög, e tög, ton togmo böpmornas böpnya Egyptme.” = Mi estas via gvidanto, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta.

Profesoro en Győr, Andreo *Réthy* eldonis skizon de cifera pazigrafio elparolebla (*Lingua Universalis...* Viennae, 1821).

Kiel estas konate, ankaŭ *Bolyai*, la fama matematikisto, okupiĝis pri la problemoj, kaj la „plej granda hungaro”, grafo Stefano *Széchenyi* en sia akademia parolado en 1842 akcentis, ke estas ebla la konstruo de tia lingvo, kiu superas niajn lingvojn en ekzaktecio.

Johano *Bobula* eldonis la sistemon de *Bachmaier* en hungara lingvo: „*Pasigraphiai szótár a magyar nyelvhez*”, 1886. La libro konsistas el du partoj: vortaro kun ciferoj, kaj ciferaro kun la apartenantaj vortoj. Ĝi entenas 4334 vortojn. Punktoj, komoj, streketoj ktp. signas la gramatikajn kategoriojn. Ekz.: la ina genro estas signita per cirkumfleko: leono = 1917, leonino = $\widehat{1917}$. (V. Supl.) – La pazigrafio de Stefano *Kovács házi: Pantographia* (1877) kaj la apriora lingvo de *Fazekas: Homopar (Győr, 1913) fermas la vicon de tiuj fruaj planoj.*

En 1958, profesoro *Zoltán Magyar* en Debrecen eldonis gramatikon de sia lingvo: *Romanid*. Ĝia nomo montras, ke ĝi baziĝas sur unu lingvo-familio, – do ĝi estas certe facila por francoj, italoj ktp., sed krome montras nenian avantaĝon en komparo kun la ĝisnunaj aliaj sistemoj faritaj laŭ similaj principoj naturalismaj. Ĝia prononco, gramatiko havas esceptojn, la vortkategorioj ne estas ekkoneblaj per finaĵoj. Ĝi do estas multe pli malfacila ol Esperanto.

Kiel interesajon ni rimarkas, ke la fama hungara romanverkisto Maŭrico *Jókai* (1825-1904) mencias en pluraj verkoj la problemon de mondlingvo. En lia volumo „Árnyképek” (Siluetoj, 1856) unu el la rolantoj diras, ke: „scienculoj nun okupiĝas pri la kreo de mondlingvo”. Pli detale skribas *Jókai* pri la problemo en sia romano „A jövő század regénye” (Romano de la sekvonta jarcento, 1874).

SUPLEMENTO

Simpligita latino:

1709. Ph. Labbé (minimuma latino)
 1732. Carpophorophilus (min.lat.)
 1885. E.Courtonne: Neo-Latin
 1888. G.Henderson: Lingua
 1890. G.Henderson: Phoenix
 D.Rosa, d-ro: Nov-Latin
 1895. F.Berman, d-ro: Novilatin
 1901. F.Isly: Linguum Islianum
 1902. K.Froelich: Reform Latin
 E.Frandsen: Neu Latin
 1903. Peano: Latino sine flexione
 1904. Colombo, d-ro: Latino
 Commerciale
 1910. W.Moeser: Semilatin
 Ernets, d-ro: Novi latine
 Scrabec: Eulalia
 1911. Ferranti: Simple
 1918. K.Pompiati: Nov Latin logui
 1919. V.Martellotta: Latinullus
 1921. van Diemen: Nove latina
 1925. Fibula: Latino viventi
 L.Reverchon: Latin
 Simplifié

Simpligita greka lingvo:

Grasserie: Apolema

Simpligita franca lingvo:

1839. Schipfer: Allgemeine Communications-Sprache
 1889. G.Henderson: Langue facile
 1892. J.Giro: Le français simplifié
 1893. A.Lakide: Francesin
 1898. B.Bohin: Pataiglob
 1900. Chapaz: Langage instantané

Simpligita hispana:

1897. J.Puchner: Nouve-Roman
 1909. Gavidia: Salvador
 1922. D.Starremburg: Mundo-lingua

Simpligita itala:

1888. S.Bernard: Lingua Franca Nuova

Simpligita germana:

1853. Lichtenstein, d-ro: Weltdeutsch

1915. Baumann, d-ro: Wede
 1925. Baumann, d-ro: Weltpitchn
 1928. Baumann, d-ro: Oiropapitshn

Simpligita angla:

1711. D-ro Swift ...
 1787. Lawth ...
 1847. Bredshaw...
 1888. A.V. Starčevskij ...
 A.M.Bell: World English
 1891. Lenzer: Colonial English
 1924. Hamilton: World English
 R.F.Zachrisson: Anglic
 1929. C.K.Ogden: Panoptic English
 1930. C.K.Ogden: Basich English

Interoslavaj lingvoj:

1661. J.Križanić kroata
 1793. B.Cumerdel: ...
 1744–1807. G.Sapel ...
 1820. Kopitar: Regular Russian
 1826. J.Herkel: slovaka
 1865. M.Majar: slovena
 1885. P.Tomić: serba
 1908. I.Hošek: Obščeslavjanskij
 jazik
 1912. K.J. Konecni: Slavina
 E.Kolkop: Slovanština

LISTO NEKOMPLETA DE LING-
 VOPLANOJ (KRONOLOGIE)

Mallongigoj:

- a=apriora p=aposteriora
 m=miksa n=natura
 paz=pazigrafio min=minimum l.
 sk=skematika
 lo98–1179. Hildegardis: Lingua
 ignota (sekreta lingvo) a

- 1491–1544. T.H. Folengo: Latino
 macaronico min, p
 1653. Th. Urquhardt: Logopandec-
 teison sk, a
 P.Digbeus: (cifera paz.) a
 1661. G.Dalgarno: (filozofia lingvo)
 1661. Becher: (cifera paz.)
 1662. Comenius: Panglottia
 (skizo)
 1663. Kirchner: Poligraphia nova
 (paz)
 1668. J.Wilkins: (mondskribo) a
 1700. (?) Tgransar (P.Tanger):
 Schlerai skem, a
 1772. G.Kalmár (pazigrafio)
 1779. Ch.Berger, d-ro: Rede und
 Schriftsprache für alle Na-
 tionen sk, a
 1788. J. de Ria: (ideografio)
 1795. Delormel: Projet de la lan-
 gue universelle fil, a
 1797. C.H. Wolke: (pazigrafio)
 De Maimieux: Pazigrafio
 1805. J.Z. Nather: (pazigrafio)
 1807. Burmann: Pangraphie paz
 1808. A.Burja: Die Pasilalie sk
 1811. Firms Périas: Pasitelegraphie a
 1820. St. Gáti: (skematika lingvo)a
 1921. A.Réthy: Lingua Universalis
 cifera paz
 1831. G.Matraya: Genigraphia paz
 1832. Gerber: (aposteriora lingvo)
 1836. Gosselin: (pazigrafio)
 1840. A.Renzi: Le polyglott
 improvisé paz
 1843. S.Herpain: Lugar (Language
 Physiologique) sk, a
 1844. E.F. Vidal: Langue univer-
 selle et analitique sk, a
 1852. Martinez: (aposteriora lingvo)
 Sotos-Ochandro: (filozofia
 lingvo)

1858. Rudelle: (aposteriora lingvo)
1859. M.Paic: (sonigita pazigrafio) a
1860. H.von Gablenz:(sonigita paz.) a
1863. A.de Vertus: Luna ideografio paz
S.de Mas: L'ideographie paz
1866. J.F.Sudre: Solresol a
1868. A.Bachmaier: (pazigrafio) Pirro: Universalglott p
J.Wilkins:(mondskribo)
1869. A.F.Staffler: Mandora sk, a
1876. J.Damm, d-ro: Praktische Pasigraphie
1877. F.Reimann: langue internationale étimologique a
St.Kovács házi: Pantographia
1878. *Schleier: VOLAPÜK*
1884. Barankovski: Ideografia paz
C.Meriggi: Blaja-Zimodal a
1885. P.Steiner: Pasilingua p
1886. Rosental: Rosentalografio paz
E.Maldant: Chabé-Aban a
1887. St.de Max: Le Bopal m
Friedrich: Kokografio paz
1887. *Zamenhof: ESPERANTO*
1888. G.Bauer: Spelin m
I.Brackmann: Mundolinco p
E.Lauda: Kosmos p
1889. A.Nicolas, d-ro: Spokil a
J.Stempfl: Myrana p
A.Browne: Sermo p
Henderson (P.Hoinix): anglo-franca kompromisa lingvo p
K.Lenze: Interpretor p
J.Lott: Kompromiss Sprache p
Ugarte: Lengua Universal p
1890. A.Liptay, d-ro: Langue Catholique p
1891. J.Fazekas: Unua plano de Hómapar (v.1913) sk
1892. E.Dormoy: La Balta m
1893. Fieweger: Dil m
J.Guardiola: Orba m
E.Heinzeller: Universala p
F.Mill: Antivolapük p
1894. C.Rietmann: Parlo p
1894. *Lingva voĉdonado pri E*
1896. A.Nilson: Centralia p
J.v. Arnim: Veltparl m
Novodum, d-ro: Prometeo Klariganto a
1898. Marchand: Dilpok m
F.Hilbe: Die Zahlen-sprache paz
1899. L.Bollak: Lingvo blua: „Bolak” m
Lott: Mundolingue p, n
1900. Umamo: Langage Humain p
1901. Rosenberger: Idiom Neut-ral p, n
Latinesce (latin-angla kompromisa)
1902. Ĉeŝihin: Pasigrafio
Gilbert: Pasigrafio
E.Molee: Tutonisch (anglo-germana kompromisa)
1903. A.Hössrich: Tal m
1904. M.Talundberg: Pario a
C.Dietrich: Reformita Volapük a
1906. M.Wald: Pankel m
Fr. Greenwood: Ulla p
1907. E.Darde: Lóge m
S.Houghton: Master Language p
H.Molenar: Pan-roman p
1907. *Couturat-Beaufront: IDO* p
1908. Pl. Friedmann: Pan-Arisch a
E.P.Forster: Ro a

1909. A.Huart-Cannes: La Median	m	E.Wahl: Occidental	a,	n
G.Peano: Interlingva	a	1923. A.Lawagnini: Unulingve		p
1910. J.Orsat: (cifro-sistemo)	paz	1925. A.Lawagnini: Monario		p
1911. De Sarranton: Molog	a	L.Vulda: Om		m
A.Koralev: Lingw Adelfenzal	m	1926. G.Nield: Loga		a
1912. M.Tothes: Tersboca	m	1927. G.Horovicz: Cosmolingvia		a
A.Beutner: Manhab (skriba)		T.Kustovny, d-ro: Servas-		
A.Beutner: Mangif(parola)m		sprache		m
1913. W.Douisthorpe: Uropa	m	V.Vengerov: Omo		m
N.Nesmejanov: Viva	m	Otto Jespersen: Novial p,		n
J.Fazekas: Homapar	a	1929. Centralstelle f. Neu-Espe-		
1918. Perrier: Parlamento	m	ranto: „Mondiale”		p
1919. J.Scarisbrick: Lips-kith	m	1934. Centralstelle: Novial re-		
1920. V.L.Gordin: Beobi	a	formita	p,	n
1922. W.Beatty: Qosmiani	m	1950. Aleksander Gode, d-ro		
		Interlingua	p,	n
		1958. Z.Magyar: Romanid		p

ESPERANTO

10. *La vivo de Zamenhof*

Lazaro Ludoviko *Zamenhof* naskiĝis la 15-an de decembro 1859, en la pola urbeto Bialystok, apartenanta tiutempe al cara Rusio. Lia patro Marko *Zamenhof* estis lingvoinstruisto, ankaŭ la avo estis lingvisto.

La juna *Zamenhof* jam frue interesiĝis pri lingvoj. La ideon de mondlingvo naskis en li la lingva antagonismo de la kvarlingva loĝantaro. En tiu urbo *Zamenhof* ĉiutage spertis, ke poloj, germanoj, judoj kaj rusoj vivas en daŭra kverelo inter si. Lia penso estis, ke tiuj homoj povus vivi pace, se ili komprenus unu la alian. Tiu ideo igis lin, la gimnazianon, pretigi planon de internacia lingvo. En la jaro 1878 li jam havis plimalpli preta sian lingvoskemon: *Lingwe universala*, kies adeptoj estis liaj kunlernejanoj.

Ĝis tiam lia patro aprobis, aŭ almenaŭ ne malhelpis tiurilatan „ludon” de sia filo, sed poste timigita de kelkaj amikoj, li promesis sian filon ne okupiĝi pri la afero ĝis la fino de siaj universitataj studoj. La patro, opiniante, ke li devas gardi sian filon kontraŭ denova vana laborado de tiaj lingvaj kimeroj, bruligis poste la manuskripton.

De 1879 ĝis 1885 li studadis medicinon en la universitato de Moskvo kaj de Varsovio. Post la ricevo de sia diplomo kuracista li laboradis en diversaj urboj. Dume li rekomencis siajn lingvajn laborojn malgraŭ la bruligo de la manuskripto de la gimnaziaj provadoj, li havis ja la tuton en la kapo. Nature, tiu lingvo multe

diferencis de la unuaj provadoj; li, post fundatralaborado, havis ĝin preta en la jaro 1887.

Intertempe — jam post kvarmonata kuracista praktikado — li konvinkiĝis, ke li estas tro impresema vidalvide al la suferoj de malsanuloj, precipe de mortantoj — kaj esperante pli bonan vivtenon kiel specialisto — li decidis iĝi okulkuracisto. Li studis tiun fakon en Varsovio kaj en Vieno. Fine de 1886 li komencis la okulistan praktikadon en Varsovio.

Tie li konatiĝis kun Klara *Silbernik*, ili baldaŭ iĝis gefianĉoj. Lia fianĉino ne nur tutkore simpatiis kun la vivcelo de Zamenhof, sed ŝi ankaŭ helpis kune kun sia patro en la realigo de liaj revoj, disponigante la necesan sumon, sian tutan doton, por eldono de la unua broŝuro en kvar lingvoj en julio 1887. En aŭgusto de la sama jaro ili geedziĝis.

(El tiu edzeco naskiĝis du filinoj kaj unu filo. Adamo — nask. en 1888 — kaj Lidia — nask. en 1904 — iĝis fervoraj aktivuloj de la movado. Ankaŭ tri fratoj de Zamenhof estis fervoraj esperantistoj.)

Lia tuta vivo, sed precipe la unuaj jaroj, estis kontinua lukto por la vivteno kaj konstanta laboro por lia idealo. La eldonoj de liaj verkoj, korespondado, organizaj laboroj postulis ne nur multan tempon, energion, sed konsumis baldaŭ lian tutan materialan bazon. La okulkuracista praktikado ne alportis la esperatan lukron; de Varsovio li sola iris al provinca rusa urbo Ĥerson en 1889, sed post sep monatoj, en 1890 jam revenis denove en Varsovion. Dum vana luktado nur liaj ŝuldoj kreskis, kaj en 1893 li transmigris kun sia familio al Grodno. Tie li iom pli bone prosperis, tamen, pro la grandigantaj infanoj, post kvar jaroj, en

1897, denove reiris al Varsovio, kaj tie li de nun vivis ĝis vivofino, en konstanta verkado, tradukado, propagando krom sia kuracista laboro. Unu el la plej grandaj eventoj estis por li la efektivigo de la unua kongreso en 1905 (Boulogne-sur-Mer), kaj lia tiea partopreno. Rezulte de lia senlaca laboro, dum la unuaj 9 kongresoj Esperanto disvastiĝis en la mondo, kvankam kaj li persone kaj la movado devis venki enormajn malfacilaĵojn. Li konstante laboris dume krom la lingvaj kaj organizaj demandoj ankaŭ por la paco, homaranismo, revis pri homarunuigo.

Ĝuste tial estis granda bato por li la eksplodo de la unua mondmilito, kiam li ĝuste estis survoje al la mondkongreso en Parizo. Li devis reveturi al Varsovio tra la nordaj landoj. Lia koro jam tiam ne estis sana. Tamen, malgraŭ sia malsano, li ĝis la lasta vivspiro laboris por Esperanto, ĝis sia morto la 14-an de aprilo 1917.

En Siberia militkaptitejo aŭdiĝas la voĉo de la juna hungara militkaptito, Julio Baghy :

La famon ne brue
Nur poste malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
„La majstro mortis.”

11. *Zamenhof prilaboras sian lingvon*

Mem Zamenhof detale priskribis en ruslingva letero (al Borovko) la naskiĝon de la ideo pri lingvo internacia. Laŭ tiu letero ni komunikas (kun citaĵoj) la devenon de Esperanto.

En Bialystok pro la kvarlingva loĝantaro „pli ol ie la impresema naturo sentas la multpezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas... la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas en malamikajn partojn.”

„... mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun malbonon.”

Li kiel malgranda infano revadis pri manieroj, kiel forigi la lingvajn barojn. Diversajn utopiojn li forĵetis, ĝis formiĝis en li la „konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam ... mi transiris en klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj mi revis pri tio, ke mi... inklinados la homojn revivigi unu el ĉi tiuj lingvoj... Poste... mi venis al firma konvinko, ke ĉi tio estas neebbla, kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo.”

Li faris provojn, elpensadis riĉegajn deklinaciojn, konjugaciojn kun senfina amaso da gramatikaj formoj, kun dikaj vortaroj. Baldaŭ li ekkomprenis, ke tio ne estas la ĝusta solvo.

La francan kaj germanan lingvojn li jam eklernis en infanaĝo, „sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi la anglan, la simpleco de la angla gramatiko ĵetiĝis en miajn okulojn”, precipe kompare kun la latina kaj greka. „Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj... ne estas necesa... mi komencis forĵetadi la senbezonaĵajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn.”

La revo nun jam ŝajnis ne tiel nerealigebla, sed la grandaj vortaroj ankoraŭ plue timigis lin. Tiam altiris lian atenton (estante 17-jara) du surskriboj de butikoj: „Ŝvejcarskaja” (pordistejo”) kaj „Konditorskaja” (sukeraĵejo). Tiu ĉi „skaja” vokis en li la penson, ke per afiksoj oni ricevas eblon „fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Ĉi tiu penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub miaj piedoj...” La grandaj vortaroj ... „komencis malgrandiĝadi antaŭ miaj okuloj.”

Li komencis tuj tiurilatan laboron, komparis diversajn lingvojn, kaj konstatis, ke en la naturaj lingvoj tiaj afiksoj efikas blinde, neregule, — sed tiu lingvo, kiu tiujn konscie, regule uzas, fariĝus multe pli facila... „ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante ĉi tiun grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke granda amaso da vortoj pure radikaj (ekz.: patrino, mallarĝa, tranĉilo) povas esti facile transformitaj en vortojn formitajn kaj malaperi el la vortaro...”

Li komencis laboradi sisteme, kaj baldaŭ li havis skribita la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Ĉe elekto de vortmaterialo komence li iris laŭ tute erara vojo, pensante, „ke estas tute egale, kian formon havas tiu aŭ alia vorto”, ekonomie la vortoj estu mallongaj post forĵeto de senbezona nombro da literoj. Ekz.: anstataŭ la longa „interparoli”, sufiĉus „pa” (komparu en Volapuko „plim” anstataŭ komplimento), — do la apriora vortformado allogis lin. Feliĉe li baldaŭ ekkomprenis, ke lernado, enmemorigo de tiaj vortoj: a, ab, ac, ad... ba, ca, da, be, ce... aba, aca... ktp. — estus terure malfacila, kaj li konvinkiĝis, ke „la materialo por vortaro devas esti Romana-Ĝermana,

ŝanĝita nur tiom, kiom tion postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de lingvo.”

Li „baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia...”

En la jaro 1878 lia „*lingwe universal*” estis preta, li vizitis tiam la okan klason de gimnazio. Li prezentis sian lingvon al siaj samklasanoj. „La plimulto de ili estis forlogitaj de la ideo kaj de... la neordinara facileco de la lingvo kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune festis...” Ili parolis en la nova lingvo kaj kantis ĝian himnon:

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

(Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas.)

Post la matura ekzameno la „apostoloj” de la nova lingvo disiris, sed renkontante la mokojn de la homoj, baldaŭ ili malkonfesis la lingvon; Zamenhof restis sola. Li decidis atendi 5-6 jarojn, zorge elprovadi la lingvon kaj prilabori ĝin praktike. Dum siaj universitataj jaroj li parolis al neniu pri sia lingvo, sed kiel solulo, retirante sin en la plej bela tempo de la vivo el la gaja kamaradaro, li revadis kaj laboradis kaŝante siajn pensojn. „Dum ses jaroj mi laboris, perfektigante kaj provante la lingvon... Multe mi tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike...”

„Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dum en la teorio... ili ŝajnis al mi tute bonaj... Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto, tiel ekz. mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn.”

Post plurjara zorga elprovado, plibonigado fine li decidis publikigi sian laboron. Li pretigis la manuskripton de sia unua broŝuro kun la titolo: „*Lingvo Internacia*. Antaŭparolo kaj plena lernolibro.” Li, kiel komencanta kuracisto, ne volis konigi sian propran nomon ĉe tia nefaka laboraĵo, kaj tial uzis la pseŭdonimon: „*D-ro Esperanto*”. Sed nun li spertis la „mal-dolĉan praktikon de la vivo, la finanĉan demandon”. Vane li serĉis eldonanton, oni rifuzis riski la libroeldonon, eble senprofitan, — ĝis fine per la helpo de lia bopatro kaj fianĉino, en 1887 povis aperi en preso lia „*Unua libro*” en rusa lingvo. En la sama jaro aperis ĝiaj tradukoj en pola, germana kaj franca lingvoj. Tiu unua broŝuro enhavis krom Antaŭparolo la alfabeton, la gramatikon en 16 reguloj, kelkajn legaĵojn kaj 947 radikojn.

La „Unua libro” enhavis du gravajn rimarkojn: „Lingvo internacia, kiel ĉiu nacia, estas propraĵo de ĉiuj”,... „la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.”

(Ni memorigas, ke parte la kontraŭa opinio kaj sinteno de Schleyer kaŭzis la malsukceson de Volapuko.)

Zamenhof akiris kelkajn adreslibrojn, dissendis siajn broŝurojn al unuopaj personoj, redakcioj, societoj, ktp., eĉ kelkajn pagitajn anoncojn li aperigis en gazetoj...

Kaj alvenadis multaj respondoj, interesiĝadoj... la lingvo ekiris sian vojon.

LA MOVADO

12. *La unua jardeko*

La unuaj sukcesoj superis la esperojn de Zamenhof. En la „Unua libro“ li alvokis, ke oni faru promeson eklerni Esperanton, se sufiĉe multaj faros tiun promeson (dek milionoj). Tamen la plej multaj interesigantoj ne faris promeson, sed tuj eklernis kaj ekuzis la lingvon. Centoj da leteroj alvenadis al Zamenhof kun multaj aproboj kaj nature kun multe da konsiloj, ankaŭ multaj proponoj pri ŝanĝo, plibonigo de la lingvo.

Tiuj proponoj ofte kontraŭdiris unu al la alia: lingvero, kiun iu deziris ŝanĝi, estis ĝuste tio, kio al aliaj ĉefe plaĉis, — kaj inverse.

Fine de 1887 Zamenhof jam aperigas sian Duan libron, en kiu li dankas la interesigon, subtenon, konsilojn. Li promesas eldoni kelkajn kajerojn kun la respondoj je la demandoj kaj proponoj, — sed li volas poste demeti de si la direktadon de la lingvo. „Ĉio bonigebla estos bonigata per la konsiloj de l'mondo. Mi ne volas esti *kreinto* de la lingvo, mi volas esti nur *iniciatoro*“. Li pensas, ke la finan ellaboron de la lingvo entreprenos iu lingva akademio.

Li unue volas limigi la eblajn ŝanĝojn ĝis la fino de 1888, kun la rimarko, ke ĉiujn pluajn ŝanĝojn faru tiu lingva akademio senpartia. Nur en tiu okazo, „se neniu el la instruitaj akademioj volos preni mian aferon (t. e. la definitivan ellaboron de la lingvo kun eblaj ŝanĝoj. — *Noto de Red.*), — tiam mi daŭrigos la publikadon de l' proponoj, sendataj al mi...“ Sed an-

kaŭ en tiu kazo ne li mem volas decidi pri la definitiva formo de la lingvo, ne la aŭtoro aŭ alia persono estu kompetenta, sed „la solaj kompetentaj nun devas esti talento, logiko kaj la leĝoj kreitaj de la plej granda parto de la verkantoj kaj parolantoj.”

Tre grava estas kaj la kernon de la sukceso enhavas la klarvido de Zamenhof, ke lingvo devas esti kreata de la vivo. Kaj la nerekonon de tiu principo kaŭzis, ke neniu alia planlingvo povis daŭre akiri popolamasojn krom Esperanto.

Estis interese, ke inter la apero de la Unua kaj Dua libroj, la 21-an de novembro 1887, la *Amerika Filozofia Societo en Filadelfio* okupiĝis per sia tiucele elektita komitato pri Volapuko. Tiu komitato konstatis, ke Volapuko ne estas la solvo de la problemo, — sed ĝi ellaboris la principojn de planlingvo, kaj tiuj principoj grandaparte koincidis kun tiuj de E. Intertempe la komitato ricevis la broŝuron de E kaj konstatis, ke tiu lingvoprojekto estas jam solvo de la problemo. Henry *Phillips*, unu el la tri komitatanoj, baldaŭ publikigis ne nur raporton pri la nova lingvo, sed eĉ vortaron por anglo-lingvanoj.

Zamenhof kun ĝojo akceptis la sciigon pri la plano de la nomita Societo: organizi enketon. Bedaŭrinde nur tre malmultaj respondis je la alvoko de la Societo kaj tiel la planita enketo ne okazis. Mem *Phillips* estiĝis fervora pioniro de E, eĉ kontraŭbatalis la planitajn ŝanĝojn en la lingvo.

La lingvo do devis evolui laŭ la vojo antaŭvidita de Z. — en la okazo, se ial ne realiĝus lingva komitato de kompetenta scienca akademio aŭ societo.

Alia grava konkero de E estis la aliĝo de la tuta Volapukista Klubo en Nürnberg. Tiu klubo fondiĝis en

1885, sed kiam en 1888 ĝia plej fervora membro Leopold *Einstein* ricevis la Unuan kaj Duan Librojn de D-ro Esperanto, li tuj konvinkigis pri la supereco de Esperanto super Volapuko.

Laŭ lia iniciato konvertigis la Nürnberga klubo — la unua E-grupo —, kaj lia fervora propagando en Germanio akiris tre multajn adeptojn por E. Tion servis ankaŭ lia germanlingva broŝuro, kiun li eldonis jam du monatojn post la ekkono de E. La nomo de Einstein estas unu el la plej memorindaj el tiu tempo, — malgraŭ, ke li post dujara agado mortis (en 1890).

Tiujn unuajn jarojn de E karakterizas: 1. provoj pri internacia organizado; 2. diskutoj pri lingvaj reformoj; 3. ekuzo de la lingvo en praktiko, per gazeto, libroj, tradukaj kaj eĉ originalaj verkoj.

Nun ricevas iom post iom la Internacia Lingvo de d-ro Esperanto definitive la nomon: „Esperanto”.

En 1889 Zamenhof eldonis adresaron de mil esperantistoj kaj la 1-an de septembro de la sama jaro aperis en Nürnberg la unua numero de la monata gazeto „Esperantisto” eldonata de Chr. *Schmidt*, prezidanto de la Klubo Mondlingva. Ĝi aperadis ĝis junio 1895. Ĉe la fino de la unua jaro la gazeto havis nur 113 abonantojn, tamen ĝi iĝis baldaŭ la plej efika kunligilo inter diverslandaj esperantistoj. Post unu jaro Zamenhof devis transpreni la eldonon de la gazeto inter grandaj financaj malfacilaĵoj pro la malgranda (150) nombro de pagantaj abonantoj. Feliĉe savis la gazeton la oferemo de W. H. *Trompeter*, kiu ĝis 1894 certigis la ekziston de „Esperantisto”, malgraŭ, ke li ne estis riĉulo. (Interese, ke ankaŭ dua E-gazeto, „La Mondlingvisto”, jam aperis en dec. 1889 en Bulgario, eldonata de M. S. *Bogdanov*.)

La plej multaj abonantoj estis el Ruslando (inter ili *Grabowski, de Wahl*), el Francio (*de Beaufront*, ktp.). Fondiĝis E-grupoj en diversaj urboj (Nürnberg, München, Schalke, Friburg, Uppsala [Svedio], Malaga [Hispanio]) kaj en multaj rusaj urboj.

En 1895 la gazeton denove Zamenhof eldonas inter tre malfacilaj materiaj cirkonstancoj. Li sukcesas aperigi ankoraŭ dum duonjaro la gazeton, sed tiam ĝi tute ĉesas. Tre grava frapo estis por la gazeto, ke la rusa cenzuro ne permesis plu la eniron kaj disvastigon de „Esperantisto” en Rusio pro artikolo de la granda rusa verkisto *Leo Tolstoj* (aperinta en n-ro 2-a, 1895), kaj la plej granda parto de abonantoj estis ĝuste rusoj. Tolstoj mem fariĝis granda amiko de E kaj lia letero pri E donis grandan kuraĝigon al ĉiulandaj esperantistoj. Inter aliaj li skribis: „... la oferoj, kiujn faros ĉiu homo de nia eŭropa mondo, dediĉante iom da tempo por lerni Esperanton, estas tiel malgrandaj, kaj la rezultoj, kiuj povas elsekvi, se ĉiuj ... ellernos tiun ĉi lingvon, estas tiel grandegaj, ke oni ne povas ne fari tiun ĉi provon...”

Intertempe aperis multaj gramatikoj kaj vortaroj por plej diversaj lingvoj, aperis originalaj verkoj kaj multaj tradukoj literaturaj.

13. *Lingva voĉdonado en 1894*

Pro nesukceso de iniciato de la Amerika Filozofia Societo, Zamenhof tiel volis kontentigi la lingvajn reformemulojn, ke li organizis *Ligon* tutmondan, kiu konsistiĝus el la lokaj grupoj. Tiuj elektu Akademion de 10 personoj kaj la Akademio decidu pri la multaj

proponoj. Tamen multaj famaj esperantistoj kontraŭis tiun ideon, inter ili Grabowski, Einstein kaj E. Wahl, kiuj opiniis, ke ne Akademio, sed la verkistoj faras la lingvon. La malsukceson de tiu plano mem Zamenhof konstatis (dec. 1890), tamen dum tri jaroj li kolektis la proponojn pri ŝanĝoj. Inter aliaj ankaŭ Grabowski faris proponojn, dum N. *Borovko* opiniis, ke estas pli ĝuste uzi la lingvon, doni al ĝi animon, — ol diskuti ĉu „kaj” estas anstataŭenda per „e” —, kaj ankaŭ, *Beaufront* skribis (apr. 1893), ke „kripligo kaj konstanta ŝanĝado nur tre malhelpus ĉiun propagandon.” (Des pli mirinde estas tiu noto de Beaufront, ĉar ĝuste la forgeso de tiu principo poste kaŭzis la malsukceson de lia lingvo „Ido”.)

En 1894 Zamenhof komencis publikigi en „Esperantisto” la gramatikon kaj reformitan vortaron de la „nova” lingvo konstruita laŭ la proponitaj ŝanĝoj (ti oni povus nomi la tria lingvo de Zamenhof). En tiu lingvo sonis „Nia Patro” jene: „Patro nue, kvu esten in cielo, sankte estan tu nomo, venan regito tue, estan volo tue, kom in cielo sik ankau sur tero...” ktp.

Dufoje oni voĉdonigis la Liganojn (t.e. la abonantojn de „Esperantisto”), sed ambaŭ voĉdonoj rezultigis, ke granda plimulto deziris (157 voĉoj) „restigi senŝanĝe la malnovan formon de nia lingvo”, dum parto (93) deziris nur kelkajn ŝanĝojn, kaj apenaŭ estis kelkaj, kiuj deziris aliajn reformojn (3), aŭ kiuj elektis la proponitan novan lingvon (11 voĉoj).

Mem Grabowski, kiu multe propagandis por la reformoj, voĉdonis kontraŭ iu ajn ŝanĝo. Kaj simile Blu-mental, de Beaufront, Borovko, Devjatnin, Kofman, Lemaire, Nylén...

Tiu voĉdonado montris la ĝustan vojon al la esperantistaro, forrestis la pluaj diskutadoj lingvaj, sed oni dediĉis sin al la kulturado de la lingvo per verkado, uzado parola kaj skriba.

Por tiuj laboroj tre grava estis la apero de *Universala Vortaro* de Zamenhof, ĝuste en tiu tempo, kiam ankoraŭ oni akre disputis pri reformoj (en j. 1893).

Tiu vortaro entenas 1740 radikojn de la *Meza Vortaro* (1888), do kune kun la 947 vortoj de la Unua libro 2687 radikvortojn. — *Laŭ Bulonja Deklaracio* (v. ĉap. 15.) la „Unua libro” kun *Universala Vortaro* de Zamenhof, estas la verketo „Fundamento de Esperanto”.

En la sama jaro proponis *de Beaufront*, ke la esperantaj libroj havu verdan koloron kaj stelon, kiel simbolon de espero. (La definitivan formon la esperantista flago — verdkolora, angule kun blanka kvadrato kaj kvinpinta verda stelo — ricevis laŭ propono de *Michaux* en 1905, dum la unua mondkongreso.)

14. *Svedio, Francio, Rusio*

Anstataŭ la ĉesinta gazeto „*La Esperantisto*” post kelkmonata paŭzo en sveda urbo *Uppsala* la loka E-grupo entreprenis eldonon de nova gazeto „*Lingvo Internacia*”. Ĝin iniciatis sveda universitatano *V. Langlet*, unu el la plej unuaj, kiuj entreprenis internacian vojaĝon per Esperanto kun s-ro *Etzel* (Rusio, Turkio, Rumanio, Aŭstrio–Hungario, Germanio). En Odessa (Rusio) ili preparolis kun *V. Gernet*, ke ĉi lasta estos la ĉefredaktoro kaj financos la gazeton dum la

redaktoro (Langlet, Nylén, Ahlberg, Krikortz) funkcios en Uppsala. De decembro 1895 ĝis 1899 aperis la gazeto en Svedio, ekde 1897 sub redaktado de Nylén. De 1900 ĝis 1904 la presadon, poste redaktadon transprenis Paŭlo *Lengyel*, presisto en Szekszárd (Hungario). En septembro 1904 Lengyel kaj lia kompostisto Kajetan *Seper*, kune kun la gazeto transmigris al Parizo; tie la gazeton redaktis unue P. *Fruictier* kaj de 1907 Th. *Cart*. „*Lingvo Internacia*” regule aperis monate ĝis la unua mondmilito, kiam ĝi ĉesis. Dum tiu lasta periodo seĝara, laŭ la principoj de *Cart*, la gazeto estis tre konservativa, batalis kontraŭ ĉiu ŝanĝo en la lingvo kaj toleris nur naturan evoluadon.

La ĉefa direktanto de la movado en Francio (el la urbeto Epernay) estis (*Chevreux*) Louis de *Beaufront* (1855–1935), unu el la plej unuaj kaj fervoraj adeptoj de E. Li mem verkis internacian lingvon „*Adjuvanto*”, sed ekkoninte E-on en 1888, neniam propagandis ĝin. Li kontraŭbatalis lingvajn reformojn, ankaŭ en sia gazeto „*L'Espérantiste*”, fondita en 1898, samtempe kun la fondo de „Societo por la propagando de Esperanto”. La gazeto havis paralelajn francajn kaj esperantajn tekstojn. Tio bezonis konstantan tradukadon kaj tio multe helpis al la lingva evoluo, — sed samtempe kaŭzis, ke la franca stilo unudirekte influis la Esperantan stilon kaj ne akcelis originale koncepti en E. Beaufront havis bonajn ideojn por organizi eksterlandajn esperantistojn, donis direktivojn al la plej efikaj propagandmanieroj, sukcesis gajni famajn publikistojn, politikistojn, scienculojn (inter ili ekz. la hungaran lingviston Gabrielo *Bálint*, profesoron de la universitato en Koložsvár). Multaj grupoj fondiĝis laŭ lia iniciato kaj helpo.

Per aŭtoritata voĉo li aprobis aŭ malaprobis problemojn kaj en lingvaj kaj en organizaj terenoj. Li estis kvazaŭ diktaroro, kio plaĉis al multaj, sed enhavis la kutiman danĝeron. Li al kutimigis la esperantistojn esti fieraj kaj memfidaj pri sia pravo kaj venko. Tio estis konforma kaj bona en la unuaj tempoj, sed poste kaŭzis trograndigojn en la propagando. Li organizis sistemon de „aprobantoj”, honoraj komitatoj, altaj projektantoj. Laŭ tio multaj apogis la movadon kaj materiale kaj morale, — sed parte tiu sistemo de apogantoj kaj la franclingva teksto de „L'Espérantiste” kaŭzis, ke multaj neniam eklernis la lingvon, legis nur la franclingvan (ofte lerte propagandan) tekston de la gazeto kaj parolis dum kunvenoj, kongresoj nur france.

Cetere grandan influon havis en la tuta mondo tiu fakto, ke francoj, kiuj dum jarcentoj montris vojon al klereco, homaj rajtoj (franca revolucio!), libereco, frateco de la homoj kaj popoloj, — estis en la unua vico inter la batalantoj por la komuna internacia lingvo, Esperanto.

Ankaŭ lingve oni klopodis imiti, sekvi la francajn esperantistojn, precipe la skribaĵojn de Beaufront, kaj tiu tendenco havis jen bonan, jen malbonan flankojn. Beaufront preferis, ke E ankaŭ sur lingva kaj movada terenoj estu gvidata de aŭtoritato, li preferis logikemon al natureco. Bedaŭrinda eraro estis lia klarigo pri la prononco de la vokaloj, laŭ kiu oni elparolu la vokalojn a, e, o longe kaj fermite (ekz. éespééráántóó), ĉar tiun kontraŭnaturan elparolon transprenis multaj lernolibroj precipe en Francio, Anglio kaj Ameriko dum pluraj jardekoj.

Laŭ influo de Beaufront oni klopodis forigi el la movado ĉiun homaman, pacifistan eĉ pacan tendencon, oni opiniis danĝera la „internan ideon”.

Kontraŭe: en Ruslando al la multaj, diverslingvaj gentoj ŝajnis E kvazaŭ savilo, esperdona rimedo el la lingva nekompreneo, el la malamo, el la suferoj. Ili rigardis Esperanton sankta afero, ja por la rusoj, estonoj, finnoj, germanoj, poloj, hebreoj, ukrainanoj, tataroj ktp. aperis E kiel komuna interpretilo por anoj de pli ol cent lingvoj. En la cara Ruslando la homoj multe suferis pro intergentaj konfliktoj. „Kiam familio perdas amatan filon, mortigitan dum batalo sur la strato, aŭ kiam malriĉa komercisto vidas sian butikon frakasata kaj bruligata, ĉar li estas hebreo, tiam por ili certe la revo pri interhoma frateco havas kaŭzon fariĝi pli urĝa kaj enradikiĝi pli profunde en la koro” — skribis Privat.

En ilia vivo fariĝis vere tuj realaĵo la interna ideo de E, ĉar ja multaj diversgentanoj, — kiuj antaŭe eĉ ne alparolus unu la alian, — nun en Esperantaj kluboj interkonatiĝis, amikiĝis. Ili do sincere kredis en la revo de Zamenhof, kaj por ili estis nature paroli, skribi kaj kanti pri frateco de la homoj, pri unu homa familio.

Eble tio estis la klarigo de la fakto, ke komence en Rusio estis la plej granda nombro de esperantistoj (tri kvaronoj de la abonantoj de la gazeto Esperantisto) kaj la plej bonaj verkistoj, poetoj. Ili ekkonis plej unue la gravecon de originala literaturo por la evoluo, plibeliĝo de la lingvo. La rusoj: Borovko (al kiu skribis Zamenhof sian faman leteron pri la deveno de E), Devjatnin, Kofman, Dombrovski kaj la poloj: Grabowski, Leo Belmont (pseŭdonimo de Blumenthal) ktp.

Ili eksentis, ke ankaŭ E devas havi ian komunan ideon, kiu anstataŭigu tiun de la naciaj lingvoj, kies anojn kunligas komuna patrolando, komunaj intereso-
soj spiritaj kaj materiaj. Tiel formiĝis la nocio de „in-
terna ideo”, kiun, eĉ se ĝi ne estis strikte difinita, ta-
men la plej multaj eksentis, ekkomprenis, nome, ke
„al la laborado por E instigas nin ne la penso pri prak-
tika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda
kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas”
(Zamenhof).

La rusoj tre lerte propagandis E-on kaj ilia ĉefa me-
rito estis, ke ili tuj uzis la lingvon ne nur skribe, sed
ankaŭ parole. Ili faris viva la lingvon kaj la polaj kaj
rusaj verkistoj donis al E liberecon en la stilo, fleks-
eblecon en la frazo.

15. *La unua mondkongreso, 1905.*

La unuaj internaciaj vojaĝoj de kelkaj rusaj kaj sve-
daj esperantistoj vekis grandan sensacion en la unuaj
jaroj de nia jarcento. Oni spertis, ke la senpera parola
interkompreno mirinde sukcesas per E. Por doni pli
vastan pruvon pri tio, la grupo de *Le Havre* en la jaro
1903 aranĝis kunvenon invitante kelkajn alilandajn es-
perantistojn. En la sekva jaro similan kunvenon oni
aranĝis inter anglaj kaj francaj esperantistoj en Calais
kaj Dover.

El tiuj unuaj bonege sukcesintaj kunvenoj elĝermis
la internaciaj E-kongresoj. Advokato Alfred *Michaux*
el *Boulogne-sur-Mer* entreprenis aranĝi mondkongre-
son en aŭgusto de 1905.

Preskaŭ sepcent esperantistoj partoprenis la Unuan. Emocia, konvinka, frateca estis la etoso: ... inter la gastamaj muroj de Bulonjo sur Maro, kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj sed homoj kun homoj – konstatis Zamenhof en sia unua kongresa parolado.

Kvankam antaŭ la kongreso multaj opiniis, ke ĝi estas tro riska entrepreno, ĉiuj ĝoje spertis, ke la lingvo estas ankaŭ parole bonege komprenebla, ke apenaŭ estas diferencoj inter la diverslandaj esperantistoj rilate la elparolon, prononcadon. Okazis vigla diskutadoj, oratoradoj, eĉ teatra vespero, kie oni prezentis la komedion de *Molière*: „*La edziĝo kontraŭvola*”.

La personeco, la modesta sinteno de Zamenhof gajnis ĉies koron kaj estimon. Antaŭ la kongreso, kiam li traveturis Parizon, la ministro de la Publika Edukado havigis al Zamenhof la ordenon de la Honora Legio. Tie, kunveno de la francaj gvidantaj esperantistoj (generalo Sébert, Javal, Bourlet) komprenigis al Zamenhof, ke estas „necese apartigi la personajn konvinkojn kaj la praktikan rolon de E.”

Inter la gravaj pritraktadoj de la unua kongreso havis apartan gravecon la deklaro pri tiu diferencigo, la fondo de Lingva Komitato kaj de Organiza Komitato (por organizado de kongresoj).

La Bulonja Deklaracio klarigis la esencon de la esperantismo en kvin punktoj laŭ la propono de Zamenhof. Laŭ la:

1-a § „La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn

naciajn” servu por interkompreniĝo de la homoj diverslingvaj. Ĉiu alia ideo de iu esperantisto estas „lia afero pure privata.”

La 2-a § baziĝante sur la praktikaj elprovoj konstatas, ke: „Lingvo Internacia povas esti nur lingvo arta” kaj ke „perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto.”

3-a § konstatas, ke la aŭtoro de la lingvo rezignis pri ĉiuj personaj rajtoj rilate la lingvon kaj transdonis ĝin por la tuta mondo.

4-a § : „E ne havas leĝdonanton kaj la opinio de ĝia aŭtoro estas absolute privatkarakterata. La sola bazo, deviga por ĉiam kaj por ĉiuj esp-istoj, estas la verketo „Fundamento de Esperanto”.

5-a § (laŭvorte): „Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.”

La Deklaracio estis tre grava paŝo kaj por la lingva kaj por la organiza terenoj kaj per ĝia akcepto la Buloŝa kongreso montris la vojon, sur kiu E povas plu evolui.

16. *La Delegacio. — Ido*

Laŭ iniciato de la francaj profesoroj L. *Couturat* (1868–1914) kaj L. *Leau* fondiĝis en Parizo en 1900 „Delegacio por Alprenado de Lingvo Internacia”. La celo de tiu Delegacio estis simila al la iama projekto de Zamenhof, nome ke iu internacia scienca organizo faru elekton inter la ekzistantaj planlingvoj. Ili deziris,

ke la Asocio Internacia de l' Akademioj estu tiu internacia scienca organizo, sed en la jaro 1907 ĝi rifuzis tiun taskon, deklarante sin nekompetenta decidi pri la afero.

Tiam la Delegacio proponis elektigi komitaton, kiu havu 12 membrojn. Inter la elektitaj membroj estis la lingvistoj *Jespersen* (Kopenhago) kaj *Baudoin de Courtenay* (Peterburgo), la filozofo *Boirac*, la kemiisto prof. *Ostwald* (Leipzig) kaj la fama hungara fizikisto prof. *Loránd Eötvös* (li poste abdikis kaj anstataŭis lin la hungara matematikisto prof. *Rados*), ktp., plus du sekretarioj: *Leau* kaj *Couturat*.

La Komitato kunvenis en Parizo (oktobro 1907). La aŭtoroj de la diversaj lingvosistemoj povis mem defendi sian projekton. Laŭ peto de *Zamenhof de Beaufront* devis pledi por Esperanto. Pri *Spokil* prezentis klarigon ĝia aŭtoro *Nicolas*, pri *Lingvo Blua* s-ro *Bolak*, pri *Parla* s-ro *Spitzer*. Prof. *Jespersen* prezentis propran gramatikan projekton, dum *Leau* kaj *Couturat* prezentis „konkludan raporton”, laŭ kiu nur Esperanto estas la sola lingvo, kiu povas esperi rapidan disvastiĝon, tamen oni devas ĝin „perfektigi”, ekz. ŝanĝi kelkajn finaĵojn, la pluralon, forigi akuzativon kaj la tabelvortojn, ktp. Rektoro *Boirac* konstatis, ke la Delegacio rajtas nur elekti inter la jam ekzistantaj lingvoprojektoj, sed ne transformi ilin, aŭ krei novan.

Tamen *Couturat* poste prezentis lingvoprojekton anoniman, kiun li nomis *Ido*. Tiu lingvo kontentigis liajn antaŭe esprimitajn postulojn pri ŝanĝoj en Esperanto. Ĝia gramatiko, strukturo diferencis de la Esperanta en kelkaj esencaj trajtoj.

Kaŭzis grandan konsternon inter la esperantistoj, ke L. de *Beaufront* anstataŭ defendi Esperanton, de-

fendis Ido-n kontraŭ la kritikoj. Lia sinteno ŝajnis, ke la Lingva Komitato verŝajne akceptos Idon, la „transformitan Esperanton”. Cetere lia rolo estis tre suspekta, kaj post kelkaj monatoj li konfesis, ke kune kun Couturat li estas aŭtoro de Ido.

En Ido estas forigitaj la supersignoj, la akuzativo (escepte de kelkaj maloftaj okazoj!), la substantivo finiĝas en la pluralo per *i*; ekzistas en ĝi trispeca infinitivo (-ar, -ir, -or), la pasivon oni esprimas per -es (*legesas* = estas legata). Grandan parton de la vortaro ili modifis (ekz. *pedo* = piedo), aŭ elektis tute novan radikon (*habila* = lerta; *malada* = malsana; *mastikar* = maĉi.) Esceptoj ekzistas en la prononcado, akcentado, akuzativo, vortfarado, ktp.

Tre duba, eĉ perfidema estis la sinteno de L. de Beaufront, kiu antaŭe estis plej fervora rebatanto de ĉiaj reformoj en E, kaj nun anonime mem prezentis reformojn, eĉ tutan reformitan lingvon – kaŝante inside sian propran rolon, ĝuste kiam li estis komisiita esti „advokato de E”.

La plej granda parto de la *Lingva Komitato* rifuzis la proponon de la Delegacio, same la esperantistaro, – tamen la apero de Ido kaŭzis skismon en la movado. Komence ŝajnis, ke krom kelkaj ĝisnunaj agemaj gvidantoj de la E-movado pr. kvinono transiris al Ido, tamen poste multaj revenis aŭ transiris al alia lingvo, ke fine la perdo estis verŝajne nur 3-4%-j.

La Ido-movado sub gvido de Couturat kaj Beaufront eldonis multajn lernolibrojn, vastan vortaron, la revuon „*Progreso*”, kaj en multaj landoj faris grandan propagandon.

La saĝa antaŭvido de Zamenhof: la netuŝebleco de la Fundamento, plej akre praviĝis en la movado de

Ido. Inter la idistoj dum multaj jaroj daŭris la reformemo; la diskutoj pri ŝanĝoj en „Progreso” rezultigis, ke oni preskaŭ ĉiujare ŝanĝis grave la lingvon, kaj la nestabileco, la senvalidiĝo de la antaŭjare akceptitaj reguloj ktp. estigis senton de malcerteco en la animo de la adeptoj. Tiel la membronombro pli kaj pli malaltiĝis, el ili rekrutiĝis adeptoj de postaj planlingvoj, eĉ mem prof. Jespersen ne nur ekŝiĝis, sed verkis novan lingvon: Novial.

Nun jam malofte oni aŭdas ion pri la ekzisto de Ido-movado, tamen ankoraŭ ĉiam aperadas en Svedio la trimonata oficiala gazeto de Ido: „Progreso”, — kiu — malgraŭ sia nomo — tamen ne progresas.

17. *La evoluo ĝis la mondmilito. — Dum milita movado*

La Ido-skismo dum jaroj sentigis sian efikon en la E-movado, ja multaj el la E-gvidantoj transiris al Ido, tiel, ke iĝis onidiro: Esperanto estas armeo sen ĉefoj kaj Ido estas ĉefoj sen armeo.

Esperantistoj ekhavis la instruon, ke oni ne atendu, ke eksteraj aŭtoritatoj decidu pli lingvaj aferoj, — evidentiĝis, ke sen unueco kaj disciplino malsukcesos la „Afero”, — kaj nepre necesas solidaj organizoj sur lingva kaj movada kampoj.

Tiel kreiĝis post la Lingva Komitato la Akademio de Esperanto kaj Universala Esperanto-Asocio (v. ĉap. 21.) en la kvara E-kongreso, kiun en 1908 partoprenis 1500 kongresanoj en Dresden. Cetere menciinde riĉa programo faris tiun kongreson modela. Estis diservoj kun E-predikoj, muziko kaj kanto, — oni kantis la Espero-n laŭ melodio de *Ménil*. Iom post iom ĉi

tiu iĝis la oficiala himno de la esperantistoj — sen ia oficiala decido. Okazis kelkaj bonaj koncertoj, oni prezentis plurajn teatraĵojn, inter ili „Malfeliĉulo” de Kotzebue kaj „Ifigenio en Taŭrido” de Goethe. Estis ekskursoj per ŝipoj al Meissen kaj al Saksa Svisio, ktp. Same kiel en la unuaj ok mondkongresoj, ankaŭ nun la festparolado de Zamenhof faris profundan impreson (v. ĉap. 34), cetere ne estis lingvaj diskutoj kaj fakaj kunvenoj.

En jaro 1909 en Barcelona same 1500 partoprenantojn havis la kvina Kongreso. Tie la Akademio kunsidis kaj faris raporton pri la prezentitaj lingvaj problemoj (ekz. sufiksoj: -oz, -end, mis-; novaj radikoj, derivreguloj, ktp.). Unuan kongresan kunvenon havis UEA, la Scienca Asocio; okazis Floraj Ludoj, kies premiojn gajnis Marie Hankel kaj Edmond Privat.

Menciinda estas el tiu jaro la unua doktora tezo prezentita al la Universitato (Medicina Fakultato) de Pierre Corret kun titolo: „Utileco kaj ebleco de adapto de lingvo internacia en la medicino”. Tiu disertaĵo estis akceptita kun plej granda laŭdo.

En jaro 1910-a estis, krom la 6-a oficiala mondkongreso en Washington diversaj aliaj E-kongresoj. (Unua kongreso de Katolikoj, de la Internaciaj Asocioj, aparta kongreso de UEA, ktp.) Laŭ lingva vidpunkto estis tre grava la apero de libro „La logika bazo de vortfarado en Esperanto”, verkita de *Saussure*. Tiu libreto donis la sciencan bazon por la E-a lingvistiko.

La antaŭmilitaj kongresoj plu laboris por pli bona organizado en la movado. Okaze de la 25-a jubileo de E, en Krakovo estis la 8-a Kongreso, kie Zamenhof en sia festa parolado definitive rezignis pri sia oficiala

rolo en la movado. Tre edifa evento de la kongreso estis la prezento de la opero de Moniuszko: „Halka” – en Esperanta lingvo.

La 10-an kongreson oni kunvokis al Parizo en la jaro 1914, aliĝis 3739 anoj, – sed la komenciĝinta *Mondmilito* malhelpis la efektivigon, mem Zamenhof apenaŭ povis reiri al sia patrujo de la franca limo tra granda evita vojo.

Dum la unua mondmilito okazis nur unu mondkongreso: la Dekunua Kongreso en aŭgusto de 1915, en San Francisko. Ĝi estis pli amerika ol universala: el la 163 partoprenintoj la plejparto estis usonanoj kaj kanadanoj. La kongreso traktis la temon: kiel organizi la fortojn post la fino de la Eŭropa milito?

Dume en Eŭropo en teranguleto, savite de l' milita ventego, en la neŭtrala Svislando la organizadon kaj gvidadon de UEA prenis en siajn manojn Hektor Hodler. Post ses monatoj da silento la gazeto „Esperanto” reaperis en januaro 1915. (Ĝi estis redaktita de H. Hodler ekde ĝia ekapero, januaro 1907).

Hodler organizis servon por helpi al homoj disigitaj de ilia familio kaj al tiuj, kiuj perdis unu la alian. Lia organizo peris la transsendon de familiaj korespondaĵoj eĉ inter la militantaj landoj (ĉiutage po du-tricent leteroj). La faritaj servoj atingis 200 000. Per sia gazeto li memorigis ĉiujn je la homaj devoj. Li presigis apartajn raportojn por la landoj, kie oni malpermesis la eniron de „Esperanto”.

Alia agadteritorio dum milito estis la militkaptitejoj. La Tutmonda Komitato de YMCA (Junulara Kristana Asocio) disdonis milojn da E-lernolibretoj inter diverslingvaj militkaptitoj. En multaj militkaptitejoj E alportis ne nur novan okupon, sed ankaŭ novan etoson.

La benon de interkompreno pere de E multaj militkaptitoj sentis, ofte en formo de efektiva helpo. Tiun etoson bone respegulas la Siberiaj romanoj de J. Baghy (La Verda Koro, Viktimoj, Sur Sanga Tero, ktp.).

La mondmilito postlasis ruinojn, forviŝis landlimojn kaj kreis novajn. Ĝi kaŭzis ankaŭ al E-movado grandegajn perdojn: dume mortis la Majstro, Bourlet, Boirac, T. Rousseau kaj multmiloj da bravaj esperantistoj.

Aliflanke post la kruelaj tagoj la popoloj pli ol iam sentis la bezonon de la paca kunvivo, de kompreno kaj harmonio. Ekestis la Ligo de Nacioj, la popoloj esperis en la nova paca erao kontentigan internacian aranĝon de la problemoj. Rapide komencis kreski la interkomunikado, radiodissendoj — kaj paralele kun tiuj sentiĝis pli forte ankaŭ la lingvaj bariloj. La situacio estis favora por la disvastigo de Internacia Lingvo Esperanto.

La unuan postmilitan mondkongreson povis partopreni nur 400 esperantistoj en Hago (1920), sed la atmosfero estis esperiga. Tia estis ekz. la Ĝenerala Kongreso de l'Unuiĝoj de Internaciaj Asocioj (Bruxelles, sept. 1920), kiu konstatis la pli kaj pli grandan neceson je alprenado de internacia helplingvo, kaj esprimis la deziron, ke „Ĉiuj, kiuj konfesas tiun neceson, aliĝu al la grava movado, celanta disvastigi E-on.”

Grava perdo estis en tiu jaro la morto de H. Hodler.

En Sovetunio la revolucia registaro decidis rekomendi adapton kaj instruadon de E.

Simile favoran decidon akceptis la konferenco de Ruĝa Kruco (Ĝenevo, 1921). La 13-an Universalan

Kongreson en Prago (1921) jam partoprenis pli ol 2500 e-istoj el 35 landoj, kaj jam mem tiuj altaj ciferoj faris ĝeneralan sensacion precipe en Mezeŭropaj landoj. La Postkongreso en Budapeŝto estis aparte tre granda evento. Tie la internacia publiko la unuan fojon ekkonatiĝis kun verkoj kaj personeco de J. Baghy kaj K. Kalocsay, la novaj steloj de E-literaturo.

La organizajn problemojn solvis por kelkaj jaroj la t. n. *Kontrakto de Helsinki*, farita dum la 14-a Universala Kongreso. Laŭ tio la Naciaj E-Asocioj havos po unu reprezentanton en la Konstanta Rezentantaro (K. R.) kaj tiu kune kun UEA elektas la ses membrojn de Intern. Centra Komitato. Tiu estas la ĉefa gvidanto de la movado, aranĝanto de la kongresoj universalaj kaj fakaj. Oni fiksis la programojn de la Univ. Kongresoj (solena malfermo, laborkunsidoj de la oficialaj institucioj, fakaj kunsidoj, ktp.). — Granda evento estis en Helsinki la „*Kongresa Runo*” prezentita de la aŭtoro: K. *Kalocsay*, inspirita de la finna nacia epopo „*Kalevala*”. („Vokas voĉ’ de Väinämöinen, Vibras vok’ en vaga vento...”)

El la postmilitaj Univ. Kongresoj ni mencias ankorau la ĝis nun plej grandan, la 15-an en Nürnberg en 1923. El la preskaŭ kvinmil aliĝantoj partoprenis pli ol kvarmil (ne alvenis la francoj kaj belgoj pro la tiam akriĝanta politika situacio). Granda arta travivaĝo estis la prezento de la dramo de *Lessing*: „*Natan la Saĝulo*”, kaj la kabaredo (ripetita) de *Literatura Mondo*. Tiun kabaredon aktoris tre bona hungara ensemblo: Julio *Baghy*, Kolomano *Kalocsay*, Mihaelo *Sárosi*, Irena *Noiret* kaj fratinoj Anna kaj Corona *Pechan* (el Pécs).

18. *Sur fakaj terenoj* (1922–1934)

La ĉefa elemento de la agado: la propagando ŝanĝis sian aspekton. Kun la disvastiĝo de la publika kono pri la internacia lingvo devis ŝanĝiĝi ankaŭ la metodoj de la propagando tiel en nacia, kiel en internacia agadkampoj. Tion montras la *teknikaj* aŭ *fakaj* konferencoj. Ili celis en certa fako aŭ laborkampo progresigi la utiligon de Esperanto kaj atentigi la koncernajn fakulojn. La unua estis en 1922 iniciatita de prof. d-ro *Privat* en Ĝenevo ĉe *Ligo de Nacioj* pri la instruado de E. Ĝin kunvokis la fama instituto *Jean-Jacques Rousseau* (apr. 1922). Tiun sekvis, iniciatita de UEA, la *Komerca kaj Turisma Konferenco* en Venecio (apr. 1923) kunvokita de la Itala Komerca ĉambro en Ĝenevo, Svislando. Tiun konferencon partoprenis multaj el Hungario, inter ili *P. Balkányi*, kiu estis oficiala reprezentanto de la Budapeŝta kaj provincaj komercaj ĉambroj, de la *Foiro de Budapeŝto* kaj de la *Ĉefurba Turisma Oficejo*. Pri la konferenco poste okazis raporto en la *Komerca Ĉambro* de Budapeŝto. En 1924 okazis la *Internacia Radio-Konferenco* en Ĝenevo, ĝin gvidis d-ro *Privat*, kaj ĝi estis la unua tiaspeca radiokonferenco en la mondo. En 1925 okazis en Parizo la *Konferenco de Komerco kaj Industrio*. Tiujn ĉeestis hungaraj delegitoj. — En 1927 okazis en Prago „*Konferenco pri Paco per Lernejo*”, kies ĉefa traduklingvo estis E. En 1921 — samjare kun la 21-a U.K. en Budapeŝto — estis sukcesa *Komerca kaj Trafika Konferenco* en Frankfurt a. M., aranĝita de *Roberto Kreuz*, ĝen. sekr. de la CK. Ankaŭ tiun parto-

prenis P. *Balkányi*. En la sama jaro oni inaŭguris en la Viena *Hofburg* la *Internacian Esperanto-Muzeon*, kiel parton de la Aŭstra Ŝtata Biblioteko. La IEM-on fondis kaj direktis kortega konsilanto *Hugo Steiner*.

En tiu periodo ekiris sian triumfan vojon la *E-instruado* per rekta metodo, prilaborita de hungara katolika pastro el *Transilvanio*: *Andreo Cseh*, kiu okaze de la U. K. en 1929 ankaŭ en Budapeŝto gvidis kelkajn kursojn laŭ sia metodo, – inter ili oficialan en la ĉefurba Pedagogia Seminario por internacia aŭskultantaro. Li konkeris multloke (unuavice en Svedio, Nederlando, Germanio) la publikon per la devizo „ri-di lernante”. Ĝis tiam oni kontentiĝis, se kurson komencis 20 kaj finis 10. Ĉe li estis ofte kvindekaj – kaj la nombro dum la kursoj ofte eĉ kreskis. Oni invitis sinsekve fremdlandajn instruistojn por fari kursojn laŭ *Ĉe-metodo*. La kursoj de Cseh donis novan antaŭpuŝon al la ĝenerala movado.

Tiutempe la landaj societoj ne multe kreskis; tion kaŭzis ofte manko de sperta gvidanto, ekonomiaj malhelpoj. Tamen en la plej multaj landoj okazis Landaj E-Kongresoj.

La laboristaro volante apartiĝi de la neŭtrala movado fondis laboristajn societojn, grupojn. Ilia internacia organizaĵo estis *Sennacieca Asocio Tutmonda* (v. ĉap. 23.), SAT aparte aranĝis sukcesajn kongresojn internaciajn.

De 1925 nova bonega aranĝo estis la *Someraj Universitatoj*.

En 1932, dum la 24-a U. K. en *Parizo* oni ĉesisigis la *Internacian Centran Komitaton* kaj en *Köln* la U. K. akceptis, ke UEA estu la sola tutmonda neŭtrala organizaĵo, al kiu apartenu kaj la landaj kaj la fakaj so-

cietoj. En Vieno (1934) okazis la lasta tiaspeca konferenco sub la devizo: *E en la Lernejo kaj Praktiko*.

Krom tiuj tiutempe gravaj kaj praktikaj aranĝoj oni komencis instigi la tekstan uzadon de Esperanto en diversaj eldonaĵoj. La unua sukceso estis la *poŝtmarkoj* kaj *poŝtkartoj* kun Esperantaj tekstoj. Sovetunio malfermis la vicon: en 1925 aperis tie la unua poŝtmarko, — la dua en 1926 okaze de SAT-kongreso en Leningrad, — la tria en 1927 je la 40-jara jubileo de E kun bildo de Zamenhof. Sekvis Brazilo! Sur oficialaj poŝtkartoj aperis ankaŭ Esperantaj tekstoj: unue en Liechtenstein, poste en Hungarlando, en Brazilo kaj Aŭstrio. Tio estis jam kvazaŭ ŝtata kaj oficiala rekono de E. Estis ankaŭ provoj uzi Esperanton sur tekstoj en la vagonaroj, precipe en la internaciaj.

Post disvastiĝo de la *radio* oni klopodis ankaŭ tie enkonduki Esperanton. Jam la Ĝeneva konferenco rekomendis tion. Komence estis kursoj en radiostacioj, tiujn sekvis informa kaj distra disaŭdigo, kelkloke jam eĉ regula, en la programoj. La Budapeŝta eksperimenta studio de la poŝto en 1925 post la Pariza konferenco donis unuafoje malgrandan programon kvazaŭ koncertan en E! Ekfunkciis *Internacia Radio-Asocio* en Parizo sub prezido de P. Corret, kiu eldonigis seslingvan *radio-vortaron* en Parizo (1926). Sekretario estis E. Aisberg, kies originalan verkon „*Mi komprenas fine la radion!*” oni tradukis en 28 lingvojn (inter ili ankaŭ hungaren).

Alia agadkampo estis la *turismo*. Turismaj oficejoj, urboj, banlokoj, Internaciaj Foiroj sinsekve eldonis prospektojn, afiŝojn, glumarkojn, ktp., ĉar ili spertis, ke la esperantistoj volonte disvastigas tiujn. En kelkaj landoj estis E-fakoj ĉe koncernaj ministerioj, simile

ĉe kelkaj foiroj. La Budapeŝta Foiro dum jardekoj uzis tiamaniere E-on.

En tiu periodo plivigliĝis la agado inter la junularo. En Nederlando (1938) fondiĝis *Tutmonda Junulara Organizo*, kiu eldonis propran monatan revuon, – kaj aranĝis ĉiujare viglajn tendarojn. El ĝi formiĝis post la mondmilito *TEJO* (v. ĉap. 24.)

Ankaŭ ĉe la laboristoj kaj en kadro de ekleziaj E-societoj estis junulara movado.

Oni iniciatis adresaron de „*Denaskaj Esperantistoj*” – do pri infanoj, kies unua hejma lingvo en la familio estis E, – plej ofte tial, ĉar la gepatroj estis diverslingvanoj. Laŭ nekompleta statistiko estis post la mondmilito almenaŭ 120-150 tiaj familioj kaj sekcio-kunveno en la 41-a U.K. en Kopenhago (1956) alvokis por plua organizado. La revueto „*Bulteno Gepatra*” (jan. 1957) eldonis la unuan tian liston.

Same kiel UEA ankaŭ SAT instigas al komuna ge-knaba agado kaj dum la U.K.-oj UEA aranĝas *Infankongresetojn*, – SAT aranĝas dum siaj propraj kongresoj depost 1954 *Geknabajn Kongresetojn*. En la junulara movado multe helpas, precipe inter lernejoj, la infangazetoj, parte verkitaj de la infanoj: *Grajnoj en Vento*, *Nia Voĉeto* kaj *Planteto* (la lastaj du ĉesintaj).

19. Antaŭ kaj dum la dua mondmilito (1934–1946)

La ĝenerala politika situacio de la mondo forte influis la E-movadon kaj nervozeco, malkonsentoj, kon-

traŭgadoj kaŭzis ankaŭ en la vico de e-istoj malagrablaĵojn, kelkfoje seriozajn.

Jam la 25-a U.K. en *Köln* (1933) ĉe komenco de la Hitlera reĝimo antaŭĵetis la ombron de la okazontaĵoj. La signo de svastiko ne estis deca ornamaĵo por kongreso de Zamenhofa lingvo. Multaj jam ne povis aŭ ne volis partopreni. La antaŭan jaron en Parizo ankoraŭ 1650, sed en Köln jam nur 950 kongresanoj estis enregistritaj.

Dum la 26. U.K. en Stokholmo (1934) oni elektis la novan estraron de UEA sub prezido de generalo L. *Bastien* el Parizo. Interesa provo estis la 27. U.K. en *Romo* (1935), nomita „*Turisma kongreso*”, ĉar parto de la kongreso okazis sur oceanŝipo kaj la kongresanoj vizitis dum la kongresa semajno diversajn lokojn.

En 1936 mortis la konata angla e-isto J. *Merchant* (iam prezidanto de ICK) – kaj Roberto *Kreuz* (ĝenerala sekr. de ICK) – kiu dum jaroj plej ageme laboris por uzigi E-on ĉe *Foiroj, Komercaj Ĉambroj*, – por enkonduko de E-varnomoj kaj por aranĝo de komerca konferenco en Frankfurt.

50 jarojn post la apero de la *Unua Libro* en 1937 okazis en Varsovio la jubilea (29-a) U.K. kun 1120 membroj. – Ankaŭ ĉi tie multaj ne povis partopreni, precipe el la najbara Germanio, kie en 1936 oni malpermesis la E-organizaĵojn malgraŭ tio, ke kelkaj germanoj provis uzi E-on por eldoni presaĵojn komforme al la faŝismaj ideoj.

La dua Mondmilito, pli terura ol tiu de 1914-1918, multe reĵetis, en multaj landoj ŝajne tute neniigis la movadon. Mankis la kontaktoj, revuoj, eldonaĵoj. Unu

el la ĉefaj gazetoj, la populara dusemajna gazeto *Heroldo de Esperanto* devis forlasi Germanion kaj la eldonisto-redaktoro, unu el la plej agemaj e-istoj: Teo Jung, post kiam oni konfiskis lian propran presejon en Köln, transmigris en Nederlando. Post ties okupado ankaŭ lia gazeto ĉesis, simile al la bonega ilustrita populara revuo de Andreo Cseh: *La Praktiko*. En Vieno oni fermis la *Internacian E-Muzeon* – feliĉe la materialo ne perdiĝis – kaj oni enkarcerigis ĝian fondinton kaj direktoron H. Steiner. Multaj e-istoj fariĝis viktimoj ne nur sur la batalkampoj, sed ankaŭ en koncentrejoj kaj per ekzekutoj.

Kiel UEA dum la unua mondmilito, nun Internacia Esperanto-Ligo (IEL), kiu formiĝis pro la UEA-krizo en 1936 kaj havis similajn organizon kaj celojn (v. ĉap. 22.) – faris sian eblon por transsavi la movadon dum la milito. IEL havis sian sidejon en Anglio kaj ĝi povis aperigi la revuon „*Esperanto Internacia*” eĉ dum milito. Ĝi organizis „Filian Oficejon” en la neŭtrala Svedio kaj de tie oni povis dissendi la IEL-cirkulerojn eĉ al malamikaj landoj por teni la kontakton.

Similajn krizojn travivis ankaŭ la laboristaj E-organizaĵoj (v. ĉap. 23-a).

Malgraŭ malhelpaĵoj IEL post la milito plifortiĝis kaj en 1946 la reprezentantoj de UEA kaj IEL komencis pritrakti la reunuigon de la neŭtrala E-movado. Interkonsento realiĝis en 1947, kiam denove en Bern jam 1370 e-istoj partoprenis la 32-an U.K.-on. La du organizaĵoj kunfandiĝis sub nomo de UEA, kies statuto estis reviziita en 1948 (v. ĉap. 22.).

20. Nova epoko post la dua mondmilito

De post la 33-a U.K. en *Malmö* (Svedio, 1948) regule funkcias la *Internacia Somera Universitato* kun la ĉefaj branĉoj: Naturaj sciencoj, Sociaj sciencoj kaj filozofio, Arto kaj Literaturo. Prelegas konataj fakuloj, scienculoj, universitataj profesoroj kaj literaturistoj. De post la 35-a U.K. okazinta en Parizo (1950) oni aranĝas *Belartajn Konkursojn* pri poezio, prozo, tradukoj kaj teatraĵoj. Tiuj celas pliriĉigi kaj evoluigi la literaturon de Internacia Lingvo, kaj diskonigi literaturajn valorojn, precipe de malgrandaj nacioj. Paralele oni komencis la *Oratorajn Konkursojn* (destinitajn por la junaj e-istoj).

En kelkaj kongresoj oni kunigas la konkursojn kaj festajn prezentadojn, koncertojn kaj teatraĵojn en kadro de *Arta Festivalo*. La unua okazis en *Harrogate* (46-a U.K. 1961), la dua en *Sofio* (48-a U.K. 1963) la tria – la plej grandioza kaj altnivela – en Budapeŝto dum la 51-a U.K. (1966).

Oni celebris mondscale la centjaran datrevenon de la naskiĝo de *Zamenhof*, je kies honoro la jubilea kongreso (44-a) okazis en Varsovio kun 3256 anoj. Ĝi estis certe la plej sukcesa kaj plej impona postmilita kongreso, kiun superis laŭnombre nur la kongresoj de Sofio kaj, Budapeŝto – kaj laste (en 1978) la U.K. en *Varna*, al kiu aliĝis 4413 kaj partoprenis pli ol kvin mil esperantistoj.

Ni devas mencii la signifplenajn agadon kaj sukcesojn ĉe UNESKO, la ĉefa oficiala kultura organizo de la mondo. UEA jam en 1952 fondis la dokumentan centron sub gvido de ĝia tiama tre multflanke agema ĝen. sekretario prof. d-ro *Ivo Lapenna* (1964-1974 ĝia

prezidanto). Lia multjara persista agado – kun aliaj kunhelpantoj – ĉe UNESKO rezultis, ke – laŭ la tutmonde kolektitaj subskriboj el 76 landoj, transdonitaj en 1950 al UN – kun petskribo, – UNESKO devis okupiĝi pri la demando. La petskribon subskribis 492 organizaĵoj – kun pr. 15 kaj duono da milionoj da membroj, kaj preskaŭ naŭcent mil unuopuloj, inter ili gravaj personoj. La *Ĝenerala Konferenco* de UNESKO en *Montevideo* (dec. 1954) akceptis post akra diskuto kaj post elokventa pledo de d-ro *Lapenna*, laŭ la propono de la meksikia delegito, rezolucion, kiu *rekonas la rezultojn de Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj; konstatas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO; komisias la Ĝeneralan Direktoron plue sekvi la spertojn pri utiligo de la Internacia Lingvo, kunlabori kun UEA, kaj invitas la membroŝtatojn, kiuj enkondukas la instruadon de Esperanto, informi pri tio la Ĝeneralan Direktoron. Krome oni akceptis UEA-n inter la neregistaraj organizaĵoj, kiuj estas membroj de UNESKO, por plua kunlaboro.* Laŭ tio UEA jam sukcese iniciatis kunagi en la UNESKO-plano „*Oriento-Okcidento*”, UNESKO aperigis siajn afiŝojn pri homaj rajtoj ankaŭ kun E-teksto, kaj en sia oficiala organo ofte estis favoraj artikoloj kaj sciigoj pri la movado.

En 1952 maturiĝis la agado de UEA, ke ĝi povu kandidati por Nobel-Premio, sed evidentiĝis, por tio estas bezonata vastskala dokumentaro, detalaj statistikoj, demonstro pri ĝia tuta funkciaro, pri ĝiaj celoj, atingitaj rezultoj, speciale en la servo de la paco, de kulturo, ktp. Tiam, – laŭ komisiono de UEA – d-ro I.Lapenna organizis la institucion „*Centro de Esploro*

kaj Dokumentado (CED). La tasko de CED kompreneble estis ne sole la kandidatigo por Nobel-Pacpremio, sed ĝi etendiĝis al ĉiuj terenoj de la lingva problemo en la mondo. Ĝi antaŭvidis eldonadon de dokumentoj, publikigadon de studoj, verkoj, liveradon de dokumentaj materialoj al landaj kaj fakaj asocioj, ktp.

La valorega materialo kolektita de CED servis por kompilado de la grandioza verko „*Esperanto en Perspektivo*” (Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo, 1974.) Ĉefr. d-ro Ivo Lapenna, red. Ulrich Lins kun multaj konataj ekspertoj. Simile grava verko estos la dua eldono de Enciklopedio de Esperanto (Unua eld. 1933-35, red. *Kökény kaj Bleier*,) — la duan eldonon redaktas U. Lins.

La ĉiujaraj aranĝoj de la kongresoj, konferencoj kun ties specialaj programoj fare de UEA plu daŭras, denove *radiostacioj* donas regule programojn en Esperanto, inter ili menciinda estas Varsovio kun ĉiutage pluraj programoj. Multloke aperas *turismaj kaj komercaj prospektoj* kaj reklamoj en E, la gazetaro denove fortiĝas, de post 1953 funkcias *Mondpaca Esperantista Movado* (MEM) kies interesan revuon PACO oni eldonas en pluraj landoj, kelklande eĉ kun oficiala subteno, kiel ankaŭ en Hungarlando. D-ro Francisko *Szilágyi* komencis la eldonadon de serioza kultura kaj socia revuo *Norda Prismo* en Svedlando. En Jugoslavio okazis grava internacia konferenco pri pedagogia valoro kaj instruado de Esperanto, — la dua estis konferenco de lernejoj, kie oni instruas Esperanton, sub patronado de la jugoslava sekcio de UNESKO en 1963. En multaj landoj, ĉefe en Bulgario, Jugoslavio kaj Pollando kreskas la lerneja instruado de Esperanto. Kelkaj fakaj kongresoj, kiel ekzemple la

fervoĵista, atingas grandecon imponan.

En 1962 forpasis d-ro Edmond *Privat*, kunfondinto kaj ĉeforganizinto de UEA kaj ĝia prezidanto dum multaj jaroj, laste prezidanto de U.L. (Universala Ligo), pledanta por realigo de Mondfederacio de la registaroj. Li iniciatis ankaŭ unue la uzon de E en radio. Dum multaj jaroj li estis la ĉefa oratoro de la kongresoj.

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) energie kaj sukcese plu agas, precipe ĉe UNESKO. Ĝi daŭrigas la klopodojn por atingi konvencion inter kelkaj ŝtatoj pri oficiala enkonduko de la deviga instruado de Esperanto en certaj specoj de lernejoj.

La diverslingvajn flugfoliojn de UEA pri utiligo de Esperanto ĉe internaciaj kongresoj, por la studentaro de altlernejoj, kaj laste por la liberiĝintaj Afrikaj kaj Aziaj ŝtatoj oni disvastigas tutmonde. Jam de kelkaj jaroj oni kreis vastan informan agon kun gravaj prelegantoj, kiel Tibor *Sekelj* en Azio kaj Afriko.

Apartaj sciencaj konferencoj ĉe kelkaj UK plene pruvis la uzeblecon de la Internacia Lingvo por scienculoj kaj en teknikaj fakoj; la enkondukon de E en la ekonomian vivon celas la (en 1963 fondita) *Instituto por Esperanto en Komercado kaj Industrio* sub gvido de gravaj fakuloj.

La oficialan rekonon de Esperanto signifas, ke UNESKO menciis d-ron Zamenhof en 1959 por celebri tutmonde lian memoron okaze de lia centjara naskiĝtago. Plimultiĝas la eldono de poŝtmarkoj pri kaj en E ĉe diversaj ŝtataj poŝtoj, inter ili estis en 1959 ankaŭ Hungarlando.

La jaro 1966-a alportis du rekordajn kongresojn. La junulara E-kongreso de TEJO en la Sudhungarlan-

da bela urbo Pécs arigis pr. mil gejunulojn por utila laboro, distro.

La 51-a U.K.-on en Budapeŝto oficiale partoprenis 3975 kongresanoj, tiel ĝi estis ĝis tiam la plej granda postmilita U.K.. Tutlande vekis grandan interesigon la kongreso, la favoro de la ŝtataj instancoj montriĝis en multaj rilatoj (ekz. senpaga uzo de ĉiuj ĉefurbaj komunikiloj). E-lingvaj diservoj protestanta kaj katolika (en lasta: orkestro kaj horo prezentis Mozart-meson), altnivela Somera Universitato kaj la grandioza Tria Arta festivalo elstaris inter la multaj aranĝoj. Estis 20 teatraj vesperoj en tri teatroj, partoprenis la teatraj ensembloj: Internacia Arta Teatro, Pola kaj Bulgara E-teatroj, (13 prezentadoj) Hungara Ŝtata Pupteatro (3 prezentadoj), Hungara E-Teatro, belega eventoriĉa Hungara Folklorvespero, ktp.

Grandega fortostreĉo de tiu jaro estis la tutmonda subskribokolektado, organizita de UEA, por akceligi ĉe UNO apogon de E. Subskribis pr. unu miliono individue kaj 70 milionoj kolektive.

La petita apogo esence estis tio, ke UN rekomendu al la Ŝtatoj-Membroj progresigi la instruadon de E kaj stimuli ĝian uzon en internaciaj rilatoj. Malgraŭ la modesteco de tiu peto, la Sekretariato obstine rifuzis prezenti tiun proponon al la ŝtatoj, resp. al la Ĝenerala Asembleo. Tamen la fakto, ke ŝtatestroj, gravaj politikistoj, scienculoj, per sia subskribo montris simpatian, fidon al la Internacia Lingvo rekonante ties neceson, – vekis tutmonde grandan interesigon.

LA ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

21. *Lingva Komitato kaj Akademio*

Dum la Unua Kongreso Zamenhof krom organizaj planoj faris la proponon fondi centran lingvan institucion por gardi la unuecon de la lingvo kaj kontroli, helpi ĝian evoluadon.

La propono estis akceptita kaj oni elektis provizore 95 anojn por tiu Lingva Komitato. En ĝi estis 21 francoj (inter ili de Beaufront, Bourlet, Fruictier, Javal, Sébert, Boirac, Michaux, ktp.), 12 angloj (Ellis, Rhodes, Pollen, ktp.), 7 rusoj (Kofman, Dombrovski, Zinoviev, ktp.) 3 poloj (Kabe, Leo Belmont, Grabowski), 3 hungaroj (Lengyel, Miletz, Süsmuth) ktp., entute 28 landoj estis reprezentitaj. Dum unu jaro Zamenhof estis la prezidanto, sed la direktadon laŭ lia propono jam tiam oni komisiis al *rektoro Boirac*. En la dua kongreso (Genève, 1906) Zamenhof mem petis, ke Boirac estu la prezidanto. Boirac ellaboris la regularon, kiu estis akceptita en la Kvara kongreso en Dresden (1908) kaj samokaze estis fondita la Akademio de Esperanto, kiu povis enhavi maksimume 18 membrojn.

Laŭ la regularo la nombro de la L.K.-anoj ne estis limigita. La E societoj povis proponi anojn por L.K. el lingvaj kompetentuloj kaj la Akademio elektis la membrojn el inter la proponitaj personoj. La membroj konservis sian oficon dum 9 jaroj. Ankaŭ la akademianoj estis elektitaj por 9 jaroj, sed ĉiun trian jaron ili estis rebalotitaj po triono.

Estis fonditaj diversaj sekcioj por Komuna Vortaro, Teknika Vortaro, Gramatiko. Sub prezido de Th. Cart, la sekcion de Komuna Vortaro prizorgis ĝis 1913 *Elb*, poste *Grosjean-Maupin*, pri la Teknika Vortaro zorgis *Verax*. Multaj gravaj lingvaj verkoj aperis jam en la unuaj jaroj kiel oficialaĵoj de la L.K. kaj Akademio: „*Zamenhofaj vortoj*” (1906), „*Propraj nomoj*” (1909), „*Korekto de eraraj tradukoj en Univ. Vortaro*” (1913) „*Oficialaj aldonoj al U. V.*” (1908-1929) ktp.

La *Sekcio de Gramatiko* aperigis sinsekve serion da artikoloj pri diversaj lingvaj demandoj (ekz. vortfarado, participa substantivo, senco de „ŝati”, „certa”, pasivaj participoj, ktp.).

La Sekcio de teknikaj (poste ankaŭ de sciencaj) vortaroj publikigis konsilaron pri „*Farado de teknikaj vortoj*”, „*Kemia nomenklatur*”-n, ktp.

La labortereno de L.K. kaj Akademio estis jena: L.K. zorgas pri „la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo” kaj kontrolas ĝian evoluon. Laŭ tiuj principoj ĝi esploras kaj solvas ĉiujn lingvajn demandojn. „Neniel la Fundamento kaj la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evoluo de la lingvo, kiun ĝi kontraŭe certigas.” La Akademio esploras ĉiujn demandojn, kiujn sendas la komisionoj, aŭ elektas mem la Akademio, aŭ prezentas almenaŭ 5 anoj de la L.K. Se pli ol unu triono de la L.K. malaprobas la decidon de la Akademio, ĝi estas denove pridiskutata de la Ak. La Ak. havas rajton elekti „korespondantojn” por akiri kunlaboron de kompetentuloj. En la jaro 1948-a la Lingva Komitato estis ĉesigita.

Akademio ĝis tiu tempo konsistis el 16-18 membroj, estis plivastigita je 40, maksimume 50 membroj.

La „*Akademio de Esperanto*” estas sendependa Lingva Institucio kun la samaj celoj kiel la iama L.K. ĝi daŭrigas la laborojn de la L.K., kaj ĝia Akademio.

La taskoj de la Akademio estas esplori lingvajn demandojn de E, verki vortaron, teknikajn terminojn, kontroli tiajn terminarojn, revizii kaj kritiki aperintajn verkojn laŭ lingva vidpunkto, defendi E-on kontraŭ konkurencaj planlingvaj sistemoj. Ĉiujn lingvajn demandojn ĝi solvas laŭ la principoj de la Fundamento de Esperanto.

La Akademio diskonigas siajn laborojn kaj decidojn en formo de cirkuleroj (Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto) kaj de tempo al tempo ĝi publikigas presaĵon: Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto. En ĝi aperas la Aldonoj al Universala Vortaro pri oficialigo de novaj vortradikoj. La prezidanto de la Akademio de Esperanto ekde 1964 estas prof. Gaston Waringhien. (V. p. 183-185)

22. *Universala Esperanto-Asocio. — UEA*

Centra Oficejo. Jam en la Unua Kongreso evidentiĝis la neceso, krei ian organizaĵon, kiu estu sidejo de la Lingva Komitato, de la Organiza Komitato (de la kongresoj), de arkivo de dokumentoj, adresaro por korespondo, ktp. Post komenca laboro de generalo Sébert, en la jaro 1906 d-ro *Javal*, riĉa blindulo, fondis kaj finance subtenis „Centran Oficejon”. Tiu eldonis la revuon „Oficiala Gazeto”, organizis la Universalajn Kongresojn ĝis la Kontrakto de Helsinki (1922) kaj

iom post iom iĝis centra reprezenta organizaĵo de la E-movado, farante grandajn servojn al la tuta movado. Sub gvido de gen. Sébert estis kolektata E-a Dokumentaro, estis gvidata lerta ĝenerala propagando. C.O. faris gravajn servojn dum la unua mondmilito (ĝi ĉesis en 1922).

Universala Esperanto-Asocio. En la Dua Kongreso en Genève 1906, franco *Carles* proponis organizi reton de „konsuloj” esperantistaj, kiuj praktike helpu la diverslandajn esperantistojn dum vojaĝoj, ĉe inform-petoj, ktp. *Hector Hodler*, (1887-1920) por apogi tiun ideon, fondis la gazeton „Esperanto” en januaro 1907. En ĝi aperis la adresoj de novaj konsuloj, la pli postaj „delegitoj”. Post la krizo, kaŭzita de Ido, li energie ekagis por fondi tian internacian organizaĵon, kiu sen lingvaj diskutoj tuj ekuzu praktike la lingvon, unuigante ĉiujn uzantojn de la lingvo, ne tuŝante la taskojn de la jam ekzistantaj int. organizaĵoj. (L.K. kaj C.O.). Hodler dissendis cirkulerojn pri fondo de tia Asocio, kaj laŭ la ricevitaj respondoj kaj balotoj, en aprilo de 1908, oni fondis la novan organizaĵon sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio*, „kies celo estas la plifaciligado de la ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter ĝiaj anoj.”

Tri monatojn post la fondo UEA jam havis 1300 membrojn kaj preskaŭ 400 delegitojn kaj subdelegitojn kaj en la unuaj kvin jaroj estis faritaj 45 mil servoj.

Dum jardekoj la organizo transiris diversajn ŝanĝojn, tamen restis la karakteriza trajto: praktika uzo de la lingvo en informaj, helpaj, turistaj servoj. Poste ĝia organiza agado disvastiĝis sur preskaŭ ĉiun agadsfe-

ron de la movado. Ĝia oficiala gazeto: „Esperanto” modele sekvas la Zamenhofan lingvouzadon ĝis la hodiaŭaj tagoj. En ĝi aperas la plej gravaj alvokoj, sciigoj pri esperantistaj novaĵoj el la tuta mondo. Ĝi enhavas ankaŭ literaturajn paĝojn.

UEA aperigas ĉiujare Jarlibron (400-600-paĝajn), en la lastaj jardekoj eĉ duan parton (pr. 200-paĝajn). En la jarlibro aperas la listo de la delegitoj, jaraj raportoj pri la agado de UEA, raportoj, sciigoj pri la ekzistantaj aliaj fakaj, religiaj, politikaj E-Asocioj, listo de la gazetoj, de libroj, ktp. Lastatempe la jarlibro refariĝis unuvoluma.

La delegitoj estas honoraj komisiitoj, kiuj memvole akceptas la taskon respondi je leteroj, fari servojn per informoj pri komerco, industrio, laboro, salajroj, instruado, turismo, ktp. La servoj estas principe senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la delegito (ekz. per respondkuponoj ĉe simpla informpeto).

La sidejo de UEA (ĝia „Centra Oficejo”) estis en Ĝenevo (Svislando) ĝis 1936. Tiujare en la 28-a Universala Kongreso en Vieno oni decidis — por savi la financon situacion — transmeti la sidejon de UEA al Londono (voĉdono 80%-a), sed la svisaj membroj, serĉante juran bazon, kontraŭstaris. Oni fondis novan organizon: *Internacia Esperanto Ligo* (IEL) kun propra domo en Rickmansworth (apud Londono). Ĝia estraro estis proksimume la sama, kiel ĉe la antaŭa UEA, kaj ĝi transprenis la rolon de UEA. Ĝi kunigis la naciajn societojn, konstruis plu la delegitaran reton. Oficiala gazeto iĝis *Heroldo de Esperanto*.

Dume UEA klopodis reorganizi sin, sed ĝi iom post iom perdis sian anaron kaj tiel sian signifon. Kontraŭe

IEL havis en 1946 jam 16 000 membrojn el 60 landoj.

En 1947, dum la 32-a U.K. en Bern, denove kunigis la du asocioj sub la nomo de UEA kun du oficejoj (Londono kaj Genevo). La oficiala organo estas denove „*Esperanto*”.

De post 1955 la sidejo de UEA estas en Rotterdam (Nederlando). Tie ĝi havas propran oficejan domon, kun sufiĉaj ejoj por administrado, biblioteko, arkivo, kunsidoj, ktp.

UEA direktas la tutmondan movadon grandskale, ĝi aranĝas la Universalajn Kongresojn, diversajn fakajn konferencojn, – estas en konsulta rilato kun UNESKO, kun la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de Unuiĝantaj Nacioj, ktp.

Precipe grava estas ĝia sekcio „*Centro de Esploro kaj Dokumentado*” (Londono), – *Agado Proksima Oriento*, – magnetofona kaj filma servoj, – komisionoj pri lernejoj, lernolibroj, ekzamenoj, konkursoj, ktp.

La membraro de UEA konsistas el individuaj membroj kaj asociaj membroj (ĉi lastaj estas membroj de la aliĝintaj landaj E-asocioj). La asociaj membroj estas reprezentataj en la komitato de UEA per komitatanoj (1000 membroj per unu komitatano).

En la jaro 1974 UEA elektis novan Estraron, kiu pli elaste adaptiĝas al la realaj mondaj cirkonstancoj en sia agado por Esperanto. Gravan sukceson alportis la 1977-a jaro, kiam la Universalan Kongreson en Rejkjaviko (Islando) partoprenis persone la ĝenerala direktoro UNESKO. Prezidanto iĝis d-ro H. Tonkin, univ. profesoro.

23. *Laborista E-movado.* *Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)*

Precipe por laboristoj estis kaj estas granda avantaĝo la facileco de E, ĉar ili plej ofte havas malpli da ebloj lerni fremdajn lingvojn, kies studo pretendas multajn jarojn.

Jam post la Unua Mondkongreso en Bulonjo formiĝis laboristaj E-grupoj en kelkaj urboj, kaj poste landaj asocioj (en Britio 1907, — Bohemio, Germanio, Hungario, Nederlando 1911, ktp.), kaj en 1906 la unua laborista internacia organizaĵo: *Liberiga Stelo*. Tamen nur post la unua mondmilito organiziĝis landaj laboristaj asocioj pli vaste (1918. Hungario, Nederlando, ktp.) En Sovetio fondiĝis en 1921 *Sovetlanda Esperantista Unuiĝo* (poste Sovetrespublikara Esperantista Unio: SEU). En tiu jaro okazis la unua laborista internacia E-kongreso en Prago, kiam fondiĝis *Sennacieca Asocio Tutmonda* laŭ iniciato de Eŭgeno Lanti (1879-1947) franca lignaĵisto, aŭtodidakta klerulo, poste desegnoinstruisto.

Kiel ĉe la plej multaj landaj laboristaj organizaĵoj, la motivon por la apartigo disde la aliaj (burĝaj) E-organizaĵoj prezentas la difino de Lanti: por laboristoj E ne povas esti celo, sed nur rimedo por klasbatalaj celoj.

Eksplicite la celoj de SAT estas:

„1. utiligi praktike la internacian lingvon E por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda; 2. kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro; 3. instruadi, klerigadi siajn membrojn tiel, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj in-

ternaciistoj; 4. servi kiel peranto ĉe la interrilatoj de nesamlingvaj asocioj, kies celo estas analoga al tiu de SAT; 5. krei literaturon spegulantan la idealon de SAT.”

Oficiala gazeto estis post la unua mondmilito *Esperantista Laboristo*, kaj kiam en la unua mondkongreso laborista (Prago, 1921) *Liberiga Stelo* alinomiĝis *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT), la oficiala gazeto transformiĝis je *Sennacieca Revuo*; poste *Sennaciulo*, redaktita de *Lanti*. Ekde 1926 kunredaktoro estis *Bartelmes*.

Jam dekomence SAT rigardis sia grava tasko levi la nivelon lingvan, kaj ĝi eldonis gravajn literaturajn verkojn, tradukojn (*Faust* de Goethe, *Kandid* de Voltaire, *Komunista Manifesto* de Marx kaj Engels, *Ŝtato kaj revolucio* de Lenin, ktp.). Aparte menciinda estas la eldono plurfoja de *Plena Vortaro*, baza vortaro de E.

En 1970 aperis la plej ampleksa E-vortaro *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (PIV) grandformata, 1300 paĝa, en redaktado de G. Waringhien.

De post la Praga kongreso ĉiujare aranĝas SAT apartan laboristan E-kongreson, — sendepende de la UEA-kongresoj, kiujn kongresojn partoprenas de 80 ĝis 700 membroj. Inter la honorprezidantoj troviĝis H. *Barbusse*, Romain *Roland*, A. *Einstein*, *Luna-ĉarskij* k. a.

Post la Viena kongreso (1925) SAT venkis la materialajn malfacilaĵojn, ĝia membraro atingis 6500 (el kiuj ĉirkaŭ la triono estis el Sovetio), kvankam en tiu tempo en kelkaj landoj estis registare malpermesite iĝi membro de SAT (ekz. Hungario, Italio, Rumanio.)

Paralele (tamen ne ĉiam kunagordite) agadis *Labo-*

ristaj Esperantistaj Asocioj (LEA). En 1928 oni pri-konsentis, ke LEA gvidas poresperantan laboron, dum SAT prizorgas la peresperantan.

Principe, laŭ la fondiĝaj reguloj SAT estis superpartia, supertendenca organizaĵo. La celo estis kunigi en ĝi ĉiutendencajn, klasbatalajn, kontraŭkapitalismajn laboristojn. Pro sia speciala „sennacieca” ideologio kaj gvidado SAT jam en la unua tempo de sia ekzistado malkontentigis multajn prol. e-istojn. La membroj konsistis el komunistoj, socialdemokratoj kaj anarkiistoj. Ĝis la jaro 1927 membroj kaj organoj de SAT laboris harmonie kaj en tiu tempo la tutmonda esperantista laboristaro povis ricevi ĝustajn informojn pri la internacia laborista movado kaj pri la konstruo de socialisma ŝtato en Sovetunio.

Ekde 1927 la direkto de SAT en Parizo komencis pli insiste propagandi en la organoj de SAT la ideologion de sennaciismo en ties malproksimen evoluinta formo. Aperis la nova broŝuro de Lanti „Laborista Esperantismo”, kiu estis eldonita kiel kvazaŭ programo de SAT kaj kiu enhavis asertojn ne akcepteblajn laŭ la marksisma ideologio.

Kompreneble marksistoj ne povis tion konsenti kaj akre kritikis tiun sintenon de la direkto de SAT. En tiu diskuto gvidrolon akceptis Ernesto *Drezen* (latvo, sovetiano, 1892-1937), inĝeniero, poste universitata prof. en Moskvo, en 1929 Lingva Komitatano, verkisto de *Historio de la Mondolingvo*, 1931, – kaj de aliaj gravaj teoriaj, lingvistikaj, movadaj libroj).

Komenciĝis akraj diskutoj kaj kiam la opozicio decidis eldoni gazeton por kontraŭbatali la antimarksisman ideologion de la direkto de SAT, la direkto eks-

igis el SAT Drezen kaj multajn aliajn opoziciulojn, sovetiajn kaj alilandajn.

Ĉe la sekva SAT-kongreso en Amsterdam en 1931 la opozicia anaro klopodis restarigi la unuecon de SAT. Kiam evidentiĝis, ke la direkcio de SAT ne volas reakcepti la eksigitajn membrojn, oni decidis fondi Internacion de Proleta Esperantistaro (IPE). La-a fondkongreso de IPE okazis en 1932 en Berlino. Al IPE aliĝis SEU, Germana Lab. E. Asocio, Japana Prol. E. Unuiĝo, Bulgara LEA kaj Nord-Amerika LEA. Aliĝis ankaŭ certaj partoj de la laboristaj E-Asocioj franca, pola, brita, sveda, nederlanda, hungara, ĉeĥoslovaka, finna, norvega, aŭstria, hispana k. a. Aperis la oficiala organo „Internaciisto” redaktita de Jozefo Batta, iama sekretario de HESL.

La skismo en SAT plu evoluis. La socialistaj esperantistoj longe hezitis plimalfortigi la laboristan E-movadon per plua skismigo. Ili multe klopodis atingi iom kontentigan solvon en la kadro de SAT. Sed kiam definitive montriĝis, ke la obstino de la SAT-gvidantoj malebligas ĉiun kompromison, tiam la malkontentuloj sub la gvidado de la forta Aŭstria Laborista Ligo E-ista (ALLE) alpasis al fondo de Internacio de Socialistaj E-istoj. Dum Pentekosto en 1933 okazis en Vieno la MezeŭropaKonferenco, kiu unuanime decidis la starigon de ISE.

La faŝista ekregado en Germanlando en 1933 kaj poste en Aŭstrio en 1934 kaŭzis gravan malfortiĝon de ĉiuj tendencoj de la Laborista E-Movado. La alproksimiĝinta dua mondmilito malfavoris al la E-movado mondscale.

La tutmonda laborista movado suferis multe pro la antaŭ- kaj dummilitaj obstakloj. Post la dua mond-

milito SAT daŭrigis sian agadon, sed ne povis atingi sian antaŭmilitan forton. Ties kaŭzo estas, ke post la dua mondmilito formiĝis novaj ŝtatoj, nome kaj ĉefe socialisma-leninisma ideologio estas disvastiĝinta sur la tuta tero kaj sekve la tutmonda laboristaro ne volas ŝanĝi sian mondkoncepton de internaciismo je sennaciismo.

En la popoldemokratiaj landoj ĉesis la dispartiĝo en apartan burĝan kaj laboristan movadon.

24. Diversfakaj organizaĵoj

a) Daŭre funkciantaj internaciaj asocioj

Jam frue organiziĝis diversaj fakaj societoj, kiuj klopodis evoluigi kaj aplikigi la lingvon por fakaj celoj. Multaj el tiuj nur efemere vivadis kaj malgraŭ, ke ilia funkciado estintus utila, pro nebona organiziteco, aŭ pro aliaj kaŭzoj ĉesis, ofte jam post kelkjara vegetado.

Iom pli gravaj fakorganizaĵoj nun funkciantaj:

Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) fondiĝis dum la dua UK en Ĝenevo (1906). Ĝia oficiala organo estis (1904-1923) *Int.Science Revuo*, ekde 1948 *Scienca Revuo*. Krome aperas *Bulteno* kaj *Interfako*. En kontakto kun la fakaj sekcioj laboras la *Terminologia Centro*, kiu estas komuna organo de ISAE kaj de *Akademio de E.* sub gvido de Rüdiger Eichholz (Kanado), kiu preparas E-igon de *bildvortaro Duden* kaj de *Slipara Vortaro*.

En 1908 fondiĝis *Tutmonda E-ista Kuracista Asocio*, kies nomo poste iĝis *Universala Medicina Esperanto-Asocio* (UMEA). Ĝi kunigas kuracistojn kaj aliajn sanitarajn laborulojn.

Oficiala gazeto kaj fakrevuo estas *Medicina Internacia Revuo* (MIR), aperanta en Japanio.

UMEA dum la lastaj jaroj tre aktiviĝis. En 1978 en *Krakovo*, en 1979 en *Hódmezővásárhely* (Hung.) oni aranĝis internacian konferencon de e-istaj kuracistoj kun altnivelaj sciencaj prelegoj. La Budapeŝta Medicina E-Fakgrupo jam de 1973 ĉiujare aranĝas Sciencajn Vesperon (sub gv.de d-ro Ludoviko *Molnár*) kun altnivelaj prelegserioj de ĉufurbaj, provincaj kaj eksterlandaj fakuloj. Ili preparas *Medicinan Terminaron* kaj aperigas fakajn artikolojn en MIR kaj ĉefe en Sciencaj Komunikadoj de HEA (red.d-ro Otto *Haszpra*).

Tre bone organizita fakasocio estas *Internacia Fervojista Esperantista Federacio* (IFEF) (fond. en 1909) Krom fakkunsidoj dum UK-j ĝi ĉiujare aranĝas fervojistan internacian kongreson. La plej granda (pr.mil ĉeestantoj) estis tiu en Budapeŝto (1962). Of.organo estas *Internacia Fervojisto*, el la landaj E-ferv.-organoj menciindas la *Hungara Fervojista Mondo* pro bona redaktado, moderna aspekto. En kadroj de IFEF internacia komisiono prilaboras fervojfakan terminaron.

Int. Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (IPTEA) (fond.en 1966) aperigas jare po 4 n-roj revuon *Interligilo*, aranĝas int. kunvenojn kaj ankaŭ prilaboras fakterminaron.

Int.Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI, fond. 1949) celas progresigi la E-instruadon en lernejoj, en ties intereso kunlaborigi pedagogojn. Of. gazeto: *Int. Pedagogia revuo*.

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) (fond. 1938) estas sekcio de UEA. Ĝi celas krei solidarecon kaj amikecon inter gejunuloj diverslandaj, kaj disvastigi E-on en tiu rondo. Of.organo: TEJO-Paĝo (rubriko en revuo de UEA), kaj kvaronjara revuo „*Kontakto*”.

Kastora Klubo de E estas int.klubo por infanoj, kiuj scias/lernas E-n. La ĉefa celo estas: instigi ilin E-n por noblaj celoj (ankaŭ per ambiciigo akiri la gradojn: Bruna-, Argenta-, kaj Ora Kastoro.) Interesaj porinfanaj artikoloj kaj la komunikaĵoj de Kastora Klubo aperas en la int. lerneja revuo: *Juna Amiko* aperanta jam de 1973 en redaktado de Géza *Kurucz* (Hung.) kun ilustraĵoj, kantoj, enigmoj.

Grajnoj en Vento estas int. reto de infanaj rondoj. Jare po 3 fojoj pretigas la infanoj mem gazeton.

Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) (fond.1948). Ĝi disvastigas E-n per nacilingvaj gazetoj kaj klopodas kunlaborigi la gekolegojn por levi la ĝeneralan nivelon de E-aj revuoj, gazetoj.

Monda Turismo (MT) fond.en Vieno, 1970, aŭspicias turistajn renkontiĝojn, vojaĝojn, akcelas eldonon de prospektoj, il. poŝtkartoj. Inter ĝiaj plej bonaj programoj estas *Int. Renkontiĝo de E-Nauramikoj* en *Abaliget* (Montaro *Mecsek*) organizita far E. Teritoria Komitato de *Pécs*.

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (ESLI, fond.1958) grupigas E-istajn ŝakistojn, aranĝas int. turniron (ekz. laste en Varna, UK, 1978).

Ligo Int. de Blindaj E-istoj (fond.1950). La of.organo E-a Ligilo, brajle presata, ekzistas jam de 1904, fond. de T.*Cart*. Ĝi tre multe helpas kunligi blindajn e-istojn por komunaj interesoj kaj plifaciligado de ilia sorto.

Universala Ligo (fond.Hago,1942) organizita de *Andreo Cseh* kaj s-ino *J.Isbrücker*, propagandis la ideon de mondfederacio, kaj enkondukis univ.monsistemon, kies monunuo estas „*stelo*” (valoranta pr. 0,25 ned.guld.)

Havas organizaĵojn ankaŭ la kvakeroj (senformala senpastra religia grupiĝo), — esp-istaj veteranoj, fotoamatoroj, matematikistoj, aŭtomobilistoj, filatelistoj,

ornitologoj, radioamatoroj, rotarianoj, skoltoj, ktp. (Adresoj, detaloj en Jarlibro de UEA.)

b) Nova ekflorado en faka agado

Unuopaj sciencistoj kaj fakuloj, krome fakaj organizaĵoj kiel ekz. tiuj listigitaj sub a) jam dekomence klopodis apliki E-n por fakaj celoj.

Dum la lastaj jaroj tiu tendenco tre fortiĝis kaj atingis konsiderindajn rezultojn. Tiu agado ne apartenas speciale al unu faka organizaĵo, sed partoprenas en ĝi multaj diversspecaj organizaĵoj aŭ ties specialaj subgrupoj, kaj unuopuloj. Ŝajnas ke ĉiam pli kaj pli multaj seriozaj esp-istaj fakuloj rekonas, ke en epoko de scienca-teknika revolucio la utiligo de E devas tre grave involvi la natursciencan kaj teknikan aplikadon de la lingvo, ke ankaŭ tiel akceliĝu la transformiĝo de la scienco en produktan forton.

En 1978 estis aranĝita en *Ahrenschoop* (GDR) internacia interlingvistika seminario en kies ferma Komunikado oni konstatis:

„Specialan atenton oni devas dediĉi al la kontentigo de la lingvaj bezonoj de la scienca kaj faka komunikado. La ĝisnunaj spertoj kaj faktoj pruvas, ke Esperanto estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la scienco. Tiel estas necese disvastigi la aplikon de Esperanto je ĉiam pli multaj sciencaj kaj fakaj terenoj... (kaj) kreskigi la proporcion de ĝia utiligo...”

La bezonon pri la scienca kaj teknika aplikado de E rekonis la *Konsultigoj* de la E-organizaĵoj de la socialismaj landoj.

Surbaze de unu el ties *Rekomendoj*, jam pluraj socialismaj E-organizaĵoj kreis iaspecan *sciencan komisionon*. Ekz. ciu el la Hungara, Ceha, Slovaka kaj Sovetia Asocioj.

La estraro de UEA decidis subteni la eldonadon de sciencaj verkoj. Simile decidis TEJO pri universitataj lernolibroj.

Ankaŭ *ekster la Esperanta mondo* oni ĉiam pli kaj pli ofte trovas en natursciencaj kaj teknikaj publikaĵoj traktadon de la monda lingvo-problemo kaj eĉ rektan signadon de E kiel solvo.

Kelkaj gravaj eventoj el la lastaj jaroj:

1978:

- Seminario pri interlingvistiko kaj esperantologio, Ahrenshoop GDR,
- Interlingvistika Simpozio en Budapeŝto (aranĝita de Universitatoj de Budapeŝto kaj Venecio),
- Interlingvistika Konferenco dum la UK en Varna
- Scienca kaj Teknika Simpozio en Žilina (ĈS)
- Ia int. Medicinista E-konferenco, Krakovo

1979:

- Ila int. Medicinista E-konferenco, Hódmezővásárhely (H),
- XIIa Konsultiĝo de la gvidantoj de la E-organizaĵoj de la socialismaj landoj (kiu akceptis gravajn rekomendojn koncerne ankaŭ la sciencajn kaj teknikajn aplikadon de E), Visegrád (H),
- Ia Latinamerika Scienca Konferenco, *Marilija*, Brazilo

En Hungario du ĉefaj centroj elformiĝis:

1. La *Klubo Konkordo*, kie de 1972 la duan kaj kvaran merkredojn de ĉiu monato estas aranĝata Scienca Vespero (ĝis 1979 pli ol 120). Ĉefe anoj de Konkordo aktivis en la ĉiujara aperigo de la ricenhava Sciencaj Komunikaĵoj kaj ekde 1979 de la Teknikaj Komunikaĵoj. Oni ellaboris kaj diversmaniere aperigis E-ajn vortlistojn pri komputiko, sanitaro, geodezio, -krome multaj aliaj estas en manuskripto.

2. La Medicina Esperanto-Fakgrupo, kies agadon ni jam menciis sub UMEA (p.83.).

La scienca laboron organizas la Komisiono pri Sciencaj kaj Fakaj Aplikadoj funkcia apud la Prezidio de HEA, ellaboranta interalie la perspektivan eldonplanon de fakaj libroj por la sekva jardeko.

Eksterlande plej grava aktiveco sperteblas en Ĉeĥoslovakio, kie nun aperas 30 mil-vorta Ĉ-E politeknika vortaro, en GDR pri scienca analizo de la E-movado kaj Int. lingvo, en Rumanio plej lastatempe rapide evoluas la movado en akademias kaj universitataj rondoj, en Belgio la sciencaj prelegserioj de la ĉiujara „*Someraj Universitataj Kursoj*” estas menciindaj ktp.

Organiziĝis grupo de interlingvistiko ĉe la *Soveta Akademio de Sciencoj*, kiu publikigas eldonaĵojn tre favorajn por E.

Konekse kun la ekflorado de la E-movado en Irano, la sciencaj kaj teknikaj bezonoj de la Tria Mondo ricevis emfazon.

La aperantaj ĉ. dek sciencaj periodaĵoj plejparte altigas sian nivelon, kaj grava neesperantista organizaĵo, Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj aperigas sian organon ankaŭ E-lingve: *Scienca Mondo*.

Ĉiam pli evidentiĝas ke la vojo al la ĝenerala akceptigo de E kondukas tra la faka aplikado, do ĉirilate en la proksima estonto grava evoluado atendeblas.

MOVADO EN HUNGARIO

25. *La unuaj dekdu jaroj*

La unua hungara esperantisto estis d-ro Gabrielo *Bálint*, universitata profesoro de la Ural-altajaj lingvoj en Kolozsvár (nun Cluj), varbita por Esperanto verŝajne per la propaganda laboro de *L. Beaufront*. La Esperanto-kurson de Bálint en 1897 partoprenis ankaŭ juna ĵurnalisto, Ábel *Barabás*. Li verkis kaj en 1898 eldonis la unuan Esperanto-lernolibron en hungara lingvo. Sekvis multaj atakaj aŭ ironiaj artikoloj en la gazetoj, kaj la gramatikon en la unuaj jaroj aĉetis nur malmultaj. Inter ili estis Paŭlo *Lengyel*, presisto en Szekszárd, kiu baldaŭ havis gravan rolon en la Esperanto-movado.

En la ĉefurbo la unua Esperanto-grupo ekfunkciis en 1901 sub gvido de Jozefo *Miletz*. La grupanoj kunvenis en malgranda trinkejo (Dob strato 100), kie ĉe malforta lumo de petrollampo apud nerabotita tablo sidadis la unuaj pioniroj de E en Budapeŝto. En tiu grupo eklaboris ankaŭ J. *Süssmuth*, internacia pioniro, nun vivinta en Usono kaj ankaŭ Aŭgusto *Marich*, kiu estis tre agema, sed ofte uzis blufan propagandan manieron.

Jam en 1902 vizitis nian landon la sveda pioniro Valdemar *Langlet*, poste ankaŭ aliaj. La propagando estis tre fekunda ĉe la stenografoj. La *Stenografia Societo* en Szeged jam en 1907 akceptis favoran decidon por E. Post du jaroj, en 1909 estis en Budapeŝto la Int. Kuracista Kongreso, en kies aranĝo partoprenis d-ro L. *Lóránd* kaj ankaŭ d-ro Karlo *Mezei*, aŭtoro de E-lernolibro.

Ankaŭ en provincaj urboj komenciĝis la E-vivo, precipe en Debrecen, kie la ĉefaj laborantoj estis d-ro Rudolfo *Rajczy*, d-ro Stefano *Joó* kaj Petro *Török*.

LA PIONIROJ

Gabrielo *Bálint* naskiĝis en Transilvanio, en Szentkatolna (nun en Rumanio) en 1844 kaj mortis en 1913 en Temesvár (nun Timișoara en

Rumanio). En la universitato li lernis unue juron, poste lingvistikon. De 1871 ĝis 1875 li faris grandajn vojaĝojn en Astraĥano kaj Mongolio por studado de la mongola kaj aliaj lingvoj. Poste li partoprenis en Ĉinio la ekspedicion de Adalberto *Széchenyi*. En 1897 li estis nomita profesoro de la Ural-altaja lingvistiko en la universitato de Kolozsvár (nun Cluĵ). Ankoraŭ en la sama jaro li faris prelegojn al siaj disĉiploj en Kolozsvár pri la problemoj de la mondlingvo kaj pri la lingvo Esperanto. Li eldonis sur hektografitaj paĝoj la 16 ĉefregulojn de E. Li havis ankaŭ kurson, kaj unu el liaj disĉiploj, Ábel *Barabás* verkis la unuan hungaran E-lernolibron, por, kiu mem Gabrielo Bálint verkis antaŭparolon. Li energie rifuzis la atakojn kontraŭ Esperanto kaj konstatis, ke „manion havas tiu, kiu ne kredas la progreson de la homaro kaj kiu preferas la disigon de la homaro per ĉinaj muroj.”

Paŭlo *Lengyel* naskiĝis en 1868 en Szabadka (nun Subotica en Jugoslavio) kaj mortis en 1932 en Budapeŝto. Li fariĝis presisto, kaj fondis presejon en la urbo Szekszárd. En 1897 Lengyel legis anoncon pri la unua E-a lernolibro. Li tuj mendis ĝin en pluraj ekzempleroj, esperante, ke li lernos la lingvon kun aliaj. Du tagojn post la alveno de la lernolibro li jam skribis leteron en la urbon Uppsala al la tiea Esperanto-grupo kaj komencis sian agadon por la internacia lingvo. Ĉar la revuo *Lingvo Internacia* baraktadis en grava krizo, en j. 1900 Lengyel surpris la eldonon kaj presigon de la revuo, poste ankaŭ la redakton kaj administradon. En 1904 kune kun sia familio li elmigris en Parizon kaj tie kunfondis la Esperanto-presejon *Presa Esperantista Societo*, kies teknika gvidanto estis li mem. En 1905 li fariĝis membro de la tiam fondita *Lingva Komitato*. Kiam eksplodis la unua mondmilito, la francaj magistratoj kiel hungaran ŝtatanon internigis lin kune kun la familio, kaj konfiskis lian tutan havaĵon. Lian kvinjaran suferadon kaj mizeron mildigis kelkaj francaj esperantistoj, inter ili du esperante parolantaj gardistoj. Nur en 1919 li povis reveni al Budapeŝto, kaj tie li laboris kiel korrektisto de presejo.

La literatura agado de P. Lengyel konservis sian valoron ĝis hodiaŭ. Jam en 1899 li verkis 200-paĝan libron en Esperanto, kiu enhavas *bonhumorajn rakontojn*. En 1906 li tradukis al Esperanto longan rakonton de la hungara verkisto Árpád *Abonyi*. Lengyel estis redaktoro aŭ kunlaboranto de multaj gazetoj. Li korespondadis kun la gvidantoj de la Esperanto-movado.

Liaj rememoroj aperis en *Literatura Mondo* (j. 1922-1923).

Aŭgusto *Marich* naskiĝis en Budapeŝto en 1883 kaj mortis en eksterlando en 1955. Unue li estis poŝt oficisto, poste policoficisto. Marich lernis Esperanton en 1901 kaj tuj fariĝis sekretario de la tiam fondiĝinta unua E-grupo en Budapeŝto. De 1905 li laboris ĉiam pli aktive. Li travojaĝis la tutan landon, faris ĉie propagandajn parolojn, kolektis monon por la movado, organizis kursojn, fondis kaj redaktis la revuon *La Verda Standardo*. La agado de Marich donis fortan puŝon al la Esperanto-movado. Sed multaj estis malkontentaj pri liaj organizaj principoj. Kiel unu el liaj kritikantoj skribis: „Marich apartenis al tiuj, kiuj volis entrepreni aferojn sen kompleta atento de la ebloj.” Certe, la agado de Marich enhavis jen romantikajn, jen tro realismajn trajtojn, sed eĉ tiel li akiris multajn adeptojn por Esperanto. Post la unua mondmilito li iniciatis internacian Esperanto-movadon inter la policistoj, unu post la alia fondis revuojn, gazetojn, el kiuj la plimulto atingis nur unu-du numerojn. Marich okupiĝis multe ankaŭ pri la historio de la planlingvoj.

Aleksandro *Giesswein* – katolika prelado – naskiĝis en 1856 en Tata kaj mortis en 1923 en Budapeŝto. Krom siaj teologiaj studoj li multe okupis sin pri la lingvistiko kaj pri la sociaj sciencoj. Li estis pioniro de pacifismo, feminismo kaj de aliaj socialaj reformklopodoj. Antaŭ la unua mondmilito li estis unu el la gvidantoj de la kristansocialista partio. Post la milito li ekziĝis el tiu ĉi partio kaj kiel gvidanto de la reformpartio pledis por la demokratiaj reformoj.

Giesswein ekde 1912 estis prezidanto de Hungarlanda E-Societo ĝis sia morto. Jam en 1911 li parolis en la parlamento por E. Ankaŭ poste li plurfoje parolis por Esperanto en la hungara parlamento. Plurfoje li partoprenis pacifistajn kaj esperantajn kongresojn. Plurajn fojojn li faris ankaŭ ekleziajn parolojn en E. Li vigle helpis ankaŭ la movadon de la katolikaj esperantistoj.

Dum la unua mondmilito Giesswein fervore subtenis la kontraŭmilitan movadon. Li disponigis sekrete la ĉefpastran palacon, eĉ preĝejojn por ilia pritraktado.

Dum sia lasta vespero li instruis Esperanton al sia parenco. Laŭ lia deziro oni lokigis sur lian tombon la kopiaĵon de la Kristostatuo de la montaro Andes.

26. En ombro de la unua mondmilito

FONDIĜO DE DU SOCIETOJ

Alvenis la tempo por pli stabile organizi la movadon. En 1911 fondiĝis *Hungarlanda Esperanto Societo* (HES) sub prezido de papa prelado Aleksandro *Giesswein*. *Giesswein* atingis, ke li oficiale reprezentu Hungarlandon en la Universalaj Kongresoj en Antverpeno kaj Krakovo (1911 kaj 1912).

Ekinteresiĝis por E. ankaŭ la laboristaro, kaj en 1913 fondiĝis la dua societo: *Hungaria Esperantista Societo Laborista* (HESL), sub prezido de Izoro *Polgár*, kiu verkis ankaŭ tre praktikan E-Lernolibron. Sed la polickapitano en la urbo Székesfehérvár malpermesis, ke la laboristoj lernu Esperanton. Unue li diris, ke E estas „ŝtelista” lingvo, poste li „reĝustigis” sin, dirante, ke „laboristoj ne lernu lingvon, kiun la laboronantoj ne komprenas.” *Giesswein* parolis en la parlamento sukcese kontraŭ tiaj misagoj.

Jam en la antaŭa jaro, 1912 kunsidis la I-a *Hungara Esperanta Kongreso* kun 300 membroj kaj multaj alilandanoj. Ĉefa okazaĵo estis la prezento de triakta hungara dramo en E, en la traduko kaj ĉefrolado de Olga *Liebner* (poste kuracistino).

La movado plivigliĝis, la propagandistoj – en la unua vico Paŭlo *Balkányi* – laboris sukcese. Kelkaj famaj esperantistoj vizitis Budapeŝton. La librokomercisto *Kókai* eldonis E-librojn. En 1912 mem la rektoro de la universitato, d-ro Johano *Kiss* fariĝis esperantisto, kaj permesis instrui Esperanton en la Universitato.

Sed la militeksplodo en 1914 igis duonsvena la tutan mondon.

ESPERANTO DUM LA UNUA MONDMILITO

La cenzuro jam ekde la militkomenco malhelpis la Esperant-lingvan korespondadon kun eksterlandanoj. La magistratoj klopodis distranĉi ĉiujn internaciajn rilatojn. *La Verda Standardo* (ĉesis en oktobro 1915) foje petis la esperantistojn-soldatojn, „ke ili en la milito ĉiam portu la verdan stelon”, sed ne estas verŝajne, ke la armeo tion estus permesinta.

La pacifistajn kongresojn en Bern kaj en Hago partoprenis ankaŭ du esperantistaj gvidantoj: d-ro *Giesswein* kaj s-ino *Zipernovszky*. *Giesswein* – kie estis eble – ĉiam pledis por la paco.

Simile, sed pli energie faris ankaŭ Paŭlo *Robicsek*, kiu en la Buda-peŝta Popola Hotelo parolis pri „Internaciismo, milito, internacia lingvo kaj laboristaro.”

Dum en la lando mem la movado devis silenti, en la rusaj militkaptitejoj E havis tre grandan rolon. Julio *Baghy*, d-ro Leono *Lóránd*, Miĥaelo *Sárosi*, d-ro Teodoro *Schwarz* (Soros), Jozefo *Mihalik*, d-ro Ignaco *Balla* kaj ankoraaŭ multaj aliaj estis rusaj militkaptitoj. J. Baghy gvidis multajn kursojn por diversnaciaj en la militkaptitejoj, eĉ por civilaj rusoj.

Postrestis pluraj fotoj, kiuj figuras 8-10 diversnaciajn militkaptitojn, kiujn „ne la ligilo de la armeo, sed Esperanto kuntenis”. Inter la kaptitoj ne estis nacia ĵaluzo kaj ankaŭ la diferenco de la soldata rango perdis sian sorĉon. Pere de E oni sendis multegajn leterojn, kaj la kaptitoj ricevis ankaŭ pakaĵojn. Post la falo de la cara reĝimo la esperantistoj estis la unuaj, kiuj per la helpo de siaj rusaj kamaradoj povis forlasi la militkaptito-tendaron.

LA MOVADO DUM LA BURĜA REVOLUCIO

Jam monatojn antaŭ fino de la unua mondmilito revigliĝis la movado, precipe en Budapeŝto kaj en kelkaj urboj. En aprilo 1918 *Giesswein* en la palaco de la Asocio Sankta Stefano disponigis ĉambregon por komuna Poŝtmark-kaj Esperanto-Ekspozicio. *Giesswein* denove faris pacifisman paroladon. La entuziasmo pliiĝis, kelkaj fervoruloj kolektis fondon por aperigo de la gazeto *Hungara Esperantisto*. La ŝarĝon de la eldono kaj redakto surprenis ĝis 1924 fervojoficisto en Szeged: Petro *Turzó*. La gazeto fariĝis oficiala organo de HES, sed en ĝi aperis informoj ankaŭ de la same refundita HESL. Revenis el la bataalkampo Paŭlo *Balkányi*, d-ro Jozefo *Takács*, el la militkaptitejoj d-ro *Lóránd* kaj aliaj. Fervore plu laboris Elek *Tolnai* kaj multaj aliaj.

La hungara oktobra revolucio (reĝimo *Károlyi*) malfermis novajn eblojn. Fondiĝis „Komitato de la Lingvo Internacia”, al kies membroj apartenis la verkistoj Ludoviko *Biró*, Frederiko *Karinthy*, la lingvistoj Sigismundo *Simonyi* kaj Jozefo *Balassa*. La komitato faris ampleksan laboron, aperigis multajn artikolojn en gazetoj.

La du societoj: HES kaj HESL laboris kune, amike. Grava evento estis la 16-a de marto 1919, kiam okazis – aparte – la generalkunsidoj de ambaŭ societoj. Okazis ankaŭ komuna marŝado tra ĉefstratoj de Budapeŝto, tiam la partoprenantoj disdonis flugfoliojn. En tiuj tagoj multaj antaŭvidis baldaŭan venkon de E.

ESPERANTO DUM LA PROLETARDIKTATURO

Hungarlando fariĝis la 21-an de marto 1919 Konsilia-Respubliko, proletardiktaturo. La agemaj hungaraj esperantistoj senhezite kolektiĝis en la laborista societo HESL, kiu ricevis belan klubejon en antaŭa aristokrata palaco. Ankaŭ alipartiaj aŭ senpartiaj esperantistoj antaŭvidis favorajn perspektivojn por E, kaj eklaboris en la novaj kadroj. Ankaŭ prelato Giesswein ofte ĉeestis la E-kunvenojn, faris artikolon kaj parolandon pri la paco, pri E.

Paŭlo *Robicsek*, kiu jam antaŭe multe laboris por E, nun fariĝis vicpopolkomisaro de la Poŝto, per dekreto oficialigis Esperanton, kaj faris ĉion eblan por la prosperigo de la internacia lingvo. Laboris multe Géza *Bárczi* (poste profesoro de lingvistiko en la Budapeŝta Universitato, membro de Akademio.) Li tradukis partojn el „*Tragedio de l'Homo*” de Madách jam pli frue.

Alvenis la unua de majo, granda festo de la laboristaro. La ĉefurbaj e-istoj sub verda standardo partoprenis la demonstracian marŝon. Post unu monato, la 1-an de junio ĉ. 150 esperantistoj kolektiĝis ĉe la ruinoj de la iama Romia urbo Aquincum. Tiam aperis la unuaj presitaj poemtradukoj de Kolomano *Kalocsay*: La Internacio kaj poemo de Ady. Ili estis deklamataj, resp. kantataj.

Ankaŭ en provincaj urboj, ĉefe en Győr (Adalberto *Kardos*), en Miskolc (d-ro Ludoviko *Győry-Nagy*) kaj en Debrecen (Petro *Török*) estis vigla movado.

El la eldonaĵoj ni menciu la kajerojn de *Hungara Revuo*, kie aperis ĉefe Esperantotradukoj de hungaraj gazetartikoloj. Aperis en E ankaŭ broŝuro de Béla *Kun*, gvidanto de la Konsilantar-Respubliko kaj broŝuro de prof. *Buday* pri la „Ekonomia unueco de Hungario.”

27. La neŭtrala movado inter 1920–1945

HUNGARLANDA ESPERANTO-SOCIETO

La reorganizo de HES post 1919 okazis malrapide. La oficiala gazeto restis plu *Hungara Esperantisto*, kies 1919-a oktobra numero objektivite konigis la sukcesojn de E dum la proletardiktaturo, pri kiuj eĉ unu ofendan vorton ĝi ne uzis.

La 16-an de majo 1920 estis Esperanto-Tago en Budapeŝto. Tiam la unuan fojon post la proletardiktaturo la e-istoj kuraĝis porti la verdan stelon. En la provinco ankaŭ en la sekvaj jaroj necesis kuraĝo al tio. Somere en 1922 okazis la unua postmilita kongreso, la IV-a en Miskolc, kiun partoprenis 214 personoj.

Ankaŭ nun troviĝis magistratoj, kiuj malhelpis la agadon de HES. Ekz. en Mezökövesd oni ne permesis la fondon de la HES-grupo, kaj la direktoro de la loka gimnazio ne donis ejon por la E-instruado, „ĉar la esperantistoj estas komunistoj.” La apero de *Hungara Heroldo* (1928) anstataŭ H. E-isto – donis novan puŝon al la movado. Gvidartikolojn de la gazeto verkis konataj hungaraj verkistoj. Karlo *Bodó* estis vera interligito inter HES kaj la hungaraj verkistoj. Du Esperanto-konzertoj en la Muzikakademio, literaturaj vesperoj en la ejo de HES, kun partopreno de verkistoj kaj aktoroj – tiam la ĉefa aranĝanto estis d-ro F. *Szilágyi* – prezentis la necesan publikecon por Esperanto. La sistema eldono de la Gazetservo (organizata de P. *Balkányi*), apero de tri jarkolektoj de la Hungara Esperanto-Jarlibro (en la redakto kaj eldono de Ludoviko *Kökény*), la aranĝaĵoj de la Universala Kongreso de Esperanto, multaj gazetartikoloj atentigis pri Esperanto. En tiuj ĉi laboroj partoprenis ankaŭ la aliaj Esperanto-societoj. La aranĝo de la landaj kongresoj de post 1935 transiris al la Federacio. HES plu laboras, sed la ĉiam pli faŝisma politiko forprenas la aeron de ĉiu humanisma aŭ demokratia movado.

ESPERANTA RONDO AMIKA

Kiam Julio *Baghy* revenis el la Siberia militkaptitejo en 1921, li tuj fervore eklaboris. Li gvidis i.a. kurson en HES kun ĉ. 20 membroj, kiuj fondis la grupon *Esperanta Rondo Amika*. ERA dum kelkaj jaroj estis vera motoro de la movado en Budapeŝto. Aranĝo de postkongreso en la hungara ĉefurbo post la U.K. en Praha en 1921, gazetservo, kursgvidado, kunlaboro al la ĵus fondita *Literatura Mondo*, aranĝo de amikaj kunvenoj, tiu de „vivaj gazetoj” – ĉio ĉi apartenis al la labortereno de ERA. La membrojn kunligis amika solidareco kaj en la movado kaj en la privata vivo. La membroj havis apartan esperantan karesnomon, kiel „Paĉjo” (J. *Baghy*), „Blondulo”, „Filo”, „Poetino”, „Bubo” ktp. Antaŭ la kunsido la membroj kantis la ERA-himnon *Nova Sento* de *Baghy*. ERA sukcesis eldoni la unuan poemkolekton de J. *Baghy* la litografitan „Bukedon”, antaŭulon de *Preter la vivo*.

ERA devis ĉesi post kelkara agado pro nefavoraj cirkonstancoj, sed ĝi reviviĝis en 1934 kaj tiam ĝi posedis jam propran hejmon kun bela salono, biblioteko ktp. Ankaŭ tiam la vivaj gazetoj havis altan altirforton.

ERA prezentis grandan helpon al la tuta hungara movado. Kiam HESL ĉesis, ankaŭ multaj HESL-anoj trovis hejmon en ERA. Kvankam la „interna ideo”, „harmonio” ktp. ne prezentas kontentigan ideologian bazon por socialisto, — kiel idealismaj konceptoj, — tamen inter la „neŭtralaj” esperantistoj ERA plenumis gravan rolon kaj ĝi utilis ankaŭ al multaj estintaj HESL-anoj.

UNIVERSALAJ KONGRESOJ EN BUDAPESTO

Komence de aŭgusto 1929 okazis en Budapeŝto la 21-a Universala Kongreso de Esperanto, al kiu aliĝis 1255 membroj, inter ili 294 hungaroj.

Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estis Jozefo *Mihalik*, ĉefsekretario Paŭlo *Tolnai*, kasisto Elek *Tolnai*, sekretario Paŭlo *Balkányi*. Ili kvar faris plej multe da laboro. Krom ili LKK havis 9 membrojn kaj multajn helpantojn.

Kvankam la Kongreson invitis la urbestro de Budapeŝto, parto de la magistratoj rigardis kun certa suspekto la prepar-laborojn. LKK sukcesis ricevi nur malfrue aŭ tre ŝpareme la moralajn kaj materialajn subtenojn, kiujn ricevas similaj kongresoj.

Ni ellevas la feston de la laborista societo HESL, kvankam oficiale ĝi ne partoprenis la Kongreson. La ĉeestantoj akceptis indigne, ke la hungara polico malpermesis deklami poemojn de Petőfi kaj Kassák.

La Kongreso starigis marmortabulon en la Reduto al Stefano *Széchenyi*, apoganto de la ideo de internacia lingvo.

La Paneŭropo-kunsidon ĉeestis pli ol 300 kongresanoj, kaj pluraj alparolantoj konstatis, ke la projekto sen Sovetunio kaj Britio ne estas ĝuste solvebla.

En 1966 Budapeŝto denove akceptis UK-n.

ESPERANTO-FEDERACIO KAJ LA FAKAJ SOCIETOJ

Ĝis la mezo de la 1930-aj jaroj HES estis la sola burĝa Esperanto-societo en Hungarlando. Ĝiaj membroj reprezentis diversajn mondkon-

ceptojn, inter ili troviĝis multaj progresemuloj, ankaŭ socialdemokratoj. Multajn el ĝiaj membroj vivigis la „interna ideo”. La oficiala gazeto de HES estis tiam *Hungara Heroldo* (fondita kaj kvin jarojn redaktata de L. *Kökény*). Ĝi sur la frontpaĝo anoncis sian programon: 1. Servo por la paco, libereco kaj progreso. 2. Diskonigo de la hungara kulturo. 3. Akcelo de la fremdultrafiko. Sed ne al ĉiuj hungaraj esperantistoj plaĉis tiu ĉi programo, pli precize la 1-a punkto. Vere, ankaŭ HES pretendis la subtenon de la tiamaj hungaraj registaroj, atendis de ili favoraĵojn por E. Sed la malkontentuloj aŭ la „realistoj” sub gvido de prof. Jozefo *Mihalik* en 1935 fondis la *Hungaran Esperanto-Federacion*, ĝuste kun tiu celo, ke ĝi reprezentu Esperanton ĉe la oficialaj faktoroj. Per la fondo de la Federacio, la hungara Esperanto-movado tiriĝis politike al dekstra flanko. La alvoko de la Federacio akcentis: kiu restas ekster tiu ĉi movado, „eĉ vorton ne rajtas havi”, ĉar „kiu ne estas kun ni, estas kontraŭ ni”.

Kvankam multegaj e-istoj ne konsentis kun tiu ĉi programo, HES kaj la intertempe fondiĝintaj fakaj societoj aliĝis al la Federacio. La Federacio fondis ankaŭ apartan sekcion por la laboristoj.

Ankaŭ *Hungara Heroldo* aperis de 1937 en la eldono de la Federacio. Kelkaj ĝiaj artikoloj estas riproĉindaj pro sia naciisma enhavo. La Federacio eldonis ankaŭ Popolklerigajn Kajerojn, ekz. pri Stefano *Széchenyi*, Aleksandro *Körösi Csoma*, Francisko *Rákóczi* ktp.

Malgraŭ la dekstrula direkto, la Federacio kontraŭstaris al tiu oficiala intenco, ke ĝi forstreu la judojn el la membraro. La afergvida prezidanto *Mihalik* klopodis savi la vivon de juddevenaj junuloj.

La Federacio ĝenerale ĝuis” la subtenon de la registaroj, ĝis la periodo de la sagkrucanoj, kiuj „principe” kontraŭbatalis Esperanton kaj aperigis artikolojn kontraŭ la lingvo.

De 1935 ĝis la liberigo krom la Federacio kaj HES agadis la *Katolika Esperanto Societo*, la *Hungara Esperanta Pedagogia Asocio*, – sub prezido de Alfonso *Pechan*, – la *Skolta Esperanto-Rondo* kaj la Esperanto-Sekcio de la Hungara Nacia Asocio, kiu lasta fakte konsistis el manpleno da homoj, servantaj per esperantlingva propagando la oficialan, dekstre naciisman hungaran politikon. La Katolika Societo en 1930 aranĝis en Budapeŝto la XV-an Katolikan E. Kongreson. En 1938 estis aranĝita en la hungara ĉefurbo la *Unua Eŭkaristia Esperanta Mondkunveno*. Krom la pozitivaj flankoj montriĝis ankaŭ negativaj. Ekz. la papa ĉambelano, prof. Francisko *Erdey*, eĉ post plurfoja sinanonco ne sukcesis paroli kun la prezidanto de la hungara radio. La skoltoj laboris tre

vigle, dum kelkaj jaroj. De 1931 oni aranĝis multajn kursojn por la skoltaj, por uzi Esperanton dum la ĵamboreo en aŭgusto 1933 en Gödöllő.

HUNGARAJ ESPERANTISTOJ EN EKSTERLANDO

En la unuaj tempoj kvar hungaraj presistoj laboris en internacia tereno por E: Paŭlo *Lengyel*, Kajetano *Seper*, Izoro *Polgár* kaj Viktoro *Polgár*. La du unuaj kompostis de 1900 la gravan revuon *Lingvo Internacia* en Szekszárd. En 1904 ili laboris en Parizo ĉe la *Presa Esperantista Societo*. Seper post nelonga tempo forlasis Parizon kaj en la franca urbo *Coulommiers* eklaboris en granda presejo kaj fariĝis oficiala Esperanto-korektisto de *La Revuo* ktp. En 1914 ambaŭ pioniroj estis internigitaj. En Parizo laboris ankaŭ la fratoj *Polgár*, unue Viktoro, poste Izoro *Polgár* fariĝis posedanto de la *Centra Presejo Esperantista*.

En 1923 en Nürnberg fondiĝis *Tutmonda Polica Ligo*, laŭ iniciato de Aŭgusto *Marich*. Kiel la Enciklopedio konstatis: „Marich emis ordigi la ordonkaj fine atingis kaoson kompletan. Li uzis fantaziajn statistikojn... Multe da energio, tempo kaj mono estis perditaj per la agado de Marich.” (Tamen pluraj seriozaj esperantistoj havis alian opinion. D-ro Eŭgeno *Fuchs* diris, ke Marich meritas statuon jam en sia vivo.)

Pro politikaj persekutoj aŭ similaj motivoj multaj hungaroj elmigris en aliajn landojn. Paŭlo *Robicsek* post 1919 fuĝis al Sovetunio kaj tie li plenumis gravajn produkt-organizajn taskojn. Ankaŭ tie li laboris por E. Georgo *Gábor* kaj Ralph *Bonesper* trovis novan patrujon en Usono. *Bonesper* ĝismorte energie laboris por E. Jozefo *Batta* en 1925 fariĝis politika elmigrinto, kaj en diversaj landoj li efike agadis en la laborista E-movado.

Du hungaroj: Julio *Baghy* kaj Andreo *Cseh* triumfe apostoladis por E en diversaj landoj. Multaj miloj lernis de ili E- n. Alta grado de psikologia sento kaj aktora talento kapabligis ilin al tre konsiderindaj rezultoj. Ili ambaŭ apartenas al la plej popularaj apostoloj de Esperanto.

D-ro Francisko *Szilágyi* jam de 1932 komencis gvidi kursojn en Svedio. Post kelkaj jaroj li definitive ekloĝis en tiu ĉi norda lando, kaj per verkado, redaktado kaj instruado li servis bonege por la kulturo de E. Krom li instruis tri jarojn (1932-34) en Svedlando Tiboro *Réthelyi*. La pentroartisto Stefano *Bartha* kaj Helena *Galambos* ankaŭ komence de la 1930-aj jaroj gvidis sukcesajn kursojn en Danlando.

Troviĝis hungaraj laboristoj, kiuj estis sen laboro en sia patrio, do ili elmigris al eksterlando. En la komenco de la 1930-aj jaroj Adalberto

Reiber el Budafok per piede ekiris kaj pasigis tri jarojn en Aŭstrio, Germanio kaj Francio. Li laboris fervore en kadro de SAT. Aperis de li multaj tradukoj de hungaraj noveloj en E-aj gazetoj. Poste li verkis kvin dikajn librojn pri siaj vojaĝoj, suferoj kaj aventuroj. (Bedaŭrinde la verko troviĝas ankoraŭ en tajpita formo.)

Nun kelkaj kuriozaĵoj. Ladislao *Zinner* – kiu estis e-isto en la urbo Ujpest – en Brazilo atingis artistan karieron, iĝis univ. profesoro, kaj helpas multe ankaŭ al la tiea Esperanto-movado. Jozefo *Major*, kiu lernis Esperanton en Budapeŝta laborista grupo en 1919, poste vojaĝis tra multaj landoj, eĉ estis sekretario de la japana spirita movado *Oomoto*. Nun li vivas en Nov-Zelando.

Ankaŭ la internaciaj Esperanto-geedziĝoj – ĉe kiuj la geedzoj estas el alia nacio – estas menciindaj. Oni kalkulas cirkaŭ 40 tiajn geedziĝojn, ĉe kiuj la edzo aŭ la edzino estis hungara. La plej interesa estas el tiuj la edziniĝo de la hungara Klara *Maitinsky* al la soveta Eŭgeno *Blinov* en Moskvo en 1931, – la plej interesa, ĉar la edzino en sia nova patrio atingis tre altan sciencajn karieron en la lingvistiko.

28. *Hungaroj de movado kaj literaturo*

PAŬLO BALKÁNYI

Paŭlo *Balkányi* naskiĝis en 1894 en Budapeŝto. Li laboris en la Kreditbanko poste en la Hungara Nacia Banko. Lia esperantista kariero komenciĝis en 1909, kiam lia patro (kuracisto) portis hejmen E-lernolibron el la E-fakkunsido de la Internacia Kuracista Kongreso en Budapeŝto. *Balkányi* senhezite lernis la lingvon kaj jam de 1912 energie kaj sur la plej diversaj terenoj laboradis por disvastigo de E. Liaj unuaj informoj pri lia patrujo kaj ankaŭ longa traduko aperis jam antaŭ la unua mondmilito en *La Revuo* (Parizo). Li partoprenis en la fondo de HESL.

Kiel soldato li ricevis leterojn de siaj eksterlandaj amikoj eĉ en la tranĉeo. Jam de 1918 multe laboris por starigi Esperanton en servon de la hungara fremdultrafiko kaj de la Budapeŝta Internacia Foiro. La hungaraj komercaj ĉambroj plurfoje komisiis lin, por reprezenti ilin dum E-aj kongresoj.

Li daŭrigis sian fervoran laboron dum la Konsilia Respubliko. Li tradukis la broŝuron de Béla Kun. Post falo de la Konsilia Respubliko la polico konfiskis la broŝuron, kaj nun ekzistas el ĝi nur unu ekzemplero. La polico ankaŭ arestis lin, kaj el la karcerio liberigis lin Marich, kiu tiam estis policoficisto. En 1921 li eldonis la unuan verketon de K. Kalocsay. Li kunlaboris en la redakcio de *Literatura Mondo* kaj de post tiu tempo li kunlaboris al preskaŭ ĉiu grava E-gazeto. En lastaj dek jaroj de lia vivo tre valora estis lia kontribuo al la Hungariaj revuoj: Hungara Vivo, Juna Amiko kaj Paco.

Balkányi dum longaj jardekoj gvidis E-kursojn, inter aliaj ankaŭ por skoltoj kaj por pioniroj de la pionirfervojo. Li konstante observis la evoluon de la instrumentoj kaj kun pedagoga instinkto lerte adaptis tiujn al siaj propraj instruaj konceptoj.

El ĉiuj hungaraj e-istoj dum kvin jardekoj li informis plej persiste kaj sukcese la eksterlandan gazetaron pri la okazaĵoj de la hungara kulturo. Dum longa tempo li estis Hungaria ĉefdelegito de UEA. Li multe laboris ankaŭ por tio, ke la junularo konatiĝu kun E. Dekomence li estis fervora kunlaboranto de la pacmovado. En tiu kvalito li meritis ankaŭ la rekonon de la Hungara Landa Packonsilantaro kaj de la Societo de Hungara-Soveta Amikeco.

Li mortis post plurjara suferiga malsano la 25-an de febr. 1977.

GÉZA BÁRCZI

Géza Bárczi (1894–1975) lingvisto, univ. profesoro, membro de la Hungara Scienca Akademio, la plej rekonata scienculo de la esploro kaj historio de la hungara lingvo. Kiel gimnaziano li eklernis E-n (pr.1908). Laŭ lia propra deklaro. La rapida rezulto: facileco de tiu lingvo vekis lian interesigon pri lingvoj „E. bezonas dekonan penon kompare kun aliaj

lingvoj, kaj ĉar ĝenerale nur la lernado de la unua fremda lingvo estas malfacila, tiu malfermas la pordon al la aliaj.” Li mem „kiu en pluraj lingvoj ne bezonas interpretiston, sentis la nekredeblan avantaĝon de E.” En la gimnazio li lernis germanan, francan, latinan lingvojn, en la universitato li enskribiĝis por la fakoj hungara, latina kaj greka, en la kolegio Eötvös por la germana kaj turka... Unue li volis esti turkologo, sed ricevinte stipendion en Francio, li okupiĝis pri romanistiko. Tie lin atingis la unua mondmilito. Li estis internigita en koncentrejon. Pro malsaniĝo oni ebligis, ke li iru al Svisio, kie en la universitato de *Lausanne* li studis krom la franca, ankaŭ la hispanan, italan. Reveninte en Hungaron (1919) li studis du jarojn en universitato de Budapeŝto, kie li ricevis diplomon pri hungara kaj franca lingvoj. Post instruado en mezlernejo sekvis universitatoj *Debrecen* kaj *Budapeŝto*: docento, fine profesoro. Li „supozis, ke fine la ĝusta vojo: latinidaj lingvoj”. Li verkis francan lernolibron kaj inter aliaj lingvistikaj libroj: „*Franca fonetiko kaj morfologio*”, – sed la sekva: „*Francaj fremdvortoj en la hungara lingvo*” jam estis kvazaŭ transiro al lia vivdestino: hungarologio (1940), do 47 jara, li okupiĝis pri *Hungara Senceksplika Vortaro*, kies unua volumo sub lia ĉefredaktado aperis nur en 1959 (entute 7 grandaj volumoj). Inter aro da filologiaj verkoj la plej gravaj estas liaj „*Hungara Etimologia Vortaro*” (1941) kaj la „*Biografio de la Hungara Lingvo*” (1962), en kiu li priparolas la pr. trimil jaran historion de hung.lingvo. Liaj esploroj montris, ke el la pr. 900 praaj vortoj, kunportitaj el la prapatrio de la finno-ugraj triboj (finnoj, estonoj, hungaroj, laponoj ktp.) iĝis la nuna vortriĉa hungara lingvo per derivado, vortfarado, kunmeto kaj – transpreno el aliaj lingvoj jam dum la migradoj kaj la najbara kunvivado.

La sama procezo okazis ankaŭ ĉe la aliaj modernaj lingvoj, nomataj naturaj lingvoj, – simile oni povas nomi ankaŭ E-n natura lingvo, evoluinta el la praesperanta (hazarde!) ĝuste pr. 900 vorta lingvo de Zamenhof, la nuna riĉa lingvo.

Bárczi plej aktive en sia junaĝo – antaŭ ol vojaĝi al Francio – okupiĝis pri E, krom kelkaj originalaj poemoj, liaj tradukoj el la hungara: ĉefe noveloj (el *K.Lovik*, *V.Rákosi* ktp.), poemoj el Petőfi, aperintaj en *La Verda Standardo* sub pseŭdonimoj: *Cezaro Bárczi*, *COBO*, *Dusano*). Lia plej grava, pionira traduklaboro estis tiu de „*La Tragedio de l' Homo*”, el kiu li tradukis la unuajn sep scenojn.

Post rehejmiĝo tiom obsedis lin la hungarologiaj laboraĵoj, ke li aktive ne povis partopreni la Hungariajn E-movadojn. Tamen dum 40 jaroj li konstante konservis sian amon, interesiĝon por E, – sed neniu

konjektis jam, ke sub la iama Cezaro Bárczi kaŝiĝas la granda scienculo Bárczi. Kalocsay – ĝuste pro la iama traduko de la *Tragedio* – komencis suspekti pri la identeco, kaj skribinte leteron al Bárczi (1954) revokis en li la aktivecon, kiu en faktoj realiĝis ĉe apero de la E-Hungara vortaro de Pechan (1958), kun kiu li persone kontaktiĝis. Bárczi per sia aŭtoritato, prelegoj, publika persona ekspozicio, nombraj artikoloj en hungaraj gazetoj, poste la akcepto de rektoreco (1966) de la I.S. Universitato dum la 51. UK en Budapeŝto, – kaj fine la apogo donita al la E-Fako de Budapeŝta universitato (ELTE) – ĉio ĉi kune efikis kvazaŭ revelacio per E ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande.

LA VIVO DE JULIO BAGHY

Julio *Baghy*, elstara figuro de la literaturo kaj movado de Esperanto, la populara „paĉjo” de esperantistoj el multaj nacioj, naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en Szeged. Liaj praavo kaj avo estis ĉe la lulilo de la naskiĝanta hungara teatra arto. Ankaŭ lia patro estis drama aktoro kaj lia patrino teatra sufloristino. Post siaj gimnaziaj studoj ankaŭ la juna Baghy fariĝis aktoro kaj reĝisoro en diversaj teatroj. Baldaŭ aperis de li hungarlingvaj poemoj kaj noveloj en hungaraj gazetoj. Antaŭ li malfermiĝis brila kariero, kiam en 1914 eksplodis la unua mondmilito sed, post mallonga frontdeĵoro li devis pasigi ses amarajn jarojn for de sia patrujo en rusaj militkaptitejoj. Ampleksa kaj varia kulturlaboro pruntis al li tamen ĝojon kaj certan kontentiĝon, kaj lia entuziasma, flagranta animo transplantis konsolon kaj esperon ankaŭ en multajn liajn samsortanojn.

Julio Baghy direktis teatron, verkis teatraĵetojn kaj ankaŭ ludis en ili, partoprenis en redaktado de hungara literatura gazeto, prezentis Esperanton al multaj militkaptitoj el multaj nacioj.

Kiam en 1921 J. Baghy hejmenveturis al Budapeŝto, li tuj fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Esperanto-movado. Li gvidis diversgradajn kursojn, aranĝis literaturajn vesperojn, fondis ERA-n. Li partoprenis multajn Universalajn Kongresojn, fariĝis komitatano de UEA, membro, eĉ

vicprezidanto de la Akademio. En la 1930-aj jaroj kiel Cseh-metoda instruisto li gvidis multajn kursojn en Nederlando, Estonio, Francio ktp. Tiutempe li jam estis mondkonata poeto, roman- kaj dramverkisto en E, unu el niaj plej elokventaj oratoroj. Multajn el liaj verkoj – ankaŭ kelkajn grandajn – oni tradukis el E al naciaj lingvoj. Almenaŭ dudek naciaj literaturoj enhavas pecojn el la verkaro de Baghy. Kiam la dua mondmilito furiozis, J. Baghy vivis konstante en Budapeŝto. Post la liberigo en la Budapeŝta Polica Klubo li bone utiligis siajn multflankajn kapablojn. Kaj senhalte daŭradas lia laboro por Esperanto. Li gvidas kursojn (ankaŭ province), faras ekzamenojn, ellaboras sian detalan lernolibron, vojaĝas al la Universalaj Kongresoj. Ekde 1956 kiel prezidanto li estis ĉe la pinto de la hungara Esperanto-movado. Julio Baghy en laboro, fervoro kaj ankaŭ en talento estas super la normala homo. Sed ja ankaŭ li scias ke ne la „normalaj” homoj estas la veraj movantoj de la kulturo kaj civilizacio.

Pri lia literatura verkado temas en la Literaturhistorio.

Li mortis en Budapeŝto la 18-an de marto 1967 post longa malsano. Lian solenan enterigon aranĝis HEA en la tombejo Farkasrét kun partopreno de pr. mil esperantistoj el la tuta lando.

En 1977 liaj korpaj restaĵoj estis transportitaj al la honora tombejo : la Hungara Panteono, kaj lokigita en la parcelo de verkistoj.

LA VIVO DE KOLOMANO KALOCSAY

K. *Kalocsay*, elstara figuro de la literaturo kaj lingvoscienco de Esperanto, naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaújszántó. Lia patro estis juĝisto. Li vizitis la gimnaziajn klasojn en Miskolc, la universitaton en Budapeŝto. En 1916 li akiris sian kuracistan diplomon. Poste tri jarojn li deĵoris sur la batalkampo. En 1920 li fariĝis kuracisto en la infekta hospitalo László en Budapeŝto. Ĝis 1967 li laboris tie, kiel sekcigvidanta ĉefkuracisto. Kiel medicina verkisto li okupis sin ĉefe pri la infektaj malsanoj. Multegaj medicinaj studentoj studadis el la verkoj de prof. Kalocsay. Li ricevis diversajn distingaĵojn en sia profesio: Li estas doktoro de la medicinaj sciencoj kaj en 1963 li ricevis la titolon de universitata profesoro. Li konis la okcident-eŭropajn kaj la rusan lingvojn, ankaŭ ilian literaturon. Li pianludis kaj ankaŭ komponis. D-ro Kalocsay debutis unue kiel hungarlingva poeto. Liajn poemojn aperigis en 1921 la revuo „*Nyugat*” (Okcidento).

Kalocsay lernis Esperanton en 1911 en Miskolc, sed plene li lernis la lingvon nur dum la sekvanta ferio, kiam li – kune kun sia amiko Ludoviko *Győry-Nagy* – faris en Miskolc kurson por po 20 gelernantoj. En la 1920-aj jaroj li pli vigle partoprenis la movadon, ofte deklamis, eĉ rolis kiel aktoro en Esperantaj teatraĵoj. Li estis bona oratoro. Dum la Universala Kongreso en 1922 en Helsinko li deklamis sian *Kongresan Runon* laŭ formo de la *Kalevala*. Kalocsay poste fariĝis ofte prezidanto aŭ alia gvidanto de Esperanto-societoj, sed la kulturalan laboron li ĉiam preferis al la organizaj taskoj.

Kalocsay-n interesis ĉiuj fenomenoj de la homa vivo, do ankaŭ la sociaj problemoj. En 1929 la hungara polico konfiskis lian kolektaĵon *Ni kantu*, ĉar en ĝi troviĝis ankaŭ laborist-tendencaj poemoj. Neforgesinde estas ankaŭ tio, ke en 1947 en poemo li la unua protestis pro la enkarcerigo de la turka poeto *Nazim Hikmet*.

Kalocsay estis ĉefredaktoro de la grava revuo *Literatura Mondo*, dum ĉiuj tri periodoj. Li malavare donis helpon kaj konsilojn al verkistoj-kolegoj.

Kalocsay estis laboristo de la lingvo. Li kalkulis verso-taktojn per la fingro, esprimis siajn sentojn proprajn, interpretis la sentojn, kiujn iam elpoetis aliaj koroj, krome li redaktis, korrektis, kaj ofte ankaŭ baraktis pro nekompreneo, sed kelkfoje lin karesis ankaŭ rekono – ni legas en liaj konfesoj (Pri lia literatura agado temas en la Literaturhistorio.)

Diversajn verkojn, interpretitajn de Kalocsay el la hungara al E, oni tradukis el lia Esperanta traduko al aliaj naciaj lingvoj, eĉ al la ĉina. („*Johano la brava*” de *Petojĵi* ktp.) Pro traduko de „*Johano*” la ĉina poeto *Sun jon* ricevis hungaran ŝtatan distingadon.

„Du tute diversaj geniuloj: Kalocsay kaj Baghy samtempe donis lumon al la vivo de Esperanto, kies literaturo ricevis de ili ĉiujn kondiĉojn de plenvalora lingvo” – konstatis d-ro Francisko *Szilágyi*, talenta hungara verkisto de Esperanto.

Kolomano *Kalocsay* mortis en Budapeŝto la 27-an de febr. 1976. Granda aro de internaciaj funebrantoj akompanis liajn cindrojn al la familia kripto en tombejo de *Aszód* (50 km-ojn de Budapeŝto).

ALFONSO PECHAN

A. *Pechan* naskiĝis en Pécs (1902). De 1922 li vivas en Budapeŝto, kie en la Universitato „Pázmány Péter” li akiris profesoran diplomon.

Li verkis lernolibrojn pri matematiko, fiziko, meteorologio. La lingvon li lernis en 1920. Li vigle partoprenis en la E-a vivo en Pécs, kaj poste en Budapeŝto. Dum 55 jaroj li instruis E-n, eĉ en la plej malfacilaj tempoj. La agado de Pechan krom la instruado etendiĝis ankaŭ al la tereno de la organizado, ĉefe inter pedagogoj. Li estis prezidanto de la H. E-Pedagogia Asocio (1935-1945), kaj poste prezidanto de la Landa Ekzamena Komisiono. Li estis kunlaboranto, lingva kontrolanto de la E-dissendoj de Hungara Radio inter 1965-1968. Ĝis nun li estas organizanto kaj gvidanto de mezgradaj kaj superaj kursoj, kaj landa inspektoro de lerneja kaj eksterlerneja instruado. Li estas ankaŭ regula kunlaboranto de la hungarlandaj E-revuoj. Lia ĉefa okupo estas leksikografio: li redaktis ampleksajn H-E kaj E-H vortarojn, kiuj ĝis nun atingis kvar eldonojn. Dum la 51-a UK li estis LKK-ano pri Arta festivalo.

ISTVÁN SZERDAHELYI

I. Szerdahelyi naskiĝis en *Avafelsőfalu* (en Transilvanio, nun Rumanio) en 1924. Post fino de universitato li akiris du doktorajn diplomojn: pri internacia juro kaj pri filozofio. Lia onklo; Ludoviko *Dér* verkis lian interesiĝon pri E en 1949, kaj en la sekva jaro li komencis instrui en lernejo rusan lingvon, kaj – samtempe ankaŭ E-n.

Komencinte la vivon de pedagogo, lia interesiĝo direktiĝis pli kaj pli al lernolibroj de lingvoj, lerniloj, metodoj, teorio kaj praktiko de lingvoinstruado. Ekde tiu tempo unu post la alia aperis liaj studoj, lingvoolernolibroj (v.ĉap. 31: Lernolibroj). Liaj baz- kaj mezlernejaj, poste altlernejaj ruslingvaj lernolibroj estas uzataj en la koncernaj lern-institutoj.

Krom pr. 20 ruslingvaj didaktikaj verkoj, d-ro Szerdahelyi verkis pr. 12 E-ajn librojn, kelkajn en plurlandaj eldonoj, kaj granda aro da artikoloj aperadas de tiam diverslande pri lingvistiko, interlingvistiko, metodiko, organizado de E-a vivo, kibernetiko en lingvoinstruado, enkonduko de E en diversajn lernejojn, precipe en altlernejojn, ktp. Pri similaj temoj li multe prelegis por fakuloj, en- kaj eksterlande en konferencoj, kongresoj.

Ankaŭ lia aktivado en la instruado disvastiĝas daŭre. La unua jardeko de tio okazis parte en provinco, kiam li kvazaŭ solece, neinfluate serĉis la vojon, rimedojn por ekkoni kaj solvi la problemojn de E-instruado, – apenaŭ li havis kontakton kun esperantistoj, societoj. Li aktivigis ĉe apero de E-aj vortaroj (1958), jam en la ĉefurbo. Kaj li unu post

la alia aperigis siajn lernolibrojn, estis kunverkinto de Gvidlibro (instrumetodo, interlingvistiko). Komenciĝis ankaŭ liaj partoprenoj en diverslandaj kursoj: en 1970 en la IV. kaj postaj Ped. Seminarioj en Szeged, poste en Bulgario (Burgas), kiun sekvis longa vico de kursoj, prelegoj (Finnlando, Pollando, F.R. Germanio, Aŭstrio, Jugoslavio, Nederlando ktp.). Pri la agado en Paderborn, Ljubljana v. en ĉap. pri Instruado).

La plej grava agado de Szerdahelyi estis liaj rezultoj atingitaj en la universitata instruado. Laŭ liaj tiurilataj iniciatoj ELTE akceptis la proponon kaj aŭtune de 1966 jam komenciĝis la unua semestro en la kadro de *Ĝenerala Lingvistiko*. Fakgvidanto estas ĝis nun Szerdahelyi.

En Paderborn (Germ.) la *Instituto por Kibernetika Pedagogio* inter aliaj sciencaj laboroj celas per eksperimentoj ellabori novajn instru-sistemojn, programojn, programitan instruadon kaj novajn teknikajn rimedojn. De hungara parto kunlaboras tie d-ro Szerdahelyi. La eksperimentoj interalie montris, ke E-n meznombro oni povas ellerni dum sepoble (aŭ eĉ dekoble) pli mallonga tempo, ol iun ajn alian lingvon.

Ekzemple du mil horojn bezonas francoj, italoj por lerni la germanan lingvon, dum la angloj bezonas 1500 horojn por lerni la germanan, nederlandan, danan, francan aŭ italan. Ĉiuj nomitaj lingvanoj povas lerni E-n dum 150 horoj!

Tri-jara eksperimento de kvin najbaraj landoj estis iniciatita de Jugoslavia E-Ligo kaj de Universitato de *Ljubljana*. La eksperimenton partoprenis bazlernejoj, kiuj komencis lerni E-n en la 4-a klaso, kaj lernis plu en la 5-a kaj 6-a klasoj. Sub samaj kondiĉoj estis instruata alia fremdlingvo por komparo. La eksperto-gvidanto de tiu tri-jara laboro estis d-ro Szerdahelyi. La konkludo post la eksperimento estis, ke la bazlernejoj multe pli rapide lernas E-n, ol iun ajn alian lingvon, – kaj ke posta, aŭ eĉ samtempa lernado de alia lingvo fariĝas pli facila.

29. En politika subpremo

H. E. SOCIETO LABORISTA

La terenoj de la laborista movado post 1919 estis ĉefe la sindikatoj, la organizaĵo de la socialdemokrata partio. Ĝis 1921 HESL fondis ses, ĝis 1929 tridek grupojn.

La pligrandiĝo de la movado necesigis eldoni propran societan gazeton. En 1923 aperis presite la oficiala organo *Antaŭen*, sed nur 5 numeroj. De 1926 ĝis 1928 HESL eldonis en hungara lingvo komunan gazeton kun la laboristaj kontraŭalkoholistoj kaj naturamikoj.

La Centro de HESL de tempo al tempo aranĝis literaturajn konkursojn, aranĝis ankaŭ klerigajn prezentadojn kaj literaturajn vesperojn. Es-tis popularaj la ekskursoj, precipe la ŝipekskursoj.

La societo havis ankaŭ kantistaron de 1922 ĝis 1927, kiu rolis ĉe diversaj laboristaj festoj. En 1928 la societo inaŭguris Esperanto-Fonton en la montaro Pilis, proksime al la vilaĝo Csév.

HESL havis bonajn interrilatojn kun la proksim-landaj esperantistaj societoj, precipe kun la fratsocieto ALLE en Aŭstrio. Al Vieno HESL trifoje organizis karavanojn, ĉiam kun bona sukceso. Delegitoj estis reciproke senditaj al la jarkunsidoj.

HESL aranĝis multajn kursojn en la tuta lando. Estis trispecaj kursoj: komencaj, progresaj kaj superaj. *J. Baghy* ofte gvidis superajn kursojn kaj faris prelegojn pri lingvaj kaj aliaj temoj. La Societo havis 32 lokajn grupojn.

HESL havis ankaŭ eldonan fakon, librovendadon, bone funkciantan propagandan fakon. Dum jaroj en la centro pagita oficisto – Vilhelmo *Bleier* – faris la administradon.

La societo suferis tre multe pro la policaj malpermesoj kaj persekutoj. La pretekstoj estis la plej diversaj, ofte eĉ ridindaj. La magistratoj malamamis entute la socialisman kulturon, sed se nur eta suspekto montrigis, ke en la kadro de HESL laboras ankaŭ komunistoj, la magistratoj uzis krudajn rimedojn, faris arestojn.

En 1934 finiĝis la agado de HESL. Unue la socialdemokrata partio eksigis ĝin el sia kadro, poste en junio 1934 la ministerio disigis la societon, kiu alportis tiom da kultur-valoru por la laboristaro.

ESPERANTO EN LA NELEĜA LABORISTA MOVADO

La magistratoj de la Horthy-reĝimo kruele persekutis la klasbatalajn laboristojn, la komunistojn, kiuj do estis devigataj agadi en la „leĝa” socialdemokrata partio, en la sindikatoj kaj en la kultur-societoj. Inter la societoj havis gravan rolon HESL. Multaj klasbatalaj laboristoj lernis Esperanton, por ke en la kursoj ili povu plenumi ankaŭ utilan ideologian

edukadon. Sed malgraŭ la singardemo, la polico ĉiam arestis kelkajn kamaradojn. En la mezo de la 1920-aj jaroj la laboristajn kultur-societojn jam direktis la neleĝa Hungarlanda Komunista Partio. Katarina *Hámán*, Jozefo *Batta*, Borbála *Szerémi*, Irena *Berger*, Blanka *Quittner*, Aleksandro *Fürst* kaj aliaj instruis krom la lingvo ankaŭ la marksisman ideologion.

Ankaŭ tuttagaj ekskursoj, teovesperoj kaj aliaj kunvenoj bone servis la edukadon. Agadis dum kelkaj jaroj moviĝ- kaj deklamĥoroj.

Tre multaj junaj laboristaj esperantistoj fariĝis aktivuloj aŭ gvidantoj de la Komunista Partio. Tre malfacila estis ilia laboro, ili devis ja gardi sin ne nur de la polico, sed ankaŭ de la estraro de la socialdemokrata partio. Ankaŭ en la centra estraro de HESL estis en plimulto tiuj, kiuj kontraŭstaris la revolucian ideologion. Tiu ĉi estraro eksigis el la societo la gvidantaron de du grupoj, eĉ la tutan I-an grupon.

Post la forpelo de la komunistaj membroj sekvis malluma periodo en la hungara E-a laborista movado. Sed ne en la neleĝa komunista movado, kie ankaŭ multaj e-istoj daŭrigis sian agadon por la laboristaro, por la hungara popolo.

KATARINA HÁMÁN

Katarina *Hámán* (1884-1936) estis eminenta persono en la hungara laborista movado kaj entuziasma adepto ankaŭ de Esperanto.

Dum siaj infanjaroj ŝi laboris sur la plugokampoj de grandbienulo. Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj ŝi finis la mezlernejon memstare. Dum la unua mondmilito ŝi deĵoris kiel kasistino ĉe la granda fervoja stacio Hatvan kaj vidis dum kvar jaroj multegajn vagonarojn, kiuj portis sanajn soldatojn al la batalfrontoj kaj reen multajn vagonarojn plenajn de vunditaj kaj malsanaj soldatoj.

Fine de novembro de 1918 ŝi aliĝis al la ĵus fondita H. Komunista Partio. Post la falo de la laborista reĝimo ŝi laboris en kemia fabriko, kaj baldaŭ fariĝis sindikata sekretariino. De post 1925 ŝi estis plurfoje arestita, kruele turmentita, kaj ĝuste tiuj turmentoj kaŭzis ŝian fruan morton en 1936.

En K. *Hámán* forte vivis la spirito de la internaciismo. Tial ŝi aliĝis tutkore al E. Ŝi faris propagandajn paroladojn ankaŭ en provinco, ŝi korespondis kun eksterlandaj kemiistoj kaj utiligis la enhavon de la ricevitaj leteroj. Ŝi gvidis ankaŭ multajn E-kursojn, kaj inter la priparolitaj temoj okupis la ĉefan lokon la marksismo.

MARTIROJ DE LA FAŜISMO

La faŝisma regado en Hungarlando mortigis ankaŭ multajn hungarajn esperantistojn.

D-ro Jozefo *Takács*, ĉentkuracisto, aktive laboris por E jam de 1910. Kelkajn jarojn li estis ĉefsekretario de HES, redaktoro de Hungara Esperantisto. En sia loĝejo en Nagymaros li fondis Hungaran Esperanto-Muzeon. Estis sunluma printempa tago en 1944, kiam hungaraj ĝendarmoj elŝiris lin el lia hejmo, – al alia loko ili portis liajn edzinon kaj filinon. La 16-an de oktobro apud la vilaĝo Pusztavám germanaj faŝistoj mortbatis kaj mortpafis 212 kuracistojn, inĝenierojn kaj apotekistojn. Inter ili estis ankaŭ d-ro J. Takács.

Alia gvidanto de HES dum multaj jaroj estis Elek *Tolnai*. En 1938 kune kun sia edzino kaj filino li vojaĝis en Anglion, por ekloĝi tie. Sed post sep monatoj ili devis reveni al Hungarlando. Aŭtune de 1944 ankaŭ E. Tolnai estis ĵetita en fervojan vagonon. Li fariĝis kaptito de la fifama tendaro en Bergen-Belsen. Eĉ tie li konigis kaj instruis Esperanton al siaj sortkunuloj. En aprilo 1945 li jam troviĝis en alia murdejo, en Theresienstadt. Tie li mortis de tifo, nelonge post la liberiĝo de tiu teritorio.

Lia bofratino estis Rozinjo *Göndör*, edzino de Paŭlo *Tolnai*. Ankaŭ ŝi laboris multe por E, instruis kaj faris tradukojn. La 9-an de novembro 1944 – post multaj antaŭaj suferadoj kaj turmentoj – la faŝista reĝimo ankaŭ ŝin elpelis el ŝia loĝloko. Ŝi devis en trupo de samsortanoj piediri tage kaj nokte, malsate kaj soife ĝis Lichtenwörth en Aŭstrio. Du tagojn post la liberiĝo de la tendaro ŝi mortis.

Pereis ankaŭ multaj aliaj samideanoj, ekz. d-ro Eŭgeno *Fuchs*, la unua Esperanto-tradukinto de Petőfi, Aleksandro *Laquer*, la fervora propagandisto, Emeriko *Farkas*, membro de la kontraŭstara movado.

Sed troviĝis ankaŭ multaj gekamaradoj, kiuj bone sciis, ke necesas radikalaj metodoj por frakasi la faŝismon kaj ŝanĝi la ekzistantan sociordon. Inter tiuj bravaj figuroj de la laborista movado estis ankaŭ esperantistoj. Julio *Kulich* (1914-1944) estis gvidanto de la junulara movado, ankaŭ li lernis Esperanton kaj korespondadis kun diverslandaj gekamaradoj. Li estis murdita en Dachau. – Talenta kaj fervora juna kamarado estis Georgo *Kilián* (1907-1943). En 1927 li fariĝis helplaboristo en la fabriko Egyesült Izzó en Ujpest, kaj baldaŭ ankaŭ gvidanto de la komunista grupeto. Ankaŭ tiutempe li komencis lerni E-n. En 1929 li partoprenis en Leipzig la SAT-Kongreson. En 1932 la polico

arestis lin samtempe kun Sallai kaj Fürst. Kiam eksplodis la dua mondmilito, Kilián restadis en Moskvo. En 1943 per flugmaŝino li volis reveni al sia hejmolando, sed li ne atingis ĝin, mortis inter nekonataj cirkonstancoj.

30. *Nova epoko post la dua mondmilito*

ESPERANTO POST LA LIBERIGO

Tuj kiam en la lastaj monatoj de 1944 la bataloj ĉesis en Sudorienta Hungarlando – en Orosháza, Békéscsaba, Hódmezővásárhely kaj Gyula la Esperanto-movado reviviĝis kaj la esperantistoj de la nomitaj urboj havis konferencon en Orosháza.

La hungara ĉefurbo liberiĝis la 13-an de februaro 1945 kaj la Hungaria Esperanto Societo Laborista, poste ankaŭ la Hungarlanda Esperanto-Societo komencis sian agadon.

En januaro 1946 en Gyula aperis la *Sudhungara Stelo*, kiu plenumis gravan rolon en la ekirigo de la movado.

La ĉefurbaj gvidantoj de la movado klopodis unuavice por la lerneja instruado de Esperanto. En 1946 estis du gravaj enketoj pri la problemo en la hungara parlamento, kaj la favoraj dekretoj sekvis unu post la alia. La lerneja sekcio de la ĉefurbo en 1947 aranĝis entute sep kursojn por pedagogoj, partoprenis ĉ. 180 pedagogoj. La pli vastan instruadon de E subtenis printempe de 1948 ankaŭ la petskribo de 102 parlamentaj deputitoj.

El organiza kaj ankaŭ el politika vidpunkto estis grava la unuiĝo de la du E-Societoj: HESL kaj HES, kiu okazis la 8-an de decembro 1947.

En decembro 1946 forsonis tra la libera Hungara Radio la unua E-lingva prelego, kiun sekvis ankaŭ aliaj. De la 10-a de marto 1947 ĝis 2-a de oktobro 1949 la radio en la unuaj tempoj semajne unufoje, poste en la lastaj monatoj semajne kvarfoje dissendis Esperantlingvajn informojn por eksterlando. Organizanto kaj radioparolanto estis Ludoviko *Kökény*. Malgraŭ granda interesiĝo pri la dissendoj, post kelkaj jaroj ili estis ĉesigitaj.

En 1965 komenciĝis E-aj dissendoj al Aŭstrio – monate po unu fojo. Pro bonega organizado de V. Szabó sukcesis vekti tiel grandan interesiĝon eĉ ekster Aŭstrio, ke la gvidantaro de Radio konsentis pri ĉiutagaj kvaronhoraj dissendoj. A. Pechan estis komisiita pri lingva kaj fo-

netika kontrolo, V. Szabó estis responda redaktoro kun 6-7 tradukistoj, programanoncantoj (inter ili Jáki, Tárkony). Kiam ŝi pro principaj disopinioj rezignis, ŝian taskon transprenis s-ino Éva Farkas. — Post la UK, en februaro 1969 tamen ĉesis la dissendoj pro teknikaj kaŭzoj.

Estis grava iniciato la *Danubvala Esperanto-Konferenco* en Budapeŝto, pri kiu ekinteresiĝis ankaŭ gravaj faktoroj. La esperantistoj post la liberiĝo daŭrigis siajn kongresojn: en 1946 Orosháza, en 1947 Pécs, en 1948 Győr kaj en 1949 Gyula estis la kongresaj urboj. De oktobro 1946 la gazeto *Hungara Esperantisto* estis la movada organo.

De 1950 ĝis 1955 sekvis silento en la hungara Esperanto-movado.

RENASKIĜO DE LA HUNGARA ESPERANTO-MOVADO

En 1955 denove komenciĝis la Esperanta vivo, unue en Sud-Hungarlando kaj Budapeŝto. La 4-an de aŭgusto 1955 fondiĝis grupo en la Budapeŝta Engels-placo sub prezidanteco de Maria *Kenesei*. La 17-18-an de septembro en la ĉefurbo estis aranĝita Landa Esperanto-Packunveno. La 11-an de julio 1956 aperis ministeria dekreto, laŭ kiu la hungara Esperanto-movado agados en kadro de la Popolkleriga Ministerio sub gvido de la *Hungara Esperanto-Konsilantaro*. Ĝia prezidanto fariĝis Julio *Baghy*, ĉefsekretario Ludoviko *Márton*. Ekde 1956 la reprezentantoj de la hungara Esperanto-movado denove partoprenis la Universalajn Kongresojn. Meze de aŭgusto 1956 en la ĉefurbo okazis sukcesa Esperanto-Renkontiĝo. Post dek monatoj jam funkciis 24 E-fakrondoj en nia patrujo, kaj oni instruis la lingvon ankaŭ en kelkaj lernejoj. En la aranĝo de la Konsilantaro okazis ankoraŭ pluraj renkontiĝoj, el kiuj pleje sukcesis la Orienthungarlanda en junio 1959 en Debrecen kaj la Nordhungarlanda en majo 1960 en Miskolc.

Ankaŭ al MEM (Mondpaca Esperanto-Movado) aliĝis iom post iom multaj hungaraj pacbatalantoj. Tiu ĉi laboro akiris ankaŭ la subtenon de la Hungara Packonsilantaro. La unua hungara eldono de *Paco*, oficiala organo de MEM, aperis en aŭgusto 1956. „Ĝi estis la unua presita esperantlingva presajo ekde ses jaroj en nia lando, kaj la eldonon de tiu ĉi numero ebligis ĉefe k-do Emeriko *Tombácz* en Szeged” — ni legas en la *Paco*.

Entute la Konsilantaro atingis sukcesojn sur diversaj terenoj. Tamen tiu ĉi organiza formo montriĝis nekonvena. La 30-an de oktobro 1960 kunsidis la centra gvidantaro de la Konsilantaro, por doni pli taŭgan for-

mon por la agado. La kunvenintoj konsentis fondi organizaĵon kun statuto sub nomo *Hungara Esperanto-Asocio*.

HEA, komence de sia laboro, en januaro de 1961 en *Pesterzsébet*, aranĝis renkontiĝon de veteranaj esperantistoj. Ĉeestis pli ol 150, inter ili multaj batalantoj el la laborista movado. En septembro 1961 la urbo *Pécs* akceptis ĉ. 300 adeptojn de la internacia lingvo por dutaga amika renkontiĝo.

Antaŭ HEA staris multe da laboro. Faciligis ĝian agadon, ke al la movado donis moralan bazon la rekono far Hungara Socialista Laborista Partio, kio esprimiĝis ankaŭ publike en la Esperanto-amika letero de Johano *Kádár*, unua sekretario de la Partio, kaj fortigis la konscion de la bona laboro ankaŭ la morala kaj materiala subteno de la sindikatoj.

En marto 1961 aperis la unua n-ro de la kvaronjara revuo *Hungara Vivo*, kiu en la redakto de Ludoviko *Kökény* tuj levigis en la unuan vicon de la E-gazetoj. Kaj aperis monate redaktate de d-ro Stefano *Nagy* la movada organo de HEA, *Hungara Esperantisto*, kies nivelo fariĝis pli kaj pli alta. Ankoraŭ en 1961, fine de julio, okazis en Budapeŝto malgranda, tamen grava internacia konferenco, tiu de INEVKOM (Internacia Esperanta Virina Komitato).

1962 estis la jaro de du grandaj kongresoj. En majo (5-11) okazis la 14-a Kongreso de IFEF kaj fine de julio la jubilea kongreso de HEA. Ankaŭ du provincaj urboj sin anoncis per io tre grava. En *Szeged* fondiĝis Esperanto-Muzeo, kaj en *Gyula* oni aranĝis la I-an Someran Esperanto-Universitaton, organizita poste ĉiujare.

Grava sukceso de la hungara movado estis la amasa kaj altnivela 51-a U.K. en Budapeŝto. Tiu ĉi kongreso alvokis la atenton de multaj homoj pri Esperanto, kaj la movado akiris freŝajn fortojn. Kreskis la nombro de la lokaj grupoj, kreiĝis serioza Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd”. En la jaro 1973 komencis aperi la hungarlingva propaganda revuo „Eszperantó Magazin” – poste ŝanĝinta sian titolon je „Világ és Nyelv” (Mondo kaj Lingvo) – redaktita unue de Mihály *Gergely*, poste de Imre *Szenes*. Tiu ĉi dumonata revuo plenumas gravan rolon en la informado de la publiko pri Esperanto.

En 1973 aperis la lerneja revueto *Juna Amiko* fondita kaj redaktata de lingvoprofesoro Géza *Kurucz* (*Kecskemét*) kun internacia kunlaborantaro. Lertaj ilustraĵoj, kantoj kun muziknotoj, bone elektitaj artikoloj faras interesa la gazeton ne nur por la kulturema junularo, sed ankaŭ por plenaĝuloj.

Dum la elekto de la gvidorganoj de HEA en 1977 eniris la estraron ankaŭ du parlamentanoj-esperantistoj. La nove elektita prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio – d-ro Ferenc *Nezvál* – ĝis sia pensiùĝo estis ministro pri justico: li ellernis la Internacian Lingvon en la antaŭmilita laborista esperantista movado.

En la lastaj jaroj multrilate vastiĝis la agado de hungaraj esperantistoj: komenciĝis ampleksa libroeldonado, kreskas la partopreno de hungaroj en internaciaj aranĝoj, vigliĝas la loka agado de grupoj ktp.

31. Aldonoj kaj kompletigoj

LA HUNGARA FERVOJISTA ESPERANTO-MOVADO

Ankaŭ inter la hungaraj fervojistoj estis pioniroj de E. El inter ili menciindaj estas Ludoviko *Jakab* (1859-1929), kies lernolibreto aperis samjare kun tiu de *Barabás* en 1898), kaj ankaŭ Teodoro *Kovács* (1879-1961) fervojoficisto, esp-isto de 1904. Li eklaboris por E en *Fiume* (nun *Rijeka* en Jugoslavio). En 1929 li verkis broŝuron pri E inter fervojistoj, kaj redaktis etan gazeton *Revuo* (1932-33).

D-ro Rudolfo (*Rezső*) *Rajczy* (1886-1919), fervoja oficisto en Debrecen, membro de HESL, partoprenis en 1913 la UK en Bern.

Tuj post la liberiĝo la fervojistoj-esperantistoj vigle eklaboris unue en Suda Hungario. Jam en 1946 la Fervojista Sindikato starigis apartan Esperanto-sekcion, kiu aperigis lernolibron kaj organizis kurson. En tiu jaro okazis la unua landa fervojista E-renkontiĝo en la provinca urbo Orosháza. En tiu ribelema departemento *Békés* ankaŭ tiam daŭris vigla E-vivo, kiam en aliaj partoj de la lando stagnis la movado. Ludoviko *Korsós* kaj Mihaelo *Zsámboki* tiam vojaĝis tra la tuta lando por propagandi, kaj organizi la varbitojn. En tiu tempo aparte menciinda estas la instruista agado de Ladislao *Boronkay* (1907-).

En 1947 la UK en Bern povis partopreni 4 hungaraj fervojistoj, kun gvido de d-ro I. *Bácskai*, kiu estis oficiala sendito de la Hungara Fervojista Sindikato. Tiu vojaĝo al eksterlando estis en la postmilita tempo granda sensacio.

De 1955 denove komenciĝis la kulturlaboro por E. Tiam tre multe faris la fervojistoj precipe en la urbo Miskolc. Tie en la Vagonriparejo aperis dum kelkaj jaroj la gazeto *Verda Vojo*, tiam unusola E-revuetto en Hungario.

En 1956 fondiĝis landa fervojista E-organizaĵo kun apogo de la Ministerio de Trafiko kaj Poŝto. De la sekva jaro la hungara fervojista E-movado fariĝis sekcio de IFEF, kaj aperis la kvaronjara ilustrita revuo *Hungara Fervojista Mondo*. Ĝia fondinto kaj dum pli ol 20 jaroj resp. redaktoro estis d-ro St. Bácskai, redaktoro ĝis 1967 Simono Csóra, post lia morto Paŭlo *Kristek* (1920-). En aŭtuno de 1961 komenciĝis 35 kursoj kaj oni instruis Esperanton ankaŭ en fervojaj edukinstitutoj.

En 1960, kiam fondiĝis HEA, la fervojistoj aliĝis al ĝi kiel Fervojista Sekcio. Grava agado de la Fervojista Sekcio estis la preskaŭ ĉiujare aranĝitaj feriaj kursoj. Ekde 1960 en la Oficiala Horaro de la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj (MÁV) krom en la franca, germana kaj rusa lingvoj ĉiuj klarigoj estas legeblaj ankaŭ en E.

De 1964 funkcias ĉiun jaŭdon vespere E-klubo en la centra domo de Fervojista Sindikato. Tiu klubo portas la nomon „*Julio Baghy*”, kaj laŭ kvaronjare antaŭe fiksita kaj publikigita plano ĝi aranĝas siajn riĉajn programojn, prelegvesperojn, ĝis 1978 pli ol 500. Inter tiuj programoj granda parto estis faka prelego, sed krom tiuj tre variaj, altnivelaj turismaj, literaturaj, artaj, sciencaj, lingvistikaj, ktp. prelegoj altiras grandnombran klubanaron kaj gastojn al la tre komforta, bela klubejo. En la klubejo sonas nur E, kaj ankaŭ la konversacia rondeto de inĝeniero L. *Boronkay* altiras multajn por ekzerci la lingvon.

En la kadro de Ferv. Sekcio funkcias de unu kaj duon-jardekoj vortar-komisiono de fakuloj, rezulto de tiu laboro estis la ambaŭdirekta poŝtvortaro fervojfaka (1968). La sama komisiono partoprenas kontinue en la grandioza laboro transmeti en E-on la leksikan materialon de la seslingva *Lexique General des Termes Ferroviaries* (Leksikono Ĝenerala de Terminoj Fervojaj), kion internacie organizas IFEF.

La Klubo havas tre riĉan bibliotekon, kiun laste kompletigis la riĉa librodonaco de la Pécs-a fervojisto Ludoviko *Ákos* (Kiglits).

La ĉefa celo de tiu ĉi serioza, ampleksa laborado estas interamikigi kun la eksterlandaj kolegoj. Jam multaj karavanoj vojaĝis – po 25-40 esperantistoj – al la najbaraj landoj kaj akiris multajn spertojn kaj ankaŭ geamikojn.

La plej granda sukceso de la hungara fervojista movado – organize apartenanta al HEA – estis la aranĝo de la 14-a Internacia *Fervojista Esperanto-Kongreso* en Budapeŝto en 1962. La ĉefaj kunlaborantoj estis d-ro Stefano *Bácskai*, Ludoviko *Kapitány*, d-ro Emeriko *Pethes*, Simono *Csóra*, d-ro A. *Tarnay*, Szilárd *Bálint* kaj ankoraŭ multaj kolegoj. Ĉeestis la kongreson pli ol 800 eksterlandanoj. La hungara poŝto eldo-

nis E-poŝtmarkon. LKK aperigis tre bonkvalitan gramofondiskon (E-himno, kantoj, muziko).

Bonega E-lingva parolo de ministro Stefano *Kossa* en la malferma kunsido, multegaj favoraĵoj fare de la magistratoj, mirinda orkestra prezento de „*Les Préludes*” de *Liszt* en la groto en Aggtelek kaj multaj aliaj aranĝaĵoj kontribuas al tio, ke la 14-a kongreso restos ĉiam sur brilaj paĝoj de la historio de Esperanto.

ESPERANTO INTER BLINDULOJ

Prof. *Cart*, fama franca pioniro de E. († 1931) estis pioniro ankaŭ inter la blinduloj. Li komencis la unuan kurson de E en svisa blindulejo, kaj konsentante kun la plej sukcesaj disĉiploj, inter ili Harald *Thilander*, fiksas la brajlo-alfabeton por E, donante al la kvin supersignitaj konsonantoj ĉiam la saman punkton. Poste *Cart* brajle presigis gramatikojn de E en diversaj lingvoj.

En Hungarlando la gvidanto de la blindula E-movado estis modesta, persista, ĉiam multe laboranta viro: d-ro Nikolao *Bánó* (1890-1973), kiu perdis sian vidpovon en 1915, kaj de tiam uzis sian liberan tempon por akceli la evoluon de la blindulafero. Li fondis la grupon BELHORO (Blindaj Esperantistoj Loĝantaj en Hungara Respubliko) precipe en la 1920-aj jaroj intense instruis Esperanton en la blindullernejoj. Verkis lernolibron kaj vortaretojn en punktskribo. BELHORO posedas E-bibliotekon, ĝia presejo eldonis jam multajn verkojn kaj verketojn. Komence BELHORO, poste H. *Thilander* (Stockholm) eldonis por la vidantoj apartan revueton: *Ligilo por vidantoj*. Membroj de BELHORO partoprenis ankaŭ internaciajn E-kongresojn.

BELHORO daŭrigis sian agadon ankaŭ post la dua mondmilito. Tiun agadon subtenas la Federacio de la Blinduloj kaj Malforte-vidantoj. En 1961 ĝi helpis eldoni sonbendon kun teksto pri la situacio de la hungaraj blinduloj. La tekston faris variaj diversaj muzikpecoj, ekz. la majstra pianludo de prof. Emeriko *Ungár*, kiu mem estis esperantisto. En 1963. aperis dua sonbendo kun verkoj de Baghy, Kalocsay kaj Bánó. La sonbendojn la Federacio senpage dissendis al multaj radiostacioj kaj societoj.

ESPERANTO EN HUNGARAJ LERNEJOJ

Jam de la komencoj de la E-movado estis fiksita unu el la plej gravaj celoj: enkonduki Esperanton en la lernejojn de la tuta mondo. Nur la

Ĝenerale deviga instruado de E povas ja alporti la tempon, kiam ĉiu homo parolas krom sia gepatra lingvo ankaŭ Esperanton. Sed la luktado por lerneja instruado estis ĉiam malfacila laboro. Unue, ĉar la lernejo eĉ en progresemaĵoj estas konservativa institucio. Due, ĉar ĝuste la lerneja instruado de la antikvaj kaj modernaj lingvoj malfaciligas la seriozan enkondukon de nova lingvo. Tria, ĉar falo de tia registaro aŭ reĝimo, kiu estis favora al E, ofte detruis la sukcesojn, atingitajn en la lerneja instruado de nia lingvo.

En Hungarlando unue dum la 133 tagoj de la proletar-diktaturo en 1919 okazis pli gravaj iniciatoj por la instruado de E. Post falo de la popola reĝimo, ankaŭ la neŭtrala, burĝa E-movado sukcesis atingi, ke la hungara ministerio por instruado en 1920 permesis la mezlernejan instruadon de E en formo de kursoj. Kaj en 1932 dum la Internacia Pedagogia Konferenco en Ĝenevo la delegito de la hungara registaro voĉdonis por la lerneja enkonduko de E. Kunefikis certe ankaŭ tio ke la delegito estis malnova esperantisto (Zoltán *Baranyay*).

Laŭ la donitaj ebloj Esperanton oni instruis en kelkaj lernejoj jam de la jaro 1921, sed kun malgranda sukceso, ĉar la ministerio la permeson sendis al HES, sed ĝi ne aperis en la oficiala organo; krome por la instruado de E ne estis eble ricevi lernokotizon. Malgraŭ tio ĉiam troviĝis kelkaj entuziasmoj, kiuj instruis Esperanton en siaj lernejoj.

En 1923-25-aj jarkolektoj de la revuo *Komerca Fakinstruado* aperis gravaj artikoloj pri E. Ludoviko *König-Király* (Miskolc) el lingva vidpunkto defendis Esperanton. Stefano *Láczner* proponis, ke oni nepre donu eblon por la instruado en komercaj lernejoj. Frederiko *Vincze*, direktoro de la Komerca Akademio, subtenis la instruadon ankaŭ pro la internaciaj kontaktoj. Stefano *Boda* (poste universitata profesoro) en sia tre motivita traktaĵo esploris tiun temon kaj akcentis jene: „Ni instruu Esperanton jam en la nuna tempo, ĉar ĝia instruado jam nun estas utila” ktp.

En 1932 fondiĝis la *Hungara E-a Pedagogia Asocio*, kiu klopodis varbi por Esperantokiel eble plej multajn pedagogojn. — J. *Baghy*, J. *Mihalik* kaj A. *Pechan* fondis Ekzamenan Komisionon en 1939, kiu aranĝas ĉiujn ekzamenojn en la lando sub prezido de *Pechan*.

La ekzamenoj plialtigis la lingvan nivelon de la esperantistaro. La ekzamena komisiono — en niaj tempoj en la kadro de HEA — ekzamenas pri parolkapableco (Diplomo A) kaj pri kursgvidado (Diplomo B), kaj plejnove pri fakaj scioj (fremdultrafiko, tradukarto, ktp. (Dipl. C.)

Post la liberiĝo niaj demokrataj ministerioj donis favorajn dekretojn por la instruado de Esperanto. Ankaŭ la eduko de novaj pedagogoj estis kontentiga. Pli ol 200 pedagogoj partoprenis tiam oficialajn kursojn.

HEA donis ĉiam gravan atenton al la instruado de E. en lernejoj. Laŭ ministeria instrukcio (25.386/1963) E estas instruebla en ĝenerallaj lernejoj en kadro de kursoj, en mezlernejoj kiel eksterordinara lernobjekto. E estas instruata – eksperimente – en kelkaj lernejoj ankaŭ devige. Dum la lernojaro 1977/78 ĉ. 3000 personoj lernis E-n en lernejoj, el tiuj 150 en universitatoj kaj altlernejoj.

La edukadon de hungaraj kaj eksterlandaj E-instruistoj servis la *Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario*, aranĝata ekde 1964 ĉiujare en Szeged sub gvido de dir. d-ro Tibor Szabó. La dek-tagaj seminarioj kun eminentaj en- kaj eksterlandaj prelegantoj altiris ĉiam pli multajn partoprenantojn, tiel kreskis la nombro de la seminarianoj dum tri jaroj de 100 ĝis 500, grandparte eksterlandanoj. Tie la pedagogoj povis partopreni kursojn por komencantoj kaj por akiro de instruista diplomo. La bonan internacian renomon de tiu seminario montris, ke tre multaj eksterlandanoj partoprenis ĝin por pliperfektigi kaj akiro de diplomo – eĉ el tre foraj landoj. Tiel akiris E-instruistan diplomon aŭ pri baza lingvoscio en Hungario ne sole el la najbaraj landoj: Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Bulgario, Pollando, ktp. – sed ankaŭ el Germanio, Sovetunio, Belgio kaj eĉ el Japanio.

Ankaŭ en Szeged funkcias la *Hungarlanda Esperanto-Muzeo* en la kadro de Móra Ferenc-muzeo. La E-an muzeon organizis profesoro Ernesto Farkas, kiu de jardekoj instruas E- n en lernejoj, kaj dum kelkaj jaroj ankaŭ en la tiea universitato. Cetere pluraj el liaj gelernantoj faris abituriantan ekzamenon pri E en gimnazio.

La unuaj ŝtataj lingvoekzamenoj el E okazis en junio de 1966 en la kadro de la lingvistika fakto de Budapeŝta Scienca Universitato. Tiun ekzamenon el diversaj lingvoj povas ekhavi ankaŭ plenaĝuloj, kiuj havas almenaŭ abiturianton. Se iu deĵoras en tia ofico, kie estas bezonata la lingvoscio de E, tiam tiu povas ricevi 8-15 %-an salajroaltigon.

Ekde sep. 1966 en la Budapeŝta Scienca Universitato ELTE lingvofakaj studentoj tria-jaraj povas alpreni al siaj du studobjektoj kiel trian fakon ankaŭ E n. Prof. d-ro Stefano Szerdahelyi instruas ilin semajne po ses horoj. Post tri-jara studado tiuj studentoj iĝis la unuaj ŝtate diplomitaj mezlernejaj E-profesoroj en la mondo.

HUNGARAJ VERKISTOJ PRI ESPERANTO

Tuj post la apero de la unua hungara E-lernolibro (1898) István *Tömörkény* skribis jene: „La nekredible rapide ellernebla kaj labirintojn de reguloj nehavanta Esperanto estas tiu mondlingvo, al kiu apartenas la estonto.”

La plej granda hungara poeto de la XX-a jarcento, Endre *Ady* en 1906 verkis artikolon por la gazeto *Budapesti Napló*. Li atentigis pri la instruado de E. Li uzis ankaŭ kelkajn Esperanto-esprimojn, kaj alvokis, ke la hungaroj „devas stari fronte de ĉia internacieco”. Li proponis instrui mondliteraturon en E en la hungaraj lernejoj.

Ankaŭ aliaj grandaj hungaraj poetoj kaj verkistoj, kiel Mihály *Babits* kaj Julio *Juhász*, skribis por E. J. *Juhász* verkis poemon pri E kaj vizitante E-ekspozicion, verkis ankaŭ amikan artikolon.

Dezső *Kosztolányi* komence estis kontraŭ E, sed enketo en E-societo konvinkis lin pri la pravo de la internacia lingvo.

Ferenc *Móra*, la ŝatata prozisto verkis artikolojn pri la hungaraj prauloj de E, kaj promesis en letero, ke lia nepo, „la sovaĝulo” certe lernos Esperanton.

Pál *Gulyás*, poeto el la urbo Debrecen, sciis Esperanton, eĉ verkis poemon en tiu ĉi lingvo.

La simpatia poeto Tamás *Falu* konstatis i.a., ke „Esperanto estas la radio de la lingvoj... Esperanto volas, ke la homo renkontiĝu kun sia homfrato kaj tuj povu demeti inter ili la ponton de la vortoj.”

La plej granda amiko de E inter la hungaraj verkistoj estis Frigyes *Karinthy* (1888-1938), kiu en artikoloj kaj paroloj batalis por E, eĉ dum kelkaj jaroj estis prezidanto de HES.

HUNGARAJ SCIENCULOJ PRI ESPERANTO

Unue pri la lingvistoj. La unua hungara esperantisto, Gabrielo *Bálint* estis lingvoscienculo de orientaj lingvoj. Li mem skribis i.a.: „Mi trege ĝojus, se anstataŭ la 12 lingvoj, kiujn mi posedas, mi devus zorgi nur pri unu facile lernebla lingvo.” La lingvisto-literaturisto Mózes *Rubinyi* ĉe komenco de la jarcento ankoraŭ kontraŭbatalis Esperanton, sed en 1946 li jam pledis por la lerneja instruado de Esperanto. Aleksandro *Gieswein*, la unua prezidanto de HES, estis ankaŭ lingvoscienculo, li speciale okupis sin pri la orientaj lingvoj. Du granduloj de la hungara lingvoscienco: Zsigmond *Simonyi* kaj Jozefo *Balassa* pozitive taksis la

valorojn de Esperanto. Ambaŭ estis vicprezidantoj de la Propaganda Komitato por Internacia Lingvo en 1918-19. La akademiano Béla *Vikár* estis fervora adepto de Esperanto, li ankaŭ lernis ĝin. Estas konate, ke en 1911 li venigis en Budapeŝton la gruzan-esperantistan poeton *Ciklari*, kaj per lia esperanta interpreto li tradukis hungaren la malnov-gruzan eposon de *Rustaveli*. Univ. profesoro lingvisto Géza *Bárczi*, aŭtoro de hungara etimologia vortaro kaj redaktoro de la granda Hungara Eksplika Vortaro iam aktivis kiel e-isto, redaktis gazeton, tradukis literaturon. Repreninte sian aktivecon li verkis artikolojn pri E, estis rektoro de Somera Universitato de S. U. K. en Budapeŝto.

Pioniran laboron faris Cirilo *Vörös*, piarista profesoro, kiam en 1911 li verkis kaj proprakoste ekdonis tri volumojn de ne-eŭklida geometrio.

En 1931 la Hungara Esperanto-Jarlibro aranĝis interesan enketon pri Esperanto. Respondis ankaŭ kelkaj scienculoj. Francisko *Mező*, la fama scienculo de la Olimpikoj proponis ellernon de E por sportuloj, ĉefe por futbalistoj. La universitata profesoro Kolomano *Molnár* raportis pri siaj spertoj en la rusa militkaptitejo en Siberio, kie li ankaŭ praktike spertis grandan utilon de Esperanto. La meteorologo Antonio *Réthly* en 1925-27 vivis en Malgranda Azio. Foje li renkontiĝis kun ekskursantaj pedagogoj. Ilia gvidanto parolis turke, greke, arabe, armene kaj Esperante. *Réthly* povis paroli hungare, germane, france kaj iomete angle kaj itale. La turka profesoro ekparolis Esperante kaj la hungara kolego komprenis lin. La arthistoriisto Ladislao *Siklóssy* akcentis, ke E estas tiel genie kreita lingvo, ke en ĝi la parolata lingvo estas identa kun literatura lingvo. Li akcentis krome kreon de unueca fonetiko de E.

Plej malkaŝe, decide esprimis sian favoran opinion pri E la akademiano Mór *Korach* en 1963, kiam li prelegis pri la teknika lingvo en la Hungara Scienca Akademio. Li diris i.a.: „Estas nekredeble, ke en ĉiuj mezlernejoj de la mondo centmiloj de lernantoj baraktas klopodante pri la alproprigo de iu aŭ alia el la vivantaj lingvoj de malfacila, konfuza, komplikita gramatikstrukturo, nur por legi en la originalo la publikajojn de almenaŭ unu aŭ du eksteraj landoj... Estas nekredeble, ke netrarigardeblaj amasoj da tradukistoj sin turmentas per farado de neeviteble malbonaj tradukoj... ktp. ktp.” Laŭ la propono de prof. *Korach* kaj kun subteno de aliaj fakuloj la akademia konferenco proponis al la estraro de la Akademio, elsendi komisionon aŭ sekcion de la Akademio pri la ekzameno de uzebleco de unueca internacia lingvo, ekz. E.

Estas notinda la diro de Julio *Hevesi*, vicprezidanto de la Akademio,

ke „oni devus klopodi al internacia konvencio, ke tiun ĉi lingvon, eĉ se ne kiel devigan fakon, oni instruu en ĉiuj mezlernejoj.” Alia notindaĵo estas, ke prof. Jozefo *Rusznayák*, prezidanto de la Hungara Scienca Akademio, kune kun alia akademiano: Julio *Ortutay* en 1959 estis membroj de la Internacia Patrona Komitato de la Zamenhof-Jaro. Ankaŭ la ĉefsekretario de la Akademio: Fr. *Erdei* faris simpatian geston al E en 1948; ankaŭ li subskribis la petskribon de la parlamentanoj por la instruado de E. Lastatempe aktive partoprenas en la redaktado de la hungarlingva revuo de HEA „Világ és Nyelv” (Lingvo kaj Mondo) du konataj hungaraj lingvistoj: János *Balázs* kaj László *Deme*.

LERNOLIBROJ POR HUNGAROJ

Ni jam menciis la unuan Esperanto-lernolibron, tiun de Ábel *Barrabás*, eldonitan en 1898. El la multaj lernolibroj, aperintaj de post tiu tempo ni mencias nur la pli gravajn. Petro *Török*, profesoro en Debrecen verkis en 1909 lernolibron kaj en 1912 „Normala sintakso de... E”. Karlo *Mezei* aperigis sian mallongan lernolibron en 1909; poste sekvis ankoraŭ ĝiaj ses eldonoj. Bone uzeblan lernolibron aperigis Johano *Medgyesi* en 1910. Unu el la plej popularaj lernolibroj estis tiu de Izoro *Polgár*; ĝia unua eldono aperis en 1914, la 7-a eldono en 1926. Post la unua mondmilito – en 1921 – aŭtoro de praktika lernolibro estis Paŭlo *Lengyel*; ĝiajn ekzercojn kunmetis K. *Kalocsay*. En 1924 HESL eldonis sian mallongan, tamen bone uzeblan lernolibron, kies 4-a eldono aperis en 1929. En 1931 aperis la unua lernolibro de Ferenc *Szilágyi*: interesa, sprita, bonhumora. Ĝin sekvis de li pluraj modernaj lerniloj en-kaj-eksterlande. 1938 Jozefo *Mihalik* eldonis sian „sisteman” lernolibron. Tiun de Emeriko *Baranyai* – en 1940 – karakterizas simpla, praktika metodo. La ofte oferema posedanto de presejeto, Aleksandro *Szalay* en 1945 dissendis sian korespondan kurson sur 96 paĝoj. En 1947 Literatura Mondo eldonis la Popularan Lernolibron de Ludoviko *Kökény*. En la libro ne estas hungarlingva teksto. La lingvaj klarigojn de K. *Kalocsay* al tiu ĉi libro eldonis L. M. – Julio *Baghy* – unu el la plej eminentaj pedagogoj de E – ankoraŭ en 1928 aperigis sian meminstruan lernolibron. En 1959 la ŝtata libroeldonejo aperigis de li novan lernolibron, kiu disvendiĝis ĝis 1968 en 7 eldonoj en 100 mil ekzempleroj. Grava iniciato estis ankaŭ la eldono de la lernolibro de Stefano *Szerdahelyi* en 1965, por 10-14 jaraj infanoj, kun didaktikaj lertaĵoj de lerta

pedagogo. Tiu ĉi lernolibro fariĝis aparte populara en sia tralaborita formo, titolita „Esperanto Internacia”. *Szerdahelyi* verkis ankaŭ duan parton sub titolo „Esperanto 2”. La ĵus aperinta lernolibro de József *Horváth* „Harminc nap alatt eszperantóul” (Esperanto dum tridek tagoj) estas destinita unuavice por plenaĝuloj. Fine ni mencias la lernilojn por blinduloj. Sur tiu ĉi tereno laboris plej sukcese Nikolao *Bánó*.

VORTAROJ POR HUNGAROJ

Antaŭ la jaro 1910-a aperis malgrandaj vortaroj nur en la lernolibroj kiel suplementoj. Tiam aperis la unua E-Hungara vortaro, la bonega vortaro de Petro *Török* (Teljes Eszperantó-Magyar szótár), kiu sur 288 paĝoj prezentis ne nur la vortradikojn, sed ankaŭ kunmetaĵojn, derivaĵojn. La zoologiaj kaj botanikaj esprimoj estis precizigitaj per la koncernaj sciencaj (latinaj) nomoj. La postaj E-hungaraj vortaroj ĝis 1958 prezentis nur la vortradikojn.

Jen la vortaroj kronologie laŭ la apero:

1910: Edmundo *Lukács*: Magyar Eszperantó kis szótár (H-E, 33 paĝoj)

1922: Roberto *Schatz*: Kis M-E szótár (H-E, 36 p.)

Roberto *Schatz*: M-E zsebszótár (H-E, 160 p.)

1923: Johano *Tomán*: E-M szótár (E-H, 168 p. – radikvortaro) Dua eldono en 1924.

Vincento *Tóth*: Vortaro de oficialaj radikoj (32 paĝoj, pluraj eldonoj) Az E hivatalos szógyökeinek szótára.

Jozefo *Takács*: E-M kis szótár (E-H, 184 p.)

1927: Johano *Tomán*: M-E szótár (H-E, 368 p.)

Leo *Dévay*: M-E kézi szótár (H-E, ĝis litero F, 160 p.) I-a parto. Ambaŭ vortaroj estas kurajaĵaj entreprenoj por fiksi la adekvatan E-an vorton al multaj hungaraj nocioj.

Bedaŭrinde tiu de *Dévay* ne estis daŭrigata, preta ĝi estus la plej detala ĝis tiam H-E vortaro.

1958: Alfonso *Pechan*: E-H vortaro (Akademia Eldonejo Terra, 448 p.)

Alfonso *Pechan*: H-E vortaro (554 p.)

Tiu unua eldono aperis en po 5500 ekzempleroj, la dua plivastigita, korektita eldono (1961) po 6000, la tria (en 1964) en po 7000, kaj la kvara (en 1968) po 14300 ekzempleroj. – Entute ambaŭ partoj po 32800 ekzempleroj. Kvina eld. estas planata por 1979.

Tiuj vortaroj apartenas al la plej vastaj E-aj, kiajn tre malmultaj aliaj landoj havas. La E-a parto enhavas multajn derivitajn, kunmetitajn vortojn kaj frazekzemplojn. Zorge estas signitaj la oficialaj vortoj, kaj la neologismoj. En la E-H parto estas 4433 oficialaj vortoj, 4045 neoficialaj, 166 neologismaj, entute 8644 vortradikoj. Krome 10875 derivitaj vortoj, do entute 19 519 vortoj, – kaj krome 3214 esprimoj kaj frazekzemploj.

En 1968 aperis *Turista Vortaro* de A. Pechan, du-direkta (586 p. Akademia Eldonejo. En la H-E parto enestas 5217 ĉiutage uzataj vortoj (ke ankaŭ komencantoj povu uzi la vortaron), kaj 8210 terminoj (ne troviĝantaj en la baza vortaro), kunligitaj kun feriado, veturado, trafiko (fervoja, aŭtomobila, ŝipa) kuracado, terapio, gastronomio, dogano, pasporto, vizo, kaj *sporto, konkursoj*, ktp. – Dezirata estas dua eldono de tiu vortaro, ĝis nun unika en la E-a leksikografio. (Nur por poloj aperis unudirekta 40 paĝa vortareto turisma (1976).

En Novisad (Jugoslavio) aperis en 1957 E-H vortaro de Kolomano Kovács. La vortaro entenas la plej oftajn vortojn sur 180 paĝoj.

Diversaj kunlaborantoj okupiĝas en Hungario pri preparo de fakaj, teknikaj vortaroj. El tiuj aperis ĝis nun:

1968: Fervoja Terminaro (142 p.), redaktita de d-ro I. Bácskai.

1972: Komputilteknika vortaro kvinlingva. (464 p.) La E-ajn terminojn kompilis A. Münnich.

1975: Domfabriko (6000 frazeologiaj esprimoj) de A. Csiszár kaj K. Kalocsay (190 p.).

1976 kaj 1978: Du volumoj de Seslingva Geodezia Terminaro (324, resp. 388 p.). La E-an parton redaktis d-ro O. Haszpra.

1978: Multobligite aperis Akvomastromada (hidrologia) terminaro, kompilita de d-ro E. Dudich, kiel aldono al plurlingva terminaro.

Medicianan fakterminaron preparas d-ro L. Molnár. Surbaze de la libro „La Sporta Lingvo en Esperanto” (1972) de Tibor Ujlaki-Nagy, estas preparata sporta terminaro sub la gvido de d-ro Á. Máthé. J. Németh preparis ŝakan terminaron sub titolo „Ŝaka Ilustrita Vortaro”.

SKIZO DE ESPERANTA LITERATURHISTORIO

ENKONDUKO

32. ESPERANTO KAJ LA LITERATURO

Plurfoje oni povas legi aŭ aŭdi tiajn deklarojn, ke Esperanto, kiel artefarita lingvo, ne povas esti taŭga por literaturo, precipe ne por poezio. La personoj, kiuj tion asortas — ne malofte bonfamaj kaj eminentaj personoj — kulpas gravan eraron: ili domaĝis la penon konvinkiĝi praktike pri la vereco de sia teoria supozo. Kompreneble por tio estus necese bone lerni la lingvon; tiam ili devus rekoni, ke ekz-e bona traduko de iu literatura ĉefverko povas esti en Esperanto tiel same bild- kaj esprimriĉa, tiel same pens- kaj sentreprodukta kaj elvokiva kiel la originalo, kaj eĉ povas ĉi tiu pli fidele speguli ol nacilingva traduko.

Jes, Esperanto ne estas, kiel la kelkcent aliaj provoj, seka senanima projekto, sed lingvo vivanta, kiu bone funkcias en ĉiuj sferoj de la homaj rilatoj, ankaŭ en la literaturo.

Tiun vivantecon la lingvo dankas al du cirkonstancoj: 1. al la individueco kaj labormetodo de Zamenhof, aŭtoro de la lingvo; 2. al la t. n. „libera evoluo” de la lingvo.

La lingvoaŭtoro ellaboris la lingvon tiel, ke ties taŭgecon li dume kontrolis per literaturaj kaj poeziaj provoj. Tion li faris jam ankaŭ pri sia unua, preskaŭ infanaĝa projekto, pri la „*Lingwe Universala*”, kies so-

laj postrestaĵoj estas la poemo „Malamikete de las nacjes” kaj traduko el Heine. „Zamenhof konceptis Esperanton kiel poetan verkon” – skribas *de Kock*. „Li ekprovis sian lingvon tuj: li tradukis el diverslingvaj klasikajoj ... kaj eĉ submetis la lingvon al la plej severa provo, kiun oni povas uzi pri lingvo ankoraŭ ne parolata: li penis verki poemojn per ĝi – skribas Marjorie *Boulton*. – En lingvo, kiun krom la aŭtoro ankoraŭ neniu scias, en lingva soleco verki poemojn estas granda psikologia kaj lingva kuriozaĵo ... unika literatura fenomeno.”

Aliflanke, Zamenhof konsciis ankaŭ pri tio, ke la lingvo estas socia fenomeno, do ne povas esti kreaĵo de unu sola homo. Tial do li ne volis verki ekz-e teorian detalan gramatikon, sed klopodis fari kiel eble plej multajn literaturajn tradukojn, por ke li perfektigu kaj kompletigu la lingvon kvazaŭ sub la impulso de literaturaj ĉefverkoj de Shakespeare, Goethe, Schiller, Molière, Dickens, Gogol ktp. Kaj tion saman li konsilis ankaŭ al la esperantistoj: li deziris, ke oni elektu por traduko malfacilajn taskojn, ĉar „nur tia maniere nia lingvo plene ellaboriĝos”. Li konsilas al la tradukantoj 1) elekti por traduko verkojn gravajn, 2) fari tradukon fidindan, ne malĝustan kopion, 3) zorgi pri la riĉigo kaj disvolvigo de la lingvo. „Tiajn esprimojn, kiujn ĉiu lingvo nepre *devas* posedi, ni devas peni en tiu aŭ alia maniero nepre *traduki*, sed ne simple *eviti* ilin, pro timo, ke nia esprimo eble ne plaĉos al la legantoj, aŭ ne ĉiuj ĝin tuj bone komprenos. Unu el la plej ĉefaj taskoj de niaj verkistoj devas esti la *ellaborado* de la lingvo.” „Kompreneble, en ĉi tio, kiel en ĉio alia, devas esti observata la deca mezuro. *Ne tro krude, ne tro multe per unu fojo*. Novaj esprimoj

devas esti enkondukataj nur *iom post iom*, nerimark-eble.” „Nia lingvo devas servi ... ankaŭ por la *vivo*; tial ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mal-longa kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta.”

A. *Albault* en sia antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto metas la demandon, ĉu la lingvo ne estus pli bona, se Zamenhof ĝin farus mem preta per unu fojo, „tiel same, kiel Minerva eliris tute armita el la cerbo de Jupitro”. Kaj li respondas, ke Esperanto dankas sian vivkapablon (apud la kelktempa lamentinda vegetado de la aliaj lingvoprojektoj) ĝuste al tio, ke „ĝi estis forĝata iom post iom de tiel multaj forĝistoj; ke tiel ĝia evoluo multe pli similis al la evoluo de ĉiuj aliaj lingvoj...: sub la postuloj de la Vivo.“ „Esperanto povis mem forĝadi al si la mankantajn armilojn per la senĉesa laborado de viglapensaj homoj disaj sur la tuta supraĵo de nia planedo.“

La evoluo de la lingvo okazis preskaŭ ekskluzive per riĉigo; la gramatika kerno restis senŝanĝa dum tri kvaronoj de jarcento. Por tiu riĉigo, per la t.n. *neologismoj*, Zamenhof kvazaŭ alvokis jam en 1905, en la antaŭparolo de la Fundamento de Esperanto: „Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam *nun*,” sed „oni devas ilin uzadi nur *en la literaturo*“.

Dum la vivo de Zamenhof tiu riĉigo de la lingvo okazis sub lia gvido: la sukcesajn neologismojn li registris aŭ lasis registri en la vortaroj redaktitaj aŭ kontrolitaj de li, „havante – kiel li diris – nenion kontraŭ la enprenado de tiuj vortoj“. Pro tiu sia „liberaleco“ li estas ankaŭ pli-malpli kaŝe atakata de Cart kaj de lia skolo, kiu, precipe sub la ŝoko de la *Ido*-skismo, timis

ĉion novan. Alia tia riĉiganto estas *Grabowski*, „la patro de la Esperanta poezio“. Inter la du mondmilitoj sekvis nova periodo de riĉigo kaj nuancigo de la lingvo; tiam Esperanto, kiel *Albault* skribas: „sukcesis transformiĝi al juna sed riĉa literaturlingvo. William *Auld* (1961) bone montris, ke ĉiu lingvo paŝas tra karakteriza stadio de 'literatura floriĝo', dum kiu ĝi estas 'tute subite riĉigita per enfluego de novaj vortoj': tio estis la tempo de Edmund *Spenser* por la angla, tiu de Pierre de *Ronsard* kaj la *Plejado* por la franca, kaj, laŭ *Auld*, la tempo inter la du mondmilitoj kun *Kalocsay* kaj lia skolo por Esperanto.” Tamen, kiel *Albault* rimarkas, la Budapeŝta skolo ne tiom kreis tiujn novajn vortojn, kiom ilin kolektis el la verkoj de antaŭaj aŭtoroj kaj vortaristoj: la pligrandiĝanta postulo de la kreskanta literaturo necesigis la sintezon de la ĝistia ma, plejparte kaŝita, riĉigo de la vortrezoro.

Tiu paraleleco inter la riĉigo de la literaturo kaj vortostoko, cetere, estas tute natura fenomeno: la vortriĉo, kiu por la ĵus naskiĝinta, senliteratura Esperanto estis ankoraŭ senutila balasto, por lingvo kun matura literaturo estas nemalhavebla bezono. Kaj tiun bezonon kontentigis la literatura evoluo mem: la disfloranta literaturo kreis por si la necesan lingvon literaturan. La tumulto, preskaŭ revolucia procedo, komparebla al la hungara lingvonovigo, jam okazis. Sekvas pli trankvilaj tempoj: malrapida plukresko kaj iom-post-ioma plua perfektigo kaj poluriĝo.

La lingva evoluo do okazis tiamaniere, kiel tion *Zamenhof* antaŭvidis, deziris, konsilis kaj akcelis dum sia vivo. La literaturo, kiun li rigardis tiel grava por la lingvo, ke li nomis ĝin garantio de ties vivo, efektive fariĝis la batanta koro de Esperanto.

33. LA PERIODOJ DE LA E-A LITERATUR- HISTORIO

La historion de la E-a literaturo oni povas dividi en tri ĉefajn periodojn, kiujn limas la du mondmilitoj.

La *unuan periodon*, ĝis la unua mondmilito distingas precipe tio, ke dum ĝi vivis, laboris kaj efikis Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo. Sed ankaŭ en tiu ĉi periodo oni povas fari ankoraŭ subdividojn. En la unuaj sep jaroj de la lingvo (1887-1894) oni apenaŭ povas paroli pri literaturo: ĉion kaj ĉion absorbis la lingvaj diskutoj pri la diversaj provoj de reformo. En 1894 Zamenhof aranĝis voĉdonadon,¹ kaj tiam la plimulto de la esperantistoj forĵetis ĉian reformon kaj akceptis la lingvon en la formo origine liverita de Zamenhof. Per tio estis donita la eblo de literatura evoluo; neniu ja volas verki en lingvo, kies fundamentaj elementoj ankoraŭ estas pridiskutataj. „La novan epokon — skribas *Kalocsay* — kvazaŭ simbole anoncas, ke en la sama jaro (1894) aperis de Zamenhof la traduko de la *Shakespeare-a Hamlet*.“ — Post tiu unua subperiodo, kiun oni povus nomi *subperiodo de reformprovoj*, komenciĝis tempo, nomebla *subperiodo de solidiĝo*. Du influoj tiutempe interefikis: unuflanke tiu de la slavaj, precipe rusiaj verkantoj (Kofman, Devjatnin, Grabowski, Wasniewski, Leo Belmont), kiuj pruntis al la lingvo grandan stil-liberecon kaj flekseblecon, aliflanke la influo de la franca *Beaufront*, kiu en sia revuo „*L'Esperantiste*“ kaj per sia „*Commentaire*“;² kompletigis la tro vortavaran Zamenhofan gramatikon, donis konsilojn striktajn kiel ordonoj, klopodis fari la lingvon kiom eble logika, sed eble ankaŭ rigida, malmulte fleksebla. Tiuj du efikoj tre feliĉe interkruciĝis: la fran-

ca logikemo kaj slava libereco, bone ekvilibriĝinte rezultigis fine la propran „spiriton“ de Esperanto. La finon de tiu periodo signas proksimume la apero de la *Fundamenta Krestomatio* en 1903, kaj la unua kongreso esperantista en Bulonjo-sur-Marco en 1905. Ĉi tiu kongreso, kiel sciante, sankciis per la fama „*Deklaracio*“ la „netuŝeblecon“ de la Fundamento de Esperanto kaj per tio certigis la bazon de la lingvo unufoje por ĉiam. Samtempe, ĝi konsilis imiti la stilon de Zamenhof, kiu „plej bone konas la spiriton de Esperanto“. Tiel do oficiale oni konfirmis, ke Esperanto, kiel la vivantaj lingvoj, havas jam sian propran spiriton, do la ĝistiamaj verkantoj, precipe Zamenhof, sukcesis atingi, kion *Borovko* jene postulis: „ni donu *animon* al la lingvo“. En 1905 estis fondita ankaŭ la *Lingva Komitato* kaj en 1908 *Akademio de Esperanto*. — La sekvantan subperiodon — ĝis la unua mondmilito — oni povas nomi *subperiodo de disvolviĝo*; ĝin karakterizas la grandskala libroeldonado de la franca firmo *Hachette*,³ la aperado kaj rivalado de la du revuoj „*La Lingvo Internacia*“ kaj „*La Revuo*“, la verkado de *Kabe*, „unua stilisto esperantista“ kaj de *Grabowski*, la aperado de diversaj vortaroj naciaj-Esperantaj, enkondukantaj tre multajn vortojn novajn, kies sintezon provis efektiviĝi la vortaro de *Boirac*. Rimarkinda estas en la komenco de ĉi tiu periodo la *Ido-skismo*. Al ĉi tiu „reformita Esperanto“ aliĝis kelkaj tre eminentaj esperantistoj, inter ili Beaufront mem, kiun Zamenhof komisiis reprezenti Esperanton, kiel ties advokato ĉe

¹ vidu: Hist. 13-a ĉap.

² legu: L'esperantist; komanter

³ legu: aŝet

„La Internacia Delegacio por la Alpreno de Helplingvo“ (pro tio li estis rigardata de la esperantistoj kiel Judaso). La Ido-krizo havis du efikojn al Esperanto: unuflanke ĝi instigis la e-istojn pli intense okupiĝi pri la strukturo de sia lingvo (al tio oni dankas la genian vortofaran teorion de Saussure); aliflanke ĝi estigis grandan malkonfidon kontraŭ ĉio nova, do fortan bremsan kontraŭ evoluo kaj riĉiĝo. Sed tio, tamen, ne estis malavantaĝa, ĉar malhelpis la trorapidan, ekscesan progreson.

La *dua periodo* estas tiu *inter la du mondmilitoj*. En la dudekaj jaroj de tiu periodo, kiun ĝenerale karakterizas plua disvolviĝo de lingvo kaj literaturo, interluktis du tendencoj. La *germana tendenco* (Germana Esperantisto, Esperanto-Praktiko ktp.) klopodis rekonduki la lingvon al la plej severa logikeco; la t.n. *Budapeŝta skolo*, kiu grupiĝis ĉirkaŭ la revuo kaj libroeldonejo L. M., administrata de T. *Schwartz*, poste de V. *Bleier*, kontraŭe, rigardis la lingvon vivanta, ĉiujn ĝiajn apartaĵojn, nelogikaĵojn, idiotismojn ili salutis kiel signon de memstara vivo, kiel eblaĵojn de artefektaj. Ili volis komenci novan periodon en la Esperanta literaturo: tiun de la artismo (propre tio estis jam ankaŭ klopodo de Zamenhof). — Granda gajno en tiu periodo estis la apero de la Plena Vortaro redaktita de *Grosjean-Maupin*, kaj de la Plena Gramatiko de *Kalocsay & Waringhien*. Ĉi tiuj du verkoj registras kaj tiel faras alireblaj por ĉiu la tutan Zamenhofan lingvozon. Esperanto havas ankaŭ sian poetikon de *Waringhien*.

La *tria periodo*, post la granda malutilo, kiun *la dua mondmilito* faris al la movado, alportis ree grandan disfloradon de literaturo. Apud la reviviĝinta Budapeŝ-

ta skolo precipe la *skota skolo* (*Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti*), angloj (*Marjorie Boulton, Gregor*), ĉeĥoslovakoj (*Pumpr, Kořinek, Pič* ktp.) brazilanoj, jugoslavoĵoj, bulgarioj, francoj, danoj ktp. partoprenas en tiu literatura florado. Dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj ludis gravan rolon periodaĵoj, kiel *La Nica Literatura Revuo*, *Norda Prismo*, *Suda Stelo*, *Monda Kulturo* ktp., kaj la grandioza eldon-aktiveco de *Juan Régulo-Pérez* en la Kanariaj Insuloj. Nuntempe la rondo de literaturaj revuoj ŝrumpis, krom *Literatura Foiro* nur *Hungara Vivo* aperigas regule beletron. Kompense vigliĝis la libroeldonado: reaperas en dua eldono multaj klasikaj verkoj, kaj sufiĉe grandnombre eldoniĝas ankaŭ novaj. La plej atentindaj eldonejoj estas lastatempe *Dansk Esperanto-Forlag*, *Fondumo Esperanto*, *TK-Stafeto*, *L'Omnibuso* (en Japanio) kaj *Hungara Esperanto-Asocio*. Multaj libroj aperas en Ĉinio. En la sepdekaj jaroj ĝojige aktiviĝis la ŝtataj eldonejoj *Edition Leipzig* (GDR) kaj *Esti Raamat* (Sovetio). Daŭre alvenas libroj el Vjetnamio.

UNUA PERIODO

En la unua periodo unuavice pritraktenda estas la literatura aktiveco de la lingvo-aŭtoro, poste oni devas okupiĝi pri la aŭtoroj de la Fundamenta Krestomatio, aparte parolante tamen pri kelkaj elstaruloj (Kofman, Grabowski, Devjatnin). Apartan ĉapitron pretendas ankaŭ Kabe, Vallienne, Privat kaj la poetoj prezentigantaj en la antaŭmilitaj jaroj.

34. L. L. ZAMENHOF

En la disvolviĝo de la E-a literaturo estis de unuaranga signifo la agado de la lingvo-aŭtoro: por la literaturistoj ĝi estis instigo, ekzemplo kaj modelo. Ankaŭ liaj originalaj verkoj havas netakseblan valoron kaj utilon, sed precipe liaj grandnombraj tradukoj efikis al la lingvo riĉige, vivige, maturige.

El *liaj originalaĵoj*, la *poemoj* kreiĝis grandparte tre frue. La t. n. *Unua Libro* (1887) jam enhavis du originalajn poemojn: „*Mia penso*“ kaj „*Ho mia kor*“: „Tiu du poemoj — skribas Marjorie Boulton — estas profunde personaj ... inter la tre malmultaj intimaj konfeso de Zamenhof.“ Fakte, la unua parolas pri la multo plej kara, kion li metis sur la altaron de siaj idealaj klopodoj, la dua esprimas lian maltrankvilon antaŭ la decida paŝo prezenti lingvon al la mondo. — Poste li ver-

kis entute nur 7 poemojn ankoraŭ; lia superhoma ĝismorta laborado (tradukado, korespondado, organizado krom la profesia kuracista okupiteco) certe ne lasis al li por tio tempon.

Ĉiu esperantisto konas kvar el tiuj poemoj. La poemo „*La Espero*“ parolanta pri la „*Nova Sento*“ kaj „*Forta Voko*“ fariĝis, kun la muziko de la franco M. de *Ménil*, la tradicia himno de la Esperanto-movado. Tamen „*La Vojo*“ estas poezie pli riĉa, forme pli efika, kaj ĝi liveris al la esperantistoj citeblaĵojn kvaŝaŭ proverbajn: „nin ne timigas la noktaj fantomoj“, „klara kaj rekta kaj tre difinita la vojo“, „nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante“, „eĉ guto malgranda“, „l’espero, l’obstino kaj la pacienco“, „la nepoj vin benos“, „se ventoj subitaj velkintajn foliojn deŝiras, ni dankas la venton“ ktp. La tria el tiuj „movadaj poemoj“ estas „*Al la fratoj*“ (1889). Ĝi, certe, estas iom tro longa por sia temo kaj la ripetoj plurfoje ne pliiĝas, sed malpliiĝas la efikon. Tamen, estas kortuŝe aŭdi la kuraĝigon al la amikoj rare dissemitaj en la granda mondo: „forte ni staru, fratoj amataj“, kaj la aman plendon kaj zorgeman timon: „tre malprokime ĉiuj ni staras la unuj de la aliaj... Kie vi estas, kion vi faras, ho karaj fratoj vi miaj? Vi en la urbo, vi en urbeto, vi en malgranda vilaĝo, ĉu ne forflugis kiel bloveto la tuta via kuraĝo?“ Tia intima alparolo sendube estis altira kaj kuntena por la unuaj samideanoj de tiuj fruaj jaroj. La kvaran poemon, „*La preĝo sub la verda standardo*“, kiu parolas en altinspira, solena, kvaŝaŭ profeta tono pri la idealo de Zamenhof: „ni inter popoloj la murojn detruos“, „amo kaj vero ekregos sur tero“, — Zamenhof verkis por la unua kongreso. Siatempe la gvidantoj de la movado tute ne entuzias-

mis pri la poemo: la liberpensuloj flaris en ĝi fideismon, la katolikojn indignigis ĝia kontraŭdogmismo; unuj kaj aliaj timis skandalon. Zamenhof pli bone konis la tiaman esperantistan publikon: ĝi ekzaltiĝis en senfina ovacio.

La ceteraj du poemoj al esperantistoj estas malpli gravaj porokazaj pecoj. Io alia estas la lasta konata poemo de Zamenhof, la „*Pluvo*“ (1909). Tiuj versoj tute personaj de homo, kiu en sia trolaco plipezigita de kormalsano („en mi batas konfuze la koro“) ĝuas la freŝon donatan de pluvo, estas matura artverketo, kaj — Marjorie *Boulton* estas prava, — „vekas senton de vera bedaŭro, ke li ne verkis aliajn poemojn tiel personajn kaj artismajn“.

Pri la valoro de la Zamenhofa poezio John *Francis* skribas: „La poemojn de Zamenhof, nurajn emociajn lirikaĵojn, oni ne povas serioze kompari kun la ĉefaj juveloj de la grandaj naciaj literaturoj, sed por sia destinita celo ili estis perfektaj: sufiĉe rimriĉaj kaj skande striktaj por sugesti la teknikajn eblaĵojn de la lingvo nova; sufiĉe tintaj por faciligi parkeron; sufiĉe individuaj laŭforme por supozigi senperan kreadon; sufiĉe simplaj por allogi tre variajn homtipojn, kaj sufiĉe emociaj por pruvi la vivecon de la lingvo.“ Ĝenerale oni povas konsenti pri ĉi tiu objektiva prijuĝo, sed oni devas aldoni, ke tiuj poemoj ankaŭ bonege plenumis sian destinitecon: entuziasmigis la komence tiel malgrandan aron de esperantistoj, vekis inter ili la senton de kunaparteneco, la konscion, ke ili laboras por nobla celo, donis al ili forton rezisti al moko kaj stulta superemo. Konsiderinde ili kunefikis por tio, ke la lingvo estu kaj restu vivanta.

En la *originala prozo* de Zamenhof oni ne trovas beletraĵojn: proze li okupiĝis aŭ pri esperantismaj kaj humanismaj demandoj aŭ pri lingvaj problemoj.

El liaj esperantismaj verkaĵoj la plej grava estas „*Esenco kaj estonteco de la ideo de Lingvo Internacia*“ (trovebla en la „Fundamenta Krestomatio“ (vd. poste), sub la pseŭdonimo *Unuel* (= unu el...), „plej modesta el ĉiuj pseŭdonimoj“, kiel skribas *Waringhien*, laŭ kies karakterizo „oni trovas en ĝi profundecon de penso, potencon de logiko, klaron de saĝo, kiuj donas al ĝi eksterkutiman valoron“.

Grandsignifaj estas ankaŭ liaj Kongresaj Paroladoj.

En la *unua kongreso* (*Boulogne-sur-Mer*, 1905) Z. memoris pri la ĝistiamaj batalantoj de la afero de internacia lingvo kaj krom la mortintaj esperantistoj speciale li honoris la agadon de Johan Martin *Schleyer*, aŭtoro de la „mondlingvo“ *Volapük*.[☆] Kun granda emfazo li parolis pri tio, ke ĉi tiu kongreso estas io senekzempla: „Ni kunvenis hodiaŭ por montri al la mondo per nerefuteblaj faktoj, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi, ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiliĝu aŭ englutu alian...“ „Kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.“ En la *dua kongreso* (*Genève*, 1906) Zamenhof konceptis la ideologion de la esperantismo. En la „Deklaracio“, kiun la unua kongreso akceptis, tekstas: „esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la esperan-

[☆] v: ĉap. 7.

tismo ne respondas.“ Tamen, deklaris Zamenhof, Esperanto *ne estas nur lingvo*, ĝi havas sian „*internan ideon*“, kiu estas super la praktika utileco. Tiu ĉi ideo estas „frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj“.

En la *tria kongreso (Cambridge, 1907)* Zamenhof parolis pri la signifo kaj celo de la kongresoj. Ilia ĉefa celo, laŭ li, estas vigligi en la partoprenantoj la amon al la esperantismo, al la interna ideo de Esperanto. La kongresoj, certe, estas neŭtralaj, nepolitikaj kunvenoj, ĉar oni devas dum ili eviti ĉion, kio povus ofendi ies gentan aŭ religian senton, sed oni tamen devas gardi la esencon: krei pacan ponton inter la popoloj. En Esperantio regas *la verda standardo*: signo, sub kiu la esperantistoj marŝas al paca batalado, por ke venu la tempo, kiam:

„La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian“.

En la *kvara kongreso (Dresden, 1908)* la Zamenhofa parolado pritraktas la aferon de la reformoj kaj konstatas: de kiam la esperantistoj ĉesis paroladi pri reformoj, komenciĝis la brila progresado. Anstataŭ reformdiskutoj senfruktaj sekvis riĉiĝo kaj evoluo trankvila. Tiu evoluo estas laboro de multe da personoj. Oni devas eviti la rompon per reforma perforto kaj gardi la kontinuecon de la lingvo.

En la *kvina kongreso (Barcelona, 1909)* la parolado konstatas kun trankvila konscio: „Ni sane vivis, ni kreskis, ni fortiĝis en ĉiuj rilatoj.“

En la *sesa kongreso (Washington, 1910)* Zamenhof pritraktas la eblaĵojn de la esperantismo kaj resumas, kion li disvolvis en sia „Esenco kaj Estonteco“:

- 1.) Lingvo internacia ne povas esti alia ol Esperanto.
- 2.) La evoluo de la lingvo okazos per tiu sama natura

vojo kiel en ĉiu alia lingvo, t. e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arkaismoj. 3.) Ŝanĝon en la lingvo, se necese, povas fari nur la esperantistoj mem, aŭ ia grandega (ekz-e interŝtata) forto, sed nepre en interkonsento kun la esperantistaro. 4.) Tiuj ŝanĝoj povas esti nur malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon de la lingvo, nek senvalorigos tion, kion la esperantistoj ĝis nun faris, faras aŭ poste faros.

En la *sepa kongreso* (*Antwerpen*, 1911) la temo de la parolado estas la organiza demando. — En la *oka kongreso* (*Krakovo*, 1912) Esperanto festas la 25-an datrevenon de sia ekzisto kaj je tiu okazo Zamenhof povas ĝoje konstati: „Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank’ al la *reguleco* de sia progreso, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano, kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ 25 jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. „En tiu kongreso Zamenhof anoncas ankaŭ sian decidon, ke li formetos de si ĉian oficialan rolon en la movado: „la nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min antaŭ vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.“ Tiun decidon Zamenhof motivis per tio, ke li volas liberigi Esperanton de ĉia efektiva aŭ ŝajna influo de unu persono. La afero — li diris — estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera. Tial li petis ankaŭ, ke la esperantistoj plu ne nomu lin „majstro“.

Al la originalaĵoj de Zamenhof apartenas ankoraŭ lia traktajo pri la „*homaranismo*“, sub kiu nomo li intencis fondi ian spiritan movadon baze de la interna ideo de la esperantismo. „Kiu volas posedi ĝustan bildon pri Zamenhof – skribas Waringhien – tiu prenu liajn du libretojn, la *E s e n c o n* kaj la *P a r o l a d o j n*:[☆] lian tutan inteligenton kaj lian tutan koron. Ili estas el la nombro de tiuj nemultaj verkoj, kiuj honorigas la homaron.“

Tre leginda estas ankaŭ la *korespondado* de Zamenhof, kolektitaj de Dietterle en la „*Originala Verkaro*“ kaj de Waringhien en la „*Leteroj de Zamenhof*“. Ĉi-lasta kolekto drame revivigas la malfacilan, ofte baktan lukton de Zamenhof kun la ne ĉiam komprenemaj kaj inter si ofte malkonkordaj adeptoj.

El la *prilingvaj* verkoj de Zamenhof la plej gravaj estas: la *Fundamento de Esperanto* (gramatiko, ekzercaro, vortaro), kiun la Bulonja kongreso sankciis kiel netuŝeblan lingvobazon kaj la *Lingvaj Respondoj*, konsiloj pri la ĝusta uzado de la lingvo. Signifa estas ankaŭ lia *vortara laboro*: li mem faris rusan-Esperantan vortaron kaj la germana-Esperanta vortaro de *Jürgensen* estis farata sub lia kontrolo. Al tio oni dankas konsiderindan riĉiĝon de la lingvo kun lia sankcio.

Sed, kiel jam dirite, li rigardis plej decida por la evoluo de la lingvo la *tradukadon de ĉefverkoj*: fakte lia traduko de *Hamlet* (1894) estis admirata sukceso por la esperantistoj kaj tre efika propagandilo inter la granda publiko. Bedaŭrinde, longe li ne povis daŭrigi sian

[☆] Kiel trian oni povas aldoni la traktaĵon pri la Homaranismo kaj kiel kvaran la Alvokon al la Diplomatoj post la Granda Milito.

utilegan traduklaboron: nur la fondo de *La Revuo de Bourlet* kaj la fama kontrakto kun la eldona firmo Hachette ebligis al li rekomenci ĝin. Estas interese, ke por traduko li preferis elekti dramojn, eble por tiel doni modelon por la viva dialogo. Li tradukis: la komedion „*La Revizoro*“ de Gogol (1907), la versan dramon „*Ifigenio en Taŭrido*“ de Goethe (1908), kiun oni prezentis grandsukcese en la Dresdena kongreso, poste rapide sekve (en 1908) la tragedion „*La Rabistoj*“ de Schiller kaj la komedion „*Georgo Dandin*“ de Molière. En la Revuo estis publikigita, antaŭ ol aperis libroforme: la „*Proverbaro*“, E-a varianto de la plurlingva Frazologio de la patro de Zamenhof; ĝi estas farita kun granda trovemo kaj lingva sprito kaj donacas al E abundon da sukaj esprimoj, kvazaŭ trezoraron de popola lingvo. Samloke aperis liaj malpli ampleksaj tradukaĵoj: „*La Rabeno de Baharah*“ de Heine kaj „*La Gimnazio*“ de Ŝolem Alejhem. Grandan sukceson havis la traduko de la iom sentimentala romano „*Marta*“ de Orzeszko; el ĝi pretiĝis ĉina kaj japana tradukoj, do E unufoje ludis la rolon de traduka pontlingvo. Mencienda estas ankoraŭ la esperantigo de la „*Batalo de l'vivo*“ de Dickens, kiun Z. faris el germana traduko (ambaŭ en 1910).

Du verkoj okupis longe la intereson kaj tradukemon de Zamenhof: la *Fabeloj de Andersen*, el kiuj unu peco, la Marvirineto, aperis jam en la Fundamenta Krestomatio (1903) kaj la *Malnova Testamento*, el kiu la Psalmaron li publikigis unue en La Revuo (1908). Post lia morto oni trovis de li la kompletan tradukon de ambaŭ. La Malnovan Testamenton poste, kontrolitan de speciala biblia komitato, eldonis la Brita Biblia Societo (1926). Ankaŭ la Fabeloj de Andersen aperis de

tiam en kvar volumoj, la lasta nur en 1963.

Grava estas el lingvohistoria vidpunkto la „*Fundamenta Krestomatio*“, kiun Zamenhof parte aŭtoris, parte redaktis, kontrolante la stilon de la ceteraj kunlaborantoj. Pri ĉi lastaj temos poste. La Krestomatio enhavas ekzercojn, fabelojn, rakontojn, anekdotojn, sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn kaj 70 poemojn, inter kiuj de Zamenhof troviĝas 5 originalaj kaj 12 poemtradukoj.

Kiel oni vidas, Zamenhof dum sia vivo konsekvence laboris en la direkto, kiun li difinis al si: lasi liberan evoluon al la ekirigita lingvo, sed amplekse kunlabori por tiu evoluo per originala kaj traduka verkado. Lia superhoma laboro donis superhoman rezulton: vivantan lingvon.

35. LA FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Sub ĉi tiu titolo Zamenhof kolektis artikolojn presitajn en „La Esperantisto“, monata esperantista revuo, kiu aperadis en *Nürnberg* de 1889 ĝis 1895; tiam ĝi devis ĉesi, ĉar ĝi publikigis tradukon de la Tolstoja verketo „*Prudento kaj kredo*“, kaj pro tio la rusa cenzuro malpermesis ĝian eniradon en Rusion, kie ĝi havis la plej grandan parton de siaj abonantoj.

En la poezia parto de la volumo Z. represigis proksimume la duonon de la poemoj, el kiuj *Grabowski* (vd. poste) redaktis (1893) la libreton „*La Liro de la Esperantistoj*“. Grabowski, en la antaŭparolo de tiu libro emfazas, ke ĝi pruvas kaj la taŭgecon de E por la poezio kaj la necescon de la poezio por E: „per la

LIRO vidiĝas plej bone la forto, fleksebleco kaj eŭfonio de nia lingvo, kaj, kio estas pli grava, la *LIRO* montras, en kiel alta grado la poezio perfektigas la lingvon... La artista teknika aparato de la poezia formo influas forte la enhavon... la poeto... formas novajn retorajn figurojn kaj riĉigas la frazeologion per lertaj mallongaj kaj precizaj parolturnoj, kiuj poste farigâs ankaŭ akiro por la prozo kaj por la lingvo de la ĉiutago. La lingvo kreskos unutempe kun la kresko kaj disvolvo de la bela literaturo; kondamni la lingvon de la komenco esti nur ĵargono komercista, signifas tion saman, kiel subfosi ties estontecon.“ Tiu ĉi opinio estis plene konsentata kaj subtenata de Z.; tion li konfirmis ankaŭ tiel, ke li donis en la *Krestomatio* vastan lokon al la poezio: preskaŭ la trionon de la volumo.

El la poetoj de la volumo, kelkaj (*Grabowski, Kofman, Devjatnin, Felix Zamenhof*) poste disvolvis vastan literaturan agadon, kelkaj (*Goldberg, Lojko, Nauman*) perdiĝis senspure, pri *Seleznev*, kiu venis el Ruslando al Parizo, *Bourlet* en „*La Revuo*“ skribis entuziasme, ke la unua li pruvis al la Parizanoj, ke E-o povas esti parolata kun la sama facileco, eleganteco kaj rapideco, kiel iu ajn nacia lingvo; *de Wahl* faris por si mem apartan internacian lingvon (*Occidental*)¹.

La prozon de la FK. Zamenhof aŭ mem faris aŭ reviziis. Tial tiu verko, kiu kvazaŭ resumis la rezultojn de la ĝistiam lingvoevoluo en beletra, scienca kaj poezia kampoj, kaj konvinke montris la taŭgecon de la baza lingvokonstruo, havas ankoraŭ nun netakseblan valoron, kiel longtempa modelo kaj historia dokumento. Rilate al lingvaj kaj stilaj detaloj, troviĝas en la lib-
1 v. ĉap 8. p.28.

ro kelko ne plene klariĝinta kaj hodiaŭ jam arkaika, do korektinda, kiel Z. mem konstatis en antaŭparolo de posta eldono. La plej nova eldono, redaktita de *Bailey* kaj *Downes* eĉ estas plurloke piednote korektita, sed tiuj korektoj ne ĉiam estas konformaj al la posta lingvuzo de Zamenhof.

Pri kelkaj aŭtoroj de la FK. ni okupiĝos aparte.

ANTONI GRABOWSKI

A. *Grabowski* (1857-1921) estis kemia inĝeniero, polo, varsoviano. Li publikigis plurajn sciencajn verkojn de sia profesio, ellaboris polan teknikan vortaron. Li estis poligloto, pli-malpli sciis ĉirkaŭ 30 lingvojn, lernis ankaŭ Volapukon, sed lin seniluziigis, ke la volapukistoj ne sciis paroli la lingvon, kiun, cetere, ankaŭ li mem trovis malfacila. Li esperantistiĝis tuj post la apero de la Unua Libro, entuziasmis pri la strukturo de la lingvo, tuj lernis ĝin kaj post nelonge li jam vizitis al Zamenhof, salutante lin en flua Esperanto. Tiam okazis la unua konversacio en E, kaj el tiu tempo devenas ankaŭ la unua traduko de Grabowski, „*La neĝa blovado*“ de *Puŝkin*, kiu estas nia plej interesa lingva memoraĵo, tiutempe la lingvo ja havis nur proksimume 900 radikvortojn.

Kelkan tempon li estis reformema, sed post la Voĉdono² (1894), li fariĝis firma fundamentano, rekoninte, ke nur leĝe akceptita bazo povas certigi la unuecon kaj evoluon de la lingvo.

² v. ĉap. 13.

Li longe prezidantis la Polan E-Societon kaj en la Akademio de E ekde 1908 direktoris la gramatikan sekcion. Tamen, la plej grava estas lia literatura agado.

En la jaroj de la unua mondmilito, restante sola el sia familio en Varsovio, li komencis kaj finis sian ĉefan verkon: la tradukon de *Pan Tadeusz* de *Mickiewicz*. Sola kaj jam ankaŭ malsana, li havis por sia konsolo nur tiun laboron krom liaj oftaj vizitoj al Zamenhof, al kiu li laŭtlegadis sian tradukon. Post la morto de Zamenhof li ankoraŭ pli soliĝis, sed streĉinte siajn elĉerpiĝantajn fortojn li finis la tradukon. En 1921 li mortis subite pro koratako, kiam li rigardis la montrofenestron de E-a librovendejo.

Grabowski verkis kelkajn originalajn poemojn, el kiuj menciindaj estas „*Tagiĝo*“, kvazaŭ dua himno e-ista, la kortuŝa „*Reveno de l'filo*“, verkita por la Krakova kongreso kaj „*Sur unu kordo*“, en kiu li sprite diskutas kun tiuj, kiuj trovas tro striktaj la rimeblaĵojn de E.

Liaj prozaj tradukoj ne estas multnombraj; en ili lia stilo estas klara kaj bone nuancita, tre proksima al la zamenhofa stilo. Tiom pli ampleksa estas lia tradukpoezia agado:

„*Mazepa*“, dramo de *Slowacki*, unu el la ĉefverkoj de la pola dramliteraturo kaj distingiginta per bela kaj riĉa lingvo, estas vere adekvate tradukita de G.; la dramon oni prezentis en la Krakova kongreso (1912). Tie oni ludis ankaŭ la operon „*Halka*“ de *Moniuszko*, kies tekston tradukis tiel same Grabowski.

„*El Parnaso de Popoloj*“ estas poemkolekto el 6 originalaĵoj kaj 110 poemtradukoj el 30 diversaj lingvoj. Plej ampleksa kaj sendube ankaŭ plej sukcesa estas la pola parto, precipe la tradukoj el *Mickiewicz*

kaj de la belega lirika poemciklo „*En Svisujo*“ de Slowacki.

La kulmino de la tradukarto de Grabowski estas „*Sinjoro Tadeo*“ de *Mickiewicz*, tradukita formfidele; en tiu ampleksa epopeo troviĝas pluraj partoj (La Tempesto, La Ĉaso, La Konverto de Jankjel) kiuj ĉiam apartenos al la plej belaj paĝoj de nia tradukpoezio. Per tiu traduko Grabowski fariĝis vere la „patro de la E-a poezio“.

Grabowski, precipe en *Sinjoro Tadeo*, estas kuraĝa evoluiganto de la poezia lingvo E-a. Lia vortotrovemo estas plej ofte tre feliĉa: el la pli ol 200 vortoj, kiujn li enkondukis, la plejparto eniris la Plenan Vortaron; esceptaj estas, kiujn mortigis aliaj formoj, ekz-e: konkiri (konkeri), tredi (treti), traco (spuro). Kelkaj liaj trovaĵoj, ekz-e *ĉi* anstataŭ *ĉi tiu*, senpera verbigo de substantivoj kaj adjektivoj, adjekta uzado de e-finajaj substantivoj, *ekde* ktp. iĝis ĝenerale uzataj, precipe en la poezio. Li estis majstro de la verstekniko, laŭ Tárkony: „inĝenier’ de ritmo kaj de rimo, kuraĝa inventisto de esprimo“, al kiu „Tagiĝo kantis en l’animo.“

LEO BELMONT

L. *Belmont* (1865-1941), laŭ vera nomo Leopold Blumenthal, pola hebreo, ĵurnalisto, verkisto, estas el la unuaj pioniroj de E: jam en 1878 li sendis salutleteron al Z., kiun li finis per la vortoj: „Vi venkos, sinjoro, vi venkos!“ Lia pollingva gazeto „*Libera Vorto*“ dediĉis multe da loko al la defendo de E. Tre legataj estis liaj pollingvaj romanoj kaj poemoj. Li troviĝas

inter la poetoj de la „*LIRO*“ kaj de la FK. En 1908 li aperigis poemkolekton sub la titolo „*Sonoj Esperantaj*“. Li neniam ĉesis pledi por Esperanto en gazetoj diversaj, sed pro lia ĵurnalista okupiteco kaj peripetia vivo (5-foje li estis malliberigita kaj unufoje ekzilita pro politikaj artikoloj), li laboris plie por ol en E. Li staris kaj parolis ĉe la freŝa tombo de Zamenhof kaj adiaŭis lin per funebra poemo. En 1922, partoprenante la unuan postmilitan kongreson en Praha, li ŝutis el si spritajn paroladojn kaj poemojn. Li reaktiviĝas en 1935 (70-jara!), verkante eseojn en *Literatura Mondo*, al kies pola numero li tre vigle kontribuas per tradukoj (1937). La freŝa tono de liaj poemoj kaj lia brava pionireco faras lin respekte memorinda figuro de la E-a movado kaj poezio.

VASILIJ DEVJATNIN

Devjatnin (1862-1938), ruso, instruisto de latino kaj de rusa literaturo, eksvolapukisto, esperantistiĝis en 1891 kaj jam post unumonata studado komencis kunlabori en „*La esperantisto*“. Li estas unu el la ĉefaj poetoj de la „*LIRO*“ kaj de la FK. Al ĉi lasta li kontribuis per originala poezio kaj prozo kaj per poemtradukoj el la rusa, germana. Li poste verkadis tre amplekse: krom lernolibroj li tradukis el *Puŝkin* la poemojn „*Poltava*“ kaj „*Ruslano kaj Ludmila*“ kaj la dramon „*Boris Godunov*“; lia Plena Verkaro aperis en 1906-1911 en kvar volumoj. Dum unu jaro li laboris en Parizo por Esperanto, kaj de tie li faris propagandan piediron al la Krakova kongreso (1912); tiun 42-

tagan pilgrimadon li rakontis en aparta libro. En 1914 survoje al la Pariza Kongreso, kune kun aliaj vojaĝantoj kies vojaĝcelo estis Parizo, li estis arestita kaj kiel militkaptito li restis en Germanio ĝis 1918. Ankaŭ dum la militkaptiteco li ne ĉesis labori por E. Li instruis germanajn suboficiojn al la lingvo kaj li ricevis eĉ salajron. Tiutempe lia verkado havis gravan signifon, sed lia posta influo tamen ne estas komparebla al tiu de Grabowski aŭ de Kabe (v.p.148.)

ANTONI KOFMAN

Kofman (1865-1940) ankoraŭ ne troviĝis inter la poetoj de la „*LIRO*“: li debutis, kiel nova astro, en la FK., kun tre kuraĝe entreprenitaj kaj surprize sukcesaj tradukoj el Heine kaj el la „*Iliado*“ de Homero, kaj kun la longa rakonta poemo originala „*Filino de Iftah*“. Poste li tradukis „*Kain*“ de Byron, partojn el la „*Faust*“ de Goethe, la naŭ unuajn kantojn de la *Iliado* kaj „*Edziĝo de Figaro*“ de *Beaumarchais* (1898). Originale li verkis moketajn poemetojn kaj pikajn epigramojn. Poligloto, li tradukis el 18 lingvoj, kaj estis granda promeso, sed en 1907 li transiris al Ido, poste al Occidental, kaj tiel liaj poeziaj kapabloj perdiĝis neuzate; jam nur la pietato konservas, malgraŭ lia malfideliĝo, lian memoron de pioniro.

ALEKSANDRO DAMBRAUSKAS-DOMBROWSKI

Dambrauskas (1860-1938), litovo, profesoro kaj katolika prelato, estas menciinda kiel unu el la unuaj

e-istoj kaj kontribuanto de FK., ĝismorta fervorulo por E. Lia „Versaĵareto“ enhavas poemojn de religia etoso. Krom E li verkis en litova, pola, rusa, latina lingvoj, – matematikajn, filozofiajn libretojn, kaj multajn tradukadojn al E.

FELIX ZAMENHOF

Felix Z. (1868-1933), uzanta la pseŭdonimon FEZ, estis la plej aĝa frato de Z. kaj la plej fervora el liaj fratoj, multe helpis sian fraton dekomence. Li kontribuis al „La Esperantisto“ kaj al la FK., precipe per poemoj. Liaj verkaĵoj aperis sub la titolo „*Verkaro de FEZ*“, kiun en redaktado de E. Wiesenfeld eldonis en 1935 Literatura Mondo.

PAŬLO LENGYEL

Inter la aŭtoroj de FK. troviĝas ankaŭ hungaro: P. *Lengyel* (1868-1932). Li estas fama pri tio, ke en 1900, kiam la tiutempe sola E-gazeto estis minacata de ĉeso, li, presisto en *Szekszárd*, transprenis kaj eldonis ĝin dum kvar jaroj.[☆] En 1904 li elmigris Parizon kaj tie, kun aliaj, li fondis la Presan Esperantistan Societon. En 1899 aperis de li ampleksa „*Libro de Humoraĵoj*“, inter 1909-1914 li estis redaktoro de la „*Juna Esperantisto*“. Li fariĝis ankaŭ Akademiano.[☆] Dum la unua mondmilito li estis kun sia tuta familio internigita en Francio kaj perdis sian tutan havaĵon. Post la unua mondmilito li verkis siajn rememorojn por Literatura Mondo.

[☆] vidu 14, 25. ĉap.

KABE estas pseŭdonimo de Kazimierz Bein (1872-1959), eminenta pola okulkuracisto, do kolego de Zamenhof. En siaj junaj jaroj el politikaj kaŭzoj li estis ekzilita por pluraj jaroj, kaj tial, kvankam li ekkonis E-on jam en 1887, li e-istiĝis nur en 1903. Baldaŭ li eklaboris tre fervore. En 1906 li jam estis vicprezidanto de la Akademio; tiam aperis lia *Vortaro de Esperanto*, vortaro Esperanta-Esperanta, en kiu la vortojn li difinas tre klare, tre trafe, en ia eleganta maniero. Inter liaj pluraj prozaj tradukoj (Grimm-fabeloj, Turgenjev-verkoj ktp.) la plej fama estas la traduko de „*La Faraono*“ (1907), granda historia romano de la pola Boleslaw Prus. Per tiu traduko li elmeritis la epiteton: „unua stilisto esperantista“. Fakte, lia lingvaĵo estas pura, klara, simpla, vere eleganta kaj libera de ĉiu naciismo: en lia stilo plenspire vivas la „spirito de la lingvo“. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibrataj: ĉiu vorto sur la ĝusta loko. Laŭ lia ekzemplo fariĝis modela en E la evito de „unu“ kiel nedifina artikolo kaj la neuzo de la kompleksaj verboformoj (estis – inta por pluskvamperfekto). Lia verkado restis pure traduka; laŭ lia opinio „la lingvo profitas pli multe per la tradukado ol per originala verkado. La originala verkisto ĉiam povas eltiri sin iel: li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ anstataŭigos ilin.“ Efektive, en tiu tempo, kiam la lingvo estis formiĝanta, unuavice la tradukoj estis utilaj por ĝia disvolvo kaj maturigo. Kaj tre feliĉa estis la elekto de la Prus-a ampleksa romano: oni avide legis tiun interesan historion el la egipta pra-tempo, kaj, ĉar temis pri libro tiam apenaŭ konata ekster Pollando, oni estis dankaj al E peranta tiel aten-

tostreĉan legaĵon. Kaj la e-istoj-verkistoj prenis kiel modelon la kristale klaran stilon de la traduko de Kabe, tiel do ĉi tiu romantraduko havis eksterordinaran kaj tre favoran influon. Oni ree eldonis ĝin en 1957, kaj oni povas konstati, ke la stilo de Kabe ĝis nun ne arkaikiĝis.

Estis granda konsterno por la tuta esperantistaro, ke Kabe en 1911, ĉe la kulmino de sia gloro, forlasis E-on. Ĝis nun ne estas klare, kio estis ties kaŭzo, ĉu personaj konfliktoj, aŭ, kiel li mem diris, senreviĝo pri la futuro de E, aŭ profesia okupiteco kaj fotoamator-eco. Kiel ajn okazis tio, lia nomo fariĝis kvazaŭ simbolo de apostateco: la ekseperantistojn de tiam oni nomis kabeoj, la forlason de la movado oni titolis kabe-igo.

En 1957, kiam oni reeldonis lian faman Prus-tradukon, li ree komencis interesiĝi pri la lingvo kaj oni konstatis, ke li parolas ĝin ankoraŭ flue. Sed, pli ol okdekjara, li jam nenion plu faris en E, do li ne povis plu dementi la rondelon de Kalocsay, kiu komenciĝas jene: „Ho Kabe, Kabe, Kabe, Kabe, droninta vive en la morto!“

36. LA FRANCA INFLUO

La franca influo aliĝis al la slava post 1900; en tiu ĉi jaro aperis la fama franclingva komentario pri la gramatiko de E fare de *Beaufront*. Literature tiu „franca epoko“ ne estis tiel fruktodona kiel la slava: karakterizaĵo de la franca movado estis la granda nombro de

la scienculoj inter la movadaj gvidantoj. La unua granda propagandisto en Francio estis mem scienculo: Charles *Méray* (1835-1911), fama matematikisto, kaj li varbis la grandan fervorulon kaj malavaran mecenaton de la esperantismo, generalon Hippolyte *Sébert*, la matematikiston Carlo *Bourlet*, la filozofon, universitatan rektoron Emile *Boirac* kaj multajn aliajn. Tiu sciencula stabo havigis al Esperanto seriozan aŭtoritaton en Francio tiel, ke la granda eldona firma *Hachette* decidis aperigi monatan revuon (La Revuo) sub la redakto de Carlo Bourlet kaj ankaŭ librojn en la fama „Kolekto Esperanta Aprobata de D-ro Zamenhof“, kaj montis eĉ tendencon monopoligi al si la tutan E-an libroeldonadon. Bourlet, kiel li mem skribis poste, fondis la revuon precipe por tio, ke Z. havu okazon regule publikigi siajn modelajn verkojn. Dank’ al tiu konstanta kunlaborado, kiun la firma kontentige salajris, Z. venis en pli bonan financon staton kaj povis traduki multajn klasikajn verkojn; tiun vastan Z-an verkadon ni ne havus sen Bourlet kaj „*La Revuo*“ (aperis de 1906 ĝis 1914).

En tiu sama jaro (1904), kiam el Hungario alvenis P. *Lengyel*, fondiĝis ankaŭ la PRESA E-ISTA SOCIE-TO, kies celo estis eldoni librojn kaj transpreni la redaktadon de la revuo *Lingvo Internacia*. Tiu ĉi revuo, ekde 1907 redaktita de Th. *Cart*, vivis ĝis la unua mondmilito.

Dume ankaŭ en Ruslando fondis *Saharov* la monatan revuon „Ondo de Esperanto“ en Moskvo. La revuo, kiu aperadis de 1909 ĝis 1917, enhavis krom ampleksa Ruslanda kroniko ankaŭ literaturon, poezion kaj libreccenzojn. La du ĉefaj revuoj de la E-a litera-

turo tamen estis tiutempe La Revuo kaj la Lingvo Internacia.

La rilato inter tiuj du revuoj ne estis ĉiam tre amika. Krom personaj antipatioj ilin dividis ankaŭ principaj konsideroj. La „Lingvo Internacia“ ĉiam plej severe observis la klaran, supernacian, „klasikan“ stilon; aliflanke „La Revuo“ estis pli multflanka, moviĝema, reprezentis la necesan fermenton de la lingvoevoluo, pro kio ĝi estis atakata de la konservativa „Lingvo Internacia“. Th. *Cart* kaj lia skolo (Pierre Corret, Fruictier, Lengyel, Capé ktp.) rigore kontraŭis ĉion novan, kaj principe malaprobis la tendencon de Zamenhof: evoluigi la Fundamentan lingvon helpe de *neologismoj* kaj *arkaismoj* (ekz-e longe kaj akre ili batalis kontraŭ la vorto „heziti“, kiun ili juĝis superflua apud „ŝanceliĝi“). Sub la influo de tiu skolo estiĝis eĉ sekto, kies klopodo estis uzi ekskluzive Fundamentajn vortojn, do ignori la 15. §-on de la Fundamenta Gramatiko; la plej fama reprezentantino de tiu sekto estis *Roksano* (Jeanne *Flourens*, 1871-1928) verkinta precipe komedietojn. Alia tendenco estis imiti plejeble la lingvuzon de Zamenhof, esti „ĝisoste“ Zamenhofa. Kiel la ĉefon de tiuj ĝisostuloj oni povas rigardi la anglan e-iston *Roŝo* (Richard *Sharpe*, 1844-1923), kies libro „*Travivaĵoj de Roŝo*“ (1931) estas ĝis nun leginda.

Literature tiu franca periodo ne estis speciale fruktodona, se ne kalkuli tiun grandegan gajnon, ke ĝi ebligis la aperon de la tradukoj de Zamenhof kaj Kabe. Sed, kiel tion oni povis atendi de scienculoj, ĝi multe faris por la scienca prilaboro de la lingvo.

Unue, en leksikologia rilato. Kun la disvastiĝo de la lingvo kaj ampleksiĝo de ĝia literaturo unu post la alia aperis vortaroj naciaj-esperantaj, kies aŭtoroj volis sen-

manke interpreti en E sian nacian vortotrezoron. Tio rezultigis multajn novajn vortojn, kaj en la diversaj vortaroj diversajn formojn por la sama nocio. Estis jam tempo kritike kribri tiun amason. Tion la unua efektivigis *Boirac* en sia vortaro.

Tiu vortinundo, cetere tiam ankoraŭ ne respondis al efektivaj bezonoj. Tial oni pe povas tute riproĉi tiun tro severan kondamnon, kiu tiutempe trafis la tro kompletan vortaron de *Grosjean-Maupin* (Cart: „ĝi estas ne nur malbona vortaro, sed ankaŭ malbona faro“). Tamen, la postmilita literaturo, precipe la poezio, multajn utiligis el tiuj „mopenaĵoj“.

Rilate la gramatikon, al la Ido-skismo estas dankebla la intensa studado de la E-a vortostrukturo, kies matura rezulto estis la vortfara teorio de *Saussure*. Laŭ lia propono, la Akademio oficialigis lian faman principon „*Neceso kaj Sufiĉo*“. Lia vortsistemo, baziĝanta sur la kategoria difiniteco de la radikoj kaj sur la aparta konstruo de ĉiu vorto el memstaraj elementoj, estas, kvankam ne oficiala, la efektiva fundamento de la E-a vortfarado. Kaj ĝi grave influis ankaŭ la lingvoevoluan, montrante la eblon de ŝparado pri sufiksoj, kiu estas karakteriza trajto de la moderna E, kompare kun la malnovaj tekstoj.

La ĉefa literaturisto de la franca periodo estis *Vallienne*.

HENRI VALLIENNE

H. *Vallienne* (1854-1908) franca kuracisto, dum sia tuta vivo multe interesigis pri literaturo. Laŭ C. Bour-

let „en tiu korpo de mezepoka kavaliro batis plej sentema kaj bona koro, en tiu kapo de kaperisto loĝis cerbo de altpensa scienculo“. Esperantisto de 1903, li tuj ekagis literature kaj komencis traduki la *Eneidon* de *Vergilius*. Lia opinio estis, ke E-o venkos nur, se ĝi estos literatura. En 1905 grave malsaniĝis lia koro kaj li plu ne povis forlasi sian ĉambron. Tiun malliberecon li uzis kun mirinda fekundeco por literatura agado. En 1906 aperis la tuta „Eneido“, en 1907 religiscienca verko „*Evolucio de la Religia Ideo*“ kaj la originala romano „*Kastelo de Prelongo*“, kiun sekvis en 1908 lia dua romano: „*Ĉu li?*“, kaj la traduko de „*Manon Lescaut*“ de *Prévost*. Postmorte en 1909 la traduko de „*Margot*“ de *Musset* kaj „*La aventuroj de Telemako*“ de *Fénelon*. Inter postmortaj manuskriptoj estis „*Metamorfozoj*“ de *Ovido*.

La plej rimarkindaj estas liaj du originalaj romanoj. Ili, volumoj po 500 paĝoj, estis de granda propaganda valoro: pruvis, ke la t. n. artefarita lingvo sufiĉas por esprimi kaj priskribi ĉiujn incidentojn de la ĉiutaga vivo. La enhavo de la romanoj estas laŭ la felietona literaturo (krimoj, incendio, mistero, identkonfuzoj pro simileco de ĝemeloj, juĝista eraro, duobla adulto paradokse senkulpa ktp.), kaj apenaŭ havas psikologian karakterizon; tamen, kun la amasigo de aventuraj eventoj, kun la sensotiklaj aludoj ili povas teni la intereson de la leganto ĝis la lasta paĝo. La romanon „*Ĉu li?*“ Literatura Mondo decidis reeldoni kun la stilrevizio de Kalocsay, sed pro la antaŭmilitaj konfuzoj aperis nur la unua duono (1938). Koncize konigas liajn romanojn V. *Benczik* en sia „*Libro de romanoj*“ (1979).

CARLO BOURLET

Bourlet (1866-1913) profesoro de matematiko, verkinto de famaj libroj matematikaj estis grandsignifulo precipe kiel propagandisto, organizanto kaj redaktoro de „La Revuo“. Lia akcidenta morto estis granda frapo al E. „De la momento – diris Zamenhof ĉe lia tombo – kiam li aliĝis al nia anaro, en nian aferon enverŝiĝis ia nova energio. Al lia senlaca iniciatado, instigado kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo.“ Krom lia redaktora kaj eldon-instiga agado li organizis ankaŭ la *Florajn Ludojn*, kiuj poste longe okazadis en katalunaj urboj; en ili oni disdonis literaturajn premiojn (vd. *Hankel*). Lia propra literatura verkado estis la *Babiladoj*, kiuj aperadis en la sinsekvaj numeroj de „La Revuo“ pri aktualaj e-ismaj temoj. La Revuon li povis fari tre altnivela kaj multflanka; en ĝi aperis ankaŭ 6-paĝa informo pri la hungara literaturo (*Barcza-Balkányi*, 1914).

THEOPHILE CART

Th. *Cart* (1855-1931), franco, profesoro de lingvoj kaj literaturo, lernis E-on 46-jara. Tuj komencis kursojn, verkis lernolibron, kiu fariĝis kvazaŭ klasika modelo. De 1920 li estis la prezidanto de la Akademio. Kiel redaktoro de la Lingvo Internacia, sub la pseŭdonimo „Blankbarbulo“, aperigis lertajn kaj bonhumorajn artikolojn. Multe li laboris por la blinduloj, kreis por ili la brajlan revuon „*Ligilo*“.

Th. Cart estis firmega fundamentano kaj kun granda energio defendis E-on kontraŭ reformoj kaj kontraŭ la danĝeroj de la Ido-skismo.

Fama fariĝis lia admona konsilo: „Ni fosu nian sulkon!“ T. e., la esperantistoj ne perdu sian tempon per diskutado pri tio, per kiu fosilo kaj kia metodo ili fosu, sed ili faru la fosadon, alie la sulko neniam estos preta. Li estis certe iom aŭtokrata animo, kaj en sia fervoro li bremsis kelkfoje pli ol necesis, por li eĉ Z. mem ne estis tute fidinda fundamentano. Sed en la tempo de la Ido-skismo tia batalema temperamento kaj necedema obstino estis ja bezonataj.

Liaj verkaĵoj kolektitaj aperis sub la titolo „Vortoj de Cart“, eldonitaj de Salo *Grenkamp* (1927).

EMILE BOIRAC

E. *Boirac* (1851-1917), franco, filozofa, rektoro de la Akademio de *Dijon*, esperantisto de 1900, la unua prezidanto de la Akademio, prezidanto de la unua kongreso en Bulonjo, estis unu el la plej bonaj stilistoj kaj per sia ĉiama bonhumoro, afabla rideto, diplomacia lerto kaj sugestia psika influo havis grandan kaj tre favoran influon al la ofte malkonkordaj gvidantoj de la franca kaj monda esperantistaro. Lia granda verko estas la „*Vortaro Esperanto-Esperanta*“ (1909). El liaj tradukoj elstaras: *Monadologio* de Leibniz (1902) kaj *Don Juan* de Molière. De li devenas la slogano „Esperanto estas latino de la demokratio“.

Saussure, (1872-1943), svisa franco, matematikisto, univ. profesoro, inter 1907 kaj 1914 disvolvis viglan literaturan agadon en diversaj e-ismaj revuoj, elpensis la monsystemon, „*spesmilo*“, kaj ellaboris la jam konigitan vortsystemon, per kiu li propre nur formulis la reformulitan vortfaran metodon de Z. La systemon varme aprobis ankaŭ Z. mem, sed la disopiniantaj akademi-anoj ĝis nun ne faris ĝin oficiala.

Poste Saussure, bedaŭrinde, volis reformi E-on kaj faris kvar aŭ kvin sinsekvajn projektojn. Per tio li izol-igis kaj perdis sian influon.

37. LA POEZIO DE LA ANTAŬMILITAJ JAROJ

Kelkajn jarojn antaŭ la unua mondmilito sin anoncis pluraj E-aj poetoj kaj verkistoj. Sed evidentiĝis, ke oni devas haltigi la inundon de laŭ lingva vidpunkto nedezirindaj verkoj kaj dum la Antwerpena Kongreso (1911) verkistoj kaj tradukistoj fondis organizaĵon: „*Esperantista Literatura Asocio*“, kies membroj havis la taskon reciproke ekzameni la manuskriptojn unu de la alia, antaŭ presigo. Preskaŭ ĉiuj literaturistoj aliĝis al ELA kaj baldaŭ montriĝis ties bona efiko. Post la unua mondmilito ĝi perdis sian influon kaj iom post iom formortis.

La plej elstara figuro de la antaŭmilitaj jaroj estis Edmond Privat.

E. Privat (1889-1962), franclingva sviso, studis lingvosciencan en Francio kaj Anglio; poste li fariĝis universitata profesoro en Ĝenevo kaj Lausanne. 16-jara, li piediris al la unua kongreso kaj faris tie grandan surprizon per sia elokvento. Li estis unu el la plej bonaj oratoroj de E, kun sia jen mole kortuŝa, jen sprite ideoriĉa parolo, kristalklara stilo kaj agrabla prononcado. „Edmond Privat, la dolĉa Vorto“ – rondelis pri li Kalocsay.

Ankoraŭ kiel lerneĵano, li fondis la revuon „*Juna Esperantisto*“ kune kun Hodler. Li verkis bonan lernolibron, facilan rakonton por komencantoj (*Karlo*, 1910), kiu estas ĝis nun populara legolibreto, eldonis versan dramon legendan (*Ginevra*, 1913), kaj poemaron „*Tra l'silento*“ (1912). En „*Ginevra*“ li prenas la temon el la kelta fabelmondo kaj rakontas la amhistorion inter la edzino de Arturo kaj kavaliro Lanceloto. La verketo enhavas tre belajn lirikajn partojn, sed mal multe da drameco. Tamen ĝi estis prezentata ne sen sukceso dufoje, en la Berna (1913) kaj en la Ĝeneva (1925) kongresoj. En Ĝenevo lerte pliigis la dramecon de la peco la reĝisorado de Baghy, kune kun eminentaj profesiaj aktoroj: geedzoj *Starke* kaj *M. Sárossy*. En „*Tra l'Silento*“ prezentas sin mildvoĉa, delikatsenta poeto, kiu apud agrable eleganta ĉarmo havas kordon ankaŭ por la korŝira doloro.

Lia ĉefverko estas tamen lia „*Vivo de Zamenhof*“, (1920), kiun kompletigis la „*Historio de Esperanto*“ en du partoj (1911 kaj 1927). Per ĉi tiuj verkoj li fariĝis la unua historiisto de E-o; li prezentas al ni la vivon de Z. kaj de lia kreaĵo detale kaj samtempe tre po-

ezie, en la ofte emocia tono de fidela adepto.

Privat havis gravajn meritojn ankaŭ kiel propagandisto: li prezentis E-n al la Ligo de Nacioj, estis ĉefa iniciatoro de la Someraj Universitatoj, prezidanto de UEA. Tiun sian aktivecon li disvolvis jam en la intermilitaj tempoj, en la dudekaj jaroj. Tiam aperis lia libreto „*Esprimo de sentoj en Esperanto*“, (1931), en kiu li majstre analizas tiujn trajtojn de la lingvo, per kiuj ĝi certigas al si la vivantecon. Li multe okupiĝis pri la problemoj de la internacia vivo, pri la popolaj luktoj por libero kaj sendependado, kaj verkis tiateme plurajn francajn librojn, el kiuj E-e aperis „*Interpopola konduto*“ (1935). En 1960 eldoniĝis kolekto el la verkoj de Privat sub titolo „*Junaĝa verkaro*“, kiu enhavas la faman prelegon pri la E-literaturo, kelkajn novelojn kaj poemojn, la tutan poemaron „*Tra l'silento*“, eĉ lian lirikan dramon „*Ginevra*“.

Tuj post lia morto en 1963, sub titolo „*Aventuroj de pioniro*“ Stafeto eldonis libron, en kiu liaj riĉaj spertoj, memorindaj renkontoj kun multaj, jam historiaj personoj alterniĝas kun noblanima opinio de Privat pri nia mondo. En 1967 aperis lia libro: „*Vivo de Gandhi*“, al kiu lin ligis respekto kaj amikeco. Preskaŭ ĝismorte li funkciis ankaŭ kiel E-lingva radioparolanto de la sendostacio Bern.

Privat, la milda poeto kaj varmvoĉa oratoro longan tempon estis fakte la ambasadoro de Esperanto.

MARIA HANKEL

M. *Hankel* (1844-1929), germanino, vidvino de univ. profesoro, esperantistiĝis en sia 60-a jaro, kaj ĝis

sia morto dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la movado, precipe al la literaturo, fondinte la E-istan Literaturan Asocion. Ŝi verkis plurajn poemojn kaj mallongajn prozaĵojn, kiujn ŝi poste kolektis en la volumeto „*Sabl-eroj*“. En 1909 ŝi gajnis unuan premion ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj, kaj por unu jaro estis elektita kiel Reĝino de la Floraj Ludoj.

La Florajn Ludojn Esperantajn organizis Carlo Bourlet okaze de la Universala Kongreso en Barcelona (1909). Per tio li revivigis mezepokan tradicion: la unuajn Florajn Ludojn oni aranĝis en *Toulouse*, ekde 1324, poste en Barcelona, ekde 1393; ĉe tiuj ludoj la poetoj konkuris per ampoemoj, kaj la unuan premion, bukedon da naturaj floroj, transdonis elektita belulino, la Reĝino de la Ludoj, kiu en 1909 fariĝis 65-jara Maria Hankel.

M. Hankel ne havis poetan talenton, sed en kelkaj poemoj la entuziasmo donis al ŝi tian inspiron, ke tiuj pecoj, precipe kun la retuŝoj de Kalocsay, bone kaj aŭtentike sentigas al ni tiun atmosferon, en kiu la unuaj esperantistoj laboris kaj esperis.

STANISLAV SCHULHOF

Schulhof (1864-1919), ĉeĥo, dentkuracisto, verkis multnombrajn poemojn en la ĉeĥa lingvo antaŭ sia esperantistiĝo. Li estis jam 57-jara, kiam aperis lia unua poemvolumeto, kiun sekvis ankoraŭ du aliaj kun originalaj kaj unu kun tradukitaj poemoj. Li estas la unua lirikisto en E, kiu per sia persona voĉo jen milde plenda, jen triste amara, povis vekii veran emocion. El liaj

30 poemoj almenaŭ la duono estas matura, korvarmiga poezio. Plej konataj fariĝis la „*Kanto de Sklavo*“, kiun Auld nomas „belega korokrio“ kaj „*En la mondon venis nova sento*”. poemo de kuntrena elano, kiu, muzikigita de Heikki Klemetti kaj kantata de la finna horo „*Suomen Laulu*“ estis vera sensacio de la Kongreso de Helsinki (1922). Post lia morto, en 1920, aperis lia antologio de ĉefaj poetoj (*Bezruč, Havlíček*, sub titolo „*Bohemaj grenatoj*“.

ELSKI KAJ ESKA

Sub tiuj pseŭdonimoj aperis en 1913 la poemlibreto Unuaj Agordoj de Stanislaw Braun kaj Stanislaw Karolczyk, du junaj polaj e-istoj. *St. Braun* (1893-1956) poste verkis multajn pli maturajn poemojn, el kiuj, bedaŭrinde la plej granda parto perdiĝis. La restintaj poemoj, kiujn Kalocsay kolektis, estas rezignaciaj, melankoliaj, skeptikaj, sed havas efektan forton kaj artan majstrecon, tiel ke li, eĉ kun siaj fragmentaj postlasaĵoj, devas esti taksata kiel elstara figuro inter la fruaj poetoj. *St. Karolczyk* (1890-1966) estas precipe kantisto de amo; lia postlasaĵo, domaĝe, estas ankoraŭ pli fragmenta ol tiu de St. Braun.

CZESLAW KOZLOWSKI

Cz. Kozłowski (1894-1956) lernis E-on kiel gimnaziano kaj en siaj junaj jaroj vigle partoprenis en la e-ista vivo Ruslanda: verkis recenzojn en la „*Ondo de Es-*

peranto“ kaj en 1912 eldonis poemkajeron „*Petaloj*“; La recenzantoj siatempaj trovis en tiuj poemoj iom tro da melankolio, sed ili estas plie interesaj manifestiĝoj de la animstato de viriĝanta bubo, en kiuj plurloke ekbrilas la sparko de vera poeta talento. Poste K. sin dediĉis, kabeiĝinte, al la pola literaturo, precipe kiel tradukanto.

JULIUSZ KRISS

J. Kriss (1891-1959) esperantisto pola, kiel junulo kunlaboris en multaj E-aj gazetoj kaj aperigis kajeron de originalaj kaj tradukitaj poemoj sub la titolo „*Melodioj de l'Nokto*“ (1914). Unu sola poemo restis vivanta de li: „*Kavaliro*“.

IVAN ŜIRJAEV

I. Ŝirjaev (1877-1933), ruso, instruisto, poste vilaĝa pastro, multe laboris literature: verkis originalajn novelojn kaj tradukis ampleksajn romanojn (Tolstoj: *Milito kaj Paco*; Dostojevski: *Fratoj Karamazov* ktp.). Liaj tradukoj, bedaŭrinde restis manuskriptaj kaj verŝajne perdiĝis. El liaj propraj noveloj aperis „*Sep Rakontoj*“ (1906) sub la pseŭdonimo „*Ivan Malfeliĉulo*“. Lia plej granda merito estas, ke li iniciatis la *Enciklopedion de Esperanto*, kaj ankaŭ mem sola kompilis pli ol 2000 artikoletojn; ĉi tiu lia laboraĵo estis la bazo, sur kiu estis poste konstruita la duvoluma verko (1933-34).

38. TRADUKLITERATURO

Antaŭ la unua mondmilito aperis nombraj tradukoj el la ĉefverkoj de la mondliteraturo: *Shakespeare: La Ventego (Motteau), Julio Cezaro kaj Makbeto (Lambert), La Venecia Komercisto (Wackrill)*; *Kiel plaĉas al vi (Ivy Kellerman)*; *Jacinto Benavente; Hispanaj dramoj (Inglada); Balzac; Eugenie Grandet (Gasse); Tennyson: Gvinevero (Clarence Bicknell, 1842-1918), kaj multaj aliaj. Lingve plej perfektaj kaj ĝis nun freŝaj estas la tradukoj de Maria Ŝidlovskaja, el kiuj (pli ol cent) aperis: A. Tolstoj: Princo Serebrjani; Koroŝenko: La sonĝo de Makaro kaj La Senlingvulo; Puŝkin: La Kapitanfilino.*

39. LA JAROJ DE LA UNUA MONDMILITO

Dum la milito, kompreneble, ĉesis la internacia literatura vivo en E. Tamen, la lingvo ne mortis, eĉ ne dormis tute. En Svisio UEA (Universala Esperanto-Asocio), fondita de Hector *Hodler* (1887-1920), organizis peradon de korespondado de familianoj inter malamikaj landoj, kaj Hodler en sia gazeto „*Esperanto*“ mesaĝis vortojn de humano kaj saĝo al la homoj sufokataj de malamo: „La parolo estas nun al la kanono, sed ne eterne daŭros ĝia blekado... Se sur la nunaj ruiĝoj ni volas konstrui novan domon, oni bezonas laboristojn, kiujn ne timigos la malfacilaĵoj... Ni, esperantistoj estu la embrio de tiuj elitoj. ...ni konservu nian idealon ...“

Alia vivsimptomo estis la disvastiĝo de E en la militkaptitejoj. *Hodler* rekomendis al la UEA-delegitoj, viziti, se eble, tiujn lokojn kaj tie serĉi kaj helpi samideanojn. Pri la etoso de Siberiaj kaptitejoj atestas du famaj romanoj de *Julio Baghy*.

Kiel jam menciite, *Grabowski* dum tiu trista tempo pretigis, kvazaŭ por memkonsolo, sian ĉefverkon, la tradukon de *Sinjoro Tadeo*, kaj Zamenhof, en sia laborĉambro, ĝis sia morto tradukis la *Malnovan Testamenton* kaj la *Fabelojn de Andersen*. La „*Ondo de Esperanto*“ en Ruslando aperis ĝis 1917 kaj en sia lasta numero publikigis longan raporton de S. V. *Obručev* (1891-1965) pri la februara revolucio.

Du rimarkindaj verkoj aperis dum tiuj jaroj: „*La Dorna Karesilo*“ de Bela Manto (*Boris Mirski*, ? – 1920), kiu enhavas poemojn satirajn, precipe versigitajn fablojn (1917), kaj la romano „*Nova Sento*“ (1915, dua eldono en 1925), de Tagulo (*H. B. Hyams*, ? – 1960).

La romano de *Hyams* en okultisma masko prezentas utopion de reformita socio. La animo de Londona senlaborulo enkorpiĝas en la Marso kaj trovas tie feliĉan mondon, kiun la marsanoj konstruis baze de racia ekonomio kaj simpligita vivmaniero.

DUA PERIODO

En la dua periodo, t. e. dum la intermilitaj jaroj (1919-1939) plej grava estis la agado de la grupo ĉirkaŭ la monata revuo „*Literatura Mondo*“, kiun grupon, pli malŝate ol aprece, oni nomis ankaŭ „Budapeŝta skolo“. Se tiun titolon oni akceptas kiel seriozan indikon, oni povas paroli ankaŭ pri aliaj tiaj skoloj: germana, angla, estona, kataluna ktp.

La perdojn kaŭzitajn de la unua mondmilito la movado kompensis kun surpriza rapideco. La decida fakto estis, ke Esperanto transvivis sian kreinton. La morto de la Majstro, kiel Zamenhof estis nomata de la unuaj adeptoj, estis dolora bato kaj postlasis grandan mankon, sed aliparte ŝajnis kvazaŭ streĉi ĉies energion.

40. LA GERMANA SKOLO

Semajna ilustrita gazeto komencis aperi en Kōln en 1920, sub la redakto de Teo *Jung*: la *Esperanto Triumfonta*, ŝanĝanta sian nomon en 1925 je *Heroldo de Esperanto*. Ĝi havis ankaŭ diversajn aldonojn, el kiuj lingve kaj literature signifaj estis „*Lingva Kritiko*“ kaj „*La Strigo*“. La kuraĝa iniciato kaj lerta persisto de tiu regule aperanta gazeto estas grava fakto de Espe-

rantio. Granda merito ĝia estas ankaŭ la ellaboro de la glata, rutina gazetlingvo. La redaktoro, Teo *Jung*, laboris ankaŭ literature, faris plurajn „postrakontojn“ (de *Sakuntala*, de *Gudrun*, de *Mil kaj Unu Noktoj*), rekantis „*La Alta Kanto de la Amo*“, kaj verkis fantazian aventurriĉan romanon „*Lando de l'Fantazio*“ (1927).

Signifaj E-lingvistoj de tiu periodo estas Eugen *Wüster*, fondinto de la Esperantologio, aŭtoro de grandioza „*Enciklopedia Vortaro*“, aperinta, bedaŭrinde nur ĝis la litero K, kaj Walter *Lippman*, sagaca pritraktanto de la Zamenhofaj „Lingvaj Respondoj“ (germane), kaj de diversaj gramatikaj temoj. Valoraj estas la germanlingvaj E-gramatikoj de *Velten* kaj *Göhl*. La „Germana Esperantisto“ kaj la „E-Praktiko“ enhavis multajn lingvoinstruajn paĝojn.

Apud la sendubaj meritoj, la germana influo havis ankaŭ malbonajn flankojn: ĝi volis altrudi ian pedantan, sekan logikecon. La netaŭgecon de tiu direkto plej evidente montras, ke tiu germana skolo estis relative sterila el literatura vidpunkto, kvankam ĝi povis varbi libroeldonajn firmojn (*Hirt & Sohn*, *Mosse*) kaj havis fervoran esperantiston-eldoniston (*Ellersiek*). Menciindaj esperantistoj-verkistoj: *Paul Bennemann* tradukis „*Gyges kaj lia ringo*“ de *Hebbel*, kompilis legolibron „*Tra la Mondo*“; lia traduko de la *Faust* de *Goethe* restis en manuskripto. August Oscar *Bünemann* tradukis la dramon „*Reaperantoj*“ de *Ibsen*. *Zanoni* (*Friedrich Pillath*) tradukis poemojn de *Heine* kaj lian „*Atta Troll*“. *Karl Minor* tradukis „*Natan la Saĝulo*“ de *Lesing*. *Argus* (*Friedrich Ellersiek*) verkis detektivromanon „*Pro Kio?*“. *Johannes Dietterle* redaktis la ampleksan libron „*Originala Verkaro de Zamenhof*“.

41. LA BUDAPEŝTA SKOLO

Dum dudek jaroj Budapeŝto estis la centro de intensa aktiveco intelekta, kiu grave influis nian literaturon, ĝin riĉigis per pluraj ĉefverkoj kaj eĉ nun ankoraŭ efike disradias. Plejado de riĉe dotitaj beletristoj, energie kapabla eldonisto kaj forta loka movado kune kreis escepte favorajn cirkonstancojn. El tiuj elkreskis la „skolo“ ligita al la revuo kaj eldonejo „Literatura Mondo“. Pli ol strikte lokita grupo, tiu skolo signas kulturan tendencon senteblian ankaŭ ekster Hungarlando kaj eĉ trans difinita periodo. La ĉefaj reprezentantoj de tiu skolo estis *J. Baghy* kaj *K. Kalocsay*.

La „skolo“ alportis novan manieron senti kaj pensi literature. Rompinte kun la diletantismo, ĝi fervore kultis estetikajn valorojn, evoluigis la esprimrimedojn, perfektigis la poezian teknikon ĝis senprecedenca grado, rezervis aparte indan lokon al la poezio, provizis la publikon per didaktaj libroj kaj levis la recenzan kritikon ĝis alta nivelo. Oni povas diri, ke ĝi instruis al tuta generacio la arton ĝue legi.

LITERATURA MONDO

La revuo L. M., ĝis nun plej grava beletra revuo en E, aperis en Budapeŝto en tri periodoj. Ĝin fondis kaj en la unua periodo, en 1922-24, eldonis Teodoro *Schwartz*, (1894-1968), kies aŭtobiografia verko pri la vivo de la judoj en Budapeŝto dum la dua mondmilito, sub titolo „*Maskerado ĉirkaŭ la morto*“ (1965) atingis grandan sukceson.

La eldonon de L. M. en 1924 transprenis Hungara E-a Instituto (Vincenzo *Tóth*). Redaktoroj estis *Baghy* kaj *Kalocsay*. Malgraŭ la multaj kaj eminentaj diversnaciaj kunlaborantoj kaj elstare valora enhavo, la revuo pro ekonomiaj malfaciloj devis ĉesi en 1926. — Tamen, en 1931 ĝi renaskiĝis sub la energia impulso de Vilhelmo *Bleier*, (1903-1940), kompetenta kaj riskema administranto, kiu samtempe kreis la eldonejon L. M¹. Ĉefredaktoris *Baghy* kaj *Kalocsay*, redaktoris *Bodó*, *Szilágyi* kaj *Totsche*², kunlaboris plej vaste internacia verkistaro, debutis en ĝi la juna generacio. De 1933 la revuo havis suplementan kvaronjaran kajeron: *Lingvo-Libro*. Ĝi ĉesis pro la milito en 1939. — Ĝia reviviĝo post la milito jam apartenas al la tria periodo de la E-a literaturo.

L. M. estis ankaŭ plej aktiva eldonejo: en apenaŭ ok jaroj ĝi sukcesis aperigi 80 volumojn kaj inter ili kelkajn el la plej signifaj verkoj de nia literaturo. Per la kreo de la eldon-kooperativo AELA *Bleier* trovis la vojon al la publiko, lerte spitis financajn malhelpojn kaj valutajn barojn ĝis la pleja limo de ebloj.

Estas malfacile taksu la servon kiun L. M. faris al la e-ismo, sed oni povas aserti, ke dum du jardekoj ĝi estis la pulmo, per kiu spiris la plej viva parto de niaj literaturistoj.

Inter 1974-1976 japanaj esperantistoj reprenis en ses volumoj la kompletajn jarkolektojn de L. M., kun aldono de facile manipulebla plena indekso, kompilita de M. *Benczik*.

¹ V. p.206.

² V. Ludoviko (Lajos) Tárkony

*J. Baghy*³ (1891-1967), aktoro, reĝisoro, verkisto, poeto, lingvoinstruisto, akademiano, e-istiĝis en 1911, aktivis por la lingvo dum sesjara militkaptiteco en Siberio. Post la milito li donis sin preskaŭ tute al E, gvidis kursojn, fondis klubojn, vojaĝis kiel Cseh-instruisto, multe agitis por plialtigi nian spiritan nivelon, iniciatis la Tagon de la Libro. Estis unu el la ĉefredaktoroj de *L. M. ĝis* 1933, kaj estis unu el la plej gravaj kontribuantoj al nia originala literaturo. Li sukcesis krei tujan kontakton kun vasta publiko, porti varmon kaj lumon al miloj da homoj kaj vekis en la legantoj ian mistikan, entuziasman simpatian. Impulsa temperamento, li verkis tre rapide en klasika sed mirinde viva lingvo eminente sugestia.

En la poemoj de la *Preter la Vivo* (1923), *Pilgrimo* (1926), *Migranta Plumo* (1929) kaj *La vagabondo Kantas* (1933) lia inspiro fontas el la travivaĵoj de la Siberia kaptiteco, el la komparto al la suferantoj, abomeno al la milito, protesta sento kontraŭ sociaj maljustaĵoj. Apud tiuj grandaj temoj, el kies variaĵoj li elkonstruas preskaŭ religiatmosferan filozofion de idealo, homamo, anoncata ofte kun romantika patoso, ne estas fremda al lia liro ankaŭ la kantado de amemocioj, nek la ŝerca subtono aŭ humura pinto. En *Ĉielarko* (1966) – antologio de popolaj fabeloj, – li majstre reverkas en versoj fabelojn de dekdu popoloj.

Kiel novelisto en *Dancu Marionetoj* (1927), *Migranta plumo* (1929) *Verdaj Donkiĥotoj* (1933), *La Teatra Korbo* (1924) kaj *Koloroj* (1962) li prezentas la samajn temojn kiel en la poemoj, jen per nigraj koloroj,

³ V. Ĉap. 28, paĝo 101.

jen per milda sentimento, jen per karikaturna satiro kaj sukcesas kelkajn el la plej brilaj pecoj de nia beletro.

Lia krea talento eminentas en la romanoj. *Viktimoj* (1925) kaj ties daŭrigo *Sur Sanga Tero* (1933) rakontas la tristan romantikon de la militkaptiteja vivo kaj tuj iĝis ege popularaj. (Ambaŭ represitaj en unu volumo en 1971.) La verva stilo kaj interna ardo, la interesa konstruo kaj turnoriĉa temoplekto tiom ligas la leganton, ke oni forgesas la neverŝajnajn trajtojn de kelkaj karakteroj. Lia plej ampleksa romano estas *Hura* (1930), kiu tre klare montras la du tendencojn de la aŭtoro, estante majstre grimaca satiro pri la socio kaj samtempe utopio pri socio pli bona. *Printempo en Aŭtuno* (1931, represita en 1972) emocie pentras burĝonan amon per paŝtelkoloroj. *Paŭlo Paal* (en *Verdaj Donkiĥotoj*) diras, inter kremo kaj pipro, la aventurojn de naiva esperantisto. *La Verda Koro* (1937) estas ĉarma rakonto el rememoroj de Siberia militkaptiteco, plurfoje eldonita en diversaj landoj. La ĉapitroj estas majstre laŭgrade komponitaj lecionoj, uzeblaj por komencaj kursoj, aŭ kiel legolibro postkurso.

Baghy ĉiam multe okupiĝis pri la demandoj de la E-a teatro, varbis teatran trupon el diletantoj, reĝisoris en kongresoj kaj postkongresoj. Li mem ankaŭ verkis plurajn unuaktaĵojn, el kiuj kvin aperis en la libro „*En maskobalo*“ (1977). La kulmino de lia dramverkista agado estas la triakta lirika dramo *Sonĝe sub Pomarbo* (1958), kiu el ĉarma idilio de ama paro trenas nin en specon de scienca fikcio kaj enpensigante per la vizio de teknokrata mondo, frostotremigante per mondpereo, reportas nin sub la dolĉan ombron de la pomarbo de juna amo. La tuto estas verkita per rimataj versoj tiel fluaj, ke ili legiĝas kvazaŭ vigla konversacia prozo.

Post lia morto, en 1970, sub titolo „*Aŭtuna foliaro*“ la eldonejo *Pirato* en *Osaka* aperigis elektajon el *Baghy-poemoj*.

Oni povas diri, ke en granda parto de la intermilitaj jaroj la e-istoj kvazaŭ estis sub la sugestio de la personeco de Baghy, „la korojn larĝbrakume kaperanta, Paĉjo de l'tuta mondo Esperanta“. „Lia dolĉa personeco – skribas Marjorie Boulton – sparkema, impetema, sed tre amikeca, sincera, komprenema, malegoisma kaj karitata preskaŭ kiel tiu de Zamenhof mem, estas eble lia plej perfekta artverko.“

KÁLMÁN KALOCSAY

Kálmán *Kalocsay*² (1891-1976), kuracisto, doktoro de medicinaj sciencoj, univ. profesoro, esperantisto de 1911, akademiano de 1949, ĉefredaktoro de *Literatura Mondo* en ties ĉiuj tri periodoj, estas unu el la ĉefaj figuroj de la E-a poezio.

Liaj originalaj poemoj aperis unue en la kajereto „*Mondo kaj Koro*“ (1921), poste en la volumo „*Streĉita Kordo*“ (1931). En ili li sin rivelas majstro de l'interna kaj ekstera formo kun emo al ĉiam pli profundaj temoj, pli altaj suproj. Tiuj poemoj – skribas *Marjorie Boulton* – estas „indaj al la Eŭropaj tradicioj – romantikaj, sed kun la salo de maturaj ironio kaj realismo, kun tiu vireca forto kaj viva drasteco ofte trovbla en la hungara poezio“. La poemoj de K. verkitaj post 1931 estas grandnombraj, sed nekolektitaj en volumo; la malgranda poemvolumo „*Izolo*“ (1938) perd-

² V. Ĉap. 28

lĝis senkolporte pro la milito. UEA en 1977 eldonis fotorepreson faritan laŭ unu el la restintaj kvin ekzempleroj. La *Rimportretoj* (1931) montras virtuozon de la rondelo kaj delikatan humoriston; en tiuj poemetoj li eternigis la elstarajn e-istojn de tiuj tempoj. Jam al la tria literatura periodo apartenas lia *Ezopa Saĝo* (1956), en kiu li verse reverkis kaj brile rejunigis malnovajn fablojn.

En lia verkaro okupas specialan terenon la amoro, la delikata kaj senĝena erotiko. En 1932 aperis la „*Sekretaj Sonetoj*“ sub pseŭdonimo *Peter Peneter* („naskiĝinta“ en 1891), kaj en 1969 ties dua eldono en la volumo „*Libro de Amo*“, kies novajn poemseriojn verkis parte la „filo“ sub ps.nomo: *Georgo Peterido Peneter* („naskiĝinta“ en 1904 !). La Sonetoj konsistas el 52 perfektaj sonetoj pri evoluigantaj amoraĵ sentoj kaj amludoj de juna paro kun akurata sprita difino de la uzataj intimaj vortoj, neologismoj. La Libro de Amo enhavas krom tio parte tradukojn, travestojn, originalojn de Kalocsay kaj Waringhien. En tiu libro estas kreita la artvalora E-a poezio pri amo, amoro, intima geedza kaj ĝenerale de la seksa vivo, en etoso de grandaj antaŭuloj de monda beletro, kiel la biblia reĝo *Salomono*, poetoj grekaj: *Anakreono, Homero, Meleagro*, — latinaj: *Ovidio, Petronio*, — italaj: *Aretino, Berni*, — kaj kelkaj el la „pli modernaj“ tempoj: *Goethe, Heine, Béranger, Verlaine, La Fontaine, Musset, Baudelaire, Babits*, ktp. — La libro estas dediĉita „al gefianĉoj kaj junaj geedzoj por instruo kaj instigo“, — tamen krome antaŭe staras la averto:

„Leganto, se vi estas pruda kaj naŭzas vin la amo nuda... pripensu bone antaŭ lego: tute ne estas mi altruda...“

da... Anstataŭ indigniĝi... forĵetu min...“ – ne legu ĉi libron!

Lia traduka verkado montras lin la plej granda ĝisnuna lingvoartisto. El la hungara literaturo li interpretis ampleksan kolekton el la poemoj de *Petőfi*, kaj libroforme aperis el ili *Johano la Brava* (en 1923, poste en 1948). Tiu longa, folklore naiva rakonto-poemo kaj la simile granda revoluciema, reformema poemo „*Apostolo*“ estis eldonita kune kun 130 *Petőfi* poemoj en volumo „*Liberio kaj Amo*“ en 1970. Majstre fidela kaj mirinda estas lia traduko de la *Tragedio de l'Homo de Madách* (1924, – nova trad. 1965). Li redaktis la *Hungaran Antologion* (1933) kaj faris en ĝi ankaŭ la plejan parton de la poemtradukoj reprezentantaj la hungaran poezion de Balassa ĝis Kassák. Lia poligloteco ebligis al li traduki ankaŭ el aliaj lingvoj: lia *Eterna Bukedo* (1931), poemantologio el 22 lingvoj, estas juvela trezoro por ĉiu versamanto; li redonas, laŭ *Waringhien*, ankaŭ la apartan harmonion, individuan atmosferon de la originalaj poemoj, „oni ĉiam rekonas la voĉon, eĉ kiam tio ŝajnis neebla“. En 1938 aperis la *Romaj Elegioj* kaj *Taglibro* de Goethe en lia adekvata, brila traduko, en ĉiuj detaloj, etoso, stilo inda al la originalo. Lia *Infero* de *Dante* (1933) estas monumento de la mondliteraturo en kungenia, formfidela interpreto. Jam en la tria literatura periodo presiĝis: *La Floroj de l'Malbono* de *Baudelaire* (tr. kun *Waringhien*, *R. Bernard*, *Magda Carlsson-Bohman*, *Hilda Dresen*, *L. Tárkony* kaj *H. Vatré*); *Kantoj kaj Romancoj*, (1971), ampleksa poemelekto el *Heine* (tr. kun *Waringhien*) kaj *Reĝo Lear* (1966), *Somermeznokta Sonĝo* (1967) kaj *La Tempesto* (1969) de

Shakespeare. El lia pretigita granda internacia antologio *Tutmonda Sonoro* aperis multaj pecoj en diversaj revuoj, precipe el la helena, latina kaj antikva orienta poezio.

Lia originala prozo estas ĉefe lingvistika kaj poetika: *Lingvo Stilo Formo* (1931), eseoj pri lingvaj demandoj, stilo- kaj formoproblemoj. Kun Waringhien li verkis du gravajn librojn: *Parnasa Gvidlibro* (1932 reviziita kaj kompletigita eldono, en kiu kunlaboris ankaŭ R. Bernard, aperis en 1968), kaj *Plena Gramatiko de Esperanto* (1935 v.p.177), la plej grava konsilanto en lingvaj problemoj. Esence la sama kaj ne malhavebla estas por hungaroj lia verko: „*Rendszeres Eszperantó Nyelvtan*“ (Sistema Esperanto-Gramatiko, 1966). Nepre menciinda kaj grava kontribuado al la „Ata-ita diskuto“ estis lia studo pri pasivo „*Vojaĝo inter la tempoj*“ (1966). Eminente bonstilaj, sed malpli gravaj estas liaj prozaj tradukoj.

Pri la du verskolektoj de li redaktitaj (*Dekdu poetoj* kaj *Naŭ poetoj*) temos aparte.

La Bristola E-Societo aperigis elektaĵon el la verkoj de Kalocsay, sub titolo „*La kremo de Kalocsay*“ (1971). En Hungario aperis kajero „*El Streĉita Kordo*“ (1976), kun dek unu poemoj el la fama originala poemaro de la poeto.

Kalocsay daŭrigis la linion de Zamenhof kaj Grabowski per la elekto de „malfacilaj taskoj“, per la riĉigo kaj evoluigo de la lingvo. Pro tio li estis ankaŭ multfoje atakata, simile sed pli akre ol Zamenhof kaj Grabowski siatempe. En la dua periodo eksplodis kvaŝa „neologisma batalo“, en kiu kelkan tempon Kalocsay ŝajnis preskaŭ izoliĝi kaj esti anatemita. Ankaŭ en la tria periodo leviĝis kontraŭ li malamikaj voĉoj,

sed malpli ofte kaj kun multe malpli granda resonado: granda parto de la neologismoj de li enkondukitaj aŭ revivigitaj estas registrita en vortaroj kaj ilin ĝoje uzas poetoj kaj poemtradukistoj, eĉ la orientanoj, kiujn la simplistoj tiel fervore defendis kontraŭ tiu vortriĉo, nomante ĝin ia okcidentismo.

En la lingvistiko la ĉefa merito de Kalocsay estas la malkovro de la vortefiko kaj inversa vortefiko. Per tio li povis legitimi plurajn „leĝerajn“ zamenhofajn formojn atakatajn de trologikuloj kaj tiel gardi la elasticcon de la lingvo. *Auld* emfazas, ke li, kiel majstro de la formo „inter 1921 kaj 1939 kvazaŭ mem ellaboris la tutan tradician poetikon de Esperanto.“ Sed, li aldonas, „ne nur teknike Kalocsay impresis kaj impresas. La disciplino de grandioza intelekto, efikante sur emocioj persone kaj sincere sentataj, rezultigis rafinitajn, delikatgustajn poemojn, en kiuj ĉiu vorto ludas sian precizan rolon, kiel marmorero en rava mozaiko.“

LAJOS TÁRKONY

L. *Tárkony*, antaŭe L. *Totsche* (1902–1978), oficisto, e-isto ekde 1919, poeto kaj konata recenziisto, kunredaktoro de L. M. kaj Lingvo-Libro. Liaj poemoj aperis en L. M., en la *Dekdu Poetoj* (1934), kaj en la tria literatura periodo, en „La Nica Lit. Revuo“, en Hungara Vivo.

Liajn kolektitajn poemojn sub la titolo *Soifo* eldonis Stafeto en 1964. Multajn recenzojn li verkis, liajn elstare kritikajn studojn pri kelkaj verkistoj e-istaj entenas la libro *De Paĝo al Paĝo* (1932, dua eldono en

1976). Per ĉi tiu verko li kreis la seriozan kaj eksper-
tan, pure literaturan artospecon de la kritiko en E.
Unua provo: taksi la E-an literaturon laŭ mezuro de
la internacia literaturo en Esperanto. Li tradukis fan-
tazian novelon de Karinthy: *Vojaĝo en Faremidon*
(1934) kaj vaste kontribuis al la proza parto de la
Hungara Antologio (1933).

L. Tárkony estas tre serioza kaj kompetenta juĝan-
to pri beletraj valoroj. Neordinare kapabla tradukisto,
kiu povas reprodukti stilnuancojn, „aromon“ de la
originalo. Pasia amanto de la belo, diskreta, sed funde
lirika temperamento, li prikantas intimajn emociojn,
poezion de ĉiutago, pentras grandajn freskopoemojn
pri la kvar mondregionoj, rerakontas antikvajn mitojn,
rezignacie inventaras la pasantajn belaĵojn de la vivo,
ĉion ĉi en la plej pura lingvo delikate cizelita. La son-
harmonio kaj sugestia povo de liaj poemoj trovis entu-
ziasmajn aprecantojn (*Clark, De Kock*). Longdaŭre li
laboris ĉe la E-dissendoj de Hungara Radio. *Hungara*
Vivo dediĉis al la pritraktado de lia verkaro sian nu-
meron 1975/6.

KARLO BODÓ

K. Bodó (1903-1963), oficisto, esperantisto de
1921, redaktoro de L. M., kiel eminenta proza traduk-
isto, amplekse kunlaboris al *Hungara Antologio*
(1933), brile esperantigis *Norda Vento* (1926), novel-
aron de Karinthy, kaj *La Cikoni-kalifo* (1920), roma-
non de *Babits*, en kiu lia interpreta arto kaj eleganta
stilo atingas perfektecon per profunda trasento de la

spirito de ambaŭ lingvoj. Liaj tradukoj estas tiel naturaj kaj vivaj rekreoj, ke ili impresas kiel nova originalo.

FRANCISKO SZILÁGYI

F. *Szilágyi* (1895-1967), esperantisto de 1924, kunredaktoro de *Literatura Mondo* komencis sian verkistan karieron en la budapeŝta skolo: liaj poemoj aperis en *Dekdu Poetoj*, lia *Trans la Fabeloceano* estis eldonita de L. M. Antaŭ la dua mondmilito li elmigris al Svedio. La pli gravan parton de sia literatura agado li disvolvis en la tria literatura periodo (v. tie).

42. KOLEKTIVAJ LM-LIBROJ

La *Parnasa Gvidlibro* (1932) estas la poetiko de E-o. Ĝi enhavas sesĉapitran versan poetikon de Kalocsay, kiu en tre klara, ofte amuza maniero pritraktas la demandojn de poezia stilo, temelekto, komparoj, rimoj, ritmo, lingva elasto kaj logiko, vortriĉo ktp. kaj skizon de E-a metriko kaj E-an Rimaron de Waringhien, kun Glosaro. La libro estis akre atakata pro la neologismoj de la Glosaro, sed pli kaj pli ĝi pruviĝis nemalhavebla helpilo de poetoj kaj tradukistoj, grave kontribuante al la evoluo de nia poezio. En Pollando aperis ĝia dua, kompletigita kaj reviziita eldono en 1968. Ĉe tiu eldono krom Kalocsay kaj Waringhien, ankaŭ Roger *Bernard* kunlaboris.

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO

La P. G. de E de *Kalocsay* kaj *Waringhien* (1935, 1938, tria eldono inter 1958-64, Milano) estas la unua vere kompleta, science sistema esploro de la tuta lingvomaterialo de E. Ĝi pritraktas la vortfaradon laŭ la Saussure-a teorio kompletigita de Wüster kaj Kalocsay kaj ĝin dokumentas kaj ekzemplas ĝis la plej etaj detaloj. Precipe valora estas la ĝisfunda analizo de la E-a sintakso. La aŭtoroj uzas precipe Z-ajn ekzemplojn. Pro la interesa diskutmaterialo la lingvo estas ankaŭ plaĉe legebla, sed precipe utila ĝi estas kiel konsultlibro: detala indekso ebligas, ke en ĉiu demando oni povu sin orienti pri la plej rekomendinda, preskaŭ ĉiam ankaŭ zamenhofa solvo. La verko havas netakseblan valoron el literatura vidpunkto: ĝi donas en facile alirebla formo la „spiriton“ de la lingvo.

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

La Enciklopedio, kiun iniciatis I. *Ŝirjaev*, estas duvoluma abunde ilustrita verko entute sur 896 paĝoj (1933/34). Ĝi estas rezulto de internacia kunlaboro de pli ol 50 personoj, kaj estas valorega fonto de detalaj informoj pri ĉio rilata al la ĝistiam movado: historio, biografioj, bibliografio, dokumentoj, institucioj, lingvaj problemoj, E-aj specialaĵoj ktp. Ĝi registris kvazaŭ en la lasta momento indikojn, kiuj cetere estus nesaveble perditaj kaj estus imitinda modelo por nova ĝisdata Enciklopedio. La kolekton kaj aranĝon de la materialo kun speciala kompetento faris la du redak-

toroj: *Ludoviko Kókény* kaj *Vilhelmo Bleier*. — La ĉefredaktadon faris *L. Kókény*, kiu proporciigis, poluris, kaj — se necese — reverkis multajn artikolojn, skribis kelkcent biografiajn kaj aliajn artikolojn. *V. Bleier* kolektis per granda eltrovemo la ilustraĵojn. *K. Kalocsay* redaktis kaj ĉefe verkis la lingvistikan parton.

DEKDU POETOJ

Dekdu Poetoj (1934) estas poemkolekto redaktita kaj antaŭparolita de *Kalocsay* kaj enhavas poemojn de *Adamson*, *Hilda Dresen*, *Price Heywood*, *N. Hovorka*, *N. Kurzens*, *G. E. Maŭra*, *L. N. Newell*, *Amalia Nuñez-Dubus*, *A. Schauhuber*, *E. C. Stillman*, *F. Szilágyi*, *L. Totsche*. Pri *Hilda Dresen*, *Maŭra*, *Newell*, *Szilágyi* kaj *Tárkony* oni trovas apartan ĉapitron.

Hendrik Adamson (1891-1946) estis estona instruisto kaj estona poeto-verkisto kun intime elegia humoro, granda reaga sentemo al la krudeco de la vivrealaĵo, kiu vere ne dorlotis lin: malsana, li vivis retiriĝinte kaj longe mortadis en mizero. Ekde 1932 li verkis poemojn ankaŭ en E, kies nur parton entenas *Dekdu Poetoj*. Malespera rezigno, profetaj ektondroj kaj amara ironio alternas sur lia liro; se li rifuĝas de la amaraj bildoj, li sukcesas mildajn aŭ ardajn ampoemojn aŭ sorĉe sonpentrajn naturscenojn. En sia novelo *Aŭli* li eminentas per karakterizo kaj etosprezento. Post 21 jaroj de lia morto, en 1967, sub titolo „*Vesperkantato*“ aperis poemaro de li, kiu malgraŭ la kelkloka ŝanĝado de la originalaj tekstoj, tamen restis lia konsiderinda poezia testamento.

(Brian *Price-Heywood* (1910-1942), angla kvakera misiisto, estis poeto de naturdetaloj, de rapide forvelk-antaj sed en sia momenteco eternvalidaj humoroj, de la etaj ĝojoj de la vivo, do fakte, miniatur-artisto, kiu tamen sopiris verki ian „epopeon viv-reeĥan“. Lia frua morto (li dronis kun torpedita ŝipo) ne lasis disvolv-igi la grandajn promesojn al li ligitajn.

Nikolao *Hovorka* (1901-1967), aŭstra verkisto kaj redaktoro, havas nur kelkajn poemojn, el kiuj elstaras la *Heineska „Sopiro“* kaj precipe la „Amindaj junaj amikinoj“ kies kortuŝa ĉarmo kaj preskaŭ tragika kompatio unuiĝas en unika harmonio.

Nikolao *Kurzems* (1910-1958), latva ŝtatoficisto, kelktempa redaktoro de la Ondo de Daŭgava, multe tradukis el la latva prozo kaj poezio kaj liaj poemoj aperis ankaŭ en aparta volumo (*Mia Spektro*, 1938). Li estis majstro de la etaj formoj, sed en tiuj miniaturoj li povas meti konsternajn, animskuajn konfesojn de spite ribela krude sincera, defie malespera animo. Lia granda esprimovo manifestiĝas ankaŭ en liaj poemtradukoj el la latva. Lia vivoverko restis fragmenta, sed ĝi estas monumenta fragmento.

Amalia *Nuñez Dubus* (1899-), hispanino, telegrafistino kaj help-profesorino, e-istino de 1911, kunlaboris en pluraj revuoj per orig. poemoj kaj poemtradukoj el la hispana. Freŝa tono, sincereco, facileco de esprimo karakterizas ŝiajn poemojn, en kiuj apud melankolia aŭ ĉarma amrevemo troviĝas ankaŭ filozofia meditado. En mallonga verketo (19 kvinjambaj strofoj) sub titolo „*Eterneco*“, ŝi prilaboris antikvan legendon de *Navarra* (1966, Zaragoza.)

Alfred *Schauhuber* (1896-), aŭstra oficisto, estas la poeto de la serena lunlumo, de la milda sed tamen vira

melankolio. Badaŭrinde li ne disvolvis plu siajn kapablojn.

Ezra Clark *Stillman* (1907-), usonano, kultura sekretario, eksmembro de direktoraro de IALA. Apud kelkaj ĉarme kaj impertinente facilaj poemetoj li verkis unu japaneskan kanton, miniaturan monumenton, kiu sola povas gardi lian nomon en la E-a poezio.

NAŬ POETOJ

Naŭ Poetoj (1938) estas poemkolekto redaktita kaj antaŭparolita de Kalocsay, sed post sia presiĝo senkolporte perdiĝinta. Ĝi enhavas poemojn de Juliette *Baudin-Vatré*, (1910-1937) mortinta june, kaj postlasanta krom kelkaj bele cizelitaj, naturamaj, iel milde panteismaj poemoj modelajn tradukojn el *Lamartine*; de Grindel *Falkonbrîg*, leningradano, kaj de N. *Ĉulitis*, latvo, kies kelkaj poemoj donis grandan promeson, bedaŭrinde neplenumiĝintan, de Ludmila *Jevsejeva* (1913-), latvino, kiu sian ĉirkaŭaĵon povas vivi kaj travibri per emocio kvazaŭ en poemkadritaj naturscenoj; de la pola Waclaw *Sieroszewski*, en kies energiaj versoj martelas ia senpacience streĉiĝanta volo; de Martin *Strümpfel* (+ 1939) sudeta germano, granda espero frue rompita, postlasanta plurajn poemojn de sugestia naturprezento; de V. G. *Sutkovej*, sovetiano el Odessa, kiu en unu poemo la plendon de amallerta viriĝanto, en alia kvazaŭ la elegion de la prilaborata materialo prikantas kun fascina longo kaj plastikeco; de Karl *Vanselov* (1877-1959), el kies abunda originala kaj traduka verkado, liveranta multajn bonajn kan-

totekstojn kaj eldonita ankaŭ en kajeroj, la kolekto enhavas du belajn poemojn kun grandefikaj kresĉendoj; fine de Saint Jules *Zee*, kies poemoj, bedaŭrinde ne multaj, kun sia delikata sentemo, nervoza vibro, etoskrea fantazio kaj memorriĉo estas juveletoj de la E-a poezio. *Zee* (aŭ *Sü*) aktivas ankaŭ en la tria lit. periodo per tradukoj. Lia silentiĝo kiel de originala poeto E-a estas unu el la plej doloraj perdoj de nia poezio.

43. ESTONAJ KAJ FINNAJ AŬTOROJ

La estona movado ekfloris precipe en la komenco de la dudekaj jaroj. El literatura vidpunkto tre grava estas la apero de E-Estona Vortaro de Vo-Ko (Vortara Komisiono gvidata de Helmi *Dresen* (1892-1941). Helmi kaj Hilda *Dresen*, krome pluraj estonoj, precipe Henriko *Seppik* (1905-), estis kunlaborantoj de L. M., kiu eldonis ankaŭ specialan estonan numeron. Granda okazaĵo estis la apero de la „*Kvin Noveloj*“ de *Tuglas* (1924), en la traduko de *Seppik*. Al la estona skolo oni povas kalkuli ankaŭ la poeton kaj verkiston *H. Adamson*, unu el la Dekdu Poetoj. Literature plej aktiva estas el tiu skolo Hilda *Dresen*.

HILDA DRESEN

Hilda *Dresen* (1896-), radiotelegrafistino, e-istino ekde 1916, sekretario de la Estonia E-a Soc. Multaj

originalaj kaj tradukitaj poemoj aperis de ŝi en LM. Krom la estona ŝi tradukas ankaŭ el la germana kaj rusa poezioj. Kun inspira simpatio ŝi tradukis kolekton el Marie Under (*Elektitaj versaĵoj*, 1929) kaj el J. Barbarus (*Horizontoj*, 1931), kunlaboris en la *Svisa Antologio* (germana poezia parto), *Estonaj Kantoj* (1931), *Estonia Antologio I.* (1932). El ŝiaj tradukoj la plej sukcesaj estas sendube ŝiaj Under-interpretoj, kaj la elstara traduko de la estona nacia epopeo „*Kalevipoeg*“, el kiu en 1975 aperis fragmentoj kun ampleksa enkondukita studo ĉe *Eesti Raamat* en Tallinn.

Ŝia originala poemaro aperis en 1967, sub titolo „*Norda Naturo*“. En tiuj originalaj poemoj ŝia lingvo estas ankoraŭ pli elasta kaj harmonia ol en la tradukoj, kie, pro troa respekto de la ritmoskemo, kelkfoje sentiĝas iom da rigideco. En tiuj originalaj poemoj regas ia milda malenkolio, sed, kiel Kalocsay skribis: „tio ne estas plorema sentimentaleco: ĝi similas al la nuba ĉielo, tra kiu oni esperas, volas lumon. Tiu lumespero donas tute apartan nuancricon eĉ al la grizo, kaj en kelkaj ŝiaj printempaĵoj ĝi tremas en la ĝojo de plenumiĝo“.

VILHO SETÄLÄ

Vilho Setälä (1892-), finno, filozofia magistro, Esperanto-eldonisto kaj redaktoro. Akademiano ekde 1930. Li verkis lerno- kaj legolibrojn, E-Finnan kaj Finno-E-an vortarojn. Lia plej konata legolibro, la „*Privilegia Vojo*“ aperis en 1960. Sub titolo „*Fortoj de l'vivo*“ (1967) aperis riĉa kolekto el lia multflanka,

potenca poresperanta laboro. Menciindaj estas ankaŭ liaj tradukaĵoj: „*Batalo pri la domo Heikkilä*“ de J. Linnankoski (1919) kaj la poemvolumeto de J.H. Erkkö „*Spegulo homarana*“ (1946). La Filozofia Fakultato de la Universitato Helsinki en 1973 aljuĝis al V. Setälä honoran doktorecon filozofian, inter kies kaŭzoj gravan rolon havis, ke li uzis Esperanton por kompara lingvistiko.

44. LA FRANCA SKOLO

La franca movado efikis al la lingvo kaj literaturo de E inter la du mondmilitoj precipe per tri personoj, per Th. Cart, kiu estis la prezidanto de la Akademio ĝis sia morto en 1931, per *Grosjean-Maupin*, la granda leksikologo de E, kaj per G. *Waringhien*. Ĉi tie ni klasos ankaŭ Raymond *Schwartz*.

La efiko de Cart montriĝis ĉefe en la batalo kontraŭ neologismoj; kun sia granda energio kaj senceda batalemo li sukcesis ekz-e oficiale malaprobigi la uzon de „i“ por landnomoj anstataŭ „uj“, proponitan de Hector *Hodler* en la gazeto „*Esperanto*“ de UEA, kiel pli konforman al la nacilingvaj landnomformoj. La batalo estis tre akra kaj de Cart ĝi estis gvidata kiel defendo de la Fundamento. La danĝero estis trotaksita; temis pri simpla neologismo uzebla anstataŭ unu el la tri sencoj de „uj“ – ion tian klare antaŭvidas kaj anticipe sankcias la antaŭparolo de la Fundamento. Fine UEA cedis, sed baldaŭ SAT enkondukis la sufikson „-io“ por landnomoj kaj nun ĝin uzas pli ol da duono de la e-istaro. Kalocsay nomis tiun „io-ujo-batalon“ mal-

ŝparita heroaĵo. Cetere la Akademio en la „Oka Oficiala aldono“ (II/ 3) konstatas, ke malgraŭ la oficiala malkonsilo de Lingva Komitato (en 1922): „*la uzado de tiu sufikso -io ne malkreskis, sed male disvastiĝis; ... la uzo „de la sufikso -io apud la Fundamenta -ujo por ricevi pli internaciajn formojn de landnomoj estas ĝusta apliko de tiu Zamenhofa metodo.*“

Emile Grosjean-Maupin (1863-1933), licea profesoro, okupiĝis ĉiam kaj preskaŭ ekskluzive pri lingvaj demandoj. Lia granda aŭdaco estis en 1910 la redakto de *E-franca vortaro*, en kiun li volis registri ĉiujn vortojn troveblajn ie ajn en la E-literaturo. Per tiu vortaro li elvokis egan indignon en Cart kaj ties rondo. Tamen, per sia diplomatia lerteco li sciis ne nur venki la malkonfidon de Cart, tiom ke ekde 1920 ĝis sia morto li estis la direktoro de la sekcio pri komuna vortaro en la *Lingva Komitato*, do li fariĝis la „vortministro“, kiel skribis pri li Kalocsay, sed eĉ sukcesis akordigi la du tendencojn en E: la konservativan kaj la novigeman. Tion li faris per la granda verko, per kiu li brile kronis sian vivon, per la *Plena Vortaro* de Esperanto.

Por kompreni tion, oni devas scii, ke la Lingva Komitato de tempo al tempo pligrandigis la oficialan vortprovizon de la lingvo per t. n. *oficialaj aldonoj*. Tio tamen okazis malrapide kaj malsufiĉe: ĉirkaŭ la jaro 1930 ankaŭ konsiderinda parto de la zamenhofaj vortoj ankoraŭ ne estis oficialigita, tiel ke la oficiala vortprovizo malproksime postrestis la efektivan vortprovizon, precipe la literaturan. Aliparte en la L. K. sidis superkonservativuloj, kiuj voĉdonis nee pri la vortoj proponitaj por oficialigo. Minacis efektiva skismo inter la oficiala kaj uzata lingvostokoj. Kaj tiam pretiĝis, — laŭ la instigo de *Lanti*, — kaj aperis en 1934, la

Plena Vortaro de Esperanto, kies vortprovizo estis multe pli granda ol la oficiala, kaj kiu, krome, registris ne nur la vortojn, sed ankaŭ ties uzadon, kiom eble per zamenhofaj ekzemploj. Tiu vortostoko baldaŭ akiris la aŭtentikecon de oficialeco: oni uzis la vortojn de PV, ne atendente ilian oficialigon. Cetere la Sepa Oficiala Aldono en 1958 listigis 72 radikojn, la Oka en 1975 en la Aktoj de la Akademio: 151 radikojn. Komprenoble post apero de Pl. Ilustrita Vortaro (1970) oni povas esperi pli oftajn oficialigojn. Grosjean-Maupin pruviĝis prudenta riĉiganto kaj sagaca firmiganto de la lingvo: lia Plena Vortaro fariĝis ankaŭ fortika gardanto de la lingva unueco.

Grosjean-Maupin rompis kun la aprioraj dekretoj de Cart kaj ties rondo, dum sia tuta vivo li detale ekzamenis la efektive uzatan lingvon, skrupule esploris kaj prinotis la verkaron de Zamenhof aŭ de *Kabe* kaj ankaŭ la gazetaron. Li jam traktis Esperanton filologie kiel naturan, vivantan lingvon. Kaj li vivis vere en la lingvo: kiel Waringhien notis en siaj *Eseoj*, lia lasta zorgo en lia mortolito estis, ke en la dua eldono de la P. V. la modo post „kvazaŭ“ estu ĝuste pritraktita.

Gaston *Waringhien*, kiu sin konfesas en la leksikologio disĉiplo de Grosjean-Maupin, faris krome, kune kun Kalocsay, la Plenan Gramatikon, kaj en la Parnasa Gvidlibro la Metrikon de E. Lia literatura verkado apartenas plie al la tria lit. periodo.

RAYMOND SCHWARTZ

R. *Schwartz* (1894-1973), franco, nask. en *Metz*, publikigis rimaĵojn jam en 1912, kaj post la unua

mondmilito poemojn kaj artikolojn en diversaj gazetoj, precipe en L. M. Ekde 1933 li redaktis la monatan spritgazeton „*La Pirato*“. Dufoje li gvidis grandfaman literaturan kabareton E-an en Parizo, ekde 1920 ĝis 1926. Ties nomo estis „*Verda Kato*“, post la dua mond-milito ĝi nomiĝis „*Tri koboldoj*“ (1944-1956). Li ĉefredaktis la gazeton de la 24-a, Pariza E-a kongreso. En la Sennacieca Revuo lia konstanta rubriko estis „El mia ridpunkto“, kies kolekton sub titolo „*Kun siaspeca spico*“ oni eldonis en 1971.

En R. *Schwartz* la E-a mondo trovis sian humuriston. En „*La Pirato*“ li estis vere la terura infano de la E-a familio: nenion li indulgis, indan je grimaco aŭ pinĉo, sed lia sprito igis ridi ankaŭ la pinĉiton. Liaj versaj verkoj „*Verdkata Testamento*“ (1926) kaj „*La Stranga Butiko*“ (1931) entenas kanzonojn laŭ kabareta stilo, ironian prezenton de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, spritajn vortludojn, akre trafajn kaj milde pikajn observojn. Ĉio ĉi, prezentita per perfekta vers-tekniko, montras lin simpatia bohemo, havanta tre sanan racion, grandan ĝukapablon pri la etaj ĝojoj de la vivo, kompreneman ridon pri ĉiu homa malforto, sanan mokon pri ĉio gravmiena kaj hipokrita. La samaj kvalitoj distingas liajn prozajn skizojn kaj noveletojn aperintajn en lia „*Prozo Ridetanta*“ (1928). Lia mallonga romano „*Anni kaj Montmarte*“ (1930) rakontas la danĝerajn aventurojn de naiva germana knabino en Parizo kaj estas eta ĉefverko per la akre trafa karakterizo, simpla kaj natura prezentmaniero, interesa templekto kaj per la kerne E-a, facilflua, natura stilo, plena de surprize vidigaj bildoj kaj ĉarma familiareco. En la tria lit. periodo aperis lia romano „*Kiel akvo de l'rivero*“ (1963). Ĝi estas lia plej pretendema verko, kva-

zaŭ epokromano, kiu kondukas siajn heroojn de antaŭ la unua mondmilito ĝis post la dua, kaj tiel same per la etosprezento kiel per la interesa eventoplekto, malgraŭ la kelka improviziteco de la lasta parto, apartenas interniajn plej bonajn originalajn romanojn kaj estas eble la plej sinlegiga el ili. En 1971 estis eldonita lia novelkolekto „*Vole ... novele*“. En la sama jaro oni represis ankaŭ „*Prozo ridetanta*“ kaj en 1974 aperis la dua eldono de „*Anni kaj Montmartre*“ kune kun la tria eldono de la fama „*Verdkata Testamento*“. Ankaŭ lia gaja, satira poemaro „*La stranga butikoj*“ en 1974, „*La ĝoja podio*“ en 1975 estis represitaj. En 1976 reeldoniĝis en du volumoj „*Kiel akvo de l'rivero*“.

Je lia memoro anonima donacinto fondis en 1975 „*Premion de R. Schwartz*“ al la plej bona „ankoraŭ neeldonita proza fikciaĵo, kiu inkluzivas romanojn kaj koherajn novelarojn“. La premion, kies sumo estas 4.300 guldenoj, oni aljuĝos en 1980.

Oni plurfoje disopiniis en la takso de Schwartz. Ne-kontestebla estas lia spirito, lia ideoriĉo, kaj majstra rego super la lingvo, kiu en liaj manoj montriĝas mirinde fleksebla, taŭga ne nur je frapantaj efektoj sed ankaŭ je facilaj ludoj. Lia granda amo al la lingvo montriĝas ankaŭ en la fervoro, per kiu en la batalo de ATA/ITA li pledis por la zamenhofa lingvuzo.

45. LA BRITA SKOLO

En Britio inter la mondmilitoj oni povas distingi du skolojn. Al la pli malnova apartenas M. C. *Butler*

(1884-1970) muzikisto, aŭtoro de bonega lernolibro spicita kun multa sprito, tradukinto de E-a Kantaro kaj E-a Himnaro, ĉefkunlaborinto de la Enciklopedio, John Mabon *Warden* (1856-1933), skoto, 1931-33 prezidanto de la Akademio, ĉefredaktoro de la Biblio, t. e. gvidanto de tiu komitato, kiu prizorgis kaj eldonis la zamenhofan tradukon de la *Malnova Testamento*, kaj la *Novan Testamenton*, kies tradukon faris John Cyprian *Rust* kaj A. E. *Wackrill* (1896-1924). En 1919 formiĝis „Brita Literatura kaj Debata Societo“ gvidata de Bernard *Long* (1879-1959), kunverkinto de la ĉefa A-E-vortaro, kaj eldonanta inter 1919 kaj 1924 la kvaronjaran revuon „*Literaturo*“ kun modelaj tekstoj literaturaj, lingva kaj recenza fakoj. En tiu „*Literaturo*“ aperis en daŭrigoj, tradukita de Louise *Briggs* la „*Sonĝo de Someromeza Nokto*“ de *Shakespeare*. Louise Briggs, kiel ankaŭ la tre simpatia kaj agrable glatastila Emma *Osmond* (1868-1944) kunlaboris ankaŭ en L. M., la unua per verstradukoj, la dua per artikoloj pri *Shakespeare*.

La pli nova generacio grupiĝis ĉirkaŭ la gazeto *International Language*, kiu aperis inter 1923 kaj 1931 kiel anglalingva propagandilo, sed kiu mobilizis nombron da junaj literaturemuloj: *L. N. Newell*, *K. R. C. Sturmer*, *W. B. Johnson*, *Alec Venture* ktp. Ĉi tiuj venis en striktan kontakton kun L. M. kaj la Budapeŝta Skolo.

L. N. NEWELL

L. N. *Newell* (1902-1968) publikigis poemojn, novelojn kaj recenzojn en la *International Language*,

L. M., H. de E. ktp. Unu el la Dekdu Poetoj. Kiel poeto li verkis malmulte, sed cizelis siajn versojn kun ekstrema zorgo, ĉu kanzoneske li poemas, ĉu ironie, ĉu li donas ian mistike malproksiman perspektivon de la etaj ĉiutagaĵoj. En siaj noveloj, kiujn li kolektis en la volumo „*Bakŝiŝ*“ (L. M. 1938), li estas agrable rakontanta realisto kun milda kaj komprenema ironio, ĉu pri araboj temas, ĉu pri angloj. En la tria periodo li longe silentis, sed ekde 1960 publikigis poemojn kaj pometradukojn en la Nica Revuo kaj retradukas en moderna kaj draste drama lingvaĵo la Shakespeare-an *Hamlet* (1964).

K. R. C. STURMER

K. R. C. *Sturmer* (1903-1960) estis vicĉefredaktoro de International Language dum ties vivo kaj klopodis altigi la nivelon de la E-a literaturo per recenzoj severaj, precipe pri poemoj. Krome li aperigis noveletojn kaj libroforme la novelon „*Por recenzo*“ (1930). En liaj noveloj la agado estas malmulta kaj simpla, la figuroj vivas korekte sian konvencian vivon societan, sed sub tiu kvieta surfaco regas sentkonfliktoj animkirlaj. Li montras plie interesan kalejdoskopon de la vivo ol ties sintezon. Plaĉaj, kaj ofte originalaj, estas liaj rimarkoj diverstemaj, kiujn li kolektis en sia „*Notlibro de Praktika Esperantisto*“ (1934). Li verkis sub la nomo *Kenelm Robinson* du novelarojn pri seksotuşaj temoj. La pli valora volumo estas „*Se Grenereto*“ (1930), kie oni trovas diversajn tonojn: lirikan sentimentalon, amaran froston, krudan rikanon. La plej serioza nove-

lo de la volumo estas „*La Fremda Knabo*“, kiu realisme priskribas la vivon en angla pensionlernejo kaj verŝajne prezentas proprajn junaĝajn spertojn pli malpli aŭtobiografie.

H. A LUYKEN

H.A. *Luyken* (1864-1940) germano angliĝinta, e-isto ekde 1904, entuziasma propagandisto, verkis ampleksajn romanojn originalajn jam en la unua lit. periodo. Liaj romanoj: *Paŭlo Debenham* (1912), *Mirinda Amo* (1913), *Stranga Heredaĵo* (1922) kaj *Pro Iŝtar* (1924). Ili aspektas iom arkaike kun siaj figuroj, kiuj iom skeme reprezentas la bonon aŭ la malbonon, kaj kun la fina venko de la pura diotimo. Certe plej legebla el ili estas *Pro Iŝtar*, kies historia fono estas la antikva Babilono, en la tempo de la biblia Ijob, kaj en kiu batalas inter si la vera kredo je Jehovo kaj la babilona idolanismo. Tie la aŭtoro povas krei ian interesokaptan streĉon ĉirkaŭ la persono de la belega sed malica Zalmuna. La stilo de la romanoj estas klasike pura, sed pezapaŝa kiel la rakontmaniero mem. Koncize konigas liajn romanojn V. *Benczik* en sia „*Libro de romanoj*“ (1979).

46. ĈEHOSLOVAKIAJ AŬTOROJ

La literatura agado de la ĉeĥoslovakoj en tiu ĉi periodo montriĝis precipe per la interpreto de la nacia literaturo. Al la fervoro de la *Moraviaj E-Pioniroj* (Ja-

rosraj *Mastny* 1892-1958, Antonin *Kudela* 1870-1939 kaj Albin *Neuzil* 1883-1948) estas dankebla la traduko kaj eldono de pluraj valoraj verkoj, ekz-e: *Ĉapek*: RUR, *Welzl*: „*Tridek jaroj en la ora nordo*“ (1931). Impona manifestiĝo de la ĉeĥoslovaka traduklaboro estas la *Ĉeĥoslovaka Antologio* (1935), redaktita de Otto *Ginz* kaj Stanislav *Kamarýt* (1883-1956) kun la reprezente bonaj poemtradukoj de M. *Lukaš*, St. *Kamarýt*, T. *Pumpr* kaj R. *Hromada*; en la proza parto diligentis krom la nomitaj tuta grupo de bonaj stilistoj, montrantaj surprize altan lingvan nivelon, certe dankeblan al la bonega didakta laboro de la lingvoinstruo de *Julie Šupichova* (1884-1970). La grava verko aperis en Budapeŝto, kiel eldonaĵo de L. M.

47. KATALUNAJ AŬTOROJ

Ekde la Barcelona kongreso, ĉiujare oni aranĝis en katalunaj urboj la Florajn Ludojn (vd. ĉe Marie *Hankel*), tiujn belajn festojn de poezio (tie gajnis premion el la hungaraj e-istoj *Baghy*, *Balkányi*, *Bánó*, kaj *Kalocsay*). Tiu mezepoka tradicio ŝajnis influi ankaŭ la katalunajn e-istajn poetojn: *Jaume Grau-Casas* (1896-1951) kaj *Artur Domenech i Mas* (1878-1936), kies poezion oni povas nomi trobadora. *Jaume Grau-Casas* kompilis la belan volumon „*Kataluna Antologio*“ (1925, dua eldono en 1931). Pli ol 50 aŭtorojn interpretas tiu libro, malfermante por la plejparto de la legantoj tute nekonatan literaturon de aparta belo kaj intereso.

48. BULGARAJ AŬTOROJ

La Bulgara Antologio (1925) kompilita de *Krestanov* enhavas multe da proza legindaĵo kaj poemojn lerte elektitajn (ilin plejparte tradukis Kalocsay). Krome aperis el la bulgara lingvo: versaĵoj de *Botev* (tr. *Dobrev*), rakontoj de *Vazov* (tr. *Atanasov*), Nuntempaj Rakontoj de *Stamatov* (tr. *Krestanov*). *I. H. Krestanov* (1890-1966), la kompilinto de la Antologio tradukis multajn novelojn por diversaj E-aj revuoj kaj verkis du interesajn informajn librojn: *Bulgara Lando kaj Popolo* kaj *El la Proksima Oriento*.

49. SOVETA SKOLO

En Sovetunio la E-a movado bone prosperis en la dudekaj jaroj kaj havis ankaŭ oficialan subtenon (en 1926 Lunaĉarski estis la honora prezidanto de la Leningrada SAT-kongreso kaj la sovetia poŝto aperigis SAT-poŝtmarkojn). Inter tiaj cirkonstancoj komencis flori ankaŭ la literaturo. Ne strikte literaturaj, sed gravaj verkoj estas de Ernest *Drezen*: *Historio de la Mondlingvo* (1931, represita en 1967) kaj *Analiza Historio de la E-Movado* (1931, represita en 1972), kiuj pri-traktas sian temon el marksisma vidpunkto. Inter la literaturistoj estas notindaj:

E. Izgur (1881-?), ruso, havanta aventuran kaj malfacilan vivon, estis persekutata de cara registaro kaj de kontraŭrevolucioj. Liaj verkoj estas: *Nur Volu* (1924), energia alvoko al revolucio tutmonda; *Je la Nomo de*

l'Vivo (1927), filozof-lirikaj fragmentoj, en kiuj esprimiĝas fajra protesto kontraŭ militarismo kaj subpremo, kaj krome utopia skizo pri perfekta socio, kva-zaŭ la alta kanto de la feliĉa vivo.

Nikolao Nekrasov (1900-, mortis dum la dua mondmilito), ĵurnalisto. Eseojn de marksisma vidpunkto li verkis en la revuo „La Nova Epoko“ pri originalaj E-aŭtoroj: Baghy, Bulthuis, Jung, Hohlov, Miĥalski, Deŝkin, Schulhof. Li tradukis el multaj rusaj poetoj; lia traduka ĉefverko estas „*Eŭgeno Onegin*“ de *Puŝkin*: enhance kaj forme fidela, kelkfoje eĉ virtuoza, sed iom pezlingva. En liaj originalaj poemoj li estas influata de la rusaj simbolistoj, precipe de Brjusov. Lia „*Krono de Sonetoj*“ montras lin entuziasma adepto de Esperanto.

EŬGENO MIĤALSKI

Eŭgeno *Miĥalski* (1897-1973), bibliotekisto-instruisto, e-isto de 1903, kunlaboris al multaj laboristaj gazetoj, distingiĝas precipe kiel poeto. Liaj du ĉefaj poemvolumoj estas: *Prologo* (1929) kaj *Fajro Kuracas* (1932). El lia manuskripta volumo *Reforĝo de l'homoj* (1937) nur fragmento estas konata. Tute perdiĝis lia volumo *Casanova*, en kiu la vivon de la fama aventuristo li prikantas en centkelkaj sonetoj. Miĥalski estis granda poeta talento: lia „*Prologo*“ estas granda promeso, ĝi enhavas kelkajn brilajn pensojn kaj bildojn, sed tiujn oni devas eltrovi el inter perfortaj lingveksperimentoj kaj ekpoetaj mallertaĵoj. En „*Fajro Kuracas*“ lia esprimpovo kaj tekniko estas multe evolu-

intaj, sed li trudas al si krudan skemecon, kiu kelkfoje efikas perfortita. En la „*Reforĝo*“ li atingas la apogeon de sia poeta evoluo, sed bedaŭrinde, ties pecoj preskaŭ tute perdiĝis. Tiel do oni povas nur bedaŭri la grandan perdon, ke tiu grandpromesulo ne povis frukti por nia poezio en sia plena matureco.

VLADIMIR VARANKIN

Vladimir *Varankin*, (1902-1937) ruso, historioscienculo. Li verkis la esperantologian libron *Teorio de Esperanto*, kiu okupiĝas pri la teorio de la internacia lingvo ĝenerale, pri la etimologio de la E-a radikaro, pri la fonetiko, morfologio kaj sintakso de E. Tre rimarkinda estas lia originala romano *Metropoliteno* (Ekrelo, 1933; dua eld. 1977), en kiu tre realisme li pripentras okazaĵojn siatempajn en Moskvo kaj Berlino paralele. La ĉefheroo *Vitalij*, soveta inĝeniero studenta en Berlino la subteran fervojon, partoprenas en la politikaj bataloj de la germanaj ruĝfrontanoj, devas lukti hejme kontraŭ burokratoj kaj perfiduloj kaj krome travivas krizon ankaŭ en sia familia kaj ama vivo. La tuto estas verkita interesostreĉe, kun bonega prikskriba talento kaj frapante vigla stilo.

NIKOLAJ HOHLOV

N. *Hohlov* (1891-1953), e-istiĝis en 1905 kaj kontribuis per artikoloj al multaj E-gazetoj, ekde la Ondo de E ĝis L. M. Li faris plurajn prozajn tradukojn: „*Krucumo*“ de *Drozdov* (1922), „*Orientaj Fabeloj de Doro-*

ŝeviĉ (1928), „*La Morto de Danton*“ de Aleksej Tolstoj (1928).

En 1928 aperis lia sola poemaro *La Tajdo*, kiu certigis al li altan lokon inter niaj originalaj poetoj. Lia liriko estas tre multflanka, jen li kantas tre individuece, trovante sian inspiron en diversaj animstatoj kaj travivaĵoj, jen li ŝajnas poeto-profeto kun forta sociala sento kaj brula zorgo pri la sorto de la homaro. Lia moto „muzikon antaŭ ĉio“ estas ja maltrafa, ĉar ĉiu lia poemo havas ankaŭ idean kernon, sed aliflanke estas vere, ke tiun kernon li diras en lule bela muzika lingvo. Li povas trovi komparojn kaj esprimojn de surpriza belo. „*Eŭropo*“ estas unu el la plej potence tondrantaj, „*Vintra fabelo*“ unu el la plej ludeme ŝvebaj poemoj en nia lingvo.

VASILIJ EROŜENKO

V. *Eroŝenko* (1890-1952) ruso, blindulo, vivis aventuran vivon, loĝis en Japanio kaj verkis japane, prelegis pri rusa literaturo en la Pekina universitato. Lia E-a verketo estas „*Ĝemo de unu soleca animo*“ (1923), kiu enhavas knabaĝajn memoraĵojn kaj fabelojn, en ĉarma kaj sincera, sed iom naiva stilo, kaj la faman poemon „*Ciganino*“, per kies deklamo li gajnis la unuan premion en la Nurnberga kongreso (1923).

GEORGO DEŜKIN

G. *Deŝkin* (1891-1967), e-isto de 1908, presigis multajn poemojn en la E-a gazetaro jam en la I-a lit. peri-

odo, kaj en 1912 sub titolo „*Versaĵoj*“ aperis lia unua poemvolumeto. Li estis aktiva ankaŭ dum la 20-aj jaroj; poste reaktiviĝis ĉirkaŭ 1960. Liajn verkojn distingas tre delikata lirismo, flua kaj eleganta stilo, simpleco, sincereco, melodio. Liajn temojn li prenas el la amo kaj la naturo. Lia poezio estas mallaŭtvoĉa, sed varme tenera. En 1957 aperis lia dua poemvolumo „*Elektitaj versaĵoj*“, kiu enhavas elektaĵojn el liaj poemoj inter 1909 kaj 1956.

ALEKSANDRO LILJER-LOGVIN

A. *L. Logvin*, (1903-) ruso, batalis kiel ruĝarmeano en Orienta Siberio, kaj en 1927 faris E-an propagandojaĝon de ĉ. 10 mil kilometroj, estis ekzilita en *Arkangelsk* en 1930-31. Li publikigis poemojn en gazetoj; liaj kolektitaj poemoj aperis en 1964 ĉe la Stafeto, sub titolo „*Sur la vivovojo*“. Lia poezio estas simpla, tre sincervoĉa.

50. LANTI KAJ LIA RONDO

E. *Lanti* (1879-1947)¹ franco, de 1919 e-isto. Li fondis la SAT-movadon (Sennacieca Asocio Tutmonda) por la e-istoj-laboristoj, kaj de 1922 ĝis 1932 en tri libroj disvolvis ties ideologion, kiu unuigas la internan ideon de E kun la klasbatalo, sed streĉas tiun ĝis

¹ v. 23. ĉap.

kompleta sennacieco. El literatura vidpunkto menciinda estas lia plastika kaj klara stilo. Li tradukis la Voltaire-ajn *Kandid* (Candide, 1929) kaj *Senartifikulo*.

La rondo de Lanti produktis tre malmulte da beletro. Granda laboro kuŝas en la traduko de la *Faust* de Goethe (1923, reverkita en 1949); ĝin efektivigis *Norbert Bartelmes* (1897-). Li kompilis ankaŭ volumeton „*Proletaria Kantaro*“ (1924) kaj la lernolibron „*Petro*“ (1925 kaj 1932). Lia novelaro „*Ne plu ludo*“, kiu enhavas sep originalajn novelojn, aperis en 1973. Sub titolo „*Mia vivo*“ en 1975 aperis lia aŭtobiografia verko kaj dek elektitaj artikoloj en unu volumo, kiun sekvis lia originala „*Poemaro*“ (1976).

Pri EMBA v. en la tria lit. periodo.

51. NEDERLANDAJ AŬTOROJ

El la nederlanda lingvo rimarkindaj tradukaĵoj estas: „*Akbar*“ de *Brouwer* (1923), trad. de geedzoj *Isbrücker* kaj *J. Ziermans*, *Gijsbert von Amstel* de van den *Vondel* (1932), trad. de *J. R. G. Isbrücker* (1889-1967). Kiel lingvoedukantoj estas menciindaj: *G. J. Degenkamp* kaj *F. Faulhaber*.

G. J. Degenkamp (1895-1973) verkis skizon pri la evoluo de nia literaturo „*Esperanto 60-jara*“ (1947). Tradukis krom la fama „*Taglibro de Anna Frank*“ (1959), „*La hispana tragedio*“-n de *Jef Last* (1939) kaj „*Skizoj pri Nederlando*“ de *K. Ĉapek* (1948, tr. *Degenkamp*).

Frits Faulhaber (1893-) krom la „*Konsilanta Gramatiko*“ verkis la libron „*Ne tiel, sed tiel ĉi*“

(1965), kaj „*Esperanto mozaiko*“ (1967). El liaj tradukaĵoj menciinda estas „*La papalagoj*“ de E. *Scheurman* (1963) kaj la „*Nevenkebla ĝeno*“ de Teo *Thijssen* (1947).

G. P. de *Bruin* (1895-1956), estas verkinto de „*Gvidilo tra E-Movado*“ (1933).

HINDRIK JAN BULTHUIS

H. J. *Bulthuis* (1865-1945), eksvolapukisto, e-istiĝis en 1901. Li multe tradukis el la nederlanda, dana, flandra, norvega kaj angla lingvoj, inter aliaj *Salome* de Oscar *Wilde* (1910) kaj *La Leono de Flandrujo* de *Conscience* (1930). Li plej famiĝis per siaj romanoj: *Idoj de Orfeo* (1923), „*Jozef kaj la edzino de Potifar*“ (1926), kaj *La Vila Mano* (1928). En la unua temas pri la strangaj aventuroj de tri ĝemeloj, kiuj post multaj konfuzoj fine trovas unu la alian. En la tria la okazajo estas la norda parto de Nederlando, kiun la aŭtoro intime konas kaj kies lokojn kaj homojn li priskribas ame. Antaŭ la dua mondmilito aperis la romano „*Inferio*“ (1938), en kiu li prezentas la kontraston inter nia „infera“ mondo kaj la feliĉa insulo de blinduloj. *Bulthuis* certe havas rakontistan talenton, povas prezenti amuzajn scenojn, sed kelkfoje li estas iom longmaniera. Lia stilo ĝenerale estas bona, sed ne malhavas nederlandismojn.

F. V. DORNO

F. V. *Dorno* — laŭ vera nomo Frans van *Dooren* (1905 -) — estas belgo, propre flandro. Li estis ak-

tiva kontribuanto de pluraj gazetoj inter la du mond-
militoj. Liaj ĉefaj verkoj estas *Aventuroj de Lia Reĝa*
Moŝto Stultuloj la X-a de Fuŝio (1936), sprita kon-
traŭreĝa satiro, kaj la ne malpli amuza krimkomedio
„*Levu la manojn*“ (1939), kies intrigo disvolviĝas dum
UK. Ambaŭ verkoj estis reeldonitaj en la jaro 1977 en
Hungario.

52. SVEDAJ AŬTOROJ

La nestoro de la sveda E-a movado estis en ĉi tiu pe-
riodo *Paul Nylén* (1870-1958), kiu kunlaboris al la
„*Lingvo Internacia*“ ekde ties komenco kaj estis ties
redaktoro inter 1895 kaj 1898. Li faris plenan E-Sve-
dan vortaron, E-lernolibron por svedoj, tradukis kun
S. E. *Krikortz* „*Fraŭlino Julie*“ de *Strindberg* (1908)
kaj kun *Stellan Engholm* „*Per balono al la poluso*“
(1930), kiun oni verkis laŭ la taglibro de la tragedia
sveda *Andrée*-ekspedicio en 1897.

MAGDA CARLSSON-BOHMAN

Sam Jansson, liceestro, estis la ĉefredaktanto de la
„*Sveda Antologio*“ (1934). En la traduko de ties poe-
zia parto precipe eminentas *Magda Carlsson-Bohman*
(1896-1971), kungenia interpretantino de svedaj poe-
moj, kiu sukcesas tiel rekrei la tradukatajn poemojn
per sia suverena arto, ke tiuj ŝajnas originaloj. Ŝi pre-
feras, precipe en sia triaperioda „*Sveda Poemaro*“
(1954), la poemojn de religia inspiro (*Evangelia kant-*

aro“; 1952), sed ankaŭ ludema humoro (ekz-e de Nils Ferlin) ne estas fremda al ŝi. Majstraj estas ŝiaj kelkaj Baudelaire- interpretoj en „La Floroj de l’Malbono“. Originalon ŝi versis tre malmulte.

STELLAN ENGHOLM

St. Engholm (1899-1960) estas unu el la plej gravaj nomoj de nia proza literaturo. Li estis grava lingvisto, pedagogo de la E-movado, prelegisto, eminenta tradukanto de svedaj verkoj: *Gösta Berling* de *S. Lagerlöf* (1934), „*La ringo de la generalo*“ (1938) kaj „*Pasko*“ de *Strindberg* (1935); en la *Sveda Antologio* (1-2 vol. 1934) li montriĝis eĉ bonega tradukanto de poemoj.

Tre grave li funkciis kiel fondanto, eldonanto kaj redaktoro de la *Malgranda Revuo* (1943-1952); tiu vere humanisma revuo estis, kiel Szilágyi skribas, „tiel serioza kaj grava, kiel la tempoj postulis“. Engholm mem multe verkis por sia revuo en sia trankvila, ĉiopesa, harmonioserĉa maniero, sed li donis lokon ankaŭ por novaj talentoj, el kiuj poste fariĝis ankaŭ pluraj elstaraj aŭtoroj. Tiu revuo, ekirigita meze de milito, estis pruvo ne nur pri la neŝancebla fido de la redaktoro sed ankaŭ pri la neestingeblo vivipovo de Esperanto.

Liaj originalaj verkoj estas la Torento-romanoj: „*Al Torento*“ (1930, dua eld. 1934), „*Infanoj en Torento*“ (1934, 1939 kaj en 1946) kaj „*Vivo vokas*“ (1946). Lia alia romano „*Homoj sur la Tero*“ (1932, dua eldono 1963) gajnis premion ĉe la romankonkurso de L.M. La „*Torento*“-trilogio en 1972 estis represita.

Kiel instruisto, Engholm havis vastan kontakton kun la infanoj kaj homoj „sur la tero“ kaj povas pri tiuj paroli kun varma simpatio tiel ke, kvankam nenio sensacia okazas en tiuj romanoj, nia intereso restas ĝisfine streĉita. Liaj du noveloj „*Maljunulo migras*“ kaj „*Venĝo*“ estas majstropecoj.

Engholm estas nefleksebla humanisto, sed ankaŭ realisto. Entuziasmo por ĉio nobla, kaj sobra, iom seka klarvido miksiĝas en li je iom kurioza, tre simpatia alojo.

53. DU PROZISTOJ

JEAN FORGE

J. Forge, ps. de Jan Fethke (1903), polo, filmreĝisoro, esperantisto de 1919, movadis, redaktis E-gazeton, gvidis Cseh-metodan kurson, sed famiĝis kiel aŭtoro de originalaj E-romanoj. En la unua romano *Abis-moj* (1923), kiu, kiel la nomo montras, priskribas profundajn animkonfliktojn, frapanta estas la originaleco de formo: la romanfiguroj en la unua persono rakontas la okazaĵojn, laŭvice alternante. La dua romano: *Saltego trans Jarmiloj* (1924) estas fantazia historio pri retroveturo al la tempo de Nerono kun multaj groteskaĵoj fontantaj el la kuriozeco de la tipoj kaj el ilia kolizio kun la paseaĵoj. En la tria: *Mister Tot aĉetas mil okulojn* (1931) temas pri aventurhistorio, sed kun tre bonaj karakterizoj kaj pura lingvo. Forge reĝisoris la E-lingvan filmon *Morgaŭ komenciĝos la vivo* (1924). Lia novelkolekto: *La verda raketo* (1961) prenas siajn

temojn el la E-ista vivo. En 1973 ĉiuj liaj verkoj atingis novan eldonon. Sub titolo „*Mia verda breviero*“ en 1974 aperis lia humura novelaro primovada.

Forge estas ideoriĉa kaj sprita aŭtoro, kies verkoj plejparte apartenas al la amuzliteraturo, sed kiel tiaj, ili estas plezurigaj, ĉar ili vicigas scenojn de lerte elalkulita efekte kaj ne malhavas ankaŭ bone observitajn psikologiaĵojn.

IZRAEL LEJZEROVICZ

I. *Lejzerovicz* (1901-1942), hebreo, ĵurnalisto, komercisto, fervora disvastiganto de E-o, distingigis kiel tradukisto de unua rango per la interpreto de *La Sorĉinstino de Kastilio* (1935) de Salom Aŝ. Kiel originalan verkiston lin karakterizas tre sukcesa satiro en siaj skizoj verkitaj sub pseŭdonimo Georgo Verda. Kolekto el tiuj skizoj aperis sub la titolo *El la Verda Biblio* (1936), reeldonita en 1978 en Hungario.

54. TRADUKKLITERATURO

El la sennombraj prozaj tradukoj aperintaj estu menciitaj nur kelkaj elstaraj: *Cezaro* de *Jelusiĉ* (1934), en la virtuoza traduko de *Ivo Rotkviĉ* (el la kroata), *La Romano de San Michele* de *Axel Munthe* (1935), en la lerte glata interpreto de *Jenny Weleminsky* (el la germana), la interesa politiko-geografia *Rigardu la Teron* de *H. W. van Loon* (tr. *G. Saville*, 1936), *Jimmy*

Higgins (tr. Fröding, 1934) kaj *Petrolo* (tr. W. Bailey, 1936) de *Upton Sinclair*, *Tri homoj en boato* (tr. Badash, 1934) de *J. K. Jerome*, *Tri japanaj dramoj* (tr. J. Ŝimomura, 1934) de *Kan Kikuĉi*, *Ĉapajev* (tr. de Devjatnin k. a., 1933) de *Furmanov*, *Pallietter* (tr. J. v. Schoor, 1933) de *Timmermans*, *Amo pli forta ol morto*, tragedio de *J. Rainis*, tr. el la latva *Ĉaĉe*, 1933 kaj precipe la *Antologioj*, kiujn ni jene resumas kaj kompletigas: *La Kataluna Antologio* estis la unua grandskala tekstokolekto el nacia lingvo (1925 kaj 1931), ĝin sekvis la *Bulgara Antologio* (1925). Poste aperis la *Belga Antologio* (1928) en du volumoj; la francan parton redaktis *M. Jaumotte*, (1899-1970) la flandran parton *H. Vermuyten* (1889-1966) en la tradukado de la poezia parto aktivis ankaŭ *Jan van Schoor* (1896-1955), kiu siajn originalajn poemojn eldonis en la volumeto *Amo kaj Poezio* (1928); inter la poemoj troviĝas pluraj memorinde plaĉaj. El la *Estona Antologio* (1932), farita tre zorge, en pure klasika lingvo, aperis nur la unua volumo. L. M. prenis en sian programon, ĉiujare eldoni Antologion de iu alia nacio, sed el ili efektiviĝis nur tri: *Hungara Antologio* (1933), en la redakto de K. Kalocsay, kiu tradukis plejparte ankaŭ la poezion, kunlabore de *K. Bodó*, *L. Halka*, *L. Totsche-Tárkony*, *F. Szilágyi*, — poste la *Ĉeĥoslovaka Antologio*, en la redakto de *O. Ginz* kaj *Stanislav Kamarýt*, kaj kunlabore de 23 tradukantoj de surprize bona stilo, inter ili de *V. Dolinsky*, *J. Fousek*, *R. Hromada*, *M. Lukaš*, *T. Pumpr*, — kaj fine la *Svisa Antologio* (1939) en la redakto de *Arthur Baur*, kunlabore de *Hilda Dresen* (germanlingva poezio), *Mad Mevo* (franclingva poezio), *K. Kalocsay* (italingva poezio) kaj *M. Jaccard* (romanca poezio). Dume aperis en Svedlando la *Sveda Anto-*

logio I. (1934) reprezentanta la periodon inter 1880 kaj 1910, en la ĉefredakto de Sam *Jansson*, kun la poezitradukoj de Magda *Carlsson*, Stellan *Engholm* kaj aliaj. L. M. preparis ankaŭ italan kaj nederlandan antologiojn, sed tiuj ne povis aperi pro la milito.

JAPANAĴ AŬTOROJ

Menciindaj estas el Japanio Naokazu *Kawasaki* (1902-) kun siaj valoraj prilingvaj artikoloj kaj verkoj, kaj Kenĵi *Ossaka* (1888-1969) kun siaj tradukvolumoj *Perloj el Oriento* (1921), *Fabloj de Ezopo* (1932) kaj, jam en la 3-a periodo, „505 elektitaj poemoj el Manĵoo-Ŝuu“ (1958) kaj „El orienta florbedo“ (1956), kiu estas kolekto de Aziaj poemoj.

Japana-ĉina poemantologio estas *Verda Parnaso* (1932) de I. U. (Saburo *Ito* 1902-1969). Ĝi enhavas ankaŭ interesajn originalajn poemojn.

TRADUKOJ EL LA HUNGARA

La ĉefaj tradukoj el la hungara en ĉi tiu periodo estas, krom la *Hungara Antologio*, la *Madách*-a „*Tragedio de l'Homo*“ (Kalocsay, 1924), „*Johano la Brava*“ de *Petöfi* (Kalocsay, 1923), „*La cikonikalifo*“ de *Babits* (Bodó, 1929), „*Norda Vento*“ novelkolekto de *Karinthy* (Bodó, 1926), „*Vojaĝo en Faremidon*“ de *Karinthy* (Tárkony, 1934), „*Morgaŭ matene*“ de *Karinthy* (Kalocsay, 1923).

Ladislao *Somlai-Spirer* (1906-1971) estis diligenta kaj talenta tradukisto en la dua kaj tria lit.periodoj. Li apartenis al la iamaj kunlaborintoj de la L. M. kaj pli ol cent diversajn literaturaĵojn li tradukis el la hungara lingvo. Liaj plej elstaraj tradukaĵoj: „*La strato de fiŝanta kato*“ de Jolán *Földes* (1937), „*La knaboj de Paŭlo-strato*“ de Ferenc *Molnár* (1938), „*La vojoj estas nekonataj*“ de Lajos *Kassák* (1940), „*Sep vangofrapoj*“ de Károly *Aszlányi* (1943), „*Printempo de morto*“ de Lajos *Zilahy* (tradukita kune kun Ladislao *Halka*, en 1947) kaj „*Amara pano*“ de József *Darvas* (1957), ktp.

TRIA PERIODO

La kontinueco inter la dua kaj tria periodoj ŝajnas pli strikta ol inter la unua kaj la dua. Tiam preskaŭ sole la revuo „Esperanto“ transdaŭrigis sian aperadon, nun, krom ĝi reviviĝis *Heroldo de Esperanto* kaj *Literatura Mondo* (krom la naciaj gazetoj), reaktiviĝis multaj intermilitaj literatoroj. Jam en 1943 komencis aperi la *Malgranda Revuo* redaktata de Stellan *Engholm*, revuo vere „malgranda“ laŭ amplekso, sed granda laŭ seriozeco, varieco kaj bonega stilo. En tiu revuo prezentis sin ankaŭ poetotalento: L. C. *Deij* (1919-), nederlanda havenlaboristo, kies poemoj kun sia antifaŝismo estas belaj kaj fortvoĉaj manifestiĝoj de humanisma animo; bedaŭrinde, post 1952, kiam la revuo ĉesis, ankaŭ li, ŝajne, eksilentis.

Aliaj fruaj floroj de la literatura printempo estis la kvin *Rapsodioj* (kajeroj de originala kaj tradukita prozo kaj poezio) de Ferenc *Szilágyi*, el kiuj la unua aperis en 1943.

Reaperis *Literatura Mondo* (redaktata de Julio Baghy kaj K. Kalocsay) en 1947, eldonita de Béla *Berceli* (kiu reeldonis ankaŭ „Johano la brava“). Sur ĝiaj paĝoj prezentis sin tiuj novaj steloj, kiuj, post la ĉeso de la revuo en 1949, fondis la faman *skotan skolon* (Auld, Francis, Dinwoodie, Rossetti). Kiel jam menciite, *Julio Baghy* abunde verkis en ĉi tiu periodo (unuaktaĵoj, noveloj, versfabeloj, Songe sub Pomarbo)

kaj *K. Kalocsay* faris eĉ la pli grandan parton de siaj tradukoj: la kompletan „*Floroj de l'Malbono*“ de *Baudelaire* (kune kun *Waringhien* kaj aliaj), ampleksan kolekton el la poemoj de *Petőfi* (eldonitan en 1970), ampleksan *Heine-volumon* (kune kun *Waringhien*) eldonitan ĉe *Stafeto*, en 1971, la versan fabelkolekton *Ezopa Saĝo*, la tradukon de *Reĝo Lear* de *Shakespeare*, amason da tradukoj el la sumera-asira, praegipta, hinda, antikva-greka, latina kaj el modernaj lingvoj por la granda pretiĝanta kolekto *Tutmonda Sonoro*. Aperis la tria eldono de *Plena Gramatiko* kaj la dua eldono de la poetiko *Parnasa Gvidlibro* (ambaŭ de *Kalocsay* kaj *Waringhien*). *Raymond Schwartz* eldonas poemvolumon *La Ĝoja Podio* kaj la grandan romanon „*Kiel akvo de l'rivero*“. Aperas *Soifo*, poemlibro de *Tárkony*.

Tre signifaj estas ĉi-periodo precipe du revuoj: *Norda Prismo* (1955-1967) redaktita de *Szilágyi*, poste ĝis 1973 de *W. Auld* kaj *La Nica Literatura Revuo* (1955-1962) redaktita de *Waringhien*, krome la Bulgarlanda *Internacia Kulturo*, la Jugoslavia *Suda Stelo* kaj la naciaj revuoj: *Hungara Vivo*, *Nuntempa Bulgario*, *El Popola Ĉinio* ktp.

Ankaŭ ĉi tiu periodo havas sian grandan libroeldoniston: *Juan Régulo-Pérez*, kies eldonejo *Stafeto* dotis nian literaturon ĝis 1969 per 75 volumoj, inter ili valoraj originalaĵoj kaj tradukoj de ĉefverkoj (de *Sofoklo*, *Shakespeare* ktp.)

La antologio prezentas plejparte aŭtorojn pritraktitajn aŭ pritraktotajn ĉi tie, menciindaj estas ankoraŭ *Jerzy Grum* (1933-), polo, aŭtoro de premiitaj noveloj kun certa gusto kaj impresiva stilo; — *Jolanthe Leser* (1910-), aŭstrino, kies premiitajn novelojn distingas

varma persona kunsenta tono; Zeljko *Takač* (1927-), jugoslavia ĵurnalisto, tiel same premiito ĉe novelkonkurso, kun vigla kaj sociale sentema observemo.

Iasence kompletigas la du antologiojn la libro *Dudek kvin jaroj* (1977), redaktita de *W. Auld* kaj *V. Benczik*. Ĝi enhavas la plej bonajn verkojn, premiitajn en la *Belartaj Konkursoj* de UEA, dum la periodo 1951-1975.

55. LA SKOTA SKOLO

La skota skolo grupiĝis ĉirkaŭ la gazeto „Esperanto en Skotlando“ redaktata tiam de *William Auld*. El la skolo famiĝis precipe la redaktoro *Auld*, *Reto Rossetti*, *John Sharp Dinwoodie* (1904-) kaj *John Islay Francis*; ili prezentis sin kune en la poemvolumo „*Kvaropo*“ (Stafeto, 1952, dua eldono 1977). Tiuj kvar poetoj emfazas la kontinuecon de nia poezio per poemoj kvazaŭ defilantaj antaŭ *Kalocsay* (cetere, *Kalocsay*, siatempe, tiel same omaĝis per poemo al *Grabowski* kaj dediĉis al lia memoro sian antologion „*Eterna Bukedo*“). La kvar poetojn trafe karakterizis *Waringhien* en sia antaŭparolo, kaj ĉi tiun variigante oni povas diri, ke el la poemoj de *Auld* oni ekkonas junan animon, kiu vigle ondas je sensovibrigaj impresoj kaj eldiras sian humanisman-materialisman konvinkiĝon spite inter la kunpremitaj dentoj; ĉe *Dinwoodie* ni trovas ian pietisman naturamon kaj melankolie opalan serenecon; la kosmogonia poemo de *Francis* frapas per sia riĉo de imagoj kaj per ia potenca sento de fatalo; *Rossetti* ĵongliste disŝutas spritfajrerojn, sed kelkfoje emocias per sinceraj tonoj de varma koro.

Dinwoodie post la Kvaropo ŝajne eksilentis kiel originala poeto, sed multaj poemtradukoj de li kuŝas en la Angla Antologio, kaj precipe en la eldonota Skota Antologio.

56. AŬTOROJ DE NUNTEMPO

a./ BELGA AŬTORO

JOHÁN VALANO

La nomo *J. Valano* — pseŭdonimo de *Claude Piron* (1931-), belgo, loĝanta en Svislando — famiĝis per la originala romano „*Ĉu vi kuiras ĉine?*“ (1976), kiu dum la 33-a Internacia Junulara Kongreso estis proklamita „Libro de la Jaro“. Ĝi estas tre sprite verkita detektivromano, kies lingvaj kaj stilaj kvalitoj superas tiujn de multaj „seriozaj“ verkoj. Konata ankaŭ kiel aŭtoro de eseoj. Plejparte pli frue kreitaj verkoj konsistigas la poemaron „*Malmalice*“ (1977).

b./ BRITAJ AŬTOROJ

WILLIAM AULD

William Auld, (1924-) magistro pri literaturo, vicprezidanto de UEA. Forlasinte la redaktorecon de la *E. en Skotlando*, estis kelktempe (1955-1958) la redaktoro de „*Esperanto*“ de UEA. Lian poetan renomon levis alten lia poemvolumo „*La Infana Raso*“ (1956, dua eldono 1969) konsistanta el 25 „kantoj“, pli ĝuste rapsodioj. La unua kanto estas de potenca vizia kaj viziiga forto kaj anoncas la genealogian interaparte-

non de ĉiuj homoj per sugestia drasteco. La „kantojn“ interligas la penso, ke la homaro vivas ankoraŭ sian infanaĝon, do ĝi havas esperon elkreski el sia sovaĝa primitiveco. Sed ĉi tio estas esprimita per multaj duboj kaj rekuraĝiĝoj, kun voĉoj de ribelo kontraŭ anakronismoj ĉu moralaj ĉu religiaj, en senrespondaj demandoj, por kiuj respondo devas ekzisti, kun aludoj mond-literaturaj kaj esperantismaj, kun la postmilita etoso de abomeno kontraŭ ĉiuj militoj ekde Sargono ĝis Nagasaki, kun enplekto de epizodoj plej intime propraj kaj sciencfikcie kosmaj, en granda fekunda kaoso, en kiu orientas tamen la ripetiĝantaj kvazaŭrefrenaj motivoj; la Sargon-motivo, la saŭroj, la konsumata celo plenumata ktp. La poeto suverene uzas ĉiujn poeziajn rimedojn ekde la popolkanta simpla ĝis surrealistma hermetismo kaj ĝis la sarkasma misformo de vortoj. La unua kanto en si mem estas unu el la plej grandaj Esperantaj poemoj.

La poemlibreto „*Unufingraj Melodioj*“ (1960) enhavas kelkajn grandajn, brustokaptajn poemojn (Julia sur Pandatario, Kanto, Septembra Mateno ktp.) kaj delikatajn japaneskojn, sed tra la tuta volumo sentiĝas ia profunda anima krizo, tiel penetra, ke ĝi taŭzas la frazojn kaj jam scias nur balbuti; oni sentas frostotremon de hororo. La unuaktaĵo „Kvazaŭ birdoj konstruas“ estas varianta sur la temoj „fidel-malfidelo“, „fido-ĵaluzo“. Klasiktona, ĝi havas bonegan lingvon, viglan lingvon, viglan dramatan dialogon, lerte faritan streĉon, sed solvon iom tro subitan kaj facilan. Sub titolo „*Humoroj*“ en 1969 eldoniĝis lia kvara poemlibro, en kiu montriĝas la tute matura, sed iom skeptika Auld, kvazaŭ li demandus: Ĉu ĉio ĉi gravis?“

Ankaŭ el literaturhistoria vidpunkto tre interesa

libro estas la „*Rimletoj*“ (1976), tiu unika kolekto de korespondaĵoj inter du elstaraj poetoj: M. Boulton kaj W. Auld. En 1978 eliris nova Auld-poemaro: „*El unu verda vivo*“.

Grava merito de Auld estas la redakto de *Esperanta Antologio* (1958), 640-paĝa volumo. Lia enkonduko estas tre leginda kun pluraj trafaj rimarkoj kaj valoraj opinioj, eĉ se liajn terminojn pri la tri literaturperiodoj ne ĉiuj konsentas. Lia dediĉa poemo estas vera gemo.

En la impona *Angla Antologio I* (1957), li surpris gravan parton de laboro kiel poezia redaktoro kaj virtuoza tradukinto de nemulte malpli ol duono de la poezia parto. Cetere la tradukarto okupas gravan lokon en la literatura laboro de W. Auld. En 1977 aperis du tradukoj el lia plumo: „*Epifanio, aŭ kiel vi volas*“ de W. Shakespeare kaj „*La urbo de terura nokto*“ de James Thomson.

Apud sia vasta literatura laboro, Auld sin prezentas ankaŭ kiel sprita lingvoprofesoro. Lian anglalingvan E-lernolibron „*Esperanto: a new approach*“ R. Haupenthal prilaboris por germanoj kaj E. Carlén tradukis ĝin por svedoj. Kvazaŭ daŭrigo de la anglalingva lernolibro, en 1968 aperis en Esperanto „*Paŝoj al plena posedo*“, kiu ĝis 1973 jam atingis tri eldonojn. Ĉi tiu lernolibro enhavas 30 „paŝojn“ (lecionojn), laŭ skemo: vortolisto kun koncizaj E-difinoj kaj legaĵoj originalaj de Zamenhof, Privat, Beöthy, Schwartz, Szilágyi, Boulton, C. Rossetti, Ribillard kaj Neergard; tradukitaj de Kalocsay, R. Rossetti kaj de Auld. La libron kompletigas bonega ekzercaro kaj listo pri la rekomenditaj legaĵoj.

En 1976 aperis lia eseo-volumeto „*Facetoj de Esperanto*“ pri nia poezia lingvo, pri transskribo de prop-

raj nomoj kaj enhavas ankaŭ versan leteron al W. *Harmon*.

Liaj artikoloj en diversaj revuoj kun forta konvinka povo okupiĝas precipe pri Esperanto kiel literatura lingvo kaj pri problemoj de la poezia tradukado.

RETO ROSSETTI

R. *Rossetti* (1909-), svisdevena brito, profesoro de artpedagogio. Redaktis „*Esperanto*“ de UEA (1954-1955), kunlaboris en la 2-a kaj 3-a periodoj de *Literatura Mondo*, en la *Nica Lit. Revuo* ktp. Iniciatinto kaj plurjara sekretario de la „*Belartaj Konkursoj*“. Post lia poemkolekto „*Oazo*“, aperinta en la „*Kvaropo*“ (vd. supre), aperis de li la poemoj de la volumeto „*Pinta Kraĵono*“ (1959), kiu enhavas „*Jubilean Eposon*“: koncizan kaj tre vivan verskronikon de E ĝis la Bulonja kongreso, krome parodiajn variantojn laŭ esperantistoj-poetoj, okazajn poemojn, profundsencajn grimacojn sub masko de infanversaĵoj kaj la ciklon „*Mestizo de l'Mondo*“; ĉi lasta prezentas la homon en kurba spegulo kaj montras la tutan timigan relativecon de nia koncepto pri beleco.

La proziston Rossetti prezentas la libro „*El la Maniko*“ (Stafeto, 1955); en ĝi montriĝas lia gracia leĝereco, turba vigleco, plastika karakteriza kapablo, precipe en la novelo „*Francisko la fuŝulo*“. En „*Banu vin mia bela*“ facile aluda erotiko delikatas. Lian spritan eksperimenton kaj trovemon pravas liaj lingvaj ŝercoj: lia studo pri vortludoj kaj la „*Neologismologio*“.

En 1976, sub titolo „*Spegulo de Esperantaj stiloj*“ aperis volumeto de R. Rossetti, enhavanta liajn 16 artikolojn, kiuj pli frue aperis en „Heroldo de Esperanto“.

Li redaktoris la prozan parton de la Angla Antologio kaj brile tradukis por ĝi kelkajn poemojn.

Lia multkolora kaj elegante facetita talento, lia perfekta mastreco super la lingvo lin kapabligis por eminentaj *Shakespeare*-tradukoj: fragmentoj el *Romeo kaj Julieta* kaj el *Julio Cezaro* (kun la grandioza parolado de *Antonius*) kaj la tuta *Otelo* (1960), kiuj alte elstaras per sia esprimriĉo, facila kaj natura lingvo, senpereco de dialogoj kaj estas eminente scenotaŭgaj.

JOHN ISLAY FRANCIS

J. I. *Francis* (1924), skoto, licea profesoro pri angla lingvo. En la „Kvaropo“ lin reprezentas lia granda poemo „*Kosmo*“ (vd. skota skolo). Kunlaboranto de la Angla Antologio, precipe kun traduko de poezio, interalie de la dua kanto de la *Perdita Paradizo* de *Milton*. Liaj propraj poemoj (en la Aulda E. Antologio) estas de intelekta speco kaj de tia sama etoso kiel liaj noveloj aperintaj en la volumo „*Vitralo*“ (Stafeto, 1960). Laŭla atesto de ĉi tiuj li estas pesimisme agordita aŭtoro, tamen ne ia skema pesimisto. Li volonte verkas fabelojn satirajn kaj simbolajn, kies simboleco tamen estas ne kaŝema, eĉ reflektora, klare rivelanta per groteskigo, troigo, mobilizanta kontraŭ tiranismo, pseŭdomoralo, servilismo, aĉa humilo. „*Ĝermoj en rikolto*“ estas amare indigna grimaco pri la idioteco de

la homa potencavido. Kaj li havas ankaŭ kolorojn komplete kaj kortuŝe pripentri la solecan sorton de maljunulino. Lia ampleksa romano „*La granda kaldrono*„ – verkita en la sesdekaj jaroj – aperis fine en 1978.

MARJORIE BOULTON

M. *Boulton* (1924-), d-rino de la literatursciencoj, estrino de instruistina seminario, lektorino pri angla lingvo kaj literaturo, verkis dudekon da libroj en la lingvoj angla kaj Esperanta.

Ŝi debutis, post multaj poemoj en gazetoj kaj revuoj, per sia poemvolumo „*Kontralte*“ (Stafeto, 1955), konsistanta el pluraj cikloj, el kiuj „*Trista Tener-eco*“ en perfekte primaj 28 sonetoj parolas pri pedagogino inter ŝiaj disĉiplinoj kun ĝistragike profunda kunsento pri la problemoj de tiuj junaj animoj; en la cikloj „*Unu virina koro*“, „*La ora branĉo*“, „*Amaraj sonetoj*“ abunde kaj kun konsterna, kelkfoje animskua forto erupcias sentoj virinaj: sincereco de nuda vundo kuniĝas kun lingva matureco kaj viveco de parolo, senpereco de voĉo. En ŝia dua granda poemlibro „*Eroj*“ (Stafeto, 1959) prezentigas la ĉefproblemoj de la jarcento, vivkialoj kaj vivkieloj, konsterno kaj angoro, „ŝovo de la nazo de l'homaro en la ekskrementon, per kiu li malpurigadas sian planedon“ (Auld); alternas tamen, en la aliaj poemoj, ie kaj ie, kun idilietoj kaj bela vivo de naturbelaĵoj, por pruvo ke la vivo estas tamen vivinda; pluraj mallongaj poemoj frapas per sia fina turno kurioze sprita aŭ agrable originala. En la kantantaj versoj de la „*Cent Ĝojkantoj*“ (1957), en ĉi japaneske mallongaj momentfotoj pri la lumaj flankoj de la vivo, ni trovas jen mildan humuron, jen pitores-

kan fantazion, jen ridetan kortuŝiĝemon aŭ delikatan memironion.

Ŝia poetika studo „*La poezikreado observita subjektive*“ (1958), estas rigardebla, kvazaŭ ŝia „*ars poetica*“.

En la „*Eroj*“ jam troviĝas tuta ciklo pri kato „*Kvarpieda konsolanto*“, poste aperis de ŝi prozo pri katoj: „*Dekdu piedetoj*“ (1964). Pri ĉi tiu temo, kiu estus, laŭ aŭstera prijuĝo, neinda al la majesto de verkista plumo, ŝi povas esti ĉiam interesa, kelkfoje eĉ kortuŝa kaj profundensa.

En 1967 aperis ŝia novelaro „*Okuloj*“, en kiu la tute matura poetino-verkistino montras viglan fantazion, ankaŭ el psikoanaliza vidpunkto pravan.

En la volumo „*Virino ĉe Landlimo*“ (KOKO, 1955) la aŭtorino kolektis siajn unuaktaĵojn, kiuj kaptas kaj prezentas problemojn en miniatura formo de peco lirika, pecoj tragikaj kun granda streĉo, peco sciencfikcia, eĉ peco por infanoj kun moralinstruo por plenkreskuloj. La dramon „*Esti aŭ ne esti*“ prezentis la Hungara Esperanto-Teatro kun granda sukceso dum la 51-a U.K. en Budapeŝto. La unuaktaĵo prezentas imagaĵon pri teruraj sekvoj de estonta nuklea milito. Plie instruan, ol literaturan signifon havas ŝia libreto „*Ni aktoras*“ (1971), kiu enhavas tri komedietojn.

Laŭ peto de grava brita eldonejo M. Boulton verkis la *Biografion de Zamenhof* (1960) kaj poste ŝi mem ĝin esperantigis sub titolo „*Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*“ (Stafeto, 1963).

Por la libro, kiu vere kronas la serion de la samtemaj verkoj (*Fiŝer, Zakrzewski, Privat, Drezen*) ŝi kolektis ankoraŭ nemalkovritajn dokumentojn. En la riĉe dokumentita verko perfekte harmonias sento kaj

racio: kun klarvido, profunda amo, delikata takto ŝi revivigas la noblan figuron de Zamenhof kaj kun granda virina intuicio ŝi povas interpreti kaj klarigi la sintecon, plurfoje enigman, de pluraj pioniroj de la lingvo. Ŝi donas ankaŭ koncizan historion de la movado, precipe en la jaroj 1887-1917, sed ankaŭ en la postzamenhofa periodo. La libro estas alloga propagandilo por eksteruloj, kuraĝigilo por esperantistoj. „*Rimleteroj*“ v. ĉe Auld.

CEZARO ROSSETTI

C. *Rossetti* (1901-1950) postlasis solan libron „*Kredu min, Sinjorino*“, kiu interese, faciltone kaj distre rakontas la aventurojn de agento dum ties klopodoj vendi sian varon. La verko aperis ankaŭ hungare en la traduko de *Szathmári*.

VICTOR SADLER

V. *Sadler* (1937-) debutis per sia elstare matura poemaro „*Memkritiko*“ en 1967. En la volumo li trafas kritikojn per siaj poemoj la malhomiĝon de la civilizita socio. Dum la lasta jardeko Sadler bedaŭrinde silentiĝis kiel poeto.

ALBERT GOODHEIR

A. *Goodheir* (1912-) estas nederlandano, vivanta en Britio. Lia poemaro „*Merlo sur menhiro*“ (1974) montras la debutanton — fakte jam ne junulon — tute

matura poeto en ĉiuj sencoj. Lia poezio estas antaŭ ĉio atestaĵo pri la lukto de la homo konservi sin mem en la milkape minacanta civilizita socio.

Li montris sin ankaŭ tre kompetenta tradukisto: „*Bakĥantinoj*“ de *Eŭripido* aperis en 1975 kaj la aventurromano „*Forkaptita*“ de R. L. *Stevenson* en la jaro 1976. Li direktas la novan eldonejon *Kardo*, kiu jam publikigis multajn valorajn verkojn.

c./ BRAZILAJ AŬTOROJ

FRANCISKO VALDOMIRO LORENZ

F. V. *Lorenz* (1872-1957), ĉeĥo, loĝanta 60 jarojn en Brazilo. Lia plej rimarkinda verko estas la formfidebla traduko de la *Bhagavadgita* el la sanskrita. En 1944 aperis de li la volumo „*Voĉoj de poetoj el la Spirita Mondo*“. Teknike virtuozaĵaj poemoj laŭdire mediume ricevitaj. Lia „*Antologio de Brazilaj poetoj*“ estas ankoraŭ manuskripta. Li estis el la unuaj esp-istoj, esperantiĝis en 1887, dekkvinjara. Onidire li posedis 80 lingvojn. Estis tempo en lia vivo, kiam li aliĝis al Ido, poste al Nov-Esperanto, rezigninte pri sia propra lingvoprojekto „*Mundial*“.

GERALDO MATTOS

G. *Mattos* (1931-), brazilano. Liaj verkoj: „*La tento de la junulo*“ (orig. poemo, 1953), „*Ivan VI.*“ (orig. versdramo, 1953), „*La nigra Spartako*“ (orig. novelo, 1953). „*Miniaturoj*“ (1959) estas kolekto de origina-

laĵ tankaĵoj. Stafeto en 1967 eldonis sub titolo „*Arĉoj*“ novan poemkolekton, kiun la poeto dividas je ses cikloj. La poemaro enhavas 109 sonetojn, inter ili du kuriozaĵojn, verkitajn en „pra-Esperanto“. En 1968 aperis lia „*Ritmoj de vivo*“, kies kvar ĉapitroj grandparte konsistas el poemoj havantaj tradiciajn ritmojn, sed en la lasta ĉapitro la poemformoj pli varias, eĉ aperas unu senrima. Poemoj de li aperis en „*Norda Prismo*“ kaj en „*La Nica*“.

Mattos estas multpromesa talento de la orig. E-a literaturo; lia versdramo *Ivan VI*. estas aŭdace entreprenita tasko kun pluraj partoj sukcesaj. Lian poezion karakterizas pasia humanismo, antiklerikalismo kaj erotiko kun riĉa formkulturo.

SYLLA CHAVES

S. *Chaves* (1929-) brazilano, advokato, brazila delegito ĉe UNESCO. En sia poemlibro: „*Animo prisma*“ (1959), la poeto esploras sin mem kun scivolo de scienculo, kaj tio donas al lia poezio ian interesan subjektive-objektivan aspekton: li lasas, ke „lia animo kiel prismo solvu la lumon de la vivo je komponantoj“, el kiuj plej gravaj estas la amo kaj amsopiro.

En 1970 estis eldonitaj sub titolo „*Por pli bona mondo tra poezio kaj Esperanto*“ liaj tradukaĵoj kun paralelaj tekstoj portugala kaj Esperanta. En tiu volumo la poeto lerte prezentas al vastaj legorondoj latin-amerikaj la perlojn de la E-kulturo.

ISMAEL GOMES BRAGA

I. *Gomes Braga* (1891-1969), brazila pioniro apud sia signifa traduklaboro (vd. tie), sub titolo „*Veterano?*“ aperigis volumon enhavantan 62 priesperantajn artikolojn.

Ĉ/ BULGARAJ AŬTOROJ

IVAN GEORGIEV

I. *Georgiev*: „*Provo alfronti la vivon*“ (Stafeto 1962). La poeto estas bulgaro, li versas pri la tradiciaj problemoj de poetoj kun sincera sentemo, plurfoje kun freŝa originaleco.

ASEN GRIGOROV

A. *Grigorov*, psn. *Marin Ljubin* (1903-), bulgaro, oficisto, ĉefredaktoro de la danublunda revuo „*Internacia Kulturo*“ (1945-1949), postĉe red. de la revuo „*Bulgario*“. Li verkis la novelkolekton „*La himno*“ (1931), originalan poezion „*Garbo*“ (1931) kaj traduk-poezion kun A. *Lakov* k.a. (1950), – redaktis la novellibron (traduko el bulgara): *Bulgara Prozo* (1960). Liajn poemojn inspiras la laborista sorto, la revoluciaj esperoj kaj realiĝoj.

d./ĈEĤOSLOVAKIAJ AŬTOROJ

El la verstradukistoj aktivantaj antaŭmilite precipe por la „*Ĉeĥoslovaka Antologio*“ *R. Hromada* (1890-1964) publikigis multnombrajn poemtradukojn en „*La Nica*“. Samloke *Miloš Lukáš* prezentis prozajn tradukojn el *Karel Čapek*.

ŜTEFO URBAN

Ŝtefo *Urban* (1913-) komponisto, muzikprofesoro, verkis krom noveloj, amuze ironiajn fabletojn kun epigrama mallongo kaj koncizo, kolektitajn en la volumo „*Nova Ezopo*“ (Stafeto, 1961). El lia valora rekonata komponista verkaro ni ellevas la muzikigon de Kalocsay-, kaj Baghy-poemoj, kies muziko genie redonas etoson, eĉ melodion de la poemoj. Tiuj kantoj inde ornamus altnivelajn koncertojn.

EVA SEEMANNOVÁ-SUCHARDOVÁ

Eva *SeemannováSuchardová* (1920-), aktorino, fondis esperantistan aktortrupon „*La verda ĉaro de Julio Baghy*“, kiu prezentis plurajn mondkonatajn dramojn en E plejparte en ŝia propra traduko, el kiuj elstaras „*Mariŝa*“ de fratoj *Mrštík* kaj „*Pigmaliono*“ de G. B. *Shaw*.

KAROLO PIČ

Karolo *Pič* (1920-), librotenisto, verkis abundajn originalajn poemojn, kiuj aperis en la ĉefaj revuoj. Lian poezion karakterizas ia grandurba sentimentaleco kun iom erotika spiro en facilaj versoj. Lia ABOCO produktas amuzajn saltojn de asociacioj. Verkis plurajn eseetojn pledantajn interalie por orig. verkado kaj kontraŭ tradukado.

JIŘI KOŘINEK

Jiři *Kořinek* (1906-) ekde 1947 abunde verkas poemojn kaj poemtradukojn, kiuj aperis en ĉiuj ĉefaj revuoj E-aj, lian tradukaĵon „*Panjo*“ de Jaroslav *Seifert*, en 1965 eldonis la Slovenia E-Ligo en *Ljubljana*. Lia inspiro sufloras al li jen intelektan, jen naturpentran, jen esperantisman poezion. Malgranda kolekto de liaj poemoj aperis en la jaro 1976 sub titolo „*Vitreroj*“.

VLASTIMIL NOVOBILSKY

Vlastimil *Novobilsky* en sia *Skizo pri la Esperanta literaturo*, tiel same, kiel Kralj, donas, apud la pritrakto kaj karakterizo de la verkistoj ankaŭ poemcitaĵojn kaj ilustras abunde per rondeloj el la Rimportretoj de Kalocsay.

TOMAŠ PUMPR

T. *Pumpr* (1906-1976), ĉefo, juristo, aktiva precipe kiel poemtradukisto, tradukis ankaŭ operojn. Kunlaboris al „*L. Mondo*“ kaj al „*La Nica*“. Verkoj *Bukedo* (trad. poemoj, 1938), „*La bapto de caro Vladimir*“ (Stafeto, 1953); ĉi lasta estas virtuoze sprita traduko de groteske satira epopeo. — Akademiano. — Liaj propraj poemoj estas precipe de humura speco.

ELI URBANOVÁ

E. *Urbanová* (1920-), ĉefino, instruistino. Poemojn ŝi aperigis en la ĉefaj E-aj revuoj. En ŝia poemlibro „*Nur tri kolorojn*“ (1960), la tri kolorojn (nigreta, nigra, nigrega) superondas la kvara, la purpuro de la ampasio. Ŝi povas ludi multajn variantojn de ĉi tiu temo kun emocia sincero, sentemo kaj sensemo jen plej persone, jen en la masko de sorĉistino, princino aŭ hetajro. Ankaŭ kelkaj urbobildoj estas trafe kaj sugestie kaptitaj.

e./ ĈINA AŬTORO

ARMAND SU

Armand *Su* (1939-), poeto kaj tradukisto, estas unu el la plej multpromesaj talentoj. Kiel originala poeto

kaj tradukisto li debutis sur la paĝoj de la „*Norda Prismo*“ en 1962. Lastatempe – precipe de post la komenco de la „kultura revolucio“ – ne plu oni renkontas liajn verkojn sur la paĝoj de la Esperantaj revuoj.

f./ DANAJ AŬTOROJ

PAUL NEERGAARD

P. *Neergaard* (1907-), dano, estas poeto de la naturscienco precipe en sia verko „*La vivo de la plantoj*“ (1957), kie li kvazaŭ fabelante solvas sekretojn, klarigas misterojn kaj instruas ian grandiozan, kvazaŭ pan-teisman solidarecon kun la vivo de l'naturu. Liajn lingvistikajn interesojn li pruvis per sia verketo „*Fremdvortoj en Esperanto*“ kaj per la fondo kaj redakto de la impone serioza perioda revuo „*Esperantologio*“. Akademiano.

POUL THORSEN

P. *Thorsen* (1915-), dano, instruisto, direktoro de la E-a libroeldonejo KOKO. Li aperigis du poemvolumojn: „*Rozoj kaj urtikoj*“ (1954) kaj „*Sen paraŝuto*“ (1963) kaj tradukis kolekton el la satiraj poemetoj de *Kumbel: Gruk* (1956). En siaj poemvolumoj li donas

ankaŭ tradukojn el danaj poetoj, tutan antologieton; precipe frapantaj estas la eskimaj kantoj peritaj de *Rasmussen*. En la originaloj temas pri vojaĝepizodoj, versitaj anekdotoj, kun trafikaj vortoturnoj, bona versado, kiu plej brile impresas en liaj Kumbel-tradukoj, facilaj kvazaŭ originaloj. Ankaŭ li mem verkis libreton laŭ simila inspiro (*Pluk* 1960); poentitajn rimafojn de plimalpli filozofiaj aforismoj kun surpriza, ofte groteska sprito. Szilágyi lin nomas „nia plej serioza humoristo“, sed li scias kanti ankaŭ elegion (*Madrigalo*) kaj baladon (*Annika*).

ZORA HEIDE

Z. Heide, jugoslavdevena danino, gajninto de pluraj literaturaj konkursoj. Ŝia unua libro aperis en 1970, sub titolo „*Ni homoj*“. En tiu bonega novelkolekto ŝi skizas antaŭ nin perfektan bildon pri la malsama mondo de la vilaĝoj kaj urboj. Kun profunda sincereco kaj humanismo ŝi karakterizas siajn heroojn. Ŝi vigle kunlaboras kun diversaj E-revuoj.

Ankaŭ sur teatra tereno ŝi sukcese debutis per skeĉoj: „*Ni komedietas...*“

GUDRUN RIISBERG

Ŝi sin prezentis en 1970 per libreto „*Gajaj klubvesperoj*“, kiun en 1972 sekvis ŝia originala novelaro „*Suno kaj pluvo*“. La novelaro larĝskale okupiĝas pri ho-

maj sortoj de dramaj ĝis humoraj. De Jytte *Lyngbirk* ŝi tradukis libron „*Kit vivas*“ (1973), en kiu temas pri malgaje aktuala problemo de narkotismo. En 1976 du tradukaĵoj aperis de G. Riisberg: la unua estas traduko de populara dana junulara romaneto „*Bodil kaj la bando*“ de Eva *Hemmer Hansen*; kaj la dua: „*Venis viro*“ estas krimromano de *Torben Nielsen*.

g./ FINNA AŬTORO

EIJA SALOVAARA

La originala novelaro de la finna verkistino „*Kie boacoj vagadas*“ (1967), rakontas pri ŝia amata Laplando, pri homaj sortoj, superstiĉoj, mistikoj ĉe la loĝantaro de la noktmeza suno.

ĝ./ FRANCAJ AŬTOROJ

GASTON WARINGHIEN

G. *Waringhien* (1904-), franco, agregacia profesoro, ekde 1964 prezidanto de la Akademio de Esperanto. Ĉefredaktis la revuon „*La Nica Literatura Revuo*“ (1955-1962). Multe da poezio li tradukis, ĉefe el la franca, sed ankaŭ el la angla (*Angla Antologio*). Lia

vortarista laboro kulminas en *Plena Vortaro* (1930 kaj pluaj eldonoj) kaj, en ties *Suplemento* kaj en la *Granda Vortaro E-a Franca* (1957). Kulmino de lia leksikologia laboro estas la grandioza „*Plena Ilustrita Vortaro*“ (PIV, en 1970), kiu ĝerminta el PV, donas seriozan bazon por uzantoj de la lingvo, ne sole en la ĉiutago, sed krom literaturo, tradukarto ankaŭ sur multaj aliaj fakaj terenoj. Aliaj verkoj: *Parnasa Gvidlibro* (kun Kalocsay 1932 kaj 1968), *Plena Grammatiko* (kun Kalocsay, 1935 kaj du pluaj eldonoj), *Maksimoj de La Rochefoucauld* (traduko, 1935), *Poemoj de Omar Kajam* (traduko, 1953), *La Floroj de l'Malbono de Baudelaire* (kuntradukanto kaj redaktoro, 1957). En „La Nica“ li publikigis eseetojn ilustritajn per poemtradukoj pri du *Bellay*, *Verlaine*, *Charles d'Orléans*, *Verhaeren*, *Mallarmé*. Kune kun Kalocsay li tradukis poemkolekton de *Heine* „Kantoj kaj romanoj“ (1969). En 1976 sub titolo „*Ĥimeroj*“ aperis la poemoj de Gérard de *Nerval* en lia traduko. Ĝi estas dulingva eldono kun ampleksa antaŭparolo kaj detalaj notoj. Liajn poeziajn tradukojn distingas klar eco kaj virtuoza reprodukto de senco, sento kaj formo.

„*La leteroj de Zamenhof*“ (1948), eldonita de li, estas modelo de redakto: la envicigo de la leteroj kaj la intermeze metitaj komentoj prezentas kvazaŭ drame la luktojn de Zamenhof inter liaj malfacile trakteblaj adeptoj.

En siaj tri esearoj: *Beletro* (1956), *Lingvo kaj Vivo* (1959) kaj „*Ni kaj ĝi*“ (1972), li montriĝas vigla kaj suklingva rakontanto, kiu ne oratoras katedre, sed kvazaŭ sidigis inter siajn aŭskultantojn por babilado. Ĉiam li estas distra, interesa kaj kvazaŭ lude instrua, ĉu

li parolas pri Hamleto, „princo de detektivoj“, ĉu pri la arkitekturo de la Dantea Infero, pri la „efemera belo“ aŭ pri la kiso, kiel poezia temo, ĉu pri la fiksfornaj poemoj, niaj „familiaj juveloj“, ĉu li pentras portreteton de esperantistoj per delikata peniko kaj amaj koloroj. En la prilingvaj eseoj kun speciala lingva instinkto li sekvas la procezon, kiel elformiĝis Esperanto el la praesperantoj, kiel ĝi evoluis kaj evoluas plu, precipe en la poezio; trafe li pritraktas gramatikajn demandojn kaj interese li konigas kaj kritikas la „postesperantojn“, la diversajn lingvoprojektojn, kiuj naskiĝis ekde ldo por pli-malpli efemera vivo.

Waringhien per sia traduka kaj esea produktado riĉigas Esperanton per vera trezoro, per plezuriga instruo, per kuraĝigaj argumentoj, per la tuta riĉo de lucida intelekto.

JEAN RIBILLARD

J. *Ribillard* (1904-1962), franco, majoro. Deĵoris multe ekster Eŭropo, precipe en Afriko, kaj ekziginte el la armeo tuj post la dua mondmilito, li mortis en Tahitio. Redaktoro de la Eŭropa eldono de „*La Budha Lumo*“. En lia „*Vagado sub Palmoj*“ (1956) li priskribas vojaĝon en la dezerto kun majstra, ĝisbaroke riĉa stilo, humuro kaj ĉarmo. En „*Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud*“ (1963) araba azeno filozofas pri la vivo kaj ties strangaĵoj. La filozofiado estas eble malpli interesa ol la vivaj figuroj skizitaj kun akra psikologia penetremo kaj la priskribo de la moroj kaj medio de la araba mondo.

HENRI BAUPIERRE

H. *Baupierre* (1918-), franco ĝardenisto. Verkis malmulte, nur en burleska kaj pastiĉa humoro, por „La Nica“. Liaj pastiĉoj estas kolektitaj en la libreto *Specimene* (Stafeto, 1962); li montras kun turnoriĉa sprito 42 esperantistajn verkistojn en kurba spegulo de pastiĉa stilimitaĵo.

LEON COURTINAT

L. *Courtinat* (1894-1973) eldonis „*Historio de Esperanto*“ (1966). La trivoluma verkego malgraŭ ĉiuj lingvaj neperfektaĵoj, enhavas ege multajn, valorajn indikojn pri la historio de Esperanto.

LOUIS BEAUCAIRE

L. *Beucaire* (1925-) famiĝis en nia literaturo per siaj „bervalajoj“. Lia unua libro „*Kruko kaj Baniko el Bervalo*“ (1970) esence estas sprita kaj „spice“ erotika, ilustrita anekdotaro, kiu en 1974 atingis duan eldonon. Ankaŭ lia dua libro estas „bervalajo“, kies titolo „*El la vivo de bervalo sentaŭgulo*“. Krom en la subtitolo signita „maldeca epizodaro“ ĝi enhavas dozon el la movada humoro.

JEAN-LOUIS SAUDIAN-ROUSSEAU

En nia literaturo sufiĉe maloftaj estas la originalaj teatraĵoj, kiuj atingas ankaŭ la nivelon de la ludebleco.

En la sepdekaj jaroj debutis *Saudian-Rousseau*, sub pseŭdonimo „BUKAR“ kies teatraĵo „*La reto*“ (1971) kun sukceso estis ludita krom la Teatro *Absidiolo* en Parizo kaj krom *Grésillon*, ankaŭ en Germanio, eĉ en Brazilo. Lia dua libreto „*Gizela kaj Roberto*“ (1974) enhavas 5 skeĉojn, el kiuj la spritega „*Bonoga farbisto*“; „*Sendorma nokto*“ kaj „*Nutradistiko*“ kun sukceso estis luditaj dum la Parizaj Federaciaj Kongresoj en 1974 kaj 1975.

LORJAK

Lorjak estas pseŭdonimo de franca esperantisto, kiu lastatempe publikigis du poramuzajn romanojn: „*Neologisme*“ (1975) kaj „*Transe*“ (1976). Dum la unua rikoltis unuaniman sukceson ĉe la publiko kaj la kritiko, — „*Transe*“ elvokis ankaŭ malaprobajn pro la troa senbrideco de la aŭtoro fantazio. Tamen ambaŭ libroj havas modelan, sprite elegantan stilon.

h./ GERMANAJ AŬTOROJ

ADOLF SPROECK

Li estas unu el la plej fekundaj tradukistoj el la germana literaturo, sed simile ampleksa estas lia originala verkado, kiu laŭ multaj trajtoj memorigas nin al R. *Schwartz*. Lia originala verko „*La skurila libro*“

(1968), estas kolekto de satiraj noveloj, poemoj kaj epigramoj. Li kunlaboris kun „Norda Prismo“ kaj „La Praktiko“.

REINHARD HAUPENTHAL

Reinhard *Hauptenthal* (1945-), estas konata precipe kiel esploranto de la Esperanta literaturo. *Enkonduko en la Librosciencon de Esperanto* estas pionira kaj eb-
le tial iom mankhava konsultlibro. *Hauptenthal* inicia-
tis reeldonon de pluraj valoraj verkoj, inter kiuj elsta-
ras *Bibliografio de Internacia Lingvo* de P. Stojan. (La
unua eldono aperis en 1929, la dua en 1973.) Dum
kelka tempo li funkciis kiel literatura redaktoro de la
preparata dua eldono de *Enciklopedio de Esperanto*.
Li redaktis germanlingvan krestomation pri planling-
voj.

ULRICH LINS

U. *Lins* (1943-) estas historiisto, unu el la plej seri-
ozaj esplorantoj de la historio de la E-movado. Lia
unua grava verko estis „*Esperanto dum la Tria Reg-
no*“, aperinta unue sur la paĝoj de *Germana Esperan-
to-Revuo* dum la jaroj 1966 kaj 1967. Pli vaste pri-
traktas la persekutojn kontraŭ Esperanto „*La danĝera
lingvo*“ (1974). Li estas redaktoro – apud la ĉefredak-
toro I. *Lapenna* – de la monumenta verko „*Esperanto
en Perspektivo*“ (1974). Li estas ĉefredaktoro de la
preparata dua eldono de *Enciklopedio de Esperanto*.
Li publikigis tre multajn seriozajn artikolojn pri la his-

torio de la E-Movado, precipe en *Kontakto kaj Esperanto*.

WERNER BORMANN

D-ro W. *Bormann*, eksdocento de Esperanto en la universitato de Hamburgo, — sub titolo „*Bona ŝanco*“ (1971) publikigis dekdu prelegojn pri la Internacia Lingvo. En sia libro li konvinke argumentas pri la taŭgeco de Esperanto. Li multe aktivas en la E-movado, estas ĝenerala sekretario de UEA.

ĥ./ GREKA AŬTORO

DESPINA PATRINU

La nuntempa greka aŭtorino, — kiu jam estas sukcesa verkistino de du romanoj kaj unu novelaro en sia gepatra lingvo, — en 1976 sin prezentis ankaŭ en Esperanto, per novelaro „*Homa animo*“ enhavanta sep rakontojn.

i./ HINDA AŬTORO

LAKSHMISWAR SINHA

L. *Sinha* (1905-1977), estis disĉiplo kaj amiko de R. *Tagore*. En 1929 aperis lia unua libro rekrea, el

17 jarcenta historio hinda „*Sivaĝi*“, kiun en 1930 sekvis „*Tri Bengalaj fabeloj*“. Tiu lasta estis tradukita ankaŭ en la svedan lingvon. Sub titolo „*Malsata ŝtono*“ (1961), li tradukis sep rakontojn de R. Tagore kaj la libro aperis en la Oriento-Okcidento-serio de UEA. En 1966, ankaŭ kiel originala verkisto li sin prezentis per sia vivrakonto: „*Jaroj sur la tero*“. Lia lasta verko estis lernolibro por bengaloj: „*Facila Esperanta Lernolibro*“ (1974).

j./ HUNGARAJ AŬTOROJ

FRANCISKO SZILÁGYI

F. *Szilágyi* (1895-1967), hungaro, sed li iĝis sveda civitano, (de ĉ. 1936), doktoro pri juro, akademiano, ekssekretario de la „Belartaj Konkursoj“ de UEA, ĉefredaktoro de Norda Prismo (1955-1967). Redaktis ankaŭ kvin „*Rapsodiojn*“ (kolektojn de prozo kaj poezio originala kaj tradukita, 1943-1953). Kunlaboris al Hungara Antologio (1933), Enciklopedio de E (1933-34), Sveda Antologio (1934), Dekdu Poetoj (1934). En „*Poemaro el Hungarlando*“ li tradukis hungaran poezion (1929), en „*Trans la Fabeloceano*“ (1931, dua eld. 1972) krom kelkaj noveloj li prezentas travestitajn popolfabelojn, tradukis la verkon de *Genthon*: „*La pentroarto en la malnova Hungario*“ (1932), kaj la novelkolekton „*Sveda Novelaro*“ (1950). Siajn novelojn li kolektis en la volumoj: „*La granda aventuro*“ (1945), „*Inter Sudo kaj Nordo*“

1950), „*Koko krias jam*“ (1955, dua eldono en 1976).

Aŭtoro de bildsistema lernolibro aperinta en sep lingvoj, de „*La simpla Esperanto*“ (1932) kaj de daŭriga lernolibro: „*Ellernu!*“ (1937).

Szilágyi estis multflanka, pli ĝuste ĉiomflanka esperantisto: iama organizanto de vigla kultura vivo esperantista en Budapeŝto, lingvopedagogo ellaborinta memstaran instrumentodon, redaktoro kaj publicisto, kies redakta laboro lertmane komponita estas de agrabla bunto, kies artikoloj ĉiam interesaj distingiĝas per varieco, per surpriza sprito, reprezentas altiran individuecon. Kiel poeto li ne produktis multe, sed en sia simbolisme nuancita poezio li kreis plurajn tempospitajn poemojn pri la intermilita kaoso kun ŝiritaj akordoj, aŭdacaj moduloj, penetraj disonancoj interpretante la etoson de la krizaj tempoj. Lia poemo „*Zamenhof*“ kun sia kolomba refreno estas kvazaŭ espero de savo en pereco anoncata per alarme batataj sonoriloj.

En siaj noveloj li prezentas parte tre krizajn situaciojn, kiel en la „*Flamsalamandro*“, aŭ en la historio de *Dunant* luktanta kontraŭ si mem (*Koko krias jam*), eĉ, kvankam pli faciltone, ankaŭ en la majstronovelo „*La liberiĝo de la juĝisto*“, en kiu homo premita inter la grizajn normojn de la vivo rifuĝas por momentoj en ian feliĉan anarkion. Szilágyi estas profunde etika pensulo kun idealisma optimismo malgraŭ ĉio. Li havas kelkan emon ankaŭ al satiro, sed tiu satiro estas ĉiam milda, komprenema, preskaŭ karesanta ne nur al la tiel ĉarme portretita knabineto Nila, sed ankaŭ al plenkreskuloj li proksimiĝas kun ia „oĉja“ sento. „Kaj la koro? Ora!“ — tririmis pri li *Tárkony*.

Lia romano „*Mistero Minora*“ (1958) estas unikaĵo: „krimio“ sen krimo. Memoro de perdita junaĝa amo (rakontata en unua persono) hantas en ĝi en tagaj revoj kaj noktaj sonĝoj, plifortigante en fiksan ideon kaj kondukante la forlasitan amanton al tio, ke el hazarde aŭdata orkestra muziko li elanalizu la konfeson de murdo fare de la komponisto kontraŭ la amata knabino. Ni retrovas en la romano ĉiujn simpatiajn kvalitojn de la Szilágyi-verkoj: la mildan ironion, kun kiu la ĉefpersono, ĉi tiu ŝlemilo heroiĝinta kvazaŭ je sia propra miro, prezentas kaj analizas sin mem, la spritan facilon kaj surprize bongustan trovemon, la interesoŝtreĉon; la analizo de la muzikverko mem estas majstraĵo.

Szilágyi estas ankaŭ kunredaktoro de la *33 Rakontoj*, „*Antologio de la E-a novelarto*“ (kun *Reto Rossetti*, 1964).

SÁNDOR SZATHMÁRI

A. S. *Szathmári* (1897-1974), hungaro, verkisto, maŝinĝeniero. Lia ĉefverko estas *Vojaĝo al Kazohinio* (SAT, 1958), aperinta jam pli frue ankaŭ hungare en pluraj eldonoj. En ĉi tiu romano la aŭtoro vojaĝas sub la masko de Gulliver al la insulo de homoj, kiuj estas tiel ideale perfektaj, ke al ili jam ĉio homa estas fremda, kaj poste li venas tie en la mondon de homoj, kiuj estas tiel trohomaj, ke tio jam estas ridinda freneziga kaj maltrankviliga, kun satiro trafa, akra, senindulga. Libro *Janus-vizaĝa*: ĝi pafas – eble eĉ kontraŭ la propra intenco de la aŭtoro – kaj kontraŭ tiuj, kiuj

volas ekstermi ĉiujn sentojn ĝis sterileco, kaj kontraŭ tiuj, kiujn ĝisabsurde regas „sentoj“, „idealoj“, „tradicioj“.

Krom tiu romano la aŭtoro publikigis plurajn novelojn en „Belarto“, „La Nica“, „Norda Prismo“, „Sennacieca Revuo“; ĉi tiujn karakterizas satiremo vipanta tiranisman, servilisman, militisman kaj ankaŭ ĉiutagajn homajn rideblaĵojn. Lia prozovolumo „*Maŝinmondo*“ (Stafeto, 1964) entenas du sciencfikciajn futur-novelojn. La titol-novelo diras amare, ke se la homaro donos sian sorton en la povon de la perfekte funkciantaj kaj konkludantaj maŝinoj, ĉi tiuj neniigos ĝin en ĝia propra intereso. La majstronovelo „*Vincenzo*“ rakontas paralele la historion de granda scienculo kaj oportunisma karieristo. „*Kain kaj Abel*“ (1977) enhavas ĉiujn novelojn kaj rakontojn de la aŭtoro krom tiuj jam aperintaj en „*Maŝinmondo*“.

Szathmári tradukis el Esperanto en la hungaran lingvon la romanon de *Cezaro Rossetti* „Kredu min, Sinjorino“, aperintan en 1958. „*Vojaĝo al Kazohinio*“ en 1972 denove aperis en la hungara lingvo, kaj en 1976 en la angla. Eldoniĝis samjare kun „*Kazohinio*“ ankaŭ ampleksa novelaro de li en la hungara lingvo, sub titolo „*Maŝinmondo kaj aliaj rakontoj*“

EMBA

EMBA, pseŭdonimo de Emeriko (Imre) *Baranyai* (1902-1961), hungaro, pentraĵaganto, poste ĝardenisto, fervorulo de la hungara laborista E-movado, aŭtoro de lernolibro. En la dua periodo li jam publikigis poe-

mojn en la SAT-organoj kaj Heroldo; post la dua mondmilito diversaj gazetoj aperigis de li poemojn. Lia originala romano: „*Maria kaj la grupo*“ (1936) havas multajn malfortajn flankojn kiel ĉiu unua provo, sed ĝi estas unikajo en tio, ke ĝi rakontas ekskluzive pri esperantista vivo kaj bone karakterizas kelkajn tipojn de la movado; la idealiston, la karieriston, la amindumavidan belulinon, la konservativulon ktp. kaj sendube ĝi povas teni viva la intereson ĝis la fino. Lia poemlibro; „*Ekzilo*“ (L. M. 1938) enhavas plurajn valorajn pecojn; ĝi estis cetere senmanke represita en lia granda poemkolekto „*Ekzilo kaj Azilo*“, aperinta post lia morto (Stafeto, 1962). Por ĉi tiu kolekto li tralaboris ĉiujn siajn poemojn pli poluritaj kaj maturesprimaj.

Lian poezion karakterizas, malgraŭ ilia arta ellaboriteco, granda simpla, senpera transdono de pensoj kaj sentoj. Kvazaŭ biografie reviviĝas en lia poemlibro la naivaj ĝojoj, la fruaj ombroj, la freŝaj sentoj de infanaĝo, la angoroj, suferoj, espero, funebro kaj ribeloj de malriĉulo, liaj entuziasmoj kaj senreviĝoj, la viv- kaj amsopiro kaj rezigno de malsanulo. Facile legiĝas tiuj simplaj versoj, sed ilian simplon ree kaj ree eklumigas per poezia brilo ia bildo, turno aŭ tropo.

Li rigardis sin socialista poeto. Certe pri laborula mizero, espero kaj ribelo neniu kantis en Esperanto ĝis nun tiel emocie kiel li.

LUDOVIKO KÖKÉNY

L. *Kökény* de kvardek jaroj laboras en la unuaj vicoj por E. Estis prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo dum 1941-1947, ĉefredaktoro de Hungara

Vivo ekde 1961 ĝis 1969. Naskiĝis en 1897 en Sátoraljaújhely. Post diplomiĝo kiel mezlerneja profesoro (historio, hungara lingvo kaj literaturo), li instruis kelkajn jarojn en mezlernejoj, poste 15 jarojn en stenografiaj-tajpistaj lernejoj; li laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto en Miskolc. Li loĝas en Budapeŝto ekde 1924, kiam li iĝis membro de la parlamenta stenografoficejo. **Aperigis popularajn ortografiajn kaj diversajn stenografiajn librojn.** E-isto ekde 1919. La lingvon li lernis de kolego-amiko Aleksandro *Hallgató* kaj poste de Ludoviko *Király*. En 1928 li fondis la gazeton „Hungara Heroldo“, redaktis ĝin dum kvin jaroj. Aperigis ankaŭ tri kajerojn de la „Esperanto-Jarlibro“ hungarlingve. Li aranĝis literaturajn vesperojn, faris vastan propagandon por E ĉefe en 1928-35 kaj en 1945-49. Por kvar hungaraj enciklopedioj verkis artikolojn pri E, ktp. Li estis la ĉefa redaktoro de la baza verko *Enciklopedio de Esperanto*. En 1947 estis eldonita lia „Populara Lernolibro de Esperanto“. De 1947 ĝis 1949 E-parolisto de la Budapeŝta Radio. Krom multaj artikoloj en kaj pri E, li tradukis novelojn, verkis ankaŭ dramformajn fabelojn, redaktis „Ora Duopo“ (1966) pri J. Baghy kaj K. Kalocsay. Kiel historiisto de la ĉefurbo Budapeŝto li verkis ampleksan historion de la VIII-a distrikto de la ĉefurbo (hungare).

ALIAJ AŬTOROJ

Krom la internacie konataj merituloj aktivas en Hungario pluraj literaturistoj, kiuj tiel aŭ alie menciinde kontribuis al la Esperanta literaturo. Andreo *Szabó*

(1922-) kaj Endre *Tóth* (1931-) estas plurfojaj gajnintoj ĉe la proza branĉo de *Belartaj Konkursoj*. Mihály *Gergely* (1921-), konata verkisto nacilingve, estis ĉefredaktoro de *Hungara Vivo* dum naŭ jaroj, ekde 1969 ĝis 1977. Vilmos *Benczik* (1945-) estas konata precipe kiel kritikisto, kaj de 1977 ĉefredaktoro de *Hungara Vivo*. Péter *Rados* (1941-) kaj Márton *Fejes* (1941-) alvokis la atenton de la publiko per sukcesaj poemtradukoj.

ĵ./ ISLANDA AŬTORO

BALDUR RAGNARSSON

B. *Ragnarsson* (1930-). Islandano, mezlerneja instruisto. Poemoj en „Norda Prismo“ kaj aliloke. Lia poemlibro „*Ŝtupoj sen nomo*“ (1959), aperis ĉe Stafeto. Li estas pesimista humanisto, volonte eskapanta en ian mistikismon. La „ŝtupoj“ estas ŝtupoj de evoluo el poezio simpla kaj teza al poezio alia, kies arta efiko „kuŝas en sia infektokapablo“ (Régulo), t.e. kiu efikas nek al la intelekto, nek al la sentoj, sed kvazaŭ al la subkonscio de la homo, sentigante per inkubaj impresoj la tragedion de la eterneco, la teruran solecon de la egocentrismo rande de abismo. Li tradukis el la islanda la poemlibron de *fra Hamri*, kies titolo estas „*Sub stelo rigida*“ (1963). En la volumo speguliĝas la abrupta ŝanĝo, kiun kaŭzis la dua mondmilito post miljara izoliteco de Islando. „*Islandaj pravoĉoj*“

(1964), lia tria libro, estas tradukaĵo el la malnovaj literaturaj trezoroj de Islando kaj la ĉefa bravuraĵo de la volumo la „*Völuspa*-traduko“ el la *Edda*-poemoj. Lia originala poemaro „*Esploroj*“ (1973), aperis en la serio de Beletraj Kajeroj ĉe Stafeto kaj montras la poeton tute matura.

k./ ISRAELA AŬTORO

I. *Dratwer* (1905-, en Varsovio). Lia verko „*Pri internacia lingvo dum jarcentoj*“ (1970) jam atingis du eldonojn. La libro estas nepre aktuala kaj valorega kolekto de opinioj pri la ideo de internacia lingvo kaj E. La grava verko enhavas la opiniojn de 35 filozofoj, 51 verkistoj, 35 scienculoj, 18 filologoj, kaj de diversaj konataj politikistoj, religiuloj, ktp.

Li estis la tradukinto de la sukcesa pollingva *Zamenhof*-biografio, kiun verkis Maria *Ziolkowska* sub titolo „*Doktoro Esperanto*“ (1959).

l./ ITALAJ AŬTOROJ

CLELIA CONTERNO-GUGLIELMINETTI

C. C. *Guglielminetti*, (1915-), itala profesorino pri beletristiko en mezlernejo. Pluraj ŝiaj poemoj estis

premitaj. Precipe pri patrineco ŝi povas kanti emocie, en liberaj versoj, kvazaŭ kun la pura simpla de Francisko de Assisi. Ŝi verkis artikolojn pri E-a literaturo kaj recenzojn en „La Nica“. Ŝia poemkolekto „*Eta vivo*“ (1969), enhavas poemojn, verkitajn inter 1935 kaj 1969. Ŝi havas ankaŭ itallingvan verkaron.

LINA GABRIELLI

Ŝi jam kun kvar libroj rolas inter niaj nuntempuloj, en kiuj oni precize povas sekvi la evoluon de ŝia stilo. „*La kombilo*“ (1962) estis la unua libro, en kiu montriĝis ŝia simpla, sed pura lingvo. La dua libro estas komuna verko kun Atus *Goldoni* „*Bill kaj lazuraj okuloj*“ (1964). Ĝi estas ĉarma rakonto pri infanoj. Ŝia tria libro aperis en 1973 kaj havas la titolon „*Karnavalo*“. En tiu kolekto de originalaj rakontoj estas kaptitaj etosoj de la juneco, pentritaj per koloroj de la plej delikata akvarelo. En 1974 per komuna volumo kun la norvego K. *Walraamoen*, ŝi sukcese prezentiĝis ankaŭ kiel poetino: „*Ni devas vivi*“.

En 1965 aperis ŝia itallingva romano, la „*Un cuore caldo*“ (Varma koro), kies specifajo estas ke ĝi temas pri vivo de esperantistino.

GIORGIO SILFER

Lia vera nomo estas Valerio *Ari* (1948-). Originalaj dramoj tute mankas en nia nuntempa literaturo, tial estas grandsignifa la dramo de G. Silfer „*Doktoro Rosales*“. La tre delikata temo estas problemo de nia, eĉ plie de la venonta jarcento. Tiu dramo (1973) okup-

iĝas pri la artefarita fekundigo laŭ psika vidpunkto, kaj en ĝi tre interese miksiĝas la scienca objektiveco kun la psikaj problemoj de la ginekologo. La premiero de la dramo okazis dum la 29-a IJK en Sarajevo kaj havis tre fortan efikon. Li redaktas de 1970 en Milano (nuntempe en Finnlando) la revueton de la itala literatura skolo „*La Patrolo*“ kun titolo: *Literatura Foi-ro*.

m./JAPANAJ AŬTOROJ

Tiu arbo, kiu radikigis, dum la dudekaj jaroj en Japanio kaj ekfloris dum la dua periodo pere de la laboro de Naokazu *Kawasaki*, Kenĵi *Ossaka* kaj Saburo Ito, — dum la tria periodo fortiĝis. La granda literatura kaj eldona aktiveco en Japanio, kies atestantoj ni estas dum la lasta jardeko, disvolviĝis kun ĝia plena ekzotika beleco kaj delikatsenta literatureco en neniam spertita abundo. Oni emas riski konstaton, ke ekzistas „*Japana Skolo*“, kun ĉiuj kriterioj de tiu kategorio. La influo de ĉi tiu skolo bone estas mezurebla ĉe niaj plej bonaj poetoj, per la disvastiĝanta imitado de la klasikaj japanaj utaoj kaj hajkoj. El la dua periodo trarkas la poezio de Kenĵi *Ossaka* kaj Masao *Niŝimura*, kvazaŭ uverturo al la disfloro de la nuntempo.

KAZUTA OKA

Nur en la jaro 1976 povis aperi la originala romano „*Matenruĝo*“ de tiu ĉi multmerita aktivulo de la japana proleta esperantista movado, kvankam la verko estis preta jam en 1935. *Oka* ne estas vera beletristo,

lia prezentmaniero estas plejparte naive didaktika, tamen faras lian romanon tre interesa la rakontitaj faktoj: li konigas al ni la vivon kaj luktojn de la maldekstraj esperantistoj en Japanio dum la tridekaj jaroj.

KENĴI OSSAKA

K. *Ossaka* (1888-1969) multe tradukis el japana literaturo, prozon kaj poezion, aperintajn en revuoj kune kun liaj originalaj poemoj. En 1921 tiuj aperis en volumo: „*Perloj el la Oriento*“. Okaze de la ora jubileo de lia esperantistiĝo, en 1956 ĉe Amo-Akademio estis eldonita lia libro „*El Orienta Florbedo*“, kiu simile al „*Perloj*“ krom tradukaĵoj enhavas kelkajn ankaŭ el liaj originalaj poemoj. En lia afekcia lingvo ĉiu vorto estas grava, ne malhavebla, instinkte li kaptas eventojn, en momento kiam li ricevas tiujn el la naturo.

MASAO NIŜIMURA

M. *Niŝimura* (1907-1940) estis japana poeto, kies poeziajn verkojn lia edzino eldonis en la libro *Edelvejso* (1957). La libro (164 paĝoj) estas tre interesa alojo de japana kaj okcidenta inspiro; precipe altira ĝin faras tio, ke la okcidenta influo estas propre E-a, do la libreto povas esti rigardebla kiel markoto de la ĝis nun evoluinta E-a poezia kulturo.

MASAO MIYAMOTO

M. *Miyamoto* (1913-) estas la plej elstara figuro de la nuntempo en la japana E-literaturo, kiu de origina-

la poezio kaj prozo ĝis la tradukarto kun egala talento laboras. Liaj libroj „*Kanto de l'koro*“ (1955) kaj „*Facilaj legaĵoj*“ (1961) estis kvazaŭ enkondukoj al lia pli poste disvolviĝinta, larĝskala literatura laboro. Kun Teruo Mikami, Kikunobu Matuba kaj Yasutaro Nozima li tradukis „*Rakontoj de Oogai*“ (1962) kaj la kvar tradukintoj faris vere brilan laboron, igante ĉi tiun verkon valora perlo ankaŭ por nia literaturo. „*La Obstino*“ (1963) de Atusi Nakazima enhavas kvar japanajn rakontojn pri malnovaj ĉinaj temoj, laŭ traduko de M. Miyamoto. Ĉi tiun tradukon sekvis en 1965 „*El la japana literaturo*“, en kiu li donis de mezo de la 19-a jarcento ĝis la dua mondmilito elektaĵojn el la japana prozo. La volumon li kune redaktis kun Teruhiko Isiguro kaj ĝin enkondukas bonega eseeto pri la literaturo en Japanio dum la koncerna periodo.

En la sama jaro aperis antologieto de originala Esperanta verkado en Japanio, sub titolo „*Japana kvodlibeto*“, inter kies kontribuantoj elstaras Miyamoto. „*Kvin virinoj de amoro*“ (1966) de Saikaku Ihara estas klasikaj amoraj rakontoj el la 17-a jarcento, tradukita de M. Miyamoto. Sub titolo „*Pri arto kaj morto*“ (1967) estis eldonita lia originala novelaro pri famaj artistoj kaj verkistoj. Denove kun T. Isiguro li tradukis la libron de la japana klasikulo Zyun'itiro Tanizaki: „*El la vivo de Syunkin*“ (1968).

„*Historieto de la japana Esperanto-movado*“ (1969, represita en 1975), estas lia originala verko, kiu multe helpas ekkoni kaj kompreni la japanan movadon en ĝia speciala medio. En la sama jaro sub titolo „*De sezono al sezono*“ li kompilis legolibron, kies ĉefa merito: la sistema konigo de nia literaturo kaj movada vivo.

En 1970 li publikigis la kompilitajn verkojn de la blinda rusa poeto V. *Eroŝenko* kun paralelaj tekstoj E-a kaj japana. La titolo de la verko estas „*Rakontoj de Eroŝenko*“.

„*Invit' al japanesko*“ (1971), estas lia tria originala verko kaj la unua originala poemkolekto. En la japanstilaj poemoj lerte estas uzataj ĉiuj eblecoj, donitaj de Esperanto. Lia sekvanta libro estas elektaĵo el la tradicia japana *utaaro* kaj havas la titolon „*El Manĵoo*“ (1971). Kaj la kompilado kaj la tradukado estas la laboro de Miyamoto.

Ĝin sekvis traduko de *utaaro* de la japana poeto *Takuboku*, kiun Miyamoto nomas „la japana Heine“. La traduko aperis en 1974 kaj havas la titolon „*Utaaro de Takuboku*“.

En 1976 Miyamoto sin anoncis per originala romano, kies titolo „*Naskitaj sur la ruino – Okinavo*“, kaj unu jaron poste, en 1977, kun la antologio „*El la japana moderna poezio*“.

Krom lia denombrita, larĝskala literatura laboro, Miyamoto aktive partoprenis en la agado de la *Hajkista Klubo* de *Osaka*, kiu inter 1967 kaj 1973 aperigis sep hajkarojn, parte originalajn, parte tradukitajn.

GAKU KONISI

G. *Konisi* (1934-) debutis en 1971 per sia sciencfikciaĵo *La kosmoŝipo „Edeno n-ro5“*. La verko lanĉas du gravajn problemojn de nia epoko: la esploradon de la universo kaj la kreskantan superregon de la homo fare de teknika civilizacio. En la sama jaro aperis lia traduko de Nobel-premiita japana romano,

kies verkisto estas Yasunari *Kawabata*. La verko „*Ne-
ĝa lando*“ (1971) estas delikatsenta majstroverko pri
la homaj rilatoj. En 1976 aperis lia sekvanta libro:
„*Vage tra la dimensioj*“, kiu enhavas liajn sep origina-
lajn sciencfikciajn rakontojn.

TEMPU YAMADA

„*Landlimo jam pasis*“ (1971) estas lia parte origina-
la, parte tradukita hajkaro de diversaj japanaj poetoj
de la 17-a jarcento ĝis nun.

MASAO UEYAMA

Li debutis kiel originala verkisto per kolekto de
noveletoj „*Ne grimacu!*“ en 1967. Kiel ĝi, ankaŭ la
libro „*Pardonon!*“ (1970) estis verkita sen pli alta am-
bicio kaj tion aludas ankaŭ la titolo de la volumo. La
verkisto petas pardonon pro sia stilo kaj pro la tiklaj
temoj. „*Kristo el bronzo*“ (1970) estas la tradukaĵo
de la japana verkisto Yosio *Nagayo*, en kiu li rakontas
duone historian okazĵon el la feŭda Japanio, kiam an-
koraŭ la konvertitoj al la katolika religio estis perse-
kutitaj. En 1974 aperis lia originala poemaro sub tito-
lo „*Por forviŝi la memoron pri ŝi*“.

KUNIO YANAGITA

Li kompilis la „*Japanaj malnovaj rakontoj*“, traduk-
itajn de diversaj japanaj tradukistoj. Unua eldono en
1965, dua en 1973.

KAZUO OSAKI

Li estis la tradukinto de la novelo de Jaeko *Nogami*: „*Kaijin-maru*“ (1966). Tiu ĉi novelo de la japana aŭtorino rakontas pri kvar maristoj sur la ŝipo „*Kaijin-maru*“, kiun la ŝtormo duone detruis kaj dum kelkaj semajnoj ĝi ĵetiĝadas sur la oceano. La karakteroj de la kvar maristoj kombiniĝas inter la antaŭvidita morto kaj la egoisma lukto por transvivi.

KIUZO ITO

Li tradukis la verkon de Ĵoĵi Cubota „*La infanoj en vento*“ (1966). Ĝi estas amuza, malpeza verketo, por infanoj distre edifa.

SYOŜAKU ISOBE

El la plej novaj japanaj E-poetoj nepre meritas mencion S. *Isobe*, el kies originala poemo „*La Kantoj de Studentaj Soldatoj*“, kelkaj fragmentoj aperis en „*Norda Prismo*“ (1976).

YAGI-NIHEI

Li debutis per ok originalaj rakontoj en 1975. La titolo de la verko: „*Mozaiko Tokio*“.

TAZUO NAKAMURA

T. *Nakamura* (pseŭdonome: Teruo *Mikami*) (1911-) esperantologo, scienca verkisto, de 1919 esp-isto, de 1952 red. de *Oomoto*. Menciinda estas lia originala verko: „*Enciklopedieto Japana*“ (1964), kiu en eleganta stilo prezentas informojn pri la japanaj kulturo, historio kaj etnologio. Lia internacia lernolibro „*Internacia kurso de Esperanto*“ vekis grandan atenton, – simile „*Zamenhofa Stilo kaj Moderna Stilo*“. Li partoprenis per aparta studo la simpozion pri problemo: -ata, -ita (1961). Li ĉefredaktis (1962) „*Rakontoj de Oogai*“ (Oogai *Mori*) kaj kunredaktis „*Japana kvodlibeto*“ (1965).

Grava estas lia traduka laborado. El inter liaj tradukaĵoj estu menciitaj: (1964), „*Filoj de Dio, Adorantoj de Dio*“, vere interesa verko de Hideo *Haga* (kun fotoj pri Oomoto), – (1965), „*Kvinteto*“ ekstraktoj el la verkoj de la kvin *Deguĉi*-oj, – kaj (1965) „*La Libro de Teo*“ de Kakuzo *Okakura*, originale verkita en angla lingvo. Tiu libro pere de tr. de T. Nakamura iĝis perlo ankaŭ en E-a literaturo, kaj faras bone komprenebla tiun profundan kunplektiĝon inter la japanaj arto, filozofio kaj vivmaniero.

HAJKISTA KLUBO EN OSAKA

Tre interesa specialeco de la nuntempa E-literaturo en Japanio: kolektiva laboro de la Hajkista Klubo en *Osaka*, Ĉi tiu kolektivo ekde 1967 ĝis 1973 aperigis sep hajkarojn, parte originalajn, parte tradukitajn. La titoloj de la hajkaroj:

- „Suito '67“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1967),
 „Etudo '68“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1968),
 „Kvinteto '69“ (La kvinteto: Masao *Ueyama*,
 'Keinosuke *Murata*, Tomu
Tomita, Sadami *Tanaka* kaj
 Masao *Miyamoto*. Eld.: 1969),
 „Kapriĉo '70“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1970),
 „Nokturno '71“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1971),
 „Sonato '72“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1972),
 „Finalo '73“ (Diversaj aŭtoroj, eld.: 1973).

UTAFESTA POEMARO

Valora iniciato de la japanoj estis la internacia literatura konkurso, kies rezulton ili eldonis en la volumo „*Utafesta poemaro*“ (1966). En ĝi estas elektajo el la plej bonaj konkurso materialoj, kiujn esperantistaj poetoj sendis al la konkurso de la Uta-festo. La festo okazis en kadro de la Internacia Oomoto Festivalo dum la 50-a UK. en Tokio, 1965. Inter la bone elektitaj poemoj de la volumo ni trovas de la tradiciaj poemoj ĝis la plej modernaj ĉiujn tendencojn, vivantajn en nia poezio, kvazaŭ sekcon pri la nuntempa E-poezio.

En la volumo ni povas legi premiitajn poemojn de Antonia-Maria *Albert*, Masao *Ueyama*, Gé *Roelofs*, Armand *Su*, Vilhelmo *Benczik*, Jiří *Kořínek*, Paul *Lobut*, Masayuki *Kuroda*, Julius *Balbin*, L. M. *Newell*, Milda *Jakubcová* kaj Jana *Cichová*.

REELDONO DE LA „LITERATURA MONDO“

Parolante pri la E-literaturo en Japanio, neblas preteriri tiun gravan kaj ofereman laboron, per kiu dudek japanaj geesperantistoj fondis „*Kooperativo por represo de Literatura Mondo*“, kontribuante per la savo de tiu unika dokumento de nia intermilita E-kulturo, ke ankaŭ la nuntempaj esperantistoj povu ekkoni ĝin. Tiu reeldono ebligas al la nuntempa generacio priaksi la signifon de LM en ĝiaj veraj dimensioj.

n./ JUGOSLAVIAJ AŬTOROJ

IVO LAPENNA

I. *Lapenna* (1909-) iama univ. profesoro de internacia juro en Zagreb, iama membro de Jugoslavia Akademio de Sciencoj, nun jura konsilisto, kunlaboranto de la Londona Universitato, prezidanto de UEA de 1964 ĝis 1974. Kiel estrarano de kongresoj li reorganizis la Internacian Someran Universitaton, enkondukis Belartan kaj Oratoran Konkursojn, starigis la Internacian Gazetaran Servon, reorganizis la Internacian Informan Fakon, fondis en 1952 la CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado). Li klopodis per ĉiuj fortoj altigi la prestiĝon de la movado. En la ĝenerala konferenco de UNESCO en Montevideo (1954) li akiris grandan sukceson: UNESCO aprobis Esperanton kaj ligis sin kun ĝi en konsultajn rilatojn.

Li verkis multnombrajn artikolojn pri aktualaj problemoj de la esperantismo. Lia ĉefa verko „*Retoriko*“ (1950, 1958 kaj 1971) estas instrua kaj plezuriga legaĵo pri kulturo kaj lingvo, informanta ankaŭ pri la stato de la lingvistiko kaj resumanta ĉion sciendan pri la parolarto, ekde la parolturnoj kaj parolfiguroj ĝis la uzado de voĉo kaj gestoj kaj vestoj, kaj ĝis la necesa morala bazo por la konstruo de la parolado; ĉio ĉi prezentata de unu el la plej grandaj oratoroj en la historio de E. Lia alia verko estas „*Aktualaj problemoj de la Nuntempa Internacia Juro*“ (1954), populare verkita libro pri la internaciaj problemoj. „*Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*“ (1966) estas kolekto de liaj plej famaj paroladoj pri Esperanto, pri la movado, pri kelkaj aspektoj de nia lingvo kaj kulturo.

„*Esperanto en Perspektivo*“ (1975) estas grandioza verko, kvazaŭ krono de la multjara esplora kaj dokumenta laboro de CED, kiun fondis Lapenna.

TIBOR SEKELJ

T. *Sekelj*, licenciato, diplomito pri juro, prezidanto de la Internacia Geografia Asocio, faris multajn vojaĝojn kaj ekspediciojn kaj pri tiuj raportis (krom diverslingvaj verkoj) en tri gravaj Esperantaj libroj: „*Nepalo malfermas la pordon*“ (1959) kondukas nin en ĉi tiun longe sekretatan landon. „*Tra la lando de indianoj*“ (1970) rakontas pri ekspedicio al ankoraŭ neesplorita regiono de Amazono, apud kiu en la paarbaregoj vivas centmiloj da indianoj inter cirkonstancoj de la ŝtona

epoko. Lian unuan libron „*Tempesto super Akonkagvo*“ kiu rakontas la ascendon sur la plej altan sudamerikan montopinton kun la tiea fikso de la verda standardo, Hugo E. Garrote tradukis en Esperanton kaj en 1959 ĝi estis jam la sesa eldono de ĉi tiu fama libro.

Liaj verkoj estas plenaj de interesaj observoj, serenaj kaj tragikaj detaloj, kaj krom la interesostreĉa prezento de vojaĝaventuroj ili donas ankaŭ alrigardon al la historio, arto, moroj, etnografio. La aŭtoro kiel propagandisto havis brilan sukceson en Aziaj rondoj budhanaj. Ankaŭ kiel poeto li eminentas. En 1974 sub titolo „*Premiitaj kaj aliaj noveloj*“ T. Sekelj sin prezentis ankaŭ kiel originala verkisto de noveloj, kaj inter la 19 poetoj de „*Reeĥoj*“ la plej impresiva poemo estas la lia: brila, altira memportreto de grandmerita mondmigranto.

DRAGO KRALJ

Li verkis resumon pri la E-literaturhistorio sub titolo „*Kvar prelegoj pri la Esperanta literaturo*“ (1960). Tiu tre utila verko prezentas elektitajn ĉapitrojn el la historio de la E-literaturo kun poem-ekzemploj, citaĵoj kaj fragmentoj.

Li redaktis la kulturalan kaj literaturan revuon „*Suda Stelo*“, ĉirkaŭ kiu grupiĝis plejparte la esperantistaj poetoj en Jugoslavio. Ilia kolektiva poemvolumo „*Reeĥoj*“ (1961) aperis ĉe Stafeto. El la 19 poetoj de la volumo jen kelkaj:

B. *Vanĉik* (1909-1970) kun drasta esprimo de pasio sub malglataj versaglomeroj kaj kun sukcesaj poemtradukoj; kunlaboris kun LM, La Nica Literatura Revuo, kunredaktis Internacia Kulturo kaj La Suda Steĵo. Grava estis lia traduko de „*La Kavo*“ de la kroata poeto J. G. *Kovaĉic*.

JOSIP VELEBIT

J. *Velebit* (1911-) kroata profesoro estas kvazaŭ spontanea fonto de originalaj poemoj kaj de inspirita tradukemo: „*Fabeletoj por etuloj kaj plenkreskuloj*“ de Skrljac *Ferdo* (1962) kaj „*La morto de Smail-agao Ĉenĝić*“ de Ivan *Majĵuranic* (1972). Lia „*Antologio de tutmonda ampoezio*“ (1969) estas grandega, 600 paĝa, serb-kroatlingva antologio el multaj naciaj lingvoj, inter kiuj ni trovas amosentajn poemojn, tradukitajn el la E-literaturo: de Julio Baghy, Hilda Dresen kaj Ludmila Jevsejeva. Menciinde estas, ke li estas plej kompetenta tradukisto de la hungara literaturo al la kroata.

Sub titolo „*Girlando da sonetoj*“ li tradukis el la slovena poemojn de France *Prešern*, (eldonita en 1973). El la makedona lingvo li tradukis la romanon de Blagoja *Ivanov*: „*Ventoj*“. La psikologia romano temas pri fremdiĝo de la homo en nia moderna socio. Vera poeto li montriĝas ankaŭ per la traduko de la poemaro „*Kanto al Mia Koro*“ de Dragutin *Tadijanoviĉ* (1936).

JAKOB STEFANĈIĈ

Ankaŭ li apartenas al la kolektivo de „Reeĥoj“ kaj kelkfoje li bone trovis la voĉon de la vera popola simpla.

GRETA STOLL

Margareta *Stoll* (1912) svisdevena aktorino estas intimvoĉe fascina poetino, novelverkistino ne nur en E, sed ankaŭ en la serba.

ANTONIJA ALBERT

A. *Albert* (1901-) kroata instruistino elstaras inter la poetoj de la „Reeĥoj“ kun sia delikata virina sugestivo.

VESNA SKALJER-RACE

V. *Skaljer-Race* (1911-) kortuŝe sonigas la kordojn de virina plendo. Sub titolo „*Maristo surmaste*“ (1969) aperis ŝia memstara poemaro, kiun la kritiko akceptis kun laŭdo. En relative simpla, sed gracia lingvo volonte pentras la naturon, korajn sentojn. Ŝi verkis poemlibrojn ankaŭ en la serbo-kroata.

DAMJAN VAHEN-SVETINOV

La slovena *Vahen-Svetinov* (1913-) aperigis poem-volumojn: „*Miaj Vojoj*“ (1938), „*Dum Longaj Vesperoj*“ (1940), „*Dum Noktoj Senstelaj*“ kaj „*Kriroj el mallumo*“ (1963).

o./ NEDERLANDA AŬTORO

ANTON H.LEENHARD

La poeto majstras la soneton kaj en lia „*Somera simfonio*“ (1970) sentblas la entuziasma, preskaŭ panteisma naturadorado al la riĉkolora somero.

p./ NORVEGA AŬTORO

JOHAN HAMMOND ROSBACH

J. H. *Rosbach* (1921-), norvego, filologo, ĉefredaktoro de Norvega E-isto, akademiano. Verkoj: *Bagatelaro* (1951), *Homoj kaj Riveroj* (1957).

Rosbach estas populara rakontisto: *Homoj kaj Riveroj* entenas 20 novelojn. Ili estas parte fantaziaj rakontoj kun pli-malpli socia tendenco (eŭtanazio, rasa diskriminacio, ktp.), parte rememoroj de junaĝo kun dolĉa melankolio pri la pasinta tempo, parte ĉerpajoj

el propraj travivaĵoj tempe de la germana okupiteco de Norvegio. La longa novelo *Riveroj* rafine kunteksas rakontajn kaj meditajn partojn. La aŭtoro havas freŝan observokapablon kaj lia rakontado fluas glate, nature kaj interese. Lia tria novelaro „*La mirinda eliksiro*“ aperis en 1968. La volumo enhavas 14 novelojn, verkitaĵajn per sprita plumo. Jen satire, jen humure li parolas pri eterne homaj temoj, sed la aŭtoro neniam maltrufas kapti la esencon.

„*Disko*“ (1970) estas la kvara libro de nia unika novelisto. La volumon li mem nomas „ciklo da skizoj“ kaj ĝi enhavas 17 novelojn, en kies fonoj staras grava demando: ĉu la morto solvas ĉion? Lia libro, kiu aperis en 1974 estas romaneto, havas la titolon „*Verda robo aŭ Ordinaraĵ indianoj*“ Ĝi temas pri diverskarakteraj homoj en ripozhotelo kaj pri robo, kiun unu el ili ŝtelis. En la jaro 1977 li anoncis sin kun la romano „*Fianĉo de l'sorto*“, kiun iuj kritikistoj trovis „arta triumfo“, aliaj „hibrida verko“.

r./ NOVZELANDAJ AŬTOROJ

BRENDON CLARK

B. Clark (1904-1956), novzelandana instruisto. Lia verko: „*Kien la poezio?*“ (1957) enhavas krom poemoj originalaj kaj tradukitaj ankaŭ teorion de E-a metriko, laŭ kiu la poezia lingvo devas esti tia sama kiel la proza, do havi nek neologismojn, nek apostrofojn, krome la takto devas esti trokea, ĉar nur tio konformas al

la karaktero de la lingvo. Bedaŭrinde, per siaj poemoj li ne povis prui la dezirindecon de sia teorio.

BERTRAM POTTS

B. Potts anglo, elmigrinta junaĝe al Nov-Zelando debutis kiel originala verkisto per la atentinda novelaro „*Nokto da timo*“ en la jaro 1971. Li tradukis al E la socikritikan romanon de J. A. Lee: „*Infanoj de la malriculoj*“ (1972) En 1978 aperis *La nova butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj*, kaj la porinfana poemaro *Poezia Bukedo*.

s./ PANAMA AŬTORO

GEORGO MAŬRA

G. Maŭra (1905-1971), panamano, modisto. Poeemoj en „*Dekdu poetoj*“ kaj en „*La Nica*“. Lia poemlibro *Duonvoĉe* (1939) aperis ĉe la Stafeto en plivas-tigita dua eldono (1962). La poeto ludas precipe sur tri kordoj: amo, libero kaj esperantismo, sed li scias por ĉiuj tri trovi emociajn versojn de pasio, de lamento aŭ de didakto kun iom ironia subpentro. Li estas precipe miniaturartisto, kies arto kulminas en kelkaj pecoj de la „unuversaj universoj“. Kun sia bela lingvo, plastikaj tropoj kaj granda esprimivo li estas unu el niaj plej rimarkindaj poetoj.

Nuntempe oni multe dubas, ĉu entute ĉi tiu poeto vivis? Multaj opinias trovi troan similecon inter la stilo de Maŭra kaj Waringhien.

JULIAN TUWIM

J. *Tuwim* (1894-1953) estas unu el la brilaj nomoj de la poezio pola. En sia junaĝo li tradukis polajn poemojn en E-n; ĉi tiujn oni eldonis en volumo „*Versaĵoj propraj kaj tradukitaj*“ (1956), aldonante tradukojn el la poemoj de Tuwim, faritajn de Lejzerowicz, Hodakowski, Karolczyk, Rytenberg, Belmont, Rajski, Jadwiga Rydyger kaj aliaj.

EUGENIUSZ MATKOWSKI

E. *Matkowski* (antaŭe Matwiejczuk), ukrain-devena, pola ŝtatano, muzikisto, aperigis poemojn en „Pola Esperantisto“, „Norda Prismo“, „Oomoto“ kaj aliloke. Lia poemvolumo, „*Poemoj*“ (1960) aperis en *Rio de Janeiro*. Li estas de maltrankvila, iom malharmonia, sed ne seninteresa individueco, tralumata de esperantismo, al kiu li estas sincere sindona. Li ŝatas drastajn situaciojn, ŝatas indigni kaj indignigi.

JERZY GRUM

J. *Grum* (1933-), ano de la redakta komitato de „Pola Esperantisto“ Kiel novelisto li jam estis menci-

ita inter la aŭtoroj de la „33 Rakontoj“ El inter liaj pli postaj tradukaĵoj elstaras la traduko de la teatraĵo „*Proksima nekonato*“ de Aleksander Scibor-Rylski (1972). Kun la jam en 14 lingvojn tradukita teatraĵo la fama pola aktoro-geedzoj Kalina *Pienkiewicz* kaj Zbigniew *Dobrzynski* faris tre sukcesan turneon en Usono kaj en diversaj landoj de Eŭropo.

Menciinda estas ankoraŭ el la literatura laboro de J. Grum du tradukaĵoj el 1964: „*Kiel esti amata*“ de *Brandys* kaj „*La fumo*“ de Maria *Konopnicka*, kiu lasta estis la verkisto ankaŭ de la alia rakonto de la volumeto „*Mia poŝhorloĝo*“, tradukita de *Kabe*.

TYBURCJUSZ TYBLEWSKI

Li apartenas al la plej juna poeta-tradukista generacio en Pollando, kiu tradukas ĉefe la poemojn de la pola poeto Tadeusz *Różewicz*. En 1971 Tyblewski aperigis ankaŭ originalan poemaron sub titolo „*Meta-morfozo*“.

JULIA PIÓRO

Ŝi debutis per originala novelaro „*El tero kaj etero*“ en 1964. La kolekto enhavas ok originalajn novelojn, el kiuj kelkaj estas delikate lirikaj, kelkaj simbolaj kun kaŝita signifoj.

1./ SOVETAJ AŬTOROJ

Fine de la sesdekaj jaroj ĝoje estis konstatabla la plivigliĝo de la soveta libroeldonado.

EŬGENO A. BOKAREV

E. A. *Bokarev* (1904-1971) akademiano, doktoro de filologiaj sciencoj verkis Rusa-Esperanto vortaron (1966), kiu estis eldonita en 50.000 ekzempleroj. Tiun sekvis jam post lia morto la Esperanta-Rusa varianto (1974). Li estis unu el la ĉefaj gvidantoj de la antaŭmilita SEU, kaj kiam denove estis ebleco por E-a laboro, ankaŭ li reaktiviĝis kaj helpis la movadon per sia aŭtoritato scienca. En U.K-j li plurfoje prelegis en kadro de Int. Somera Universitato.

MILDA JAKUBCOVÁ

De ŝi aperis broŝureto el ŝiaj originalaj poemoj sub titolo „*Elektitaj versaĵoj*“ (1969). Kune kun E. *Lippe* ŝi redaktis kaj tradukis kolektaĵon de nuntempaj latvaj poetoj: „*Latva Poezio 1945-1966*“ en Riga, Latvio.

LUDMILA JEVSEJEVA

L. *Jevsejeva* (1913-), latvino, debutis inter „*Naŝ Poetoj*“ dum la dua periodo, sed ŝi estis aktiva ankaŭ dum la tria. Ŝiaj poemoj aperis en la *Literatura Mondo*, *Norda Prismo* kaj *Pola Esperantisto*, sed ŝi kunlaboras kun peskaŭ ĉiu E-revuo.

BENITA KÄRT

La estona Benita Kärt apartenas al la pli nova generacio, kies unua poemaro „*Miozoto*“ aperis en 1970. La poemoj havas fortan inspiron de la naturo, kiun la kritiko nomis dolĉe romantika sunradieto en la sufoke moderna poeziarbaro.

Ŝia dua libro estas tradukaĵo de A. H. *Tammsaare* „*Mastro de Korboja*“, pri geedziĝo inter gefiloj de du bienulaj familioj, kun tragikaj sekvoj.

u./ SUDAFRIKA AŬTORO

EDWIN DE KOCK

Edwin *De Kock* (1930-), sudafrikano, instruisto. Aperigis poemojn en „*Norda Prismo*“ kaj en aliaj gazetoj. Lia unua poemlibro estas „*Ombroj de la kvara*“

dimensio“ (Stafeto, 1961). En liaj poemoj oni trovas sinesplorajn kontemplojn esprimitajn per imagoforto kapabla je freŝaj kaj trafaj metaforoj. Kelkloke sentigas trostreĉo de imago por la kreo de bildo aŭ metaforo nepre neniam uzita. Lia granda epopeo „*La konflikto de epokoj*“ havas memorindajn partojn, sed fragmente, kiel ĝi aperis ĝis nun, ne estas ĝuste prijuĝebla. Bedaŭrinda estas lia trokeemo kaj lia teorio pri „neŭtrala akto“, kontraŭa al la plej firmaj tradicioj de nia poezio.

En 1967 aperis lia dua poemkolekto „*Fajro sur mia lango*“. La poeto kaŭzinta jam multajn disputojn, en ĉi tiu poemkolekto meditas pri la vivo kaj pri si mem. Ekkaptas lin ĉiuj kontraŭdiroj kaj sensencaĵoj de la vivo.

Pro lia prozodio kaj pro strangaĵoj de lia metriko ne de ĉiu komprenita poeto en „*Poemoj kaj prozeroj*“ (1970) pensigas pri forfluginta junaĝo kaj en ĉi tiu verko kvazaŭ li estus jam pli milda, pli komprenebla. Auld diras pri De Kock en sia recenzo: „cetere li estas unu el tiuj talentoj, kies ostojn ĝispenetris la lingvo Esperanto: la esperantisteco traradias lian vivsintendon“.

La „*Kvin elementoj*“ (1970), parolas pri akvo, aero, fajro kaj tempo. La unuaj du elementoj jam aperis en 1958, en la „*Esperanta Antologio*“. La esenco de ĉi poemaro: la koro; — kaj De Kock unuavice reprezentas moralajn kaj filozofiajn nociojn: amo, vivo, kruelo kaj morto, kiel ilin vidas la personigitaj „elementoj“.

En 1975 Kock sin anoncis per nova volumo „*Plukonstrue*“. Krom originalaj poemoj la volumo enhavas versdrameton „*Rekomenco*“.

ADOLF HOLZHAUS

La plej konata libro de tiu ĉi persista esploristo pri Zamenhof sub titolo „*Doktoro kaj lingvo Esperanto*“ aperis en 1969. La volumo krom la biografio de la patro de Zamenhof, enhavas interesajn aldonojn pri la vivo de la Majstro kaj de la komenco de la E-movado, en rusa kaj juda medioj. Lia sekventa libro pri Trompeter, sub titolo „*Wilhelm Heinrich Trompeter*“ (1971), en 1973 atingis duan eldonon. La libro entenas la bibliografion kaj la leterojn de tiu nia frua pioniro kaj mecenato, sen kiu laŭ Zamenhof „nia afero tute ne ekzistus“.

La alia libro de Holzhaus „*Verkoj de Heinrich Heine*“ (1973) estas valorega verko, kolekto de ĉiuj E-tradukoj de la poemoj de Heine, aperintaj en E-gazetoj, revuoj, libroj, aŭ eĉ kuŝintaj manuskripte. En la sama jaro Fondumo Esperanto en Helsinki eldonis lian „*Granda galerio Zamenhofa*“, kiu estas kolekto de 952 fotoj pri Zamenhof kaj liaj familianoj. Ĉe la sama eldonejo aperis lia „*Zamenhof: Leteroj*“ en 1975.

57. TRADUKKLITERATURO

La tradukliteraturo en la tria periodo estas eksterordinare riĉa kaj multe da elstaraj verkoj de la mondliteraturo ricevis E-vestaĵojn pere de niaj plej eminentaj tradukistoj. Pro amplekso de la materialo ni trarigardu la tradukliteraturon, – simile al la originala, – laŭ

alfabeta ordo de la landoj, forlasante tiujn tradukistojn kaj tradukaĵojn, kiuj jam estas menciitaj inter la originalaj verkistoj.

a./ ARGENTINO

Selso *Diego* tradukis Esperanten „*Alvoko de l'silento*“ (1966) de argentina poetino *L. Rekarero*.

„*Martin Fierro*“ (1965), argentina eposo de José *Hernández* en la traduko de Ernesto *Sonnenfeld* riĉigis nian tradukliteraturon.

„*La friponeto de Tormes*“ (1973) estas hispana klasikaĵo el la 16-a jarcento kaj apartenas al la artospeco pikareska, karakterize hispana, de nekonata aŭtoro. La traduko estas laboro de Ergoto de *Bonaero* (*Adan Hryenkiewicz*), kies aliaj tradukoj: „*Junulejo*“ de *M. Cane* kaj „*La buĉejo*“ de *E. Echevarría* (1973), en unu volumo. „*Kalejdoskopa Varieteo*“ (kolekto de mallongaj eseoj, recenzoj, poemoj kaj humoraĵoj, parte originalaj, parte tradukitaj el diversaj lingvoj, (1974). „*Pikaresko monda*“ (1973/76) enhavas la tradukojn de „*Friponeto de Tormes*“ kaj „*Pikaresko monda*“. Ties dulingva eldono en 1976 enhavas ankoraŭ „*La papageto*“-n.

b./ BRAZILO

„*Antologio de Braziliaj Rakontoj*“ (1953) estas reprezenta verko, kiu enhavas 33 aŭtorojn, la plej famajn

en Brazilo. La lingvajn erudiciojn de *Gomes Braga* kaj *Carreiro Neto* laŭdas ĉi tiu verko.

Sub titolo „*Elektitaj poemoj*“ (1959) aperis poemovolumo de la june (24 jara) mortinta Brazila poeto *Castro Alves*, en la surprize bona traduko de L. H. *Knoedt*. La juna poeto kantis pri amo, naturo, frata kunsento al sklavoj kaj kun granda amo al la vivo.

La „*Fermentario*“ (1960) estas majstroverko de la granda Urugvaja pensulo C.V. *Ferreira*, pri la plej diversaj detaloj de la individua kaj socia vivo, kun mirinda abundo da pensoj. La traduklaboron de *Carreiro Neto* kaj *Gomes Braga* helpis ankaŭ *Manuel Fernández Menéndez*.

„*Iracema*“ (1974) estas klasika romano de la brazila literaturo de José de *Alencar*, kiun el la portugala tradukis B. *Silva*.

c./ BRITIO

„*Antonio kaj Kleopatro*“ (1947) kaj „*Trojlo kaj Kresida*“ (1952) de Shakespeare, estis tradukita de nia konata Shakespeare-tradukanto Stephen A. *Andrew*.

„*Angla Antologio*“ (1957). Kunlaboris: W. *Auld*, F.R. *Banham*, C.D.A. *Capp*, J.S. *Dinnwoodie*, A.D. *Foote*, J. *Francis*, G.C. *Jervis*, E.P. *Ockey*, R. *Rossetti*, A. *Venture* kaj G. *Waringhien*. (Detale pri la antologio ĉe W. *Auld*.)

„*Reĝo Edipo*“ kaj „*Antigona*“ de *Sofoklo* (1960) en la konsciencia traduko kaj kun tre instruaj komentoj de D.B. *Gregor*.

De J.D. *Applebaum* (1877-1965) oni denove eldonis la infanlibron „*La struvelpetro*“, tradukitan en 1921. La libron originale verkis germana kuracisto H. *Hoffmann* por sia fileto. *Applebaum* estis la tradukinto ankaŭ de la „*Vojaĝoj kaj Mirigaj Aventuroj de Münchhausen*“ (1927), originale verkita de R.E. *Raspe*, kaj de la versdramo: „*Jozefo*“ (1957), kies temo estas la biblia rakonto pri Jozefo kaj la edzino de Potifar.

ĉ./ BULGARIO

„*Bofilino*“ de G. *Karaslavov* (1959) en la traduko de Simeon *Simeonov* kaj Asen *Simeonov* estis eldonita en 1959.

„*Sub la jugo*“ de Ivan *Mincev Vazov*, kiun la bulgaroj eldonis laŭ traduko de Simeon *Ĥesapĉiev*, Simeon *Simeonov*, k.a. en 1959, okupiĝas pri la vivo kaj luktoj de la bulgara popolo sub la turka jugo.

La „*Bulgara prozo*“ (1960) enhavas 19 novelojn de diversaj tradukistoj.

„*Elektita verkaro de Hristo Botev*“ (1960), laŭ traduko de Ivan *Dobrev* kaj Ivan *Sarafov*, donas bonan elektadon el la verkoj de la fama bulgara klasikulo.

d./ ĈEĤOSLOVAKIO

„*Romeo, Julieta kaj la Tenebro*“ (1965) de J. *Otčenasek*, estis tradukita de Vladimir *Vana*. Al la libro

verkis enkondukon L. Aragon.

„*Libro de apokrifoj*“ (1970) de Karel Čapek laŭdas la tradukarton de Josef Vondroušek. La temoj de la novelminiaturaj estas mitaj, historiaj kaj literaturaj.

„*Sileziaj kantoj*“ (1970) de Petr Bezruč en la tradukoj de R. Hromada, J. Kořínek kaj T. Pumpr. La sciencfikcia novelaro „*La perdita vizaĝo*“ de J. Nesvadba, tradukita el la slovaka de A. Staňura, aperis en 1974.

Atuta verko de la tradukarto en Ĉeĥoslovakio estas la impone ampleksa „*Slovaka Antologio*“ (1977), redaktita de Jozef Vel’ky. La traduklaboro estis tre kompetente farita de sep elstaraj literaturistoj.

e./ ĈINIO

Unu el la plej bonaj kaj aktivaj ĉinaj tradukistoj estas Saint-Jules Zee (aŭ Sü), kiu debutis en 1938 inter „*Naŭ Poetoj*“. Lia aktiveco ankaŭ en la tria periodo daŭris, ĉefe en traduklaboro. Li tradukis el la ĉina la romanon „*Fajrolumo en la Fronto*“ (1950) de Liu Beĵü. „*Sovaĝa herbaro*“ (1951, dua eld. 1974) estas kolekto de noveletoj, poemoj, skizoj kaj skeĉoj de la granda ĉina verkisto Lu Sin. Sub titolo „*La plej forta voĉo de la paco*“ (1952) estis eldonita kolekto de poemtradukoj, aperintaj en „*El Popola Ĉinio*“, tradukitaj de S.-J. Zee kaj aliaj. Zee estis kunlaboranto ankaŭ de „*Ĉina Antologio 1949-1959*“ (1959). Lia silentiĝo, kiel originala poeto Esperanta, estas unu el la plej doloraj perdoj de nia poezio.

Krom Zee por tiu Antologio tradukis *Pandiŝo*, *Cen-
stnio*, *Sang Yong-Sen*, *Laŭlum*, *Honfan*.

„*Rakontoj pri la fantomspitantoj*“ (1961) estas tra-
dukita de *Pandiŝo* kaj I. *Ko*.

„*Noveloj de Lu Sin*“ estas novelkolekto de la gran-
da ĉina verkisto *Lu Sin*, laŭ traduko de *Elpin*, I. *Ko*,
Pandiŝo, 1963.

La florkloran junularan versrakonton „*Aŝma*“
(1964) tradukis *Laŭlum*.

f./ DANIO

„*Dana Antologio*“ (1961). Tradukis Christian
Heilskov, C.A. *Hvorslev* k.a. . La antologio donas bo-
nan sekcon pri la dana literaturo.

„*Taglaboristoj*“ de Hans *Kirk* estas tradukaĵo de L.
Friis kaj W. *Jensen*. La libron oni represis en 1968.
Lastatempe – dank’ al la agado de Dansk Esperanto-
forlag – aperas multaj verkoj, tradukitaj el la dana
lingvo, sed plejparte el la poramuza literaturo (detek-
tivromanoj ktp.).

g./ FINNLANDO

La finnoj eldonis la tradukon de „*Sep fratoj*“
(1947) de Alexis *Kivi*, laŭ traduko de Ilmari *Ek-*

ström. De A. Kivi jam en la dua periodo aperis „*La botistoj*“ (1919) kaj „*La fianĉiĝo*“ kun „*Lea*“ en unu volumo (1920), en la traduko de Hilma Hal.

En 1964, en vere bonega, klasika traduko de J. E. Leppäkoski aperis la kompleta „*Kalevala*“. Plej laste – en 1978 – aperis la fama romano „*La kanto pri la fajr-ruĝa floro*“ de J. Linnankoski en la traduko de E. Kuoppala kaj J. Jäntti.

ĝ./ FRANCIO

Tre ampleksan literaturan laboron disvolvas la franco Roger *Bernard*. Li tradukis multajn poemojn el la franca literaturo, kiuj aperis ĉefe en „*La Nica*“ kaj en la „*Norda Prismo*“. Liaj tradukaĵoj el la franca poezio kun liaj du originalaj poemoj aperis ankaŭ en aparta volumeto „*Apenaŭ bukedeto...*“ (1971).

Gravaj estas liaj teatraĵo-tradukoj: „*Topaze*“ de Marcel *Pagnol* kaj „*Ŝipego Tenacity*“ de Charles *Vidrac*, aperintaj en unu volumo (1960). En ambaŭ li sukcese redonis la nuancojn de la franclingva originalo. La unua estas komedio pri valoro de la honesteco en la burĝa socio, kaj la dua popularlingve pritraktas la vivon de la havenlaboristaro.

Li tradukis ankaŭ romanon, „*La naŭzo*“ de Jean-Paul *Sartre* en 1963, pri kies ekzistadisma filozofio povas esti dubo, sed la majstreco de la traduko estas senduba.

En 1964 denove J.P. *Sartre*-tradukaĵoj aperis de li en libroformo; ĉifoje du ekzistadismaj dramoj, la

„*Sen eliro*“ kaj „*La respektema p...*“, kiujn kun granda sukceso plurfoje ludis IAT dum UK-oj. La temo de la unua: por ekzisti oni devas elekti ian vivstilon, dum la dua estas satiro kontraŭ komfortemuloj.

R. *Bernard* kontribuis ankaŭ al la lasta eldono de la „*Parnasa Gvidlibro*“ kaj kune kun G. *Waringhien* komunikis rimvortaron „por ĉiu versamanto kaj aspiranta poeto“. Gravan lokon okupas en la laboro de R. *Bernard* ankaŭ aliaj teatraĵo-tradukoj, de Jean *Cocteau*, Paul *Geraldy*, Jules *Romains*, ktp. Kelkaj el tiuj estis luditaj en E ĉe la Franca Radio; la monologo de *Cocteau* „*La homa voĉo*“ plurfoje, la „*Bela indiferentulo*“ en *Madrid* (1968) estis luditaj ankaŭ dum E-kongresoj.

En la prezentado de la franca literaturo gravan rolon havas ankaŭ Paul *Lobut*, kies tradukaĵoj aperis en diversaj E-revuoj. Li tradukis la posthuman prozpoeman volumon de *Baudelaire*: „*La spleno de Parizo*“ (1967).

h./ GDR KAJ GFR

Ne multas tradukoj el la germana literaturo post la milito. Menciindaj estas „*Brulanta sekreto*“ (1949) de Stefan *Zweig* en la traduko de K. kaj P. *Schwerin*, „*La karnavalo kaj la somnambulino*“ de K.L. *Immermann*, tradukita de A.E. *Wohlthat* kaj aperinta en la jaro 1952. En 1969 sekvas „*Kantoj kaj romanoj*“ de *Heine*, grandioza verko jam menciita. Lastatempe aktiviĝis eldona aktiveco en GDR, kaj ties frukto estas

apero de du ampleksaj romanoj, ambaŭ en la traduko de Karl Schulze: „*Nuda inter lupoj*“ (1974) de B. Apitz kaj „*Trigroŝa romano*“ (1977) de B. Brecht.

ĥ./ HINDIO

Probal *Daŝgupto* sub titolo „*Primico*“ (1977) majstre tradukis kvindek poemojn de la mondfama, nobelpremiita R. *Tagore*.

i./ HISPANIO

Josep *Ventura i Freixas* tradukis el la kataluna la romanon „*Soleco*“ (1967) de la fama verkistino Victor *Català*.

Al la prezentado de la hispana literaturo en Esperanto plej grave kontribuis Fernando de *Diego*. Lia traduko „*La lando de Alvargonzález*“ de Antonio *Machado* aperis en 1969. Ĝin sekvis en 1971 la „*Cigana romancaro*“ de Federico *García Lorca*, en lia unuaranga traduko. „*Kun sopira koro*“ de Gustavo Adolfo *Bécquer* aperis en 1972. Ĝi estas nur parto el la hispana originalo „*Rimas*“. Notinde estas, ke K. *Kalocsay* tradukis tri poemojn el la „*Rimas*“ en sia „*Eterna bukedo*“. En la sama jaro aperis en la traduko de F. de *Diego* „*La Arbo de Sciado*“, filozofia romano de P. *Baroja*. „*Doña Barbara*“ estas unu el la plej fa-

maj romanoj de la Latin-Amerika (Venezuela) literaturo, verkita de Rómulo Gallegos. Ĉi tiu volumo aperis en lia traduko en 1975. Lia plej grava tradukverko estas „*Don Quijote*“, aperinta en 1977. Li havas manuskripte tre valoran disertaĵon pri la tradukarto: versajne ĝi eldoniĝos en 1978.

J./ HUNGARIO

La dua eldono de „*La Tragedio de l'Homo*“ de Imre Madách, en la traduko de Kálmán Kalocsay (1965) estas tralaboro de la malnova traduko el 1924, kaj ĝi bone spegulas la detiaman lingvoevoluo. La ĉefverko de la hungara literaturo iĝis ĉefverko ankaŭ en Esperanto.

Cetere en 1966 esperige komenciĝis la libroeldonado en Hungario, kiu en 1977 plene disvolviĝis. Aperis — inter aliaj — la ĉarma bestromano (kun belaj ilustraĵoj de Pál Csergezán), *Vuk* (1966) de István Fekete, laŭ traduko de Margit Leszkó; la politike interesa romano pri la lastaj dudek jaroj de hungara vilaĝo, la „*Dudek horoj*“ (1966), de Ferenc Sánta. La romanon kolektive tradukis, V. Benczik, I. Botos, L. Somlai, kaj L. Tárkony, sub gvido de K. Kalocsay. La „*Fabeloj*“ de János Dorosmay enhavas kolekton de spritaj, interesaj kaj instruciĉaj fabeloj en bone adaptita traduko de Valeria Szabó.

Kun muziknotoj estis eldonita kolekto el popolkanotoj sub titolo „*Hungaraj popolkantoj en Esperanto*“ de d-ro Ferenc Jáki.

En 1973 aperis „*Sklavoj de Dio*“ romano de Géza *Gárdonyi* en la bonega traduko de János *Hamvai* (hungaro vivanta en Novzelando.)

Laste aperis „*La morto de la ĉielarko*“ (1977) de Endre *Ady*. Tiu ĉi volumo – eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de la poeto – prezentas elektaĵon el lia poezio kaj publicistika verkaro.

Multnombraj tradukoj el la hungara literaturo aperas sur la paĝoj de *Hungara Vivo*, ĉefe en la interpreto de V. *Benczik*, M. *Fejes*, A. *Pechan*, P. *Rados*, Zs. *Varga-Haszonits* kaj aliaj.

ĵ./ ISRAELO

O. *Ginz* tradukis la romanon de R. *Kritz*, kies titolo estas „*Freŝa mateno*“ (1967) kaj rakontas pri travivaĵoj de juda junulo, – forpelita el Aŭstrio dum la nazi-reĝimo, – al la nova patrio.

k./ ITALIO

„*La Dia Komedio*“ de *Dante*, tradukita de G. *Peterlongo*, aperis en 1963. Luksa, dulingva eldono kun ilustraĵoj de *Botticelli*. La senrimeco multe deprenas el la valoro de la traduko, precipe komparante kun la – ankaŭ formfidela – altnivela traduko de la „*Infero*“ far *Kalocsay*.

En la serio „*Oriento-Okcidento*“ de UEA. aperis en 1969 „*La Nobla Korano*“, kiun tradukis d-ro Italo

Chiussi (1919-1973). La volumo iĝis la „libro de la jaro“ en 1969.

En 1970 kun tri tradukoj sin anoncis Luigi *Minnaja*. Li tradukis de Lydia *Senes* „*Eta bukedo*“, kiu estas odo al la naturo kaj amo; de Ugo *Foscolo* „*Pri la tomboj*“. Tiu lasta estas longa poemo, unu el la juveloj de la itala literaturo. Sub titolo „*Pacon Sinjoro*“ aperis dek religiaj poemoj, el kiuj kvin estas originalaĵoj de *Minnaja* kaj kvin tradukaĵoj el la itala.

De Giovanni *Pascoli* en heksametroj li tradukis „*Thallusa*“ (1973), kiu priskribas la sorton de sklavinino en la antikva Romo.

Nepre notinda estas la laboro de Giordano *Azzi*. Li tradukis el la „*Esperanta Antologio*“ 13 poemojn en italan lingvon. La poemaro povas doni al la itallingvanoj pozitivajn impresojn pri la E-literaturo. (Ĉi tiu estas jam la dua tiaspeca iniciato en Eŭropo, por prezenti la E-poezion nacilingve. Pri la unua ni jam parolis ĉe Josip *Velebit*.) Krome estas tre bela la E-a traduko de „*Poemoj*“ de Giovanni *Pascoli* far *Azzi*.

La plej multpromesaj novaj talentoj de la itala tradukliteraturo estas G. *Pisoni* kaj N. *Rossi*, kiu lasta esperige verkas ankaŭ originale. De *Rossi* aperis en 1975 „*La doloro*“, kiu enhavas la poemojn de Giuseppe *Ungaretti*, verkitajn inter 1937 kaj 1946.

1./ JUGOSLAVIO

Kvankam la temo de lia libro plie apartenas al la popularscienco, ol la beletristiko, tamen ni devas mencii la nomon de lic. Marinko *Gjivoje* (*Ĝivoje*), kiu tra-

dukis, — pli precize reverkis — la libron de Petar *Giunio*, kies titolo estas: „*Sekretoj de la marestaĵoj*“ (1960).

En 1970 oni eldonis la dramon poemon de Petro *Petroviĉ Njegos* „*La montara krono*“, laŭ traduko de Svetislav S. *Petroviĉ*. Ĉi tiu majstroverko de la serba literaturo rakontas pri la ekstermo de la turkiĝintoj, fine de la 17-a jarcento en Montenegro.

R. *Imbert* kun *Tišljar Zlatko* tradukis la libron de la Nobel-premiita jugoslava verkisto Ivo *Andriĉ*: „*Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto*“ (1972). La libro bone respiegulas la rakontan kaj psikologian talenton de la mondfama I. *Andriĉ*.

m./ KOREO

Novan koloron kaj riĉigon signifas en nia literaturo la apero de du tradukitaj verkoj el tiu fora lando.

Laŭ traduko de *Cho Sung Ho* sub titolo „*Koreaj rakontoj*“ de *Cunhjang*, en 1975 aperis tri rakontoj en modesta volumeto. Ĝin sekvis en 1976 „*Elektitaj siĝoj de Nosan*“, kiun tradukis en Esperanton G. *Taekeng*. La cent „*siĝoj*“ (kantoj el Oriento) estas inspiritaj de la patriamo, naturo kaj la vivo.

n./ NORVEGIO

Elstaras el la postmilita tradukliteraturo „*Peer Gynt*“ de H. *Ibsen* (1951). La tradukinto, E. A. *Hau-*

gen, glate venkis la malfacilaĵojn de formfidela reproduktado de ritmo kaj rimo, dotinte E-n per inda interpreto de ĉefverko.

Sub titolo „*El propra kaj fremda*“ (1971), de H. A. Rosbach aperis kolekto de prozo kaj poezio, parte originale verkita, parte reverkita kaj parte tradukita precipe el norvegaj aŭtoroj.

o./ POLLANDO

Pola eldonejo aperigis „*Quo Vadis*“ de *Sienkiewicz* en la klasiklingva traduko de Lidja Zamenhof (1957) reeldonis „*La Faraono*“ de B. Prus (1957), tradukita de Kazimierz Bein kaj „*Sinjoro Tadeo*“ (1955) de *Mickiewicz* en la traduko de A. Grabowski.

Apartan mencion meritas la originale pollingva Zamenhof-biografio de Maria Ziolkowska sub titolo „*Doktoro Esperanto*“; ĝin tradukis en klasikan Esperanton Isaj Dratwer (1959).

p./ PORTUGALIO

En 1959 eldonis la „*Grupo de Admirantoj de Zamenhof*“ en Lisbono la „*Antologio de portugalaĵoj rakontoj*“, kiun redaktis Manuel Seabra.

El inter la sovetaj tradukistoj elstaras K. Gusev. Unu post la alia aperis sub titolo „*Por la Paco*“ antologi-etoj, kiujn li kompilis kaj redaktis kun V. *Samodaj* kaj I. *Ĥoves*. En 1965 sub titolo „*Versoj elektitaj*“ aperis poemvolumeto de Sergej *Jesenin*. La poemojn de la volumeto krom Gusev tradukis Hilda *Dresen*, I. *Ĥoves* kaj S. *Rublov*. Same sub lia gvido estis eldonita en 1964 „*Elektitaj versaĵoj*“ de la fama rusa poeto, *Lermontov*. Sub titolo „*Bone*“ (1967) Gusev tradukis longan poemon de *Majakovskij*, kaj en 1968 aperis lia alia tradukvolumeto „*Liriko*“, kiu enhavas tradukaĵojn el la poemoj de F. *García Lorca*. Simile Gusev estis la tradukinto de la poemkolekto de Lesja *Ukrainka*, „*Liriko*“ (1971). La poemojn kompilis Nadia *Andrianova*, la konata soveta esperantistino, esploranto de la vivo de V. *Eroŝenko*.

Petro *Poliščuk* el la uzbeka lingvo tradukis tri volumetojn: „*La kaŝmira kanto*“ (1967) de Ŝaraf *Raŝidov*, – la poemojn de Aliŝer *Navoi* (1968), kiu estis granda pensulo kaj poeto dum la mezepoko, – kaj la longan poemon „*Zejnab' kaj Aman*“ de Hamid *Alimĝan* (1968).

El la volumo de la elstara estona verkisto Juhan *Smuul*: „*Letero el la vilaĝo de obstinuloj*“, H. *Tulve* tradukis unu novelon, kies titolo estas „*Ŝippereo*“ (1968). V. *Samodaj* kun E. *Ostrofnikova* tradukis „*Du noveloj*“ de Arkadij *Gajdar* (1969).

Eldoniĝis en la Estona SSR la novelaro de la konata estona verkistino Lili *Promet*: „*Kuŝanta tigro*“ (1971) en la bonega traduko de Alma *Lekko* kaj

„Okupacio“ de merita estona verkisto Erni Krusten, operantigita de Hiller Saha (1972).

8./ VJETNAMIO

En Vjetnamo ĝis la liberiga milito aperis la revuo „Vjetnamo Antaŭenmarŝas“. En tiu tempo estis ankaŭ konsiderinda libroeldonado el tradukaĵoj. La plej gravaj el ili: de Quang Loi „Sude de la 17-a paralelo“, kiun tradukis Minh Kinh Nguyen (1960); „Pro unu bovino“, novelkolekto de diversaj Vjetnamiaj verkistoj, kiun tradukis la E-klubo en Hanojo (1962); Huu Mai „La lasta altaĵo“, laŭ traduko de multaj Vjetnamaj esperantistoj (1963) kaj „La morto de Jankio“ (1964), kolekto de rakontoj de ses aŭtoroj, en kolektiva traduko. Tiuj verkoj temas pri kontraŭfranca kaj kontraŭusona batalo.

„La geedzoj A Fu“ de Hoai To estas la traduko de Minh Kinh Nguyen (1960) kaj kune kun Minh Tung Nguyen li tradukis „Surtera Infero“ de Xuan Tram Nguyen (1961). Al ĉi tiu libro verkis postparolon Isabelle Blume.

En la traduko de Anh Ka Dao oni eldonis „Elektitaj poemoj“ de revolucia poeto Huu To en 1964. „Tagkajero en prizono“, la verko de Chi Minh Ho el la ĉina lingvo estis tradukita de Anh Ka Dao, en 1966.

Unu el la plej bonaj Vjetnamaj militromanoj aperis en 1964, kies verkisto estis Phuong Ho kaj la titolo de la romano: „Kan Lik“. La romanon, kontraŭ kelklo-

kaj ŝablonaj karakterizoj, trafenetras nature freŝa tono, kelkfoje iom naivaj, ĝuste tial ĉarmaj. Bedaŭrinde pri la tradukinto nenie troviĝas indiko. Alia bona novelkolekto de Sang *Nguyen* parolas pri la terura Vjetnama milito kaj havas la titolon „*La drinkejo de l' mutulo*“ (1969). La scenejo de la okazintaĵoj estas la delto de la rivero Mekongo, kie la loĝantaro sinofere reagis al la kruelaj maljustaĵoj kaj perfortoj de usonanoj kaj iliaj lakeoj.

Nuntempe aperintaj signifaj vjetnamaj verkoj estas „*La bambufluto*“, kolekto de naŭ tradukitaj noveloj de diversaj aŭtoroj, kaj „*La foraj steloj*“, novelaro, entenanta 12 novelojn de naŭ nuntempaj vjetnamaj aŭtoroj (1974).

METODIKO

ENKONDUKO

1.5. *Metodo estas sistema kombinado de rimedoj kaj procedoj por atingi difinitan celon.* La metodo rilatas ĉiam al konkreta situacio kaj dependas ĉiam de konkretaj faktoroj. *Absoluta*, ĉiam — kaj ĉie — valida *metodo ne ekzistas*. Ekzistas nur pli aŭ malpli ĝenerale validaj principoj, rimedoj kaj procedoj.

La instrumentodon de iu studobjekto *difinas*:

a/ *la celo* de ĝia instruado — KIAL?

b/ *la karaktero* de la studobjekto kaj ĝia materialo — KION?

c/ *la formo* de la instruado kaj la konsisto de la lernantaro — KIUJN?

2.5. *La celo de E-instruado*

Dum la instruado de E ni klopodas atingi *praktikan kaj edukan celojn*.


La praktika celo de E-instruado estas: *elformi* en la lernantoj *la kapablon paroli* la lingvon, t.e. produktive uzi ĝin por transdoni kaj transpreni informaĵon kaj skribe kaj parole.

La eduka celo de E-instruado estas *elformi* en la instruatoj dum la instruprocezo tiujn *karaktertraĵojn*, kiuj karakterizas la esperantismon, kiel koncepton.

E, kiel studobjekto, devas kontribui al tiuj *ĝeneralaj popolklerigaj celadoj* en kies kadroj ĝi okazas. Krome,

laŭ siaj specifaj ecoj, E povas akcentite kontribui al la efektivigo de kelkaj *partikularaj* celoj. Ekzemple: estante lingvo internacia ĝi emfaze taŭgas por la edukado al internaciismo, al internacia interkomprenigado. Estante *neŭtrala* – ĝia instruado ebligas la edukadon al la reciproka estimo de nacioj, *taksi egalaj ĉiujn naciojn*. Laŭ sia esenco estante pacama, E perfekte taŭgas *eduki la pacamon*, konduki al la pacakunckzistado de diversaj nacioj.

3.5. Laŭkaraktere E estas lingvo, sekve la principoj de ĝia instruado kongruas kun la ĝeneralaj principoj de la lingvoinstruado. Elirante el la plej ĝeneralaj, la *principoj ĉiam konkretiĝas* laŭ la skemo:



La sistemo de instrumentodaj principoj en nia kazo sekvas la vicon: lingvo → fremda lingvo → vivanta fremda lingvo → internacia lingvo, fremda, vivanta.

4.5. *La formo de la instruado* povas esti tre diversa. La plej grava estas *la lerneja instruado*.

La enkonduko de E en lernejojn dekomence estis unu el la plej gravaj taskoj de la movado. Jam dum la Unua UK en 1905 Edmond Privat proponis ĝin kaj eniris en la tagordon kiel *la 4-a punkto*. Ĝis la unua mondmilito oni enkondukas la instruadon de E *sporade* en la plej diverslandajn lernejojn. *Post la mondmilito*, en 1922, (la 18-an de aprilo) *la Ligo*

de Nacioj kunvokis la reprezentantojn el ĉiuj land-membroj por diskuti la problemon: „*La lerneja instruado de E*”.

La konferenco sendis siajn favorajn proponojn al la Estraro de Ligo de Nacioj. Post longaj diskutoj *venkis la franca* starpunkto, kiu kontraŭis la enkondukon de E en la lernejojn (18 voĉoj kontraŭ 8) kaj fine oni decidis transdoni la aferon al la Komisiono pri *Intelekta Kunlaborado*. Finfine *la Komisiono* ne proponis la enkondukon de E en la lernejojn, sed *konsilis* al la Ligo de Nacioj *atente sekvi* la evoluadon de E, „kies uzado efike povus helpi la efektivigon de la morala unueco de la homaro, se ĝi ĝenerale disvastiĝus”. 30 jarojn poste preskaŭ samenhavan Rezolucion akceptis *la Unesko-konferenco en Montevideo*: „La Ĝenerala Konferenco. . . (IV. 1. 4. 4223) Notas, ke pluraj Ŝtat-Membroj informis pri sia preteco *enkonduki* aŭ ampleksigi la *instruadon de E en siaj lernejoj* aŭ *superaj edukaj institucioj*, kaj petas tiujn Ŝtat-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj, atingitaj sur tiu kampo, . . .”

Nuntempe en la plejparto de la ŝtatoj E estas *instruebla en lernejoj*, precipe kiel *nedeviga, kromprograma, libervole elektita*, studobjekto.

Nuntempe la enkonduko de E en lernejojn kaj ĝia oficialigo formas la ĉefan taskon de UEA kaj de ILEI. En sia statuto ILEI formulas: „unuigi ĉiujn instruistajn E-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de E en ĉiuspecajn lernejojn, kaj organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj de la monda E-instruistaro rilate la plibonigon kaj modernigon de E-instruado.”

Grandan antaŭenpuŝon povas doni al la afero la konkludo de la III-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de E en la lernejojn (Maribor, 1970. 03. 27-28.), kies duan paragrafon ni citas laŭvorte:

„... la Konferenco instigas al la daŭrigo de la instruado en ĝisnunaj formoj kaj en la celo de plua evoluigo de E-instruado proponas al la kompetentaj lernejoj instancoj de la ŝtatoj Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio enkonduki eksperimente devigan instruadon de E en difinita nombro de lernejoj. Estus konsilinde, ke la instruado de E komenciĝu post 4 jaroj de la elementa lerneja studado, kaj ke ĝi daŭru minimume tri jarojn.”

La Konferenco komisiis la fakan gvidadon de la eksperimento al la E-fako de la Scienca Universitato *Kötvös Loránd*, Budapest.

5.4. *La formon de la instruado* parte jam difinas la konsisto de la lernantaro: en lernejoj oni instruas ĝenerale geknabojn, gejunulojn, en la vesperaj kursoj—plenkreskulojn. La faktoroj, kiuj pleje influas la metodikon estas: la aĝo, la gepatra lingvo kaj la ĝeneralaj kaj lingvaj antaŭkonoj. Dum la organizado de studmaterialo kaj ĝia instruado oni nepre devas priatenti la aĝon, kiu, siavice difinas la kapablojn kaj la interesrondon de la gelernantoj. La plej grava faktoro estas la gepatra lingvo, kiu ĉiam ĉeestas, ĉu konscie, ĉu subkonscie dum la tuta instruprocezo. La fakto, ke la alproprigon de E antaŭas jam la regado de iu lingvo parte helpas, parte malhelpas la instruadon.

La fakto de interĝenado de lingvoj nomiĝas *interferenco*. La interferenco kaŭzas helpaĵojn (*pozitivajn*




transferojn) kaj malhelpaĵojn (*negativajn transferojn*). Estas la tasko de metodologio esplori la interferencan sistemon, konstati la pozitivajn kaj negativajn transferojn kaj konstrui la *metodologian tipologion* de la gepatra kaj instruata fremda lingvoj. La plej granda didaktika valoro de E-instruado, kiel unua fremda lingvo estas, ke ĝia alproprigo ĝisminimume reduktas la interferencon inter la gepatra kaj la dua fremda lingvoj, kreante riĉan sistemon de pozitivaj transferoj. (Precipe grava estas ĝia transfera rolo inter la ugrofinna hungara lingvo kaj iu hindo-eŭropa lingvo.)


6.s. Kiel dirite en 2.s. — la praktika celado de E-instruado estas la alproprigo de la parolo. La metodiko strikte diferencigas la *lingvon* kaj la *parolon*. La lingvo estas la materialo de la instruado, ĝi estas sistemo de konoj. La lingvon: ĝian fonetikon, gramatikon kaj leksikon oni povas lerni, sed la nura kono de la lingvo ne signifas kapablon uzi ĝin praktike. La parolo estas *sistemo de aŭtomataj kapabloj: paroli, kompreni, skribi, legi*. La kapabloj elformiĝas per daŭra, persista, konsekvenca *ekzercado*. La konoj estas rimed-karakteraj: ili plifaciligas la elformigon kaj la firmigon de la kapabloj.

LA STUDMATERIALO

7.s. La lingvo estas ampleksega, komplika kaj tre kompleksa fenomeno. „Ataki” ĝin sur ĉiuj frontoj samtempe neblas. La tasko de la metodologio estas *segmenti la materialon*, t.e. detranĉi el ĝi partojn, kiuj limigite kapablas memstare funkcii. La principon —

ned ne la proporciojn! — prezentas jena skemo:

L = leksiko 
 G = gramatiko 
 F = fonetiko 
 1,2,3,4 -lernojaroj



La lingvomaterialo, segmentita en la celo de la instruado nomiĝas „*minimumo*”: leksika-, gramatika- kaj fonetika-minimumo. La minimumoj denombrias la materialon, ekz. la *vortelemantojn*, la *gramatikafojn*. Ĉu iu elemento apartenas aŭ ne al la minimumo, estas konstatenda laŭ certaj *principoj*:

8.5. Post la segmentado de la lingva materialo sekvas la *organizado* de la segmentita materialo, t.e. la *dozigo* laŭ diversaj instruetapoj kaj la *metodika ellaborado*. La dozigo okazas en la formo de *instruprojektoj*, la metodike ellaborita materialo konkretiĝas en la *lernolibro*.

INSTRUMETODAJ KONCEPTOJ

9.5. La unua lerneja metodo, — kiu elformiĝis tiam, kiam oni komencis instrui la *latinan* lingvon en la Eŭropaj lernejoj, kaj poste, laŭ tiu modelo la aliajn,

precipe la *francan*, – nomiĝas *gramatika-traduka metodo*. En la instruado centran lokon okupas la lernolibro, (komence iu libro, ekz. la Biblio) kies tekstojn oni *legas* kaj poste *analizas* gramatike kaj *tradukas* gepatrolingven. Tio estas *la analizo*. La *inversa* procedo t.e. kiam *unue* oni lernas *vortojn kaj gramatikajn regulojn kaj poste surbaze de gramatikaj kaj leksikaj konoj oni kunmetas* frazojn – nomiĝas *sintezo*. La ĉefa ekzercadformo estas la tradukado, sekve, la gepatra lingvo ĉiam ĉeestas dum la instruado.

10.5. Je la fino de la XIX-a jarcento, kiam plivigliĝas la internacia trafiko, la vivo postulas jam praktikan uzon de la fremdaj lingvoj. Ne plu sufiĉas *la teoria kono* de leksiko kaj gramatiko, sed oni postulas *praktikajn rezultatojn*. En 1880 aperas la libro de Francois Gouin: „*L' art d' enseigner et d' étudier les langues*” (La arto instrui kaj lerni la lingvojn). *La bazaj principoj* estas:

1. *gravas* ne la vido, sed *la aŭdo*, sekve oni devas *paroli kaj paroligi*. La parolo estas tempa fenomeno, kies elementoj sekvas unu post alia kaj ne spaca, kun elementoj metitaj unu apud alia;
2. oni lernas iun fremdan lingvon *por scipovi komunki informajon*, sekve, la baza *didaktika unuo* estas ne la vorto, sed *la frazo*. La parolata frazo devas ĉiam antaŭi la frazon legotan aŭ skribotan. Laŭ tiuj principoj diserigas Gouin la lingvon je fraz-serioj, (t.n. „*Gouin-vicoj*”) konstruitaj laŭ strikta logika kaj kronologia sinsekvo. Tiamaniere li konstruas 50 000 frazojn grupigitajn laŭ 5 temoj:

1. la gepatra domo,
2. la socio,
3. la naturo,

4. la metioj,
5. la sciencoj.

Ekzemplo de Gouin-vico: (la lernanto agas kaj dume li diras, kion li faras).

„Mi iras al la pordo. Mi haltas ĉe la pordo. Mi staras antaŭ la pordo. Mi etendas la brakon. Mi tuŝas la klinkon de la pordo. La pordo malfermiĝas. . . ktp.”

La Gouin-koncepto jam krute diferencas de la gramatika-traduka koncepto, kvankam Gouin, en la komenca periodo uzas la gepatran lingvon por traduki kaj klarigi la gramatikajn fenomenojn.

11.5. Du jarojn post la apero de la Gouin-verko, en 1881, la germana metodikisto Wilhelm Viëter, sub la pseŭdomino „*Quousque tandem?*”^{*} publikigas sian faman verkon: „*Der Sprachunterricht muss umkehren*”^{**} kiu poste fariĝis la bazo de la nova, t.n. „*rekta metodo*”. Tiu koncepto regas tutan periodon (la t.n. reformperiodon) kaj ĝis niaj tagoj havas fortan influon.

La bazprincipoj de la rekta (senpera) metodo estas:

- a/ la forigo de la *gepatra* lingvo,
- b/ la ekskludo de la *gramatiko*-instruado,
- c/ la forigo de la *lernolibroj*.

La ekskluziva *ekzercadformo estas la konversacio*, kiu devas esti ĉiam *aktuala, vigla kaj sprita*. Oni uzas *ekzercojn de tradukado nek el – nek en gepatran lingvon*.

Kvankam la rekta metodo havas multajn pozitivajn elementojn, tamen ĝia ekskluziva apliko *ne eblas*:

* Kiom longe ankoraŭ?

** La lingvoinstruado devas returniĝi.

*instrui nekonataĵon per ne konataĵo**** estus absurda postulo.

12.ŝ. Ankaŭ la E-instruado trapasis ĉi tiujn evolu-fazojn. Novan epokon en la metodiko de Esperanto-instruado malfermis la hungaro *Andreo Cseh* (Ĉe, naskiĝis en 1895). Li ellaboris sian instruprocedon en 1920. Poste, kune kun ges. *Isbrucker* fondis en Arnhemo la *Internacian Cseh-Instituton* (poste Internacia E-Instituto). Tie oni okazigas kursojn por estontaj Cseh-instruistoj kaj eldonis monatan revuon „*La Praktiko*” (organo de Universala Ligo, fondita en 1932).

La *Cseh-metodo* estas esence *rekta-metodo*, ĉar la karakteriza situacio, en kiu oni ĝin uzas (fremdlingvano instruas al fremdlingvano) en si mem malebligas la uzon de iu komuna lingvo. Oni *ne uzas lernolibrojn, sed la gramatikon oni instruas*, eĉ sufiĉe intense.

Sed la instruado de gramatiko estas *enkadrigita en la studmaterialon* kaj oni instruas ĝin en E. Tiu fenomeno estas tute speciala kaj ĝi *troviĝas en neniu alia instrumetoda koncepto*.

Laŭ la *Cseh-metodo* oni povas atingi bonegajn rezultojn facile, amuze kaj rapide. Tamen ĝian ĝeneraligon *malhelpas: la manko de lernolibro kaj la manko de taŭgaj instruistoj*. La metodo postulas de la instruistoj tiel altajn kvalitojn, kiujn postuli ĝenerale ne eblas. Tamen, kiel la plej alta grado de E-instruado restas ĉiam modelo por la E-instruistoj.

13.ŝ. La bazprincipoj de *Cseh-metodo* estas (laŭ Enciklopedio de E, I-a volumo, p. 87.):

1. *neuzado de nacia lingvo*, klarigado de novaj vortoj per la jam instruitaj,

*** Latine: „Ignotum per ignotus”

2. *neuzado de lernolibroj,*
3. *komuna ĥora respondado* de la kursanoj,
4. aplikado de *konversacio* pri aktualaĵoj, anstataŭ uzado de lernejecaj ekzemploj,
5. *riĉa apliko* de humuro kaj ŝercoj,
6. instigado al tio, ke la lernantoj *mem eltrovu* la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruas gramatikan sistemon. *La devizo* estas: „forte, kuraĝe, kaj elegante”.

Andreo Cseh jene klarigas sian koncepton:

La kursmaterialo estas mezurita por elementa kurso, do ĝi entenas la elementan gramatikon kaj celas kapabligi la kursanojn al simpla konversacio pri la plej necesaj ĉiutagaj aferoj. La celo estas ebligi al la publiko, ke ĝi povu *post du-tri monata* lernado vere uzi la lingvon en korespondado kaj parolo. Tamen, oni ne ŝarĝu la lernantojn per multe da vortoj. La ampleksigo de la vorttrezoro restu tasko de la praktiko mem. Fari sporton el instruado de vortoj estas sensenca laboro: verŝi akvon en senfundan barelon. Anstataŭ tio mi preferas igi la lernantojn por esprimi siajn pensojn en simpla maniero, kaj okaze de malhavo de necesa vorto per *ĉirkaŭskribo*.^{*} Tiamaniere la kurso utilas ankaŭ kiel ekzercado de pensado.

La metodo estas kombinaĵo de la gramatika kaj de la rekta metodoj, konforme al la specialaj ecoj de E. Dum kiam en la naciaj lingvoj *la gramatiko* estas labirinto konfuziga, *en E ĝi estas tiom klara, ke ni tute ne bezonas eviti ĝian instruadon.* Male: la instruado de E devas esti gramatika. Tial mi ordigos la instruatajn gramatikaĵojn en ne sistema sinsekvado gra-

^{*} t. n. besic (bazik)-principo

digita . . . Dum la kursoj ni ne donas la oficialajn nomojn de la gramatikaj elementoj. Efektive ili neniom utilas kaj mi opinias, ke tio povas resti tasko de la komenco de la daŭriga kurso. . . Mi klopodas konduki la lernantojn, ke ili *mem eltrovu* la solvon de gramatikaj problemoj kaj ili *mem konstatu* la regulon. La efiko de tia procedo estas, ke la lernanto streĉas la atenton kaj pensadon, ĝojas pri sia eltrovo kaj tiu travivaĵo utile servas la komprenon kaj memoron. Mi ne faras komparon inter la reguloj de E kaj aliaj lingvoj, ĉar tio malofte utilas, ofte malutilas pro la kaprica malordo en la nacilingvaj gramatikoj. Aliflanke, la rekta metodo donas grandajn avantaĝojn: la tujan parolan uzon de la lingvo, instigon pensi en la lernata lingvo, bonan kaj facilan perceptadon pro demonstrado ktp. Cseh volis profiti la avantaĝojn de ambaŭ metodoj per kombinado.

La konversacia formo ludas gravegan rolon kaj ĝi servas la devizon: *paroligu la lernantojn*. Ni klopodu, ke la kursanoj parolu pli multe, ol ni mem dum la lecionoj.

Kuna respondado havas du utilojn: unue, ĝi *kuraĝigas* tre modestajn personojn al respondado; due, ĝi *ŝparigas* multan tempon, kiun bezonas la individua demandado. Ĉe la sistemo de kuna respondado povas partopreni en unu kurso *grandnombra* lernantaro. Tamen – kompreneble – oni aplikas ankaŭ individuan demandadon de tempo al tempo.

La nacia lingvo ne estas uzata en la kurso. Nur *en la komencaj lecionoj* la instruisto bezonas la helpon de tradukisto plie por rompi la eble enuigan monotonecon de la gramatikaĵoj. La nacian lingvon oni uzu nur ĉe ekstrema neceseco. Ĝia uzado povas esti tre utila

ekster la leciono, precipe, ĉe la publika korektado de la hejmaj laboraĵoj.

Fremdlanda instruisto estas tre grava utilaĵo. Ne nur el la reklama vidpunkto, ĉar fremdulo estas ĉiam pli alloga, ol samlandano, sed ankaŭ pro tio, ke la lernantoj tuj, de leciono al leciono havas la ĝojigan kontentecon, ke ili povas jam per la lernata lingvo interkompreniĝi kun alinaciano. Do la lernantoj tuj travivas la praktikan utilecon de la lingvo kaj ricevas bonegan argumenton pri la uzebleco de E inter diversanacianoj. Aliflanke la instruisto mem gajnas el tia situacio, ĉar la manko de komuna nacia lingvo devigas lin pli atente kaj energie labori.

Sen lernolibro okazas la kursoj pro du gravaj kaŭzoj: unue, ĉar entuziasmaj lernantoj ofte *antaŭlernas* kaj per tio ili aŭ konfuzas sin mem, aŭ ĝenas la progresadon de la aliaj. Due, ĉar la lernolibro ofte kutimigas al malordo. Bela vetero, interesa filmo aŭ societo facile forlogas la lernanton de la leciono, ĉar li ja povas relerni la lecionon hejme el la libro. Dum la leciono la sama preteksto tentas al distriĝo. Sed ne havante libron oni devas regule viziti la kurson kaj streĉi la atenton.

Kapti la atenton — jen la ĉefa tasko de la instruisto, ĉar ĝi estas la ĉefa kondiĉo de la sukceso. *Instrui neatentantajn homojn egalas skribi sur akvon*. Sed *teni plenan atenton* dum la lecionoj estas tre malfacila tasko. La lecionoj okazas vespere, la lernantoj estas lacaj pro la tuttaga laboro. La instruisto devas esti preskaŭ sorĉisto por ligi sian lernantaron. *Severeco*, rigida disciplinado, perforta streĉigo de la atento *ne helpas*, sed eĉ malutilas. La sola helpo estas: lerte cluzi psikologiajn faktorojn. Tial mi elektis la jenan

regulon: *ligi ĉiun instruadon al agrabla, amuza travivaĵo*. Tiamaniere ricevitan instruadon oni firme fiksis kaj tenas en la memoro kaj la instruisto skribas ne sur akvon, sed ĉizas en ŝtonon. *Anstataŭ seka lingvokurso ni faru agrablan konversacion* kun allogaĵoj, dum kiu la partoprenantoj senkonscie, ofte eĉ kontraŭvole lernas. Se ekzistas modernaj kuracistoj, kiuj sanigas per rido, ni ne timu provi *instrui per rido*. Ties pruvo estas nia kurso kaj se oni serĉas por ĝi ĝustan adjektivon, tiam ĝi devas esti proksima al la vorto „psikologia”. Ĉiu laboranto kun homoj – do ankaŭ la lingvoinstruisto – plej prudente agas, se li klopodas ekkoni la homan psikon kaj se li poste uzas tiun konatan psikon kiel fundamenton por la konstruado.

Hejma laboraĵo estas laŭvola. Por eviti la impreson pri lernado ni uzu demandarojn. La respondado estas pli amuza, ol laboriga, tamen ĝi devigas al la praktikedo de multaj gramatikaj aferoj. El la respondoj oni povas kompili statistikon, utiligeblan por kursfina amuzo.

Kelkaj *konsiloj* de *Andreo Cseh* al la instruantoj:

1. En la kurso la plej grava estas *la persono de la instruisto*. *Li povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la plej bonan*. Tial klopodu regi vin kaj vian laboron kaj fariĝu majstro en via fako.
2. *Ne rapidu* en la instruado! Tio tute ne helpas. Se ne restas sufiĉa tempo, prefere forlasu partojn, precipe negravajn rakontaĵojn.
3. *Preparu vin* bone al ĉiu leciono, por ke vi estru la materialon kaj lernantaron.
4. *Ne donu tro grandan materialon* en unu leciono,

ĉar la cerbo bezonas tempon por digesti, same kiel la stomako.

5. Dum la lecionoj *parolu malrapide kaj tre klare*. Haltu inter la frazpartoj, por ke la vortoj ne kunfluu. *En la parolo oni ne povas vidi la distancojn inter la vortoj*, kiel en la skribo. Per lerta kaj agrabla, sed ne tro aktoreca modulado de la voĉo por la enhavo de viaj diraĵoj.
6. Faru nur tiajn *demandojn, je kiuj oni povas doni certan respondon*. Postulu ĉiam *kompletan respondon, ne akceptu nur „jes” kaj „ne”*. La celo de la metodo estas *ĝuste la paroligo* de la lernantoj.
7. Komencu ĉiun lecionon per kelkaj demandoj, kiuj *ripetas* la materialon de la lasta leciono.
8. *Koloran kreton* uzu por atentigi pri novaj gramatikaĵoj.
9. *Decan bonhumoron, ŝercojn apliku inter pripensitaj limoj*. Nobla gajeco origu vian laboron. Zorge evitu demandon aŭ aludon, kiu povus ofendi aŭ ĝeni iun. Faru vian laboron elegante por imponi.
10. Vivigu vian tutan laboron *amo al E kaj amo al viaj lernantoj*. Tiam vi brile sukcesos kaj niaj konsiloj estas superflujaj.

14.9. La plej *granda valoro* de la Cseh-metodo estas la konsekvenca *organizado de la studmaterialo*. Jen kelkaj variantoj pri la komencoj de la kursoj: *La varianto*: La instruanto desegnas punkton kaj skribas

	.	<u>punkt-o</u>
el punkto faras komon	,	<u>kom-o</u>
el komo faras cirklon	o	<u>cirkl-o</u>

aldonante novan komon vi ricevas pomon

9 pom-o

Oni *substrekas per kolora kreto* la radiko-n kaj samtempe diras „radiko”, poste, substrekante ĉiujn „o” oni diras: „per -o substantivo”. Sekvas la streketo: kvadrato, triangulo kaj iliaj kombinaĵoj: grandaj kaj malgrandaj, el ili oni desegnas katon, hundon, birdon, per kolorkreto oni instruas la kolorojn, per koloroj florojn, herbon, arbon ktp.

2-a varianto: KIO—TIO. La instruanto montras la ĉirkaŭantajn objektojn kaj diras: „*Tio estas lampo. Tio estas kreto. Tio estas tabulo*”. Poste li demandas: „*Kio estas tio?*— montrante samtempe la objekton. Poste li metas la kreton sur la tablon kaj demandas: *Kio estas sur la tablo?* Post bona respondo li prenas de la tablo la kreton kaj demandas: *Kio estis sur la tablo?* (-AS, -IS).

3-a varianto: per internaciaj vortoj: Li elektas internacie konatajn vortojn, ekzemple: telefono, aparato, biciklo, vagono, lampo, benko ktp. kaj per ili faras frazojn kaj demandojn.

4-a varianto: varianto de interkonatiĝo. Enirante la instruanto diras: Saluton! „Mi estas sinjoro X”. Post kelkfoja ripeto li iras al iu sinjorino kaj diras: „Mi estas sinjoro X, vi estas sinjorino X”. Same: viro-virino, fraŭlo-fraŭlino”. Unua gramatikaĵo: -IN-, MI, Estas, VI, sekvas: Li-Ŝi — montrante iun: Li estas sinjoro Z, ŝi estas sinjorino W ktp. Poste la pluralo: Ili estas sinjoroj, ili estas sinjorinoj.

Poste: Kiu estas vi?

„La sekreto de la sukceso estas: paroli kuraĝe, kaj elegante. Sed ne sufiĉas diri nur la *nomon*. Mi devas

diri ankaŭ la *profesion*.”

- .. Mi estas profesoro.
- .. Kio estas mi? — Vi estas profesoro.
- .. KIU? = Petro Kovács.
- .. KIO? = profesoro.

Poste la instruanto demandas ĉiun aparte: Kiu estas vi?

Kio estas vi?

„*En la hispana lingvo estas interesa kutimo. Kiam oni skribas demandan frazon, oni metas signon ne nur al la fino, sed ankaŭ al la komenco. Rigardu*” (oni montras hispanlingvan tekston): ¿. En E la renversitan demandsignon oni povas legi: ĈU.

Ĉu mi estas profesoro? — Jes (Oni demandas ĉiun lernanton).

Ĉu mi estas lernanto? — Ne, vi ne estas lernanto, vi estas profesoro.

La materialo konstruiĝas jene:
profesioj, LI, Ŝi, sed; („Li: sinjoro, Ŝi: sinjorino”)
„Ne estas ŝi, ne estas li, sed ĜI (Ĝi estas seĝo)
Klasaj mebloj (La): *La seĝo* estas meblo.

La adjektivo: La kreto estas *blanka*.

Je la fino de la unua studhoro la instruanto surskribas sur la tabulon la salutojn: Bonan matenon, tagon, vesperon, nokton, apetiton. Dankon! Ĝis revido!

Jen kelkaj karakterizaj ekzemploj pri la instruado de *gramatiko*:

Pluralo:

Kio estas ĝi? Ĝi estas kreto.	kreto	1	
Kio estas ĝi? Ĝi estas kreto.	+ kreto	1	
	<hr style="width: 100px; margin-left: auto; margin-right: 0;"/>	kreto	1

Ĝi estas matematiko!?

Kreto kaj kreto estas kreto?

Unu kaj unu estas unu? !

Malbona matematiko!

$$\begin{array}{r} \text{kreto} \quad 1 \\ + \text{kreto} \quad 1 \\ \hline \end{array}$$

kretoj 2 = estas du
kretoj.

Kio estas la *bona matematiko*?

Unu kaj unu estas du.

Kreto kaj kreto estas kretoj: du kretoj.

$$\begin{array}{r} \text{Blanka kreto} \quad 1 \\ + \text{Blanka kreto} \quad 1 \\ \hline \end{array}$$

Blankaj kretoj 2

$$\begin{array}{r} \text{verda kreto} \quad 1 \\ + \text{verda libro} \quad 1 \\ \hline \end{array}$$

2 ?

Ĉu verdaj ĉokoladoj?

Ne! Verdaj kreto kaj libro.

Akuzativo: Li enkondukas per rakonteto:

„Mi rememoras pri *interesa epizodo*. Antaŭ kelkaj jaroj mi instruis en Bukareŝto. Bukareŝto estas la ĉefurbo de Rumanio. Estis tie afabla fraŭlino. Post la tria leciono la fraŭlino forlasis la kurson. Mi demandis ŝian amikino: kio estis la kaŭzo? La amikino diris: Ho, ŝi estis tre malkontenta. Ŝi plendas, ke la kurso estas tre seka kaj malinteresa, ĉar la profesoro instruas nur la vortojn: tablo, muro, fenestro, lampo. Sed ili tute ne estas interesaj vortoj. La respondo konvinkis min, ke mi devas meti en la kurson pli interesajn vortojn. Sed kiuj vortoj estas interesaj? Por trovi ilin mi komencis la observadon. Ofte okazis, ke oni petis de mi vortaron. Mi donis vortaron kaj ili serĉis en la vortaro. Mi atente observis, kiu vorto estas la unua, kiun ili serĉis en la vortaro. Kaj mi konstatis, ke tiu

unua vorto estis ĉiam la sama:

amas (skribas sur la tabulon). Mi tuj metis ĝin en la kurson. Kaj efektive, de post tiu tempo neniu fraŭlino forlasis la kurson. Sed ankaŭ la sinjoroj ne forlasis la kurson! Rigardu! Sur la tabulo staras la plej interesa vorto. Sed ĝi estas sola. Tio ne estas bona. Rigardu! Antaŭ ĝi kaj post ĝi estas liberaj lokoj.

La laboristo *amas*. Kiu *amas*? La laboristo *amas*. Sed estas ankoraŭ libera loko!

La laboristo *amas* la oficistino.

Ĉu ĝi estas bela frazo? Jes, ĝi estas bela frazo.

Instruisto skribas sur tri paperpecetojn la vortojn: „*La laboristo*”, „*amas*”, „*la oficistino*”, kaj ĵetas ilin en ĉapelon, - kirlas, poste proponas al la lernantoj alpreni po unu. Formiĝas du frazoj. Oni skribas, ilin sur la tabulon):

La laboristo *amas* la oficistino.

La oficistino *amas* la laboristo.

– Kio estas nur la tabulo? – Sur la tabulo estas du frazoj.

– Ĉu la frazoj estas bonaj? – Jes, la frazoj estas bonaj.

– Ĉu la frazoj estas egalaj? – Ne! Ne!

„La du frazoj estas egalaj, sed ili ne estas bonaj. Estas fatala miskompreno! Sed en E estas malgranda, sed tre utila kaj grava litero. „n”. Ĝi staras ĉiam post la objekto de la ago. Ĝi klarigas la frazojn. Ni vidu! (-n per ruĝa kreto):

La laboristo *amas* la oficistinon.

La oficistinon *amas* la laboristo.

Ĉu vi scias – kiu *amas*? – Jes, nun ni scias: la laboristo.

Se ne estas litero „n”, mi ne scias, kiu *amas*!

Nun mi ŝanĝas la lokon de litero „n”.

La laboriston amas la oficistino.

Ĉu vi scias, kiu amas? — Jes, la oficistino.

Same: Li amas ŝi. — Ĉu klare? — Ne!

Li amas ŝin. Kiu? — Li. Kiun? — Ŝin.

Lin amas ŝi.

Poste oni ekzercas la akuzativon per la helpo de la verboj: Tuŝi, montri, fari . . .

La vortdifinoj estas ĉiam tre trafaj kaj ŝercaj: Kion signifas „atentas”? — Li malfermas la fenestrojn kaj la longajn pordojn (t.e. la okulojn kaj la orelojn); Kion signifas „legas”? — Ŝi rigardas la vortojn kaj komprenas ilin.

— „La malbona lernanto ne atentis. Ĉu la instruisto estas feliĉa? Ne, sed malfeliĉa. Kion faras li? Li prenas unu *meblon*, longan kaj maldikan sed fortan meblon, la pedagogian meblon kaj li batas la malbonan lernanton.”

Ankaŭ dum la komuna korektado de taskoj oni agas same. Jen ekzemplo: La erara frazo estas: „Via okuloj estas nigra? Ĉu estas bona la frazo? Ne. Ĝi signifas: ŝi havas du okulojn, sed nur unu apartenas al ŝi kaj unu estas nigra”.

15.5. Dum la evoluvojo de metodiko la esploris-
toj konvinkigis, ke neniu „ekskluziva” metodo taŭ-
gas. Por konstrui efikan metodikan sistemon oni devas elekti la pozitivajn elementojn de ĉiuj antaŭaj kon-
ceptoj, sistemigi ilin laŭ certaj principoj kaj tiamaniere elformi science motivitan kaj pruvitan instrumetodan
sistemon.

Tiuj sistemoj nomiĝas *elektantaj metodoj*. Kiel ni vidis en la antaŭaj §-oj, ankaŭ la *Cseh-metodo* estas

elektanta. La diversaj variantoj de la elektanta metodo diferenciĝas laŭ la kombino de diversaj elementoj, laŭ ilia proporcio. Dum la lasta tempo krute ŝanĝiĝis la lingvistika koncepto kaj ĝenerale la sciencaj esplor-metodoj dank' al la cibernetiko. En lingvistiko kaj poste en lingvometodiko aperis la klopodo esprimi ekzakte kvazaŭ-matematike la opajn fenomenojn. Samtempe kapturnige evoluas la tekniko kaj liveras novajn kaj modernajn aparatojn, instalaĵojn, uzeblajn ankaŭ en la lingvoinstruado. Fine, la internacia trafiko atingis tiajn mezurojn, ke la bezono de fremda lingvo urĝegas la instruistojn atingi rapidajn kaj tuj praktikeblajn rezultojn. Observante tiujn faktorojn *elformiĝis* la plej moderna varianto de la elektantaj metodoj la t.n. KA-metodo (la inicialoj de „Kompleksa”- „Aktiva”).

16.5. *La KA-metodo* efektive estas *la modernigo* de CSEH-metodo, tamen havas kelkajn tute specifajn, partikularajn principojn. La bazprincipoj de KA-metodo estas la jenaj:

KA metodo

- a/ *uzas ekzaktan metodon*, en la planado de la studmaterialo laŭ matematike esprimeblaj parametroj sistemigas ne nur kvalite, sed ankaŭ kvante la studmaterialon;
- b/ la gramatikan sistemon de la lingvo konstruas sur la sistemon de *strukturoj*, t.e. modeligas la lingvon, konstruante la struktursistemon de la lingvo aranĝas ilin en logika sinsekvo observante la bezonojn de la instruado;
- c/ konstruante la fundamentajn didaktikajn dokumentojn (minimumojn, instruprojektojn, struktursistemon) priatentas la eblecojn de *programita instruado*,

- t.e. organizas la studmaterialon en tia formo, ke ĝi estu taŭga ankaŭ por instrumaŝinoj;
- d/ formulante la bazajn metodikajn principojn observas la rezultojn de la *psikolingvistiko*, precipe la fenomenojn de la *interferenco kaj transferado*; la konkreta instruprogramo baziĝas sur la *science ellaborita metodologia tipologio*;
- e/ dum la instruado uzas intensive la *modernajn teknikajn helpilojn* ĝis la lingvolaboratorio;
- f/ *instruas lingvon en ĝia funkcio*, t.e. kiel rimedon por *transdoni komunikaĵojn*. Tiu principo postulas *maksimuman uzon de E* dum la studhoru. La baza unuo estas ĉiam la frazo, kiel unuo de komunikaĵo. La frazo devas esti *komunikiva*, t.e. enhavi informon. Tiun postulon oni povas plenumi nur tiam, se la lingvoinstruado estas vivproksima kaj disvolviĝas en natura aŭ kvazaŭnatura atmosfero. La gepatra lingvo servas precipe kiel ilo de kontrolo, la gramatiko estas instruata funkcie (en strukturoj) kiel rimedo komprenigi kaj firmigi la kapablojn. La sekvaj 5-oj *detaligas* la opajn momentojn de *KA-metodo*.

LA INSTRUADO DE LA LINGVA MATERIALO EN KOMPLEKS—AKTIVA METODO

17.5. *La fonetiko kaj grafiko* de E ne kaŭzas *instruproblemon* por tiuj, kiuj ankaŭ en gepatra lingvo uzas latinan grafikon. Estante preskaŭ *fonetika lingvo* kaj ne havante ortografiajn esceptojn — la instruado de grafiko kaj fonetiko okazas preskaŭ *instinkte*. (Por la nacioj, kiuj uzas alian grafikon ol latinon, la E-grafiko estas la plej taŭga rimedo alproprigi la latinan

grafikon!) En la grafiko prezentas nur kelkaj facile solveblaj problemoj (ekz. la uzo de majuskloj, de skribsignoj, precipe de dividostreko kaj apostrofo, la uzo de supersignoj, ktp.)

La fonetikon oni instruas laŭ imita metodo. Tio signifas, ke la *prononco* kaj la *intonacio de la instruanto estas decida*: la lernantoj ne povas havi pli bonan prononcon, ol la instruanto! Tio devigas la instruanton esti tre severa rilate la prononcadon. Ĉar la baza unuo estas la frazo, la instruisto prononcas la sonojn ĉiam en ilia ĉirkaŭaĵo, la lernanto ricevas la akustikajn impresojn en frazo. Se, observante la *artikulacian bazon* de la lernanto (t.e. la fonetikan kaj fonemikan sistemon de la gepatra lingvo) estas E-sonoj, kiuj tre diferencas de la gepatro-lingvaj sonoj, aŭ eĉ ne estas en la gepatra lingvo, tiam la instruanto devas ilin pli intense ekzerci en vortoj eĉ aparte, kiel izolitajn sonojn.

Ni devas esti tre severaj precipe en tiu kazo, kiam la *misprononco ŝanĝas aŭ detruas la sencon de la vorto.*

En la instruado de ĝusta prononcado estas tre valoraj la *gramofondiskoj* de elstaraj esperantistoj, la *sonbendoj* de UEA*. Oni povas surbendigi la diversajn *radiodissendojn* por observi la ĝustan prononcadon.

Dekomence ni konsekvence *korektu la prononcerarojn* de la lernantoj, *sed ni atendu, ĝis li finas la frazon.* Ni alkitimigu la lernantojn legi bele kaj esprimplene la legaĵojn, paroli laŭte kaj klare. La bonan prononcadon de la lernantoj rezultos nia afabla admono kaj korekto, la necedema persisto.

* Magnetofona Servo de UEA: estas riceveblaj sonbendoj de elstaraj diversnaciaj esperantistoj kun tre valora enhavo.

18.5. *La leksiko de E konsistas el vortelementoj.* Tio estas specifa problemo por ĉiu-lingvano, ĉar en la naciaj lingvoj la leksikaj unuoj estas la vortoj. Jam dekomence ni devas elformi en la lernantoj la kapablon *instinkte kaj aŭtomate ekkoni la vortstrukturon kaj same mekanike formi vortojn el elementoj.* Tio signifas, ke la *vortstrukturon oni devas jam en la komenca stadio konsciigi:* kret-o, instru-ist-o, lern-ant-in-o.

La *instruleksiko* laŭ KA-metodo estas tiel organizita, ke en la komenca periodo oni *instruas konkretajn leksikajn unuojn* proksimajn al la situacio. *Tiuj estas montreblaj nature.* Ekz.: tabulo, kreto, benko, lernanto ktp. La natura montrado estas la plej oportuna *semantigo* (t.e. malkovro de la senco).

La vortoj aperas ĉiam en frazoj, kiuj havas konatan strukturon. (Estas ja baza principo, ke oni *instruu novajn leksikajn unuojn per konata gramatikaĵo kaj inverse.*) Kelkfoje la nova leksika unuo estas divenebla el sia kunteksto (ĉirkaŭaĵo). Se ne estas *montrebla nature* aŭ *age* (mimike), ni *montru ĝin bilde.* Jam en la komenca periodo aperas kaj poste pliiĝas tiaj vortoj, kiujn oni povas montri nek *nature*, nek *bilde*, nek *age* aŭ *mimike.* Tiam ni devas uzi aliajn rimedojn de semantigo. La unulingva (t.e. ne traduka) *semantigo* povas okazi per:

a/ *samsenca* vorto (sinonimo): ekz. *estro* = ĉefo.

b/ *parencenca* vorto: ekz. *oceano* = granda maro.

c/ *vortanalizaj difinoj*: ekz. *solvebla problemo* = problemo, kiun oni povas solvi.

d/ *difino, ĉirkaŭskribo*: *ujo* = enestas tute,

ingo = ne enestas tute,

scii parkere = scii ion, sen rigardi la tekston.

Listas ja memkompreneble, ke la vortoj, enestantaj en la unulingva semantigo devas esti jam konataj. Ekzemplojn por unulingva semantigo oni trovas abunde en la lernolibro Esperanto-2 (de Szerdahelyi) kaj en Plena Ilustrita Vortaro (PIV).

Fine, se la semantigo ne estas solvebla per demonstrado aŭ unulingva difino, ni devas ĝin *traduki*. La traduko, cetere, en opaj kazoj servas nur kiel *kontrolo*, ne ni ne estas konvinkitaj, ke la lernantoj komprenis la koncernan *leksemon*.

19.5. En la antaŭa 5 ni montris la formojn de semantigo, t.e. la prezenton de novaj leksikaj unuoj kaj la malkovron de la *sememo*. Sed la *kompreno* estas nur *la unua paŝo*. La leksemon oni devas *koni* por poste *mekanike uzi* ĝin en la parolo. De la kompreno tra la kono ĝis la kapablo gvidas la *intensa ripetado*. Por scipovi intense ekzerci la novan leksemon, la *kvanto* de pohore instrueblaj novaj leksikaj unuoj (en lernejo) ne povas esti pli ol 10 (ĝenerale 6-10) en la komenca periodo, poste tiu nombro proprocie plialtiĝas. La plifirmigon de la leksemo helpas diversaj metodikaj artifiko, ekz. trafaj frazoj, proverboj, ŝercoj, enigmoj, kantoj, versaĵoj — ĝenerale la parkerado.

20.5. *La gramatiko de E* — kontraŭe al naciaj lingvoj — estas la facila parto de ĝia materialo. Ĝia instruado kaŭzas nenian problemon. Tamen ĝia facileco ofte *bremsas* la elformigon de la mekanika parolkapablo. Tiu ŝajna paradokso originas en la falsa percepto de la fenomeno. La *kompreno kaj kono de la gramatika sistemo tute ne signifas* ĝian instinktan, *automatan praktikon*. La kompreno kaj kono de gramatiko postulas nenian energion kaj tempon. Sed

ĝia aŭtomatigo pretendas longan kaj konsekvencan ekzercadon. Kiu forgesas tiun fundamentan faktan, neniam kapablos paroligi siajn lernantojn!

La baza principo de gramatiko-instruado laŭ KA-metodo estas, ke oni instuas gramatikon *en sia funkcio*. Dum elementa kurso aparta instruado de gramatika teorio ne okazas. La gramatikajn kategoriojn oni *enkondukas ĉiam konversaciante, demonstrante multajn frazojn*, en kiuj enestas la nova kategorio kaj kiam la instruanto konvinkigis, ke la lernantoj rimarkis kaj konsciis la novan fenomenon mallonge, per unu-du frazoj oni formulas la regulon. Tio estas la indukta procedo: el praktikaj faktoj ni eltiras la ĝeneralan regulon. La gramatiko-instruado de E okazas ĉiam *indukte!** Ekzemplo por la instruado de akuzativo kaj prepozicio „per”. En Sz/1. III/B leciono (paĝoj 22-23) estas simile traktebla: (La rekvizitoj estas jam antaŭpreparitaj).

Jen la tabulo! Mi montras tabulon. Kion mi montras? (– Vi montras tabulon.)

Kion vi vidas? Ni vidas tabulon.

Nun mi desegnas. Mi desegnas bildon. Kion mi desegnas? Vi desegnas bildon. Ĉu vi vidas la bildon? Jes, mi vidas la bildon. Kia estas la bildo? La bildo estas bela. Kian bildon desegnas la instruisto? La instruisto desegnas belan bildon. Ĉu vi vidas ĝin? Jes, mi vidas ĝin. Ĉu vi vidas nun min? Jes, ni vidas vin.

El tiuj ekzemploj la lernantoj rimarkis, ke la finaĵo de la akuzativo estas *-N*, kiun povas apreni la substantivo, adjektivo, la persona kaj demanda pronomoj. Post la konversacio la instruisto skribas sur la tabulon:

* La inversa procedo, t.e. el la ĝenerala, abstrakta regulo al la opa, konkreta fakto, nomiĝas dedukto.

La instruistO desegnAS bildON. — kiON?

NI vidAS ĜIN.

Elformiĝis la strukturo: -O -AS -ON

Kiel oni povis rimarki, per tri konataj transitivaj verboj (montri, vidi, desegni) oni povis *prezenti* la novan gramatikaĵon. Per kelkaj aliaj oni povas *ekzerci*: „*ŝati, mangi*” (ekz. ĉokoladon), poste: „*kolekti, skribi, lerni, legi*”. En tia kazo la ekzercado de akuzativo ebligas la *ripetadon* de preskaŭ ĉiuj konataj transitivaj verboj.

21.5. La dua principo de gramatika instruado post *la funkcia* principo estas *la strukturisma principo*. Samtempe, la sistemoj de strukturoj helpas la konsekvencon *konstruon* de la gramatika instrumaterialo kaj minimumoj.

Oni distingas vortostrukturen kaj frazostrukturen. La vortostrukturo montras la interrilaton de vortoclementoj ene de la vorto, kez. DIS-ER-IG-I, 4-elementa strukturo, kies formulo estas: Pr+Su+Su+F (Pr=prefikso, Su=sufikso, F=finiĝo). La frazostukturo montras la interrilaton de frazelementoj en la frazo.

Jen kelkaj modeloj:

-O	ESTAS	-O	hundO	ESTAS	bestO
-O	ESTAS	-A	arbO	ESTAS	altA
-O	-AS	-E	knabO	sidAS	belE
-O	-AS	-ON	patrO	legAS	librON, (ktp.)

En E la *gramatika minimumo eniras* en la *leksikan minimumon*. Tio estas unika aperaĵo en la lingvo-metodiko kaj klariĝas per tio, ke *la leksika inventaro* de la lingvo *konsistas el elementoj kaj leksikaj kaj gramatikaj*: -A, -O, -AS, -IS, -ANTa ktp. same enestas

en la leksika inventaro, kiel: PATR-, TABL-, BEL-, AM-
ktp. Ĉar ĉiuj *gramemoj* enestas en la baza minimumo,
tio signifus, ke la tutan bazan gramatikon oni instruu
dum unu kurso. Laŭ la tradicia praktiko de E la bazan
gramatikon oni instruas dum unu kurso. Sed en la
lerneja sistema instruado tion oni povas dividi je du
lernojaroj (vidu la materialon de Sz/1/!)

LA ELFORMIGO DE KAPABLOJ


22.5. En lingvometodiko estas konataj kvar bazaj
kapabloj: la *skribo* kaj *lego*, la *kompreno* kaj la *parolo*.

La parolago estas siaspece organizita interŝanĝo de
informaĵoj. La *interŝanĝo de informaĵoj* povas okazi
en du formoj: *skriba* kaj *buŝa*. Tiuj du formoj
diferencas per la uzataj de ili signaroj: la skriba formo
havas spacan, la buŝa – tempan kvanton. Laŭ tio ni
diferencigas du informad-formojn: la *grafikan* (skribo-
lego) kaj la *akustikan* (parolo-kompreno).

La interŝanĝo de informaĵoj okazas per la uzado de
signosistemoj. Sekve, ĝia antaŭkondiĉo estas, ke tiuj,
kiuj partoprenus en la interŝanĝo (kaj la informanto
kaj la informato) konu la signalsistemon de la koncer-
na inform-kodo, t.e. en nia kazo la lingvan materialon
(vidu la 5-ojn 17-20), alivorte: la tuta signalsistemo
devas enesti en la memoro.

Sed la simpla *enmemorigo* de la materialo ankoraŭ
ne sufiĉas: oni devas ĝin *uzi* dum la informada proce-
zo, t.e. oni devas elformi la kapablon *aŭtomate kaj*
mekanike apliki ĝin en la servo de informoj eblas nur
per aŭtomata apliko de la signalsistemo de la koncerna
informada kodo.

23.5. La komunika akto havas ĉiam du polusojn: la informantan kaj informatan.



produktiva akto

receptiva akto

grafika	s k r i b o	lego
akustika	parolo	kompreneo

El la supra skemo estas kompreneble, ke la informanto partoprenas en la komunika ago *produktive* (t.e. li bezonas produktivajn kapablojn), la informato – *receptive* (t.e. li devas nur akcepti kaj kompreni la informaĵon).


Inter la produktiveco kaj receptiveco interpoliĝas la *reproduktiveco* kiel *transira didaktika grado* de kapablo.

Tiuj gradoj neniam prezentiĝas puraj: ili intermiksiĝas laŭ certaj proporcioj: pli facile ni akiras receptivajn kapablojn ol reproduktivajn, kaj pli facile reproduktivajn ol produktivajn. Estas konataj fenomenoj, ke oni legas kaj komprenas la legitaĵon aŭ aŭdas kaj komprenas parolon antaŭ ol mem kapabli esprimi memstare siajn pensojn. Same, la lernantoj pli frue kapablas paroli pri la lernolibraj temoj pere de lernolibraj lingvorimedoj, ol memstare esprimi sin en simila viva situacio.

24.5. La *legado* estas adekvata transformo de grafikaj signoj je akustikaj kaj ilia sinkrona percepto.

Oni distingas laŭtan kaj mutan, respektive analitikan kaj sintetikan legadojn. La laŭta kaj analitika legado estas rimed-karaktera, la muta kaj sintetika legado estas celkaraktera.

La laŭta legado estas unu el la plej valoraj ekzercadformoj. Dum ĝi la okuloj kaptas la grafikajn signojn, kiuj transiras en la aŭdanalizatoron de la cerbo, kie ili akiras sonŝelon. Sinkrone la sonoj eniras la parolmotoran analizatoron, situantan en la kortiko (cerba ŝelo) de kie ili transiras al la muskoloj de la parolorganoj. La psikologia ago dum la *muta legado* estas preskaŭ la sama, nur la akustikaj impresoj estas pli palaj.



Dum la analitika legado ni klopodas kompreni ĉiun elementon de la legitaĵo aparte kaj detale. Tiucele oni klopodas malkaŝi ĉiujn lingvajn fenomenojn kaj solvi ĉiujn renkontitajn problemojn. Tiel la analitika legado kompletigas kaj ekzercas la lingvajn konojn.

La sintetika legado celas ekkoni la informaĵon de la teksto. Oni preteriras la lingvajn fenomenojn, malatentas la esprim-rimedojn kaj koncentrigas la atenton al la kompreno de la enhavo.

La legokapablo evoluas proporcie kun la pliampleksigo de la lingvokono (fonetiko, gramatiko kaj leksiko). La korelacia koeficiento (citita ĉe Hagboldt) laŭ du malsamaj eksperimentoj estas: inter la leksika kono kaj parolkapablo: 0,82 respektive 0,78; inter gramatika kono kaj parolkapablo: 0,77 respektive 0,65.

Dum la instruprocezo ni uzu ĝenerale la analitikan-sintetikan (miksitan) legadon sed neniam ni forgesu, ke la celo estas alkiutimigi la lernantojn iom post iom al la sintetika legado. Pro tio, en la meza kaj supera periodoj ni devas ekzerci la mutan-sintetikan legadon dum la studhoroj, kaj ni devas eduki ilin al la emoj intensive legi hejme.

25.5. *La skribo estas la inverso de la lego: la lego estas perceptebla kiel deĉifrado (dekodigo), la skribo – kiel kodigo (ĉifrado).* Ankaŭ la skribo estas kompleksa psikologia fenomeno: partoprenas ĝin la vidaj kaj kinestezikaj analizatoroj kaj parte la aŭdaj. Ili sendas impulsojn al la kortiko, de tie venas la avizoj al la manoj kaj fingroj. Oni skribas kvazaŭ laŭ ia interna diktado.

La skribado konsistas el du fazoj: *vortkonstruo* el literoj kaj *informajkonstruo* el vortoj kaj sintagmoj. En metodika plano oni distingas du etapojn:

1. la *skribtekniko* t.e. la kono de grafika kaj ortografia sistemo de la lingvo por kapabli konstrui vortojn el literoj;
2. la *skribkapablo* t.e. la kapablo esprimi ĉion skribe, kion oni kapablas esprimi parole.

La skribtekniko baziĝas sur la kono de gramemoj: literoj, diakritikaj signoj kaj interpunkciaj signoj. La principa bazo de la skribtekniko estas la rilato inter la sono kaj litero. La instrupostuloj estas:

- a/ kaligrafie *ĝuste prezenti* la grafemojn,
- b/ *adekvatigi* la literojn kaj la sonojn,
- c/ *koni* la ortografiajn regulojn de la lingvo.

La instruado de skribtekniko en E ne kaŭzas problemojn, ĉar:

- a/ estas *kvanta adekvateco* inter la sono kaj litero:
1 litero = 1 sono
- b/ ne estas *liter-homonimio* kaj *liter-sinonimio* kiel en aliaj lingvoj: ĉiu litero reprezentas ĉiam la saman sonon kaj inverse (escepte la ĉi-daktike neglekteblan sonkonformiĝon kaj asimiladon);
- c/ La literoj de E estas konataj al la lernantoj el la gepatra lingvo (escepte la supersignojn).
- d/ la ortografio baziĝas sur la fonetika principo, senescepta, logika.

La instruado de *skribtekniko* estas rimed-karakteraj kaj *servas al* la pli *rapida* kaj pli *firma alproprigo de la lingva materialo* kaj elformigo de aliaj kapabloj. Precipe ĝi helpas la elformigon de legokapablo ĉar ambaŭ kapabloj baziĝas sur similaj psikologiaj procezoj kun inversa vicordo. Tio motivas la samtempan paralelan instruadon de skribtekniko kaj legtekniko — sed *la parolo ĉiam devas antaŭi* ilin!

La skriba esprimo de la informaĵo tre similas la parolan: psikologie ĉeestas ĉiuj analizatoroj. Krome la skribon komplikas la manko de komuna situacio inter la informanto kaj informato. Fine, dum la parolo la informanto povas uzi *helprimedojn*: geston, mimikon, intonacion.

Alia diferenco inter la skribo kaj parolo estas, ke dum la parolo la penso kaj ĝia esprimo estas sinkronaj: sed dum la skribo la formuligo de la penso *antaŭas* ĝian esprimon. Malhelpas la elformigon de skribkapablo ankaŭ la eblecoj: dum la studhoroj ĝenerale oni ekzercas la parolon kaj nur malofte la skribon. Ĝenerale la skribo estas limigita je hejmtaskoj kaj la tre maloftaj skribaj kontroloj. Pro tio estas tre grave ĉiam konscie korekti la hejmajn laboraĵojn kaj

alkutimigi la lernantojn al la korespondado. La korespondado estas la plej taŭga formo por elformi en la lernantoj la skribkapablon (vidu la 40.s-on!)


26.ŝ. La akustika formo de la komunika ago estas *la parolo kaj la kompreno*. Dum la parolo la plej gravan rolon ludas la *artikulacia aparato*, kaj la aŭdo partoprenas ĝin nur pasive. Dum la kompreno inverse: sed ankaŭ dum la kompreno partoprenas la artikulacia aparato, kiel *interna parolo*. Kiam ni aŭskultas parolon de iu, unue ni analizas la aŭditaĵojn, poste ni sintezigas ilin transponante jam en alian kodon. Parolante, ni elektas el la ekzistanta materialo la necesajn elementojn kaj unuigas ilin en parolunuon. En ambaŭ kazoj helpas la logika kaj mekanika memoro. En la kompreno aktivan rolon ludas la ekkono de la lingva materialo, en la parolo — ĝia esprimo.

Laŭ la moderna koncepto, la *parolo de lernata lingvo ĉeestas dum la tuta instruprocezo*: ĝi estas kaj la rimedo kaj la celo de la instruado. En nia kazo tiun principon oni povas esprimi jene: „*Instrui Esperanton per E!*”

Du formoj de la parolo estas: la *dialogo* kaj la *monologo*.

La dialogo estas konsekvenca ĉeno de demandoj kaj respondoj, kiuj generiĝas unu el la alia (la posta el la antaŭa) dum la senpera interkomunikado de du aŭ pluraj personoj. Monologo estas parolo de unu persono, kiu disvolvas siajn pensojn, opinion, pritakson ~~kp~~ pli aŭ malpli detale.

La ciklo de la komunika agado aspektas jene:



La ŝanĝo de informaĵoj sekvas la vicon: $A \rightarrow B \rightarrow C_1 \rightarrow A_1 \rightarrow B_1 \rightarrow C \rightarrow A$.

La interrilato de la kompreno kaj parolo estas evidenta. Sed ne estas tute evidenta en la metodiko la problemo de la receptiva ekzercado kaj instruado. Oni ne forgesu, ke la receptiveco havas ĉiam pli vastan lingvan kampon ol la reproduktiveco aŭ produktiveco: ni ne povas influi la informanton kaj devigi lin, ke li elektu dum la parolo nur lingvajn elementojn, konatajn de ni. Aliflanke la percepto kaj la kompreno estas psika fenomeno, bezonanta certan tempon. Fizike la parolo estas aer-oscilado kaŭzata de parolorganoj. La sonondoj sekvantaj unu la alian portas informojn. Dum la percepto kaj observado de la parolo ni diserigas la sonkontinuon je elementoj, ni rekonas ilin, ni identigas ilin kun la posedataj modeloj, kaj al la identigitaj signaloj aliĝas la adekvataj signifoj, kiuj reprezentas iun eron al la realaĵo. Tiu procezo okazas dum certa tempo, kaj dume ni devas konservi la opajn

erojn ĝis finiĝas la tuta komunikaĵo. Sed la kapabloj de la homa cerbo estas limigitaj. Ĝi estas esprimebla (tamen ne tute precize pro la subjektivaj faktoroj de la informato) en la mezurunuo de la informaĵoj: bito, ni povas 10 sekundojn konservi la ricevitan 160-bitan informaĵon. Tion oni povas atingi, se la instruisto priatentas la ritmon de sia parolo (normala parolo estas po 80-90 vortoj en minuto, meza: po 100 vortoj en minuto, rapida: po 140-150 vortoj en minuto).

La instruado de la parolo okazas laŭ la sekva vico: reproduktiva parolo laŭ la lernolibra materialo – normaligita parolo de la instruisto (t.e. „klaslingvo”) → produktiva parolo en ne preparitaj kaj ne ekzercitaj vivsituacioj.

LA LERNEJA PRAKTIKO

La antaŭpreparo de la eduk-instrua laboro

27.s. La *instruprojekto* estas la baza dokumento de la instruado de iu studobjekto. Ĝin eldonas iu supera instanco (ĝenerale la ministerio) kaj enhavas: la instrumaterialon kaj la postulojn. (Por la E-instruado en la hungaraj lernejoj la Ministerio ĝis nun ne eldonis Istruprojekton. Laŭ la skemo de aliaj lingvoj ni montras ĉi sube ekzemplon, kompilitan laŭ la lernolibro E/1):

I. lernoĵaro

(2 studhoroj ĉiusemajne, 66 studhoroj)

Leksiko

500 leksikaj elementoj. Krom tio 5-10 % iom maloftaj vortoj kaj esprimoj troviĝantaj en originalaj tekstoj, receptive.

La tematiko de la leksika materialo

Temoj de la *ĉiutaga vivo*:

La lernejo kaj la *lerneja ĉirkaŭaĵo*;

La hejmo kaj *familio*;

La homa *korpo*: sano, malsano, sporto;

La urbo: strato, surstrata trafiko, aĉetado;

La vilaĝo kaj terkulturo;

La naturo: bestoj kaj plantoj, ekskursoj;

La tempo kaj la vetero, la kalendaro;

Gramatiko

-O, -N, -J, -A; pli, plej; -E, -As, -Is, -Os, -Us, -U, -I; personaj *pronomoj*, senpersona pronomo, posedaj pronomoj;

Tabelvortoj, numeraloj;

Esti, havi, voli, povi; jesado-neado; demandoj:

Ĉu;

Prepozicioj: En, sur, de, ĝis, al, per, kun, sen, ĉirkaŭ; super, sub, antaŭ, inter, apud, ĉe, el, post, pri, dum, krom, trans, tra, pro, por.

Afiksoj: -IN-, -IST-, -ANT-, -EJ-, MAL-, EK-, GE-, -IG-, -IG-, -AD-, BO-, -AN-, -ET-, -EG-, -ER-, RE-, -IL-, -AJ-, -UJ-.

La plej necesaj radikvortoj: primitivaj adverboj, konjunkcioj, subjunkcioj, partikuloj.

Postuloj

Parolo: La lernanto kapablu: en la kadro de lernitaj temoj *kompreni* simplan E-parolon, kiu baziĝas sur konataj vortoj, iniciati aŭ partopreni facilajn konversaciojn, priskribi simplajn bildojn; konstrui al ili demandojn kaj respondi al ili; rakonti la enhavon de la legita teksto:

kompili al la teksto planon, demandojn kaj respondi al ili;

Legado, tradukado: La lernanto kapablu: legi sen eraro kaj esprimplene legaĵojn, enhavantajn nur konatajn vortojn; traduki tekstojn, enhavantajn nur konatajn vortojn el kaj en Esperanton; traduki mallongajn mezfacilajn tekstojn, enhavantajn kelkajn nekonatajn vortojn per la helpo de vortaro en kaj el E;

Skribado, konceptado: La lernanto kapablu: kaligrafie senerare, klare kaj bele skribi Esperantajn tekstojn; laŭ diktado skribi facilajn tekstojn, baziĝantajn sur konataj vortoj; kompili la enhavon de la legaĵo; el la lernitaj temoj skribi kelkajn memstarajn frazojn; per la helpo de vortaro kompili mallongajn leterojn;

Skribaj kontrollaboraĵoj:

Dum la lernoĵaro oni devas skribi 3 skribajn kontrollaboraĵojn.

28.5. *La instruprogramo* kaj la aldonitaj „minimumoj”, kiuj plikonkretigas la instrumaterialon estas la bazaj dokumentoj de la lernolibro. Samtempe, ĉiu instruisto, antaŭ ol komenci la kompiladon de *la instruplano*, devas precize kaj detale koni la instruprojekton. La dua paŝo post la kono de la instruprojekto estas la kono de la *lernolibro*. La instruisto devas detale kaj profunde studi la lernolibron, uzotan far li dum la sekva lernoĵaro. Samtempe li observas kaj la materialon de la lernolibro kaj ĝian

metodon. Nur kiam li senmanke konas la instruprojekton kaj la lernolibron, li povas plani sian laboron, t.e. konstrui sian *instruplanon*.

La instruplano estas presita blanketo, disdonita far la lernejo. La limdato de la instruplano estas ĝenerale la 15-a de septembro. Ĉiu instruisto preparu la instruplanon en du ekzempleroj: unu ekzempleron ricevas la direktoro, kiu surbaze de la instruplano kontrolas la laŭplanan instruadon, la alia ekzemplero restas ĉe la instruisto por ĉiutaga uzado.

La oficiala formularo de instruplano en hungaraj lernejoj:

instrumonato kaj – semajno	instruhoro	la materialo de la instruhoro	anticipaj kaj postaj rimarkoj, spertoj ri- late la materialon kaj metodo de la in- struhoro
1	2	3	4

La metodiko de la planado

La fiksjaj parametroj, laŭ kiu oni planas, estas: la disponebla tempo (t.e. la nombro de studhoroj) kaj la nombro de lecionoj. Ekzemple, en hungaraj elementaj lernejoj oni instruas E-n po du horoj semajne – 12 lecionojn laŭ la lernolibro E/1, – kiel fakultativan objekton. La instruado de fakultativaj objektoj komenciĝas ĝenerale la 1-an de oktobro. La normala lernojarro (komenciĝanta la 1-an de septembro) enhavas 33 instrusemajnojn, sekve, la fakultativa studobjekto

disponas pri 29 instrusemajnoj, kiuj egalas 58 instru-
horojn. El tiuj 58 instruhoroj:

3 x 2 = 6 instruhorojn bezonas la skribaj kontrol-
laboroj kaj ilia korektado;

2 instruhorojn la duonjara ripetado (la jarfino
okazas pere de la 12-a leciono). Restas 50 instru-
horoj por la 12 lecionoj. El ili 2 instruhoroj por la
Enkonduka leciono, la resto $48:12 = 4$ studhoroj por
unu leciono. (Rimarko: ne ĉiuj lecionoj estas egalaj,
kelkaj bezonas pli, la aliaj malpli da instruhoroj. La
instruisto ne devas forgesi pri tio dum la plano.)
Post tia disdivido li faras la unuan skizon de la plano,
kiu povas aspekti jene:

(Unua lernoĵaro, laŭ E/1)

I/ 1	1	Enkonduka leciono
	2	Enkonduka leciono
2	3	I-a leciono /A
	4	I-a leciono /A
3	5	I-a leciono /B
	6	I-a leciono /B
4	7	II-a leciono /A
	8	II-a leciono /A
5	9	II-a leciono /B
	10	II-a leciono /B
6	11	III-a leciono /A
	12	III-a leciono /B
7	13	III-a leciono /B
	14	III-a leciono /B
8	15	Ripetado de I-III lecionoj
	16	Unua kontrollaboraĵo
9	17	Korektado de la I-a kontrollaboraĵo ... kaj tiel plu.

La dua fazo estas la kompletigo de la plano per detaloj. Ekz.:

I/1	1	<p><i>Enkonduka leciono/A</i> Nacilingva enkonduka parolo pri Zamenhof kaj E. La unuaj vortoj: literoj, sonoj akcentado; Gramatiko: 1. s., 2. s., 3. s., 4. s.</p>	<p>Portreto de Zamenhof; Teo, kafo, sukero; Bildlibro pri bestoj; Mondmapo kun la kontinentoj</p>
-----	---	---	---

Nia lernolibro de Esperanto (ĝia uzado);
 la bezonataj lerniloj (kajeroj, ktp.)

I/1	2	<p><i>Enkonduka leciono /B</i> Leksiko: kune kun la antaŭaj 34 vortoj. Gramatiko: -O, -A, ESTAS 5. s., 8. s./a, 24. s., 35. s./a</p>	<p>La demonstrilojn vidu en la supra studhorro! Strukturoj: La. . . O estas. . . O LA. . . O estas. . . A Ekzercoj de legado, skribado kaj tradukado.</p>
-----	---	---	---

La instruplano estas la gvidilo de la instruisto, ĝi devas esti ĉiam ĉe-mane. La instruplano devas kongrui kun la klasĵurnalo. Post la studhorro la instruisto faru rimarkojn en la kolono No.4 pri siaj dumhoraj spertoj (pri la amplekso de la materialo, pri la demonstrado, metodo ktp.)

29. s. Post la planado de la tutjara laboro komenĝas la ĉiutaga agado de la instruisto: *la instruhoroj*.

Neniu instruisto rajtas eniri la klasĉambbron *sen antaŭa konsciencia preparo!* Li devas antaŭe kvazaŭ *pense sekvi* ĝis la fino la verŝajnan disvolviĝon de la tuta instruhero, neforgesante, ke ĉiu instruhero povas nin surprizi per neatenditaj okazontaĵoj. La instruisto devas detale, senmanke kaj profunde *koni* la instruotan materialon, sed ankaŭ la manieron, laŭ kiu li transdonos ĝin al la lernantoj: li devas antaŭvidi la situaciojn kaj antaŭprepari ĉiun apartan instrueron de la horo. Klopodu ĉiu instruisto, ke la instruhero estu kvazaŭ eta didaktika artverko kaj post la studhero ĉiu lernanto estu pli riĉa je konoj kaj kapabloj, ol li estis antaŭ la studhero.

La didaktika kaj pedagogia celoj de la instruado de E realiĝas kaj efektiviĝas dum la sinsekva kaj konsekvenca ĉeno de instrueroj. La dokumento de la instruhero estas la *horskizo*, kiu samtempe dokumentas la antaŭpreparan laboron de la instruisto.

La horskizon la instruisto kompilas por si mem kaj ne por la direktoro aŭ inspektoro (kvankam la direktoroj kaj inspektoroj ĝenerale petas la horskizojn, por konvinkiĝi pri la bona prepara laboro de la instruisto)! Gravas ne la formo, sed la enhavo de la skizo. La horskizo enhavu ĉiujn detalojn, kiujn bezonas la instruisto por gvidi la studheron. La komencanta instruisto ne hontu teni en manoj la horskizon, post kelkaj jaroj li ne plu bezonas fari tion dum la instruhero. La horskizo detalas la instrumaterialon laŭ la didaktikaj eroj en kronologia vico, t.e. kiel ili sekvas unu post alia dum la instruhero. Sekve tiu vico dependas de la *tipo de instruhero*.

La tipo dependas de la efektivigendaj didaktikaj celoj: se dum la instruhero efektiviĝas akcentite nur

unu didaktika celo, temas pri *specialaj* instruhoroj; se efektiviĝas *kelkaj* didaktikaj celoj – la instruoro nomiĝas *miksa*. 90 % de la tutjaraj instruoroj estas miksaj.

30. §. La specialaj instruoroj estas:

1. instruoro de nova materialo;
2. ekzerca instruoro;
3. instruoro de ripetado kaj
4. kontrola instruoro (parola aŭ skriba)

La ĝenerala skemo de la specialaj instruoroj estas:

ORGANIZADO 2-4 min.	SPECIALA CELO (1-4) 35-38 min.	Designado de HEJMTASKO 3-5 min.
------------------------	--------------------------------------	---------------------------------------

1. Instruoro de nova materialo

La centran lokon okupas la *klarigo* kaj *ekzercado* de la nova materialo. Tiu-tipa instruoro estas bezonata, se la materialo (ĝenerale gramatik-karakteraj) estas pli ampleksa kaj pli komplika ol la kutimaj.

2. Ekzerca instruoro

Dum la ekzerca instruoro ne okazas transdono de nova materialo, dum la tuta studhoron oni ekzercas kaj sistemigas la materialon de unu aŭ kelkaj temoj. La celo de ekzercaj studhoroj estas la *aŭtomatigo* kaj *plifirmigo* de kapabloj. Paralele oni uzas *kontrolo*n, t.e. oni taksas la partoprenon de la lernantoj en la ekzerca laboro.

3. Instruoro de ripetado

La ripetado ludas gravegan rolon en la instruado de E. Oni devas nepre organizi almenaŭ 3 detalajn ripetadojn (po 2 instruoroj): en la komenco de la lernojar, duonjare kaj jarfine. La ripetado samtempe

estas kaj ekzercado kaj kontrolo, kaj ĉefe: sistemigo de pli ampleksa dozo de instrumaterialo.

4. Instruĥoro de kontrolo

La instruisto devas havi konstante informojn pri la scio, kono kaj kapablo de la lernantoj: ĉi tio estas la spegulo de lia laboro. La kontrolo informas la instruiston pri la vortoj kaj mankoj de sia instrulaboro. Kia ajn estu la instruĥoro, la kontrolo ne povas manki!

La kontrolo devas esti daŭra, senintermita kaj ĝenerala: la instruisto devas *koni la produktojn de opaj lernantoj kaj ĝenerale de la tuta grupo*, la individuajn kaj komunajn *erarojn* diferencigite laŭ konoj kaj kapabloj. Mem la lernantoj pretendas la kontrolo: ankaŭ ili volas koni la rezulton aŭ fiaskon de sia laboro: la *laŭdo* kaj *bona noto* admonas, la korekto kaj atentigo helpas la lernantojn. Sed la kontrolo devas esti ĉiam *komuna laboro*, samtempe *ekzercado*.

De tempo al tempo la instruisto bezonas pli ĝeneralan bildon pri la sukceso de la lernantoj. La plej taŭga formo estas la *skriba kontrolo*: oni povas skribigi rapidajn, mallongajn laboraĵojn kaj en aparta kajero: la t.n. kontrolajn laboraĵojn (se estas semajne 2-hora instruado 3, — ĉe 3-hora — 4 kontrolaj laboraĵoj dum la lernoĵaro.) La kontrollaboraĵojn ĝenerale antaŭas instruĥoro de ripetado. La *skribaj kontrol-laboraĵoj* havas konstantan formon: 2,5 cm margĝeno, super la duobla linio oni ne skribas, sub ĝi, per romiaj ciferoj oni signas la numeron de la laboraĵo, poste la titolon, la taskon kaj la solvon. Oni skribas nur sur unu flanko de la papero, la paralela restas por la korektaĵoj. La temo devas esti konvena al la instrumaterialo de la koncerna etapo, ekzemple: oni diktas

demandojn, — la tasko estas respondi al demandoj: oni diktas indikajn frazojn, la tasko estas konstrui demandojn al la substrekitaj frazelementoj; kompletigi mankhavajn frazojn, pli poste: skribi la resumon de legita teksto, priskribi bildon aŭ iun situacion aŭ eventon, kompili leteron; fine la tradukaĵoj, precipe el la gepatra lingvo Esperanten, por kontroli la gramatikajn kaj leksikajn konojn de la lernanto.

Tuj post la skribado la instruisto korektu la laboraĵojn. Dum la korektado oni uzas la sekvajn signojn:

- o litereraro ekz. klaso
- vorteraro
- == gramatika eraro
- √ mankas litero aŭ vorto
- ~ konfuza, malklara frazo

1 3 4 2 ĝustigo de la vortordo

Estas konsilinde unue korekti ĉiujn laboraĵojn, poste konstati la vicordon laŭ la valoro de la laboraĵoj kaj proporcie klasifiki ilin.

La korektado kaj la klasifikado estas malfacilaj laboroj: pretendas precizecon kaj konsciencon. En la laboraĵoj ne licas resti nekorektita eraro!

Por la komuna korektado de kontrollaboraĵoj oni devas dediĉi apartan studhoron. La instruisto devas konstrui post la korektado la „mapon” de la eraroj: li devas konstati, kiuj estas la ĝeneralaj eraroj kaj kiuj partikularaj — kaj serĉi ilian kaŭzon. *Antaŭ ol disdoni la kajaĵojn li devas konigi al la klaso la ĝeneralajn erarojn kaj ekzerci ilian ĝustan formon en la klaso ĝis li ne konvinkigās, ke la klaso ne plu ripetās tiujn erarojn. La partikularajn erarojn li notu por si mem, kaj de tempo al tempo li kontrolu, ĉu la lernanto jam evitas tiun eraron. Post la disdono de la kajaĵoj ĉiuj*

lernantoj devas korekti „spgulbilde” siajn erarojn. Poste, transskribi la erarojn en la laborkajerojn kaj hejme ekzerci ilian ĝustan formon.

La kajeroj de kontrollaboraĵoj devas esti gardataj en la lernejo, nur post 5 jaroj ili estas selekteblaj.

31. §. *La miksaj instruhoroj*

Kvankam en la antaŭa § ni parolis pri *specialaj* studhoroj, ni povis konvinkiĝi, ke *tute specialaj* (t.e. „*unucelaj*”) studhoroj „puraj” *ne ekzistas*: al la ĉefa celo ĉiam aldoniĝas akcesore iu dua: ekz.: ekzerco-kontrolo kaj inverse; nova materialo kaj ekzerco. Dum la miksa studhoru egalvalore ĉeestas diversaj instru-celoj, nome ĉiuj, pri kiuj temis la antaŭa §: kontrolo, nova materialo, ekzercado kaj ripetado. Ili miksiĝas proporcie dum la studhoru, laŭ la intencoj de la instruisto observanta la principon: *la plej grava ero de ĉiu studhoru devas esti ĉiam la ekzercado!*

La kutima skemo de miksa studhoru estas:

1. Organizado de la studhoru
2. Kontrolo: hejmaj taskoj – skribaj
parolaj: tutfrontaj
individuaj
3. Enkonduko de nova materialo – konversacio
4. Antaŭekzercado de la nova materialo
5. Legado kaj legajellaborado
6. Postekzercado kaj aktualigo
7. Resumo, designado de hejmaj taskoj: parola, skriba.

1. *Organizado de la studhoru*

a/ La klaso stare atendas la envenantan instruiston. Irante al la katedro, la instruisto ĵetas rigardon al la nigra tabulo: ĝi devas esti ĉiam pura, kun antaŭpreparita spongo, kreto, kolorkretoj kaj la aliaj instruhelpiloj. Starante la instruisto salutas la klason: „Bonan

matenon! („Bonan tagon!”) la klaso resalutas ĥore. Sekvas la raporto de la deĵoranto: „Sinjoro instruisto, mi raportas al vi, ke en nia E-grupo ĉeestas. . . lernantoj, forestas. . . lernantoj, laŭnome: . . .” La instruisto dankas la raporton kaj permesas al la lernantoj sidiĝi. Li enskribas en la klaslibron la numeron de la stud-horo. La materialon kaj la forestantojn. (La deĵoranto devas surskribi sur la nigran tabulon la daton kaj la numeron de la studhoro.) La organizado ne povas daŭri pli ol 4 minutojn.

2. Kontrolo

a/ *Kontrolo de skribaj hejmtaskoj*

Ne estu horo sen skriba hejmtasko. La skriba hejmtasko estu la ekzercado de la nova materialo kaj ĝia praktika apliko. Ĝi ne estu tro malfacila kaj tro ampleksa: en la komenca periodo ne pli ol 3-5 mallongaj frazoj. Unu el la lernantoj laŭlegas aŭ skribas sur la tabulo frazon. Ni al kutimigu niajn lernantojn tuj kompari siajn frazojn kun la surskribita, kaj se ili konstatas diferencon, tuj prezenti sin levante la manon. Tiel la instruisto tuj rimarkas, kies solvo estas ĝusta, aŭ ne. La erarojn ni klarigu kaj ĉiu lernanto korektu per ruĝa krajono sian eraron. La lernanto ne kopias el sia kajero la frazon. Lia kajero estas ĉe la instruisto, kiu dume kontrolas la kajeron kaj la lernanto solvas la taskon ĉe la tabulo. Ekz. se la tasko estis respondi al demando, unu el la lernantoj legas la demandon, la vokita lernanto respondas ĝin skribe kaj dume la instruisto kontrolas lian kajeron. Ni estu pretendemaj kaj forme kaj enhave koncerne la kajerojn de niaj lernantoj. Dum la unua studhoro ni komuniku la formon de kajerlaboro (margeno, titolo, dato ktp.), kaj ni estu konsekvencaj!

b/ Respondigo frontala kaj individua

La respondigo okazas en formo de konversacio frontale, t.e. la demandoj de la instruisto direktiĝas al la tuta klaso (frontale) kaj je la konversaciaj frazoj, demandojn alterne respondas jen tiu, jen alia lernanto (kiel sub a,b en sekva §.)

Dum tiu konversacio ĉe kelkaj lernantoj (kies nomojn la instruisto povas menciigi en la horskizo antaŭ la studhoru) la instruisto restas pli longe kaj paroligas ilin pli detale. Post tiu kontrola konversacio la instruisto pritaksu la laboron kaj klasifiku almenaŭ 4-5 lernantojn. *

32.§. *La enkonduko de la nova materialo* okazas en konversacia formo: la instruisto gvidas tiel la konversacion, ke dume aperu la novaj elementoj (kaj leksikaj kaj gramatikaj) kiujn li intencas enkonduki. La lernolibroj E/1 kaj E/2 konkrete helpas tiun laboron per la enkondukaj ekzercoj, situantaj antaŭ preskaŭ ĉiu leciono.

Dum la demandado la instruisto atentu la sekvajn principojn:

a/ *demandu ĉiam la tutan klason*, kaj nur poste alvoku iun:

b/ *demandu kaj la bonajn, kaj la malbonajn lernantojn*: la respondoj de bonaj lernantoj estas modeloj. Sed ankaŭ la malbonaj rajtas kaj devas partopreni en la konversacio. Alvoku ne nur tiujn, kiuj prezentiĝas!

c/ la demando estu *konkreta, klara*, tuj komprenebla.

Ĝi *veku la intereson* de la tuta klaso;

d/ la demando estu *informiva*. En la komenca periodo ni ne havas eblecon meti tiajn demandojn pro la

* La klasifikaĵoj (notoj) estas: 5 = bonega, 4 = bona, 3 = meza aŭ sukcesa, 2 = kontentiga, 1 = nekontentiga.

manko de lingva materialo. En tiu periodo ĝenerale estas uzataj „ekzercaj demandoj”. ekz. „Kia estas la kreto?” (La lernanto ja scias, ke ankaŭ la demandinto scias tion, do, la demando ne havas valoron el la vidpunkto de la informaĵo, nur el lingva-ekzerca vidpunkto. Tion ni ĝenerale ne demandas en la ĉiutaga vivo). La demando: „Kie laboras via patro?” — estas jam informiva, ĉar la instruisto ne scias, kie laboras la patro de la demandito, do, la interesiĝo estas natura!

En la komenca periodo oni uzas ĝenerale *mallongajn, specialajn kaj alternativajn demandojn*. La *specialaj demandoj* komenciĝas *per K* — komenca tabelpronomo kaj la demandito devas ion aldoni al la demanda frazo. Ekz.: „Kion faros vi dimanĉe?” — „Dimanĉe mi ripozos”. — Post la *alternativa demando* (komenciĝanta *per Ĉu?*) la respondo simple ripetas parton de la demando: „Ĉu dimanĉo estas ripoztago?” — Jes. ...”

La didaktika valoro de specialaj demandoj estas pli alta, sed ankaŭ la alternativaj demandoj helpas la aŭtomatigon de lingva materialo.

La respondoj estas lakonaj, mallongaj, kompletaj kaj kompletigitaj.

Ĉu E estas facila? *Lakona* respondo: Jes.

Mallonga respondo: Jes, ĝi estas
facila.

Kompleta respondo: Jes, E estas
facila lingvo.

Kompletigita

respondo: Jes, E estas
facila kaj bela
lingvo.

Jes, E estas ne

nur facila, sed
ankaŭ belsona
lingvo.

Kie estas mia kraĵono?

Lakone: Tie.

Mallonge: Ĝi estas sur la tablo.

Komplete: Ĝi kuŝas sur la tablo apud la libro.

Kompletigite: Via kraĵono estas sur la tablo, ĝi
kuŝas apud tiu dika vortaro.

En la pli postaj periodoj, por alĉutimigi la lernantojn al la kompreno de pli longaj demandoj, oni povas kompletigi ankaŭ la demandojn per kutimaj parolturnoj. Ekz.: Bonvolu al mi diri . . .

Kiu povas diri al mi . . .

Mi estus tre dankema, se iu el vi . . .

Tiu formo de prezento de la materialo estas samtempe ankaŭ la unua de ĝia ekzercado. Dum la prezento kaj la unua ekzercado oni uzu abunde aŭdo-vidajn instruhelpojn (Vidu la § 38.).

33. §. *La legaĵoj kaj legaĵellaborado*

La legaĵoj, kiel kompaktaĵoj tekstoj, sistemigas la prezentitan kaj antaŭekzercitan materialon, servas kiel bazo de posta ekzercado kaj aktualigo, donas modelon de ĝusta stilo kaj aplikado de la lernita lingva materialo.

Ĝenerale ĝis tiu momento, kiam komenciĝas la legado, la *lernolibroj estas fermitaj*.

La demonstra legado: en la komenca periodo unue legas la instruisto kaj la lernantoj sekvas per okuloj la tekston en la lernolibroj. Dum la demonstra legado, la instruisto staru (nepre ne promenu);

ne rapide (sed ne tro malrapide kaj ne ripetadu);
la tonmodulado estu simpla, klara kaj esprimplena,
la voĉforto mez-laŭta.

Post la instruisto povas legi la tuta klaso ĥore aŭ lernantoj individue po unu alineon.

En la plipostaj periodoj povas demonstri la legadon ankaŭ la lernantoj, sed nur se la teksto de la legaĵo estis bone preparita, dum la antaŭekzercoj. La legadon multe plifaciligas kaj plisimpligas, se la lernantoj *konas la aŭdo-motorajn korpojn de la legendaj vortoj*. Tekston, enhavantan nekonatajn vortojn, oni povas legi nur en la meza periodo de la instruado. En tiu periodo oni devas legi eĉ ne preparitajn tekstojn kaj iom post iom al kutimigi la lernantojn kompreni ankaŭ la antaŭe ne analizitajn tekstojn (La preparado devas konigi nur la novajn elementojn de la legotaĵo: la novan leksikon kaj gramatikon, sed nenikaze malkaŝi la eventon de la legaĵo!)

La komprenon de antaŭe ne analizita teksto helpas la t.n. „*orientiloj*”: la orientiloj estas tiuj elementoj en la teksto, kiuj unuavide helpas rekoni la strukturon. Tiaj estas ekz.: la verbo ESTI, la finaĵoj -O, -ON, -OJN, -A, -AN ktp. Relativaj orientiloj estas: la pronomoj, prepozicioj, konjunkcioj kaj subjunkcioj kaj la afiksoj. Ni al kutimigu dekomence la lernantojn, ke ili klopodu kompreni tion, kion ili legas (ĝenerale la lernantoj kutimas priatenti nur la teknikon de la legado kaj eĉ ne klopodas kompreni la tekston.) La plej bona prezentado de nova legaĵo estas: *aŭskulti surbendigitan tekston* de la legaĵo, legita de modele parolanta, elstara pedagogo.

Formoj de legaĵellaboradoj:

a/ *meti demandojn pri la teksto;*

- b/ *kompili* la planon de la teksto;
- c/ *titoligi* la opajn partojn (alineojn)
- d/ *elekti* en la teksto la *frazojn*, *karakterizantajn la personojn*;
- e/ *dramigo*: se la legaĵo estas dialog-forma, oni disdonu la rolojn. La kunligan tekston legu iu tria lernanto.
- f/ *surscenigo*: la lernantoj ludas la rolojn de la agantaj personoj el la legaĵo.
- g/ *aktualigo*: transformado de la legaĵa situacio en la ĉiutagan situacion de la lernanto;
- h/ *transformado kaj kompletigo*: oni povas transmeti la eventon en la pasinton aŭ futuron; alpenŝi la antaŭ-okazintaĵojn kaj la sekvon de la rakonto ktp.

La traduko — ne estas ekzercadformo. Oni tradukigu nur tiam, se la instruisto ne estas konvinkita pri la senmanka kompreno de la teksto. Sekve, la traduko estas unu el la formoj de la kontrolo. Sed, antaŭ ol tradukigi, ni devas elĉerpi ĉiujn aliajn ekzerco-tipojn, kontroleblecojn.

En la mezaj kaj superaj kursoj aperas la ampleksaj, nepreparitaj tekstoj. Dum ilia ellaborado ni devas nepre instrui al niaj ĝelernantoj la uzadon de vortaroj. (La ĝenerala *eraro* de la lernantoj ĉi-koncerne estas, *ke ili senkritike transprenas la unuan signifon de la vorto*, — *ne observante la sintagmon!*)

La dumhora vortara laboro kutime konsistas el tio, ke la instruisto surskribas la prezentiĝantajn novajn vortojn sur la tabulo kaj la lernantoj kopias ilin en siajn vortar-kajerojn. En la postaj periodoj la lernantoj povas memstare prepari la tekstojn. En tiaj kazoj estas konsilinde skribi en vortar-kajeron ne nur la izolitan vorton, sed, unue la frazon aŭ almenaŭ la sintagmon, en kiu la nova vorto troviĝas en la teksto, kaj poste — la izolitan vorton. Ekde la meza periodo oni povas

jam difini, ĉirkaŭskribi aŭ alimaniere priskribi la sencon de la vorto, aldoninte laŭ neceso ankaŭ la gepatro-lingvan tradukon. Ekde la meza periodo *por ekzercigi la lernantojn en uzo de vortaroj, oni aranĝu kelkfoje en la klaso konkursojn pri la plej rapida kaj plej ĝusta vortaruzo.*

Ni devas al kutimigi niajn lernantojn al la abunda *hejma laŭta legado*. Oni povas legigi lernolibrajn tekstojn (ekz. en la klaso oni ellaboras la tekston ĝis ĝia plej interesa parto, la sekvan parton oni designas por hejma legaĵo) – sed ankaŭ gazetojn (Juna Amiko, Kontakto, Hungara Vivo, ktp.) La legitaĵojn poste la lernantoj prezentu al la klaso en formo de raportaĵo, recenzo, referaĵo ktp.

34. s. La ekzercado estu ĉiam kompleksa, t.e. leksiko-gramatika aŭ gramatiko-leksika. Tion postulas ankaŭ la baza principo de la lingvoinstruado: instrui la lingvon per la lingvo en sia funkcio; la baza ekzercadunuo estu ĉiam la frazo! Kaj la gramatikon, kaj la leksikon ni devas ekzerci en frazoj. La „skeleto” de la frazo evoluas de la komencaj, simplaj fraztipoj al pli kompleksaj. Sed ĉiu frazo en si mem estas prototipo de senfina ĉeno de samstrukturaj frazoj. Plej oportune ni povas preterlasi la instruadon de gramatika-teorio, se ni prezentas kaj ekzercas la materialon laŭ frazstrukturoj.

Ekz. la sekvaj frazoj estas *samstrukturaj*:

En la ĝardeno estas multaj floroj.

En la klaso lernas diligentaj knaboj.

En la urbo konstruiĝas modernaj domoj.

La *frazstrukturo* estas: En la...-o...-as...-aj...-oj.

La *frazmodelo* estas:

Pr+S+V_p+A_m+S_m (prepozicio, substantivo, verbo, adjektivo, substantivo)

(p=predikato, M=multenombro)

La *strukturismaj ekzercadformoj* (didaktikaj operacioj):

a/ *Simpla anstataŭigo*: La libro de la lernanto estas bona.
La . . . de la lernanto estas bona.

(kajero, voĉo, konduto, noto)
La libro de la estas bona.
(instruisto, patro, amiko. . .)
La libro de la lernanto estas...a.
(interesa, bela, ekscitiga, nova)

Seria anstataŭigo: Somere ĉiu as ripozi.
povas, deziras, volas, intencas,
esperas, veturas . . .

b/ *Transformado*: de indika frazo en demandan, ordonan, deziran, nean;
transformado de tempo, persono, nombro, ktp.
Li lernas diligente. Li lernu diligente! Bonvolu lerni diligente. Li ne lernas diligente. Ho, se li nur lernus diligente. Li lernis diligente. Ĉu vi lernas diligente?
ktp.

c/ *Integrado*: kuntirado de du frazoj en unu: Jen kostumo. Jen mia amiko. Jen la kostumo de mia amiko.

Li promenas. Li legas. = Li legas promenante.

d/ *Reduktado*: plisimpligo de la strukturo: Mia patro laboras en la fabriko. = Li laboras tie.

e/ *Ekspansio*: plivastigo, plietendigo de la strukturo: Li laboras . . . kie, kion, kiel, kun, kiu, de kiam, ĝis kiam ktp. Alia formo de la ekspansio (laŭ diversaj niveloj):

La knabo	skribas.
	leteron.
	volas skribi leteron.
	estas skribanta leteron.
	skribanta leteron estas en la ĉambro.

Kaj la instruisto, kaj la lernanto devas al kutimiĝi al tiu ekzercadformo: malkaŝi la strukturon, alproprigi la modelon kaj la kapablon variigi ilin.

35. s. La strukturismaj ekzercoj ebligas: la *aŭtomatigon de la lernita materialo*, la produktivigon de la receptiva-reproduktiva materialo kaj pretigas ĝin al la praktika uzebleco en la ĉiutaga vivo.

La dua grava principo, kiun oni devas priatenti, dum la postekzercadoj estas: la praktika uzo de la lernita materialo. Tio signifas, ke oni devas „*elpaŝi el la lernolibro*” kaj *transponi* la materialon *en la ĉiutagan vivon de la lernantoj*. Atingi tion oni povas nur se en la klaso regas vere Esperant-lingva atmosfero. Realigi tion, krei spritajn, naturajn, vivajn situaciojn — jen estas la plej malfacila tasko de la instruisto. — Unu el la rimedoj por krei Esperant-lingvan atmosferon estas la konsekvenca uzo de *Esperantlingvaj organizaj esprimoj* jam ekde la unua studhoru, *eĉ se tio estas ekster la lernata aŭ lernita materialo*. Iom post iom la lernantoj komprenos ilin kaj sentos ilin tute naturaj. Ekz.: Kiu forestas? Venu al la tabulo! Fermu la librojn! ktp.

36. s. Parolante pri la ekzercad-formoj ĝis nun temis nur pri parolaj ekzercoj. Ĝenerale la skribaj ekzercoj okupas nur duan lokon post la parolaj, sed estus erare tute ne ekzerci la produktivan skribon. En la nuna praktiko, la skribado ĝenerale servas nur kiel formo de kontrolo (ankaŭ la hejmaj skribaj taskoj estas plie kontrolkarakteraj, ol ekzercaj). Sed ni devas elformi ankaŭ la skribkapablojn! Kaj elformi iun kapablon oni povas nur per la samspeca ekzercado: parolkapablon per parolo, skribkapablon — per skribo. Ekz. skribigi planon de iu legita teksto, aŭ fari demandaron al la teksto oni povas ne nur hejme, sed ankaŭ en la klaso. Eĉ, tiamaniere oni povas laborigi samtempe la tutan klason!

37. §. La instruhelpiloj

„Montru bildon kaj eĉ la mutulo ekparolas”.

(Uŝinskij)

Laŭ la statistiko, la homoj akceptas la novajn konojn pere de la sentorganoj laŭ la sekva proporcio:

vidsento	— 87,0 %
aŭdo	— 7,0 %
flaro	— 3,5 %
palpo	— 1,5 %
gusto	— 1,0 %


Tiu statistiko montras la gravan rolon de la *videfektaj* instruhelpiloj. (Jam antaŭ jarcentoj „malkovris” tiun fenomenon J.A. Komensky!)

Inter la videfektaj helpiloj ni devas distingi du specojn:

a/ la lingvan demonstrilon — t.e. la tekstoj;


b/ la objektajn demonstrilojn — t.e. en la naturo, laŭ bildo montri la objekton.

La videfektaj instruhelpiloj helpas la forigon de gepatra lingvouzo: anstatŭ la traduko oni simple montras nature aŭ bilde la objekton (se ĝi estas montrebla). Samtempe la demonstrado helpas elformi rektajn asociativajn rilatojn inter la sonkorpo (grafika korpo) kaj signifo. En la gepatra lingvo tiuj du aspektoj estas adekvataj (la sonkorpo kaj signifo). En la fremda lingvo — ne. La celo de la ekzercado estas adekvatigi ilin. Skeme (laŭ Franke) tiu fenomeno aspektas jene:



S=signifo, Vg=vorto en gepatra lingvo, Vf=vorto en fremda lingvo: La rilato $S \longleftrightarrow Vg$ estas adekvata.

Lernante la fremdan vorton la procezo evoluas jene: kiam la lernanto vidas la objekton, en lia memoro aperas la vorto – gepatrolingve: ekz.: „*Ceruza*,” kaj nur post tiu formo aperas „*krajono*”, t.e. inter la signifo (realaĵo) kaj ĝia lingva bildo (vorto) intervenas la gepatra lingvo:



Nia celo estas krei rektan rilaton inter la objekto kaj ĝia vortbildo en fremda lingvo, do, transformi la vicon: $S \rightarrow Vg \rightarrow Vf$ aŭ $Vf \rightarrow Vg \rightarrow S$ en $S \rightarrow Vf$ respektive $Vf \rightarrow S$ t.e. krei rektan asociativan rilaton. Tion helpas la vid-efektaj (kaj aŭdo-videfektaj) demonstriloj.

38. §. La *demonstrilojn* (instruhelpilojn) oni povas grupigi:

a/ laŭ ilia karaktero:

tradiciaj: nigra tabulo, kreto, lernolibro, kolor-kreto, bildoj, fotoj, geografiaj karto, modeloj, specimenoj, ludiloj kaj objektoj naturaj;

modernaj-teknikaj: diapozitivo, epidiaskopo, gramofono, magnetofono, radio, filmo, televido . . .

b/ laŭ ilia efeko: vid-efektaj, aŭd-efektaj, vid-aŭd-efektaj.

Jen kelkaj bazaj principoj de ilia uzo:

1. *Ne okazu studhoru sen la uzo de iu demonstrilo!*
2. Elektu la ĝustan, konvenan helpilon, konforme al la aĝo, intereso, inteligento kaj ĝenerala kapablo de la lernantoj.
3. La instruhelpiloj efikas nur pere de la instruisto: la plej simpla demonstrilo (ekz. skatolo, peco da gu-

mo) fariĝas mirakla demonstrilo en la manoj de lerta instruisto kaj la plej moderna teknika helpilo valoras nenion, se ĝi ne estas uzata ĝuste kaj lerte.

La studhorojn oni devas zorge antaŭprepari. Se la instruisto demonstras diafilmon aŭ aŭdigas magnetofonbendon — antaŭ la studhoroj li devas rigardi, respektive aŭskulti ĝin. La teknikajn helpilojn instalu dum la paŭzo, je la komenco de la studhoroj ĝi estu uzpreta.

39. §. Laŭ la *KA-metodo* (Kompleks-Aktiva) la instruhelpilon oni devas intense uzi dum la instruoprocezo, ili helpas la laboron de la instruisto, sed ne anstataŭas lin. Elformiĝis du konceptoj, kiuj preskaŭ ekskluzive bazas la instruprocezon sur aŭdo-vidajn instruhelpilojn: la t.n. *lingvolaboratorioj* kaj la t.n. „aŭdo-vida, *struktur-globala metodo*” de *Guberina kaj Rivenc* (la t.n. *Saint-Clauda skolo*).

En la lingvolaboratorioj ĉiu lernanto havas sian apartan budeton, instalita kun magnetofono kaj interligita kun la instruisto. Sekve, dum la sama tempodaŭro ĉiu lernanto povas labori kaj solvi pli da taskoj, ol dum la tradicia instruado. La kursano povas ĉiam sin kontroli pere de la surbendigita modelo. La laboratoriaj ekzercoj tre sukcese kontribuas al la elformigo de kapabloj, sed ne povas anstataŭi la klaslaboron.

Laŭ la Saint-Clouda-metodo ĉiu leciono konsistas el 3 partoj:

- a/ dialogo laŭ ĉiu-taga situacio
- b/ gramatik-karakteraj strukturaj dialogoj
- c/ konversacio

Sekve, la instruado okazas en tri fazoj:

- a/ enkondukaj ekzercoj
- b/ gramatikaj strukturoj
- c/ konversacio

La a/ kaj b/ fazo diseriĝas jene:

1. prezento: oni projekcias 2 foje la diafilmon kaj sinkrone oni aŭskultas la magnetofonan tekston (15-30 bildkadroj, respektive frazoj).
2. kompreno – sen uzo de gepatra lingvo
3. imito: la kursanoj post magnetofono ripetas la frazojn, rigardante la bildojn.
4. firmigo – oni aŭskultas kaj rigardas la materialon po opaj partoj 10-15 foje kaj tiom foje ripetas ĝin la gekursanoj. (la instruisto: parolas nur dum la 2-a faz-ero.)

Sammaniere oni ekzercas la b/-fazon. En la c/-fazo oni aktualigas la tutan materialon, transmetante ĝin en la konkretan situacion de la gekursanoj.

Resume: Dum la instruado la aŭdo-vidaj efektoj estas maksimume elĉerpataj. La instruiston helpas gvidlibro, enhavanta instrumentodajn konsilojn kaj la tekstojn. La kursanoj ne ricevas tekstojn: ili havas programitajn kajerojn kun presitaj ekzercoj kaj taskoj. Gis la 16-a leciono, la kurso okazas ekskluzive per la priskribita metodo, – poste oni komencas la legafellaboradon, la skribon kaj la legon. La instru-materialo estas strikte organizita: enhavas 1500 leksemojn de la cel-lingvo. Tradukadon ĝi tute ne uzas.

Por la lerneja instruado tiu varianto ne estas tre taŭga, des pli por plenaĝulaj kursoj. Sed – la plenaĝuloj ŝatas ankaŭ pensadi pri la fenomenoj, serĉi interrilatojn, konsciiĝi pri la lernitaĵo. Tion la metodo ne ebligas. Same ne ebligas hejman laboron kaj preteratentas la gepatro-lingvan bazon.

40. §. *La krominstruhora laboro*

Estas grava pedagogia tasko de la instruisto konsciigi, ke la fremda lingvo ne estas simple unu el la studobjektoj, kiun ni lernas, faras taskojn ktp. La lingvo – estas kompleksa sistemo de konoj kaj kapabloj, kaj alproprigi ĝin povas nur tiu, kiu ekzercas ĝin ĉiutage,

uzas ĉiun eblecon tiucele. Tiu, kiu okupiĝas pri la lingvo nur en tiuj du tagoj de la semajno, kiam estas instruhoroj, *neniam kapablos regi ĝin!* Pro tio, la eksterklasa okupiĝo tre gravas. Estas kelkaj formoj, kiujn povas organizi mem la instruisto:

a/ *Kluba vivo* — studrondoj, kluboj, ktp., kie oni parolas nur Esperante, aranĝas programojn kaj organizas eblecojn por praktiki la lingvon. En la lernejoj la akceptita formo estas la fakrondetoj, organizataj de (*KISZ*)—junulara organizaĵo (du horoj ĉiun duan semajnon);

b/ *Ekskursoj* — vizito de muzeoj, urbopartoj aŭ en arbaron, kaj dume uzi nur Esperanton. Oni devas ilin antaŭprepari (Kion ni vidos?) kaj poste oni povas verki pri ĝi mallongajn riportaĵojn, artikolojn, por la murgazeto ktp.

c/ *Hejmaj legaĵoj* — ni eduku niajn lernantojn ami la librojn, ĵurnalojn, legi intense kaj taksi tion, kion ili legis.

d/ *La korespondado* estas la plej grava formo de krominstruhora laboro. La adresateco de la letero kreas kvazaŭ-dialogan situacion, la temojn la lernantoj elektas mem, do tiuj apartenas al ilia interesrondo kaj la leter-stilo estas tre proksima al la stilo de ĉiutaga parolo. La korespondadon postulas kaj la pedagogia kaj la didaktika celo de la E-instruado. La amika korespondado kontribuas al la edukado de internaciismo. Ĝi stimulas la intereson al lingvolernado kaj estas la plej bona okazo ekzerci la produktivan skribkapablon. La korespondadon oni komencu nur tiam, kiam la lernantoj jam kapablas memstare esprimi siajn pensojn, eĉ se nur limigite (estas konsilinde komenci la korespondadon per bildkartoj, kun mallongaj tekstoj).

La leteroj estu enhavaj. Ili povas esti bonhumoraj, sed neniam banalaj aŭ ŝablonaj. La lernanto volonte

skribas pri si, pri la familio, hejmo, lernejo, ludoj kaj amuzoj, ili volonte interŝanĝas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn. Pliposte ili skribas pri la lando, literaturo, historio, geografio, kutimoj, muzikoj, kino ktp.

La leterojn skribu mem la lernantoj. La instruisto prizorgu nur la finan trarigardon, kiu tuŝu nek la individuecan enhavon, nek la esprimmanieron, sed zorgu nur, ke la lingvo estu korekta kaj la formo konvena.

La leksiko ĉi-rilate estas kompletigenda per la kutimaj formuloj de la epistola stilo: alparoloj, salutoj, leterkomencaj formuloj, danko, pardonpeto, leterfinaj formuloj. Estas konsilinde gvidi apartan korespondotaglibron, en kiu oni registru la senditajn leterojn, sendaĵojn, kolektas la valorajn formulojn el la ricevitaj leteroj ktp.

Ĉiu ricevita letero estas respondenda kaj la eventualaj sendaĵoj rekompencendaj.

Krom la individua korespondado oni povas organizi korespondadojn inter grupoj, klasoj, studrondetoj per komune verkitaj leteroj. Sincera kaj afabla korespondado povas gvidi al amikigo de du grupoj (klasoj), eĉ al reciproka vizito.

INDEKSO

- ABONYI, Á.: 89
 ADAMSON, H.: 178, 181
 ADY, E.: 93, 117, 272
 AHLBERG, P.: 48
 AISBERG, E.: 63
 ÁKOS (KIGLITS), L.: 113
 ALBAULT, A.: 126, 127
 ALBERT, A.-M.: 248, 253
 ALEKSANDRO, la Granda: 11
 ALENCAR, J. de: 264
 ALIMGAN, H.: 276
 ANAKREONO: 171
 ANDERSEN, H.C.: 139
 ANDREW, S.A.: 264
 ANDRIANOVA, N.: 276
 ANDRIC, I.: 274
 APITZ, B.: 270
 APPLEBAUM, J.D.: 265
 ARAGON, L.: 266
 ARETINO, P.: 171
 ASZLÁNYI, K.: 205
 AS, S.: 202
 ATANASOV, A.D.: 192
 AULD, W.: 127, 131, 160, 174,
 206, 207, 208, 209-212, 214
 264
 AZZI, G.: 273
 BABITS, M.: 117, 171, 175, 204
 BACHMAIER, A.: 17, 30
 BÁCSKAI, St.: 85, 112, 113
 121
 BADASH, G.: 203
 BAGHY, J.: 37, 59, 60, 92, 94,
 97, 101-102, 106, 110, 114,
 115, 119, 157, 163, 166, 167,
 168-170, 191, 193, 206, 220,
 237, 252
 BAILEY, W.: 142, 203
 BALASSA, B.: 172
 BALASSA, J.: 92, 117
 BALÁZS, J.: 119
 BALBIN, J.: 248
 BÁLINT, G.: 48, 88-89, 117
 BÁLINT, Sz.: 113
 BALKÁNYI, P.: 3, 61, 62, 91, 94,
 95, 98-99, 154, 191
 BALLA, I.: 92
 BALZAC, H. de: 162
 BANHAM, F.R.: 264
 BÁNÓ, N.: 114, 120, 191
 BARABÁS, Á.: 88, 89, 112, 119
 BARANYAI, E.: vidu ce EMBA
 BARANYAY, Z.: 115
 BARBUSSE, H.: 79
 BÁRCZI, G.: 93, 99-101, 118
 BAROJA, P.: 270
 BARTELMES, N.: 79, 197
 BARTHA, S.: 97
 BASTIEN, L.: 65
 BATTA, J.: 97, 107
 BAUDELAIRE, Ch.: 171, 200, 207,
 226, 269
 BAUDIN-VATRÉ, J.: 180
 BAUDOIN de COURTENAY, J.:
 54
 BAUPIERRE, H.: 228
 BAUR, A.: 203
 BEAUCAIRE, L.: 228
 BEAUFRONT, L. de: 45, 46, 47,
 48, 49, 50, 54, 55, 72, 88,
 128, 149
 BEAUMARCHAIS: 146
 BECHER, J.J.: 16
 BÉCOUER, G.A.: 270
 BEIN, K.: vidu ce KABE
 BELLAY, J. du: 226
 BELMONT (BLUMENTHAL),
 L.: 46, 50, 72, 128, 144-145,
 257
 BENAVENTE, J.: 162
 BENCZIK, M.: 167
 BENCZIK, V.: 153, 190, 208,
 238, 248, 271, 272
 BENNEMANN, P.: 165

- BEÖTHY, L.: 211
 BÉRANGER, P.J. de: 171
 BERCELI, B.: 206
 BERGER, Ch.: 21
 BERGER, I.: 107
 BERNARD, R.: 172, 173, 176, 268, 269
 BERNI, Fr.: 171
 BEZRUC, P.: 160, 266
 BICKNELL, C.: 162
 BIRO, L.: 92
 BLEIER, V.: 69, 106, 130, 167, 178
 BLINOV, E.: 98
 BLUMENTHAL: vidu ce
 BELMONT, L.
 BOBUBLA, J.: 30
 BODA, S.: 115
 BODÓ, K.: 94, 167, 175-176, 203, 204
 BOGDANOV, M.S.: 44
 BOIRAC, E.: 54, 59, 72, 129, 150, 152, 155
 BOKAREV, E.A.: 259
 BOLAK, L.: 54
 BONAERO, E. de: vidu ĉe
 HRYENKIEWICZ, A.
 BONESPER, R.: 97
 BORMANN, W.: 231
 BORONKAY, L.: 112, 113
 BOROVKO, N.: 46, 50, 128
 BOTEV, H.: 192, 265
 BOTOS, I.: 271
 BOTTA: 10
 BOTTICELLI, S.: 272
 BOULTON, M.: 125, 131, 132, 170, 211, 214-216
 BOURLET, K.: 52, 59, 72, 82, 141, 150, 154, 159
 BRANDYS, K.: 258
 BRAUN, S. (ELSKI): 16D
 BRECHT, B.: 270
 BREDSAW, J.: 23
 BRIGGS, L.: 188
 BRJUSOV, V.J.: 193
 BROUWER: 197
 BRUIN, G.P.: 198
 BUDAY, L.: 93
 BULTHUIS, H.J.: 193, 198
 BURJA, A.: 21
 BURMANN, : 18
 BUTLER, M.C.: 187
 BÜNEMANN, A.O.: 165
 BYRON: 146
 CANE, M.: 263
 CAPÉ, A.: 151
 CARLÉN, E.: 211
 CARLES, A.: 75
 CARLSSON-BOHMAN, M.: 172, 199-200, 204
 CART, Th.: 48, 86, 114, 150, 151, 154-155, 183, 184
 CASTRO, A.: 264
 CATALA, V.: 270
 CAPP, C.D.A.: 264
 CARREIRO NETO, P.: 264
 CENSINIO: 267
 CHARLES, d'ORLÉANS: 226
 CHAVES, S.: 218
 CHIUSI, I.: 273
 CHO Sung Ho: 274
 CICOVÁ, J.: 248
 CIKLARI: 118
 CLARK, B.: 175, 255-256
 COCTEAU, J.: 269
 COHEN, M.: 19
 CONSCIENCE, H.: 198
 CONTERNO-
 GUGLIELMINETTI, C.: 239-240
 CORRET, P.: 63, 151
 COURTINAT, L.: 228
 COUTURAT, L.: 18, 53, 54, 55
 CSEH, A.: 62, 66, 86, 97, 288, 289, 290, 292
 CSERGEZÁN, P.: 271
 CSISZÁR, A.: 121
 CSÓRA, S.: 113
 CUBOTA, I.: 246
 CUNHJANG: 274
 ĆACE, I.: 203
 ČAPEK, J.: 19, 197, 220, 266
 ČULITIS, N.: 180

- DALGARNO, G.: 20
 DAMM, J.: 18
 DANTE, A.: 172, 272
 DAO Anh Ka: 277
 DARVAS, J.: 205
 DAŠGUPTO, P.: 270
 DE KOCK, E.: 125, 175, 260-261
 DEGENKAMP, G.J.: 197
 DEIJ, L.C.: 206
 DELORMEL: 20
 DEME, L.: 119
 DÉR, L.: 104
 DEŠKIN, G.: 193, 195-196
 DÉVAY, L.: 120
 DEVJATNIN, V.: 46, 50, 128,
 132, 145-146, 203
 DICKENS, Ch.: 125, 139
 DIEGO, F. de: 270
 DIETTERLE, J.: 165
 DIGBEUS, P.: 16
 DINWOODIE, J.S.: 131, 206, 208,
 209, 264
 DJENISOV, P. N.: 19
 DOBREV, I.: 192, 265
 DOBRZYNSKI, Z.: 258
 DOLINSKY, V.: 203
 DOMBROWSKI,
 (DAMBRAUSKAS) A.: 50, 72,
 146-147
 DOMEÑECH i MAS, A.: 191
 DORNO, F.V. (DOOREN, F. van):
 198-199
 DOROŞMAY, J.: 271
 DOROŠEVIČ, V.: 194
 DOSTOJEVSKI, F.: 161
 DOWNES, W.J.: 142
 DRATWER, I.: 239, 275
 DRESEN, Helmi: 181
 DRESEN, Hilda: 172, 178, 181-
 182, 203, 252, 276
 DREZEN, E.: 18, 80, 81, 192,
 215
 DROZDOV, A.: 194
 DUDICH, E.: 121
 EICHEVERRIA, E.: 263
 EICHHOLZ, R.: 82
 EINSTEIN, A.: 79
 EINSTEIN, L.: 44, 46
 EKSTRÖM, I.: 268
 ELB, L.: 73
 ELLERSIEK, F. (ARGUS): 165
 ELLIS: 72
 ELPIN: 267
 EMBA(BARANYAI, E.) 119, 197
 235-236
 ENGELS, F.: 79
 ENGHOLM, S.: 199, 200-201, 204
 206
 EÖTVÖS, L.: 54
 ERDEI, F.: 119
 ERDEY, F.: 96
 EROŞENKO, V.: 195, 244, 276
 ETZEL: 47
 EÜRIPIDO: 217
 FALKONBRIG, G.: 180
 FALU, T.: 117
 FARKAS, Emeriko: 108
 FARKAS, Ernesto: 116
 FARKAS, É.: 110
 FAULHABER, F.: 197
 FAZEKAS, J.: 30
 FEJES, M.: 238, 272
 FEKETE, I.: 271
 FERDO, S.: 252
 FERLIN, N.: 200
 FERNÁNDEZ MENÉNDEZ, M.:
 264
 FERREIRA, C.V.: 264
 FILIPO, la Dua: 11
 FIŞER, A.: 215
 FLOURENS, J.: 151
 FOOTE, A.D.: 264
 FORGE, (FETHKE) J.: 201-202
 FOSCOLO, U.: 273
 FOUSEK, J.: 203
 FÖLDES, J.: 205
 FRANCIS, J.I.: 131, 134, 206,
 208, 213-214, 264
 FRANCISKO, Assisi: 240
 FRIIS, L.: 267
 FRODING, K.: 203

- FRUICHTIER, P.: 48, 72, 151
 FUCHS, E.: 97, 108
 FURMANOV, D.: 203
 FÜRST, A.: 107, 109
 GABLENZ, H. von: 19
 GÁBOR, G.: 97
 GABRIELLI, L.: 240
 GAJDAR, A.: 276
 GALAMBOS, H.: 97
 GALLEGOS, R.: 271
 GARCIA LORCA, F.: 270, 276
 GÁRDONYI, G.: 272
 GARROTE, H.E.: 251
 GASSE, E.: 162
 GÁTI, S.: 30
 GEORGIEV, I.: 219
 GERALDY, P.: 269
 GERBER, F.A.: 22
 GERGELY, M.: 111, 238
 GERNET, V.: 47
 GIESSNER, J.: 85
 GIESSWEIN, A.: 90, 91, 92, 117
 GINZ, O.: 191, 203, 272
 GIRO, J.: 23
 GIUNIO, P.: 274
 GJIVOJE (GIVOJE), M.: 273
 GLUBOKOVSKI, M.N.: 20
 GODE, A.: 29
 GOETHE, J.W.: 57, 79, 125, 139,
 146, 165, 171, 172, 197
 GOGOL, N.V.: 125, 139
 GOLDBERG: 141
 GOLDONI, A.: 240
 GOMES BRAGA, I.: 219, 264
 GOODHEIR, A.: 216-217
 GOUIN, F.: 286
 GÖHL, G.H.: 165
 GÖNDÖR, R.: 108
 GRABOWSKI, A.: 45, 46, 50, 72,
 127, 128, 129, 132, 140, 141,
 142-144, 146, 163, 173, 275
 GRAU-CASAS, J.: 191
 GREGOR, D.B.: 131, 264
 GRENKAMP: vidu če KORNFEI
 S.
 GRIGOROV, A.: 86, 219
 GROSJEAN-MAUPIN, E.: 73, 130,
 152, 183, 184-185
 GROSSELIN: 17
 GRUM, J.: 207, 257-258
 GULYÁS, P.: 117
 GUSEV, K.: 276
 GYÖRY-NAGY, L.: 93, 103
 HAGA, H.: 247
 HAL, H.: 268
 HALKA, L.: 203, 205
 HALLGATÓ, A.: 237
 HÁMÁN, K.: 107
 HAMRI, Th. fra: 238
 HAMVAI, J.: 272
 HANKEL, M.: 57, 154, 158-159,
 191
 HARMON, W.: 212
 HASZPRA, O.: 121
 HAUGEN, E.A.: 275
 HAUPENTHAL, R.: 211, 230
 HAVLIČEK-BOROVSKY, K.: 160
 HEBBEL, F.: 165
 HEIDE, Z.: 224
 HEILSKOV, Ch.: 267
 HEINE, H.: 139, 146, 165, 171,
 172, 207, 226, 262, 269
 HEMMER HANSEN, E.: 225
 HENDERSON, G.J. (HOINIX, P.):
 24
 HERNANDÉZ, J.: 263
 HERODOTO: 10
 HERPAIN, S.: 21
 HEVESI, J.: 118
 HIKMET, N.: 103
 HILDEGARDIS, Bingen von: 21
 HO Chi Minh: 277
 HO Phuong: 277
 HODAKOWSKI, T.: 257
 HODLER, H.: 58, 59, 75, 157,
 162, 163, 183
 HOHLOV, N.: 193, 194-195
 HOLZHAUS, A.: 262
 HOMERO: 171
 HONFAN: 267
 HORVÁTH, J.: 120
 HOVORKA, N.: 178, 179

- HRYENKIEWICZ, A.: 263
 HROMADA, R.: 19, 203, 220, 266
 HUU Mai: 277
 HVORSLEV, C.A.: 267
 HYAMS, H.B. (TAGULO): 163
 HESAPÇIEV, S.: 265
 HOVES, I.: 276
 IBSEN, H.: 165, 274
 INGLADA, V.: 162
 IHARA, S.: 243
 IMBERT, R.: 274
 IMMERMANN, K.L.: 269
 ISBRÜCKER, J.: 86, 197
 ISIGURO, T.: 243
 ISOBE, S.: 246
 ITO, K.: 246
 ITO (SABURO), I.U.: 204, 241
 IVANOV, B.: 252
 IZGUR, E.: 192
 JACCARD, M.: 203
 JAKAB, L.: 112
 JÁKI, F.: 110, 271
 JAKUBCOVÁ, M.: 248, 259
 JANSSON, S.: 199, 204
 JAUMOTTE, M.: 203
 JAVAL, E.: 52, 72, 74
 JÄNTTI, J.: 268
 JELUŠIĆ, M.: 202
 JENSEN, W.: 267
 JEROME, K.J.: 203
 JERVIS, G.C.: 264
 JESENIN, S.: 276
 JESPERSEN, O.: 29, 54, 56
 JEVSEJEVA, L.: 180, 252, 260
 JOHNSON, W.B.: 188
 JÓKAI, M.: 31
 JOÓ, S.: 88
 JUHÁSZ, J.: 117
 JUNG T.: 66, 164, 165, 193
 JÜRGENSEN: 138
 KABE (BEIN, K.): 72, 129, 132,
 146, 148-149, 151, 185, 258,
 275
 KÁDÁR, J.: 111
 KAJAM, O.: 226
 KAIMÁR, G.: 30
 KALOCSAY, K.: 3, 60, 93, 98,
 102-103, 114, 119, 121, 128,
 130, 149, 157, 159, 161, 166,
 167, 170-174, 176, 177, 178,
 180, 182, 183, 184, 191, 192,
 203, 204, 206, 220, 221, 226,
 237, 270, 271, 272
 KAMARYT, S.: 19, 203
 KAPITÁNY, L.: 113
 KARASLAVOV, G.: 265
 KARDOS, A.: 93
 KARINTHY, F.: 92, 117, 175,
 204
 KAROLCZYK, S. (ESKA): 161,
 257
 KASSÁK, L.: 95, 172, 205
 KAWABATA, Y.: 245
 KAWASAKI, N.: 204, 241
 KÁRT, B.: 260
 KELLERMAN, I.: 162
 KEMPELEN, F.: 30
 KENESEI, M.: 110
 KERSTANOV, I.: 192
 KIKUČI, K.: 203
 KILIÁN, G.: 108, 109
 KIRÁLY, L.: 237
 KIRCHNER, A.: 16
 KIRK, H.: 267
 KISS, J.: 91
 KIVI, A.: 267
 KLEMETTI, H.: 160
 KNOEDT, L.H.: 264
 KO, I.: 267
 KOFMAN, A.: 46, 50, 72, 128,
 132, 141, 146
 KÓKAI, V.: 91
 KONOPNICKA, M.: 258
 KONISI, G.: 244-245
 KORACH, M.: 118
 KORNFELD, S.: 155
 KOŘINEK, J.: 131, 221, 248,
 266
 KOROLENKO, V.: 162
 KORSÓS, L.: 112
 KOSSA, S.: 114
 KOSZTOLÁNYI, D.: 117
 KOTZEBUE, A.: 57

- KOVÁCS, K.: 121
 KOVÁCS, T.: 112
 KOVÁCSHÁZI, S.: 30
 KOVAČIĆ, J.G.: 252
 KOZŁOWSKI, Cz.: 160-161
 KÖKÉNY, L.: 69, 96, 109, 110,
 119, 178, 236-237
 KÖNIG-KIRÁLY, L.: 115
 KÖRÖSI CSOMA, A.: 96
 KRALJ, D.: 221, 251
 KREUZ, R.: 61, 65
 KRIKORTZ, S.E.: 48, 199
 KRISS, J.: 161
 KRISTEK, P.: 85, 113
 KRITZ, R.: 272
 KRUSTEN, E.: 277
 KUDELA, A.: 191
 KULICH, J.: 108
 KUMBEL: 223
 KUN, B.: 93, 99
 KUOPPALA, E.: 268
 KURODA, M.: 248
 KURUCZ, G.: 84, 111
 KURZENS, N.: 178, 179
 LABBÉ, Ph.: 23
 LÁCZER, S.: 115
 LA FONTAINE: 171
 LAGERLÖF, S.: 200
 LAKOV, A.: 219
 LALANDE: 18
 LAMARTINE, A.M.L.P.: 180
 LAMBERT, D.: 162
 LANGLET, V.: 48, 88
 LANTI, E.: 78, 79, 80, 184,
 196-197
 LAPENNA, I.: 67, 68, 69,
 249-250
 LAQUER, A.: 108
 LAST, J.: 197
 LAŮLUM: 267
 LAWTH: 23
 LEAU, L.: 53, 54
 LEE, J.A.: 256
 LEENHARD, A.H.: 254
 LEIBNIZ, G.W.: 155
 LEJZEROWICZ, I.: 202, 257
 LEKKO, A.: 276
 LEMAIRE, R.: 46
 LENGYEL, P.: 48, 72, 89, 97, 119,
 147, 150
 LENIN, V.I.: 79
 LEPPAKOSKI, J.E.: 268
 LERMONTOV, M.J.: 276
 LESER, J.: 207
 LESSING, G.E.: 60, 165
 LESZKÓ, M.: 271
 LIEBNER, O.: 91
 LILJER-LOGUIN, A.: 196
 LINNANKOSKI, J.: 183, 268
 LINS, U.: 69, 230-231
 LIPPE, E.: 259
 LIPPMAN, W.: 165
 LISZT, F.: 114
 LIU, B.: 266
 LJUBIN, M. (GRIGOROV, A.):
 219
 LOBUT, P.: 248, 269
 LOI Quang: 277
 LOJKO, I.: 141
 LONG, B.: 188
 LOON, H.W. van: 202
 LÓRÁND L.: 88, 92
 LORENZ, F.V.: 217
 LORJAK: 229
 LU Sin: 266
 LUKÁCS, E.: 120
 LUKÁŠ, M.: 220
 LUNAČARSKIJ, A.V.: 79
 LUYKEN, H.A.: 190
 LYNGBIRK, J.: 225
 MACHADO, A.: 270
 MADÁCH, I.: 93, 172, 204, 271
 MAGYAR, Z.: 30
 MAIMIEUX, J. de: 17
 MAITINSKY, K.: 98
 MAJAKOVSKIJ, V.V.: 276
 MAJOR, J.: 98
 MAJURANIC, I.: 252
 MALLARME, St.: 226
 MARICH, A.: 88, 90, 97
 MARTINET, A.: 19
 MARTINEZ-LOPEZ, P.: 22

- MÁRTON, L.:** 110
MARX, K.: 79
MAS, S. de: 18
MASTNY, J.: 191
MÁTHÉ, Á.: 121
MATKOWSKI (MATWIEJCZUK)
 E.: 257
MATTOS, G.: 217-218
MATUBA, K.: 243
MAŮRA, G.E.: 178, 256
MEDGYESI, J.: 119
MELEAGRO: 171
MENU-de-MÉNIL, F.: 56
MÉRAY, Ch.: 150
MERCHANT, J.: 65
MEZEL, K.: 88, 119
MEZŐ, F.: 118
MICHAUX, A.: 47, 51, 72
MICKIEWICZ, A.: 143, 144
MIHALIK, J.: 92, 95, 96, 115,
 119
MIŃAŁSKI, E.: 193-194
MIKAMI, T.: vidu če
 NAKAMURA, T.
MILETZ, J.: 72, 88
MILTON, J.: 213
MINNAJA, L.: 273
MINOR, K.: 165
MIRSKI, B.: (Bela Manto): 163
MIYAMOTO, M.: 242-244, 248
MOLEE, E.: 24
MOLIÈRE: 52, 125, 139, 155
MOLNÁR, F.: 205
MOLNÁR, K.: 118
MOLNÁR, L.: 121
MONIUSZKO, S.: 58, 143
MÓRA, F.: 117
MORI, O.: 247
MOTTEAU, A.: 162
MOUNIN, G.: 18
MRŠTIK, A. kaj V.: 220
MUNTHE, A.: 202
MURATA, K.: 248
MUSSET, A. de: 171
MÜNNICH, A.: 121
NAGAYO, Y.: 245
NAKAMURA, T. (NIKAMI, T.):
 243, 247
NAKAZIMA, A.: 243
NATHER, J.Z.: 17
NAUMAN, A.: 141
NAVOI, A.: 276
NEERGAARD, P.: 223
NEKRASOV, N.: 193
NÉMETH, J.: 121
NERVAL, G. de: 226
NESVADBA, J.: 266
NEUZIL, A.: 191
NEWELL, L.N.: 178, 188, 248
NEZVÁL, F.: 112
NGUYEN, M.K.: 277
NGUYEN, S.: 278
NGUYEN, X.T.: 277
NICOLAS, A.: 54
NIELSEN, T.: 225
NISIMURA, M.: 241, 242
NJEGOS, P.P.: 274
NOGAMI, J.: 246
NOVOBILSKY, V.: 221
PECHAN, A.: 60, 96, 101, 103,
 109, 120, 272
PERIES, F.: 19
PETERLONGO, G.: 272
PETHES, E.: 113
PETŐFI, S.: 95, 103, 172, 204,
 207
PETRONIO: 171
PETROVIČ, S.J.: 274
PHILLIPS, H.: 43
PIČ, K.: 131, 221
PIENKIEWICZ, K.: 258
PILLATH, F. (ZANONI): 165
PIÓRO, J.: 258
PIRRO, M.: 22
PISONI, G.: 273
PLEJADO: 127, 166
POLGÁR, I.: 91, 97, 119
POLGÁR, V.: 97
POLIŠČUK, P.: 276
POLLEN, J.L.: 72
POTTS, B.: 256

- PREŠERN, F.: 252
 PRICE-HEYWOOD, B.: 178, 179
 PRIVAT, E.: 57, 61, 70, 132, 156,
 157-158, 211, 215, 281
 PROMET, L.: 276
 PRUS, B.: 148, 275
 PUMPR, T.: 131, 191, 202, 222,
 266
 PUŠKIN, A.S.: 142, 145, 162,
 193
 QUITTNER, B.: 107

 RADOS: 54
 RADOS, P.: 238, 272
 RAGNARSSON, B.: 238-239
 RAINIS, J.: 203
 RAJCZY, R.: 88, 112
 RAJSKI, A.: 257
 RÁKÓCZI, F.: 96
 RASMUSSEN: 224
 RAŞPE, R.E.: 265
 RAŠIDOV, Š.: 276
 RÉGULO-PÉREZ, J.: 131, 207,
 238
 REIBER, A.: 98
 REIMANN, F.: 19
 REKARERO, L.: 263
 RENZI, A.: 18
 RÉTHELYI, T.: 97
 RÉTHLY, A.: 118
 RÉTHY, A.: 30
 RHODES, J.: 72
 RIA, J. de: 17
 RIBILLARD, J.: 227
 RIISBERG, G.: 224-225
 ROBICSEK, P.: 92, 93, 97,
 ROELOFS, G.: 248
 ROLAND, R.: 79
 ROMAINS, J.: 269
 RONSARD, P. de: 127
 ROSBACH, H.A.: 275
 ROSBACH, J.H.: 254-255
 ROSENBERGER, V.: 28
 ROSSETTI, C.: 216, 235
 ROSSETTI, R.: 131, 206, 208,
 211, 212-213, 234, 264
 ROSSI, N.: 273
 ROTKVIČ, I.: 202
 ROUSSEAU, J.J.: 61
 ROUSSEAU, T.: 59
 RÓZEWICZ, T.: 258
 RUBINYI, M.: 117
 RUBLOV, S.: 276
 RUDELLE, L. de: 22
 RUST, J.C.: 188
 RUSTAVELI: 118
 RUSZNYÁK, J.: 119
 RYDYGER, J.: 257
 RYTENBERG: 257

 SADLER, V.: 216
 SAHA, H.: 277
 SAHAROV, A.A.: 150
 SALLAI, I.: 109
 SALOVAARA, E.: 225
 SAMODAJ, V.: 276
 SANG Yong-Sen: 267
 SÁNTA, F.: 271
 SARAFOV, I.: 265
 SÁROSI, M.: 60, 90, 157
 SARTRE, J.P.: 268
 SAUDIAN-ROUSSEAU, J.L.:
 228-229
 SAUSSURE, R. de: 57, 130, 152,
 156
 SAVILLE, G.: 202
 SCHATZ, R.: 120
 SCHAUHUBER, A.: 178, 179-180
 SCHEURMAN, E.: 198
 SCHILLER, Fr.: 125, 139
 SCHIPFER, J.: 23
 SCHLEYER, J.M.: 24, 25, 26, 27,
 41, 135
 SCHMIDT, Chr.: 44
 SCHOOR, J. van: 203
 SCHULHOF, S.: 159-160, 193
 SCHULZE, K.: 270
 SCHWARTZ, R.: 183, 185-187,
 207, 211, 229
 SCHWARTZ (SOROS), T.: 92,
 130, 166
 SCHWERIN, K.P.: 269
 SCIBOR-RYLSKI, A.: 258

- NEABRA, M.: 275
 NÉBERT, H.: 52, 72, 75, 82, 150
 NEEMANNOVÁSUCHARDOVÁ,
 E.: 220
 NEIFERT, J.: 221
 NEKELJ, T.: 70, 250-251
 NELEZNEV, I.: 141
 NELSO, D. vidu ĉe
 HIRYENKIEWICZ, A.
 NENES, L.: 273
 NEPER, K.: 48, 97
 NEPIK, H.: 181
 NETÁLÁ, V.: 182-183
 NIHAKESPEARE, W.: 125, 162,
 173, 188, 207, 211, 213, 264
 NIHARPE, R.: 151
 NIHAŬ G.B.: 220
 NIENKIEWICZ, H.: 275
 NIERSZEWski, W.: 180
 NIKLÓSSY, L.: 118
 NII. BERNIK, K.: 36
 NII. FER, G. (ARI, V.): 240-241
 NIIVA, B.: 264
 NIMEONOV, A.S.: 265
 NIMONYI, S.: 92, 117
 NINCLAIRE, U.: 203
 NINHA, L.: 231-232
 NIKALJER-RACE, V.: 253
 NII. OWACKI, J.: 143
 NI MUUL, J.: 276
 NII. OKLO: 207, 264
 NIOMLAI-SPIRER, L.: 205, 271
 NI ONNENFELD, E.: 263
 NI OTOS-OCHANDO, B. de: 20
 NIPI NSER, E.: 127
 NIPI TZER, C.L.: 54
 NI PROECK, A.: 229-230
 NI TAFFLER, A.F.: 21
 NI TAMATOV, G.: 192
 NI TAŬURA, A.: 266
 NI TARCEVSKI, A.V.: 23
 NI TARKE, A.: 157
 NI TIFANĀIĀ, J.: 253
 NI TII. NER, H.: 62, 66
 NI TIEVENSON, R.L.: 217
 NI TII. LMAN, E.C.: 178, 180
 NI TII. OJAN, P.: 230
 STOLL, G.: 253
 STRINDBERG, A.: 199, 200
 STRÜMPFEL, M.: 180
 STURMER, K.R.C.: 188, 189-190
 SU, A.: 222-223, 248
 SUDRE, J.F.: 20
 SUN Jon: 103
 SUTKOVOJ, V.G.: 180
 SÜSSMUTH, J.: 72, 88
 SWIFT, J.: 23
 SZABÓ, A.: 237
 SZABÓ, T.: 116
 SZABÓ, V.: 109, 271
 SZALAY, A.: 119
 SZATHMÁRI, S.: 216, 234-235
 SZÉCHENYI, A.: 89
 SZÉCHENYI, S.: 30, 95, 96
 SZENES, I.: 111
 SZERDAHELYI, I.: 104-105,
 116, 119
 SZERÉMI, B.: 107
 SZILÁGYI, F.: 69, 94, 97, 103,
 119, 167, 176, 178, 200,
 203, 206, 207, 211, 224,
 232-234
 ŠIDLOVSKAJA, M.: 162
 ŠIMOMURA, J.: 203
 ŠIRJAEV, I.: 161, 177
 ŠOLEM, A.: 139
 ŠUPICHOVÁ, J.: 191
 TADIJANOVIĀ, D.: 252
 TAEKENG, K.: 274
 TAGORE, R.: 231, 232, 270
 TAKÁCS, J.: 92, 108, 120
 TAKAĀ, Z.: 208
 TAKUBOKU, I.: 244
 TAMMSAARE, A.H.: 260
 TANAKA, S.: 248
 TANIZAKI, Z.: 243
 TÁRKONY, (TOTSCHÉ), L.: 110,
 167, 172, 174-175, 178, 203,
 207, 233, 271
 TARNAY, A.: 113
 TENGÉR, P.: 21
 TENNYSON: 162

- TGRANSAR: 21
 THIJSSSEN, T.: 198
 THILANDER, H.: 118
 THOMSON, J.: 211
 THORSEN, P.: 223-224
 TIMMERMANS, F.: 203
 TO Hoai: 277
 TO Huu: 277
 TOLNAI, E.: 92, 95, 108
 TOLNAI, P.: 95, 108
 TOLSTOJ, A.: 162, 195
 TOLSTOJ, L.: 45, 161
 TOMÁN, J.: 120
 TOMBÁCZ, E.: 110
 TOMITA, T.: 248
 TONKIN, H.: 77
 TÓTH, E.: 238
 TÓTH, V.: 120, 167
 TÖRÖK, P.: 88, 93, 119, 120
 TROMPETER, W.H.: 44
 TUGLAS, Fe.: 181
 TULVE, H.: 276
 TURZÓ, P.: 92
 TUWIM, J.: 257
 TYBLEWSKI, T.: 258
 UEYAMA, M.: 245, 248
 UJLAKI-NAGY, T.: 121
 UKRAINKA, L.: 276
 UNDER, M.: 182
 UNGÁR, E.: 114
 ÜNGARETTI, G.: 273
 URBAN, Š.: 220
 URBANOVÁ, E.: 222
 URQUHARDT, Th.: 21
 VAHEN-SVETINOV, D.: 254
 VALANO, J. (PIRON, C.): 209
 VALLIENNE, H.: 132, 152-153
 VANA, V.: 265
 VANČIK, B.: 252
 VARGA-HASZONITS, Zs.: 272
 VANSELOV, K.: 180
 VARANKOV, V.: 194
 VATRÉ, H.: 3, 172
 VAZOV, I.M.: 192, 265
 VELEBIT, J.: 252, 273
 VEL'KY, J.: 266
 VELTEN, W.: 165
 VENTURA i FREIXAS, J.: 270
 VENTURE, A.: 188, 264
 VERAX, C.: 73
 VERGILIUS: 153
 VERHAEREN, E.: 226
 VERLAINE, P.: 171, 226
 VERMUYTEN, H.: 203
 VERTUS, A. de: 18
 VIDAL, E.F.: 21
 VIDRAC, C.: 268
 VIKÁR, B.: 118
 VINCZE, F.: 115
 VONDEL, J. van den: 197
 VOLTAIRE: 79, 197
 VONDROUSEK, J.: 266
 VÖRÖS, C.: 118
 WACKRILL, A.E.: 162, 188
 WAHL, E. von: 28, 29, 45, 46,
 141
 WALRAAMOEN, K.: 240
 WARDEN, J.M.: 188
 WARINGHIEN, G.: 74, 79, 130,
 135, 138, 171, 172, 173, 176,
 177, 183, 184, 207, 225-227,
 256, 264, 269
 WASNIEWSKI, J.: 128
 WELEMINSKY, J.: 202
 WELZL, J.: 191
 WIESENFELD, E.: 147
 WILDE, O.: 198
 WILKINS, J.: 19
 WOHLTHAT, A.E.: 269
 WOLKE, C.H.: 17
 WÜSTER, E.: 165, 177
 YAGI, Nihej: 246
 YAMADA, T.: 245
 YANAGITA, K.: 245
 ZAKRZEWSKI, A.: 216
 ZAMENHOF, A.: 36
 ZAMENHOF, F.: 141, 147
 ZAMENHOF, Lidia: 36, 275
 ZAMENHOF, Ludoviko Lazaro:
 26, 27, 35-41, 42, 45, 46, 47,
 51, 52, 54, 57, 58, 59, 70, 72,

124, 125, 126, 128, 132-140,
142, 151, 154, 156, 173, 211,
262
ZAMENHOF, M.: 35
ZEE, S.J. (SU): 181, 266
ZIERMANS, J.: 197
ZILAHY, L.: 205
ZINNER, L.: 98
ZINOVIEV: 72
ZIOLKÓWSKA, M.: 239, 275
ZIPERNOVSZKY, K.: 91
ZLATKO, T.: 274
ZWEIG, S.: 269
ZSÁMBOKI, M.: 112

BIBLIOGRAFIO

Historio, Movado

- Auld, W.*: Mitoj kaj faktoj pri E (CED, Londono, 1964.)
Biblio (Brita Biblia Societo, Londono, 1966)
Bormann, W.: Aufbau, Entwicklung, Leistungen (Strukturo, Evoluo, Servoj)
(Deutsches E-Institut, Augsburg, 1977)
Boulton, M.: Zamenhof, aŭtoro de E (La Laguna, 1964)
Bruin, G.P.: Gvidilo tra la E-Movado (Amsterdamo, 1936.)
Ceram, C.W.: Götter, Graber und Gelehrte (Dioj, Tomboj kaj Scienculoj) (Rowolt Verlag, Hamburg, 1958)
- Courtinat, L.*: Historio de E. (3 volumoj, 1966)
Drezen, E.: Analiza historio de E-movado (Leipzig, 1931 -Kioto, 1972)
Drezen, E.: Zamenhof (Leipzig, 1929, 1970)
Erdey, Fr.: Unua Eukaristia E-Mondkongreso (Budapesto, 1928)
Korytkowski, G.J.: Ekumenismo kaj Internacilingva Problemo (IKUE, 1973)
Kökény-Bleier-Strjaev: Enciklopedio de E (Budapesto, AELA, 1933, du vol.)
Lapenna, I.: Elektitaj paroladoj kaj prelegoj (Rotterdam, 1966)
Lapenna, I.: La Internacia Lingvo. Faktoj pri E. (Londono, 1954)
Lapenna, I.: Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (2-a eld. (Londono, 1972))
Lapenna, I.: Esperanto en Perspektivo (UEA, 1974)
Privat, E.: Aventuroj de Pioniro (Stafeto, 1962)
Privat, E.: Historio de E. (du vol. Leipzig, 1923-27)
Privat, E.: Vivo de Zamenhof (5-a eld. Rickmansworth, 1967)
SAT, Historio de SAT (1921-1952) (Paris, 1953)
Stop-Bovitz – Isbrucker: La E-Movado (Oslo, 1948)
Tiborc, S.: Az Eszperanto Magyarországon (E. en Hungario, Budapesto, 1959)
Waringhien, G.: Leteroj de Zamenhof (2 vol.) (Paris, 1948)
Zamenhof, L.L.: Originala Verkaro (Leipzig, 1929)
Ziólkowska, M.: Doktoro Esperanto (Varsovio, 1959)

Lingvo

Aktoj de la Akademio

Bastien, L.: Naŭlingva Etimologia Leksikono (1950)

Kalocsay, K.: La kvindek jaroj de la lingvo (En Ora Libro de la E-Movado, 1937)

Kalocsay, K.: Lingvo Stilo Formo (3-a eld. 1970)

Kalocsay, K.: Rendszeres E-nyelvtan (Sistema E-gramatiko) (Tankönyvkiadó, Budapeŝto, 1968)

Kalocsay-Waringhien: Plena Gramatiko de E (Unu vol.-Lit.Mondo, 1935; 3-a eld. du vol. E.Prop.Centro, Milano, 1964)

Waringhien, G.: Lingvo kaj Vivo (La Laguna, 1959)

Waringhien, G.: Plena Ilustrita Vortaro (SAT, Paris, 1970)

Wendt, H.F.: Sprachen (Fischer Bücherei, Frankfurt am Main, 1961)

Zamenhof, L.L.: Fundamento de E (9-a eld., Marmande, 1963)

Zamenhof, L.L.: Fundamenta Krestomatio (16-a eld., Esperantista Centra Librejo, Paris, 1939)

Interlingvistiko

Dratwer, I.: Pri internacia lingvo – dum jarcentoj (CED, Rotterdam, 1970)

Drezen, E.: Historio de la mondolingvo (Leipzig, 1931.-Osaka, 1967)

Gilbert, W.: Planlingvaj problemoj (Stafeto, 1962)

Manders, W.J.A.: Interlingvistiko kaj esperantologio (Purmerend, 1950)

Szerdahelyi, St.: Bábelről a Világnyelvig (De Babelo ĝis la Mondlingvo) (Gondolat, 1977)

Tonkin, H.: Esperanto and international language problems (tria eld. Washington, 1972)

Literaturo, Sciencoj

Kralj, D.: Kvar prelegoj pri la E-a literaturo (Ljubljana, 1960)

Lapenna, I.: Retoriko (tria eld., Rotterdam, 1971)

Novobilsky, V.L.: Skizo pri la E-a literaturo (1956)

Privat, E.: Pri E-a literaturo (1911)

Tárkony, (Totsche), L.: De paĝo al paĝo (Lit.Mondo, 1932, HEA 1976)

Instruado, Metodo

Fésűs, A.: Új módszerek a nyelvtanításban (Novaj metodoj en la lingvo-instruado) (inter aliaj lingvoj ankaŭ E) (Győr, 1968)

Fésűs, A.: Az idegennyelv-oktatás új módszerei (Győr, 1969)

Markarian, R.: La eduka valoro de la instruado de E en la lernejoj (CED, Londono, 1964)

- Rakuŝa, R.*: Metodiko de la E-a instruado (1970)
Sakaria, H.: Enkonduko en la pedagogion (E-Instituto de Estonio, 1932)
Szerdahelyi, St.: Metodologio de E. (universitata studlibro, 376 paĝa)
(Tankönyvkiadó, 1975)
Zlatnar, P.: Esperanto kaj lernejo (en ĝi ankaŭ Metodiko de Rakuŝa)
(Jugosl. E-Federacio, Ljubljana, 1957)

x x x

- Poŝatlaso de la Mondo* (Kartografie, Praha, 1971)
Strani Mira (Poltizdat, Moskvo, 1974). La sama hungarlingva kartografia libro: *D. Gergely, A.*: Földünk országai (Landoj de nia Tero) (Kossuth Kiadó, Budapest, 1975)

ENHAVO

Antaŭparolo al la dua eldono	3
Antaŭparolo al la unua eldono	5
SKIZO DE HISTORIO DE INTERNACIA	
LINGVO	7
ENKONDUKO	
1. La problemo de la multlingveco en la historio	8
2. La problemo en la nuntempo	13
LA ARTEFARITAJ LINGVOPLANOJ	16
3. Pazigrafioj	16
4. Pazilalioj	18
5. Aprioraj lingvoj	19
6. Aposterioraj lingvoj	21
7. Volapük	24
8. Planlingvoj post Esperanto	27
9. Hungaraj pioniroj de internacia lingvo (Hun- garaj planlingvistoj)	30
Suplemento	31
ESPERANTO	35
10. La vivo de Zamenhof	35
11. Zamenhof prilaboras sian lingvon	37
LA MOVADO	42
12. La unua jardeko	42
13. Lingva voĉdonado en 1894	45
14. Svedio, Francio, Rusio	47
15. La unua mondkongreso, 1905	51
16. La Delegacio. — Ido	53
17. La evoluo ĝis mondmilito. — Dunmilita movado.	56
18. Sur fakaj terenoj (1922–1934)	61

19. Antaŭ kaj dum la dua mondmilito (1934–1946)	64
20. Nova epoko post la dua mondmilito	67
LA ESPERANTO—ORGANIZAĴOJ	72
21. Lingva Komitato kaj Akademio	72
22. Universala Esperanto—Asocio (UEA).	74
23. Laborista E-movado. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)	78
24. Nuntempe funkciaj internaciaj fakorganizaĵoj	82
LA MOVADO EN HUNGARIO	88
25. La unuaj dekdu jaroj	88
26. En ombro de la unua mondmilito	91
27. La neŭtrala movado inter 1920–1945	93
28. Hungaroj de movado kaj literaturo	98
29. En politika subpremo	105
30. Nova epoko post la dua mondmilito	109
31. Aldonoj kaj kompletigoj	112
SKIZO DE ESPERANTA LITERATURHISTORIO	123
ENKONDUKO	124
32. Esperanto kaj literaturo	124
33. La periodoj de la E-a literaturhistorio	128
UNUA PERIODO	132
34. L. L. Zamenhof	132
35. La Fundamenta Krestomatio	140
Antoni Grabowski	142
Leo Belmont	144
Vasilij Devjatnin	145
Antoni Kofman	146
Aleksandro Dambrauskas-Dombrowski	146
Felix Zamenhof	147
Paŭlo Lengyel	147

Kabe	148
36. La franca influo	149
Henri Vallienne	152
Carlo Bourlet	154
Theophile Cart	154
Emile Boirac	155
René de Saussure	156
37. La poezio de la antaŭmilitaj jaroj	156
Edmond Privat	157
Maria Hankel	158
Stanislav Schulhof	159
ELSKI kaj ESKA	160
Czeslaw Kozlowski	160
Juliusz Kriss	161
Ivan Ŝirjaev	161
38. Tradukliteraturo	162
39. La jaroj de la unua mondmilito	162
DUA PERIODO	164
40. La germana skolo	164
41. La Budapeŝta skolo	166
Literatura Mondo	166
Julio Baghy	168
Kálmán Kalocsay	170
Lajos Tárkony	174
Karlo Bodó	175
Francisko Szilágyi	176
42. Kolektivaj LM-libroj	176
Plena Gramatiko de Esperanto	177
Enciklopedio de Esperanto	177
Dekdu poetoj	178
Naŭ poetoj	180
43. Estonaj kaj finnaj aŭtoroj	181

Hilda Dresen	181
Vilho Setälä	182
44. La franca skolo	183
Raymond Schwartz	185
45. La brita skolo	187
L. N. Newell	188
K. R. C. Sturmer	189
H. A. Luyken	190
46. Ĉeĥoslovakiaj aŭtoroj	190
47. Katalunaj aŭtoroj	191
48. Bulgaraj aŭtoroj	192
49. Soveta skolo	192
Eŭgeno Miĥalski	193
Vladimir Varankin	194
Nikolaj Hohlov	194
Vasilij Eroŝenko	195
Georgo Deŝkin	195
Aleksandro Liljer-Logvin	196
50. Lanti kaj lia rondo	196
51. Nederlandaj aŭtoroj	197
Hindrik Jan Bulthuis	198
F. V. Dorno	198
52. Svedaj aŭtoroj	199
Magda Carlsson-Bohman	199
Stellan Engholm	200
53. Du prozistoj	201
Jean Forge	201
Izrael Lejzerowicz	202
54. Tradukliteraturo	202
Japanaj aŭtoroj	204
Tradukoj el la hungara	204
TRIA PERIODO	206
55. La skota skolo	208

56. Aŭtoroj de la nuntempo	209
a) Belga aŭtoro	209
b) Britaj aŭtoroj	209
c) Brazilaj aŭtoroj	217
ĉ) Bulgaraj aŭtoroj	219
d) Ĉeĥoslovakiaj aŭtoroj	220
e) Ĉina aŭtoro	222
f) Danaj aŭtoroj	223
g) Finna aŭtoro	225
ĝ) Francaj aŭtoroj	225
h) Germanaj aŭtoroj	229
h) Greka aŭtoro	231
i) Hinda aŭtoro	231
j) Hungaraj aŭtoroj	232
ĵ) Islanda aŭtoro	238
k) Israela aŭtoro	239
l) Italaj aŭtoroj	239
m) Japanaj aŭtoroj	241
n) Jugoslaviaj aŭtoroj	249
o) Nederlanda aŭtoro	254
p) Norvega aŭtoro	254
r) Novzelandaj aŭtoroj	255
s) Panama aŭtoro	256
ŝ) Polaj aŭtoroj	257
t) Sovetaj aŭtoroj	259
u) Sudafrika aŭtoro	260
v) Usona aŭtoro	262
57. Tradukliteraturo	262
a) Argentino	262
b) Brazilio	263
c) Britio	264
ĉ) Bulgario	265
d) Ĉeĥoslovakio	265

e) Ĉinio	266
f) Danio	267
g) Finnlando	267
ĝ) Francio	268
h) GDR kaj FRG	269
ĥ) Hindio	270
i) Hispanio	270
j) Hungario	271
ĵ) Israelo	272
k) Italio	272
l) Jugoslavio	273
m) Koreo	274
n) Norvegio	274
o) Pollando	275
p) Portugalio	275
r) Sovetunio	276
s) Vjetnamio	277
METODIKO	279
Enkonduko	280
La studmaterialo	284
Instrumetodaj konceptoj	285
La instruado de la lingva materialo en kompleks- aktiva metodo	300
La elformigo de kapabloj	306
La lerneja praktiko	313
Indekso	339
Bibliografio	350
Eldonejoj ofertas	353
Enhavo	365

ESPERANTAJ LIBROJ EL HUNGARIO

- G. Gárdonyi: **Sklavoj de Dio** (*Romano*, 409 p.)
F. Szilágyi: **Koko krias jam!** (*Noveloj*, 200 p.)
L. Tárkony: **De paĝo al paĝo** (*Eseoj*, 121 p.)
Auld-Dinwoodie-Francis-Rossetti: **Kvaropo** (*Poemoj*, 252 p.)
J. Baghy: **En Maskobalo** (*Unuaktaĵoj*, 140 p.)
Csizsár-Kalocsay: **6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj**
Esperanta-Kamboĝa Vortaro (148 p.)
F.V. Dorno: **Aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-a de Fuŝio** –
– **Levu la manojn!** (*Satiro kaj krimkomedio*, 140 p.)
E. Ady: **La morto de la ĉielarko** (*Poemoj kaj artikoloj*, 90 p.)
S. Szathmári: **Kain kaj Abel** (*Noveloj*, 286 p.)
Turista Kantaro (84 p.)
Komputilteknika Vortaro (*Hungara-germana-angla-franca-esperanta*,
464 p.)
25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951-1975
(*Poemoj kaj noveloj*, 108 p.)
F. Molnár: **La knaboj de Paŭlo-strato** (*Romano*, 180 p.)
M. Jókai: **La filoj de l' ŝtonkora homo** (*Bildrakonto*, 64 p.)
I. Lejzerowicz: **El la „Verda Biblio”** (*Satiroj*, 80 p.)
Esperantologiaj Kajeroj 2 (*Studoj*, 273 p.)
Esperantologiaj Kajeroj 3 (*Bárczi-memorlibro*, 375 p.)
Sciencaj Komunikadoj 1977 (*Studoj*, 100 p.)
Sciencaj Komunikadoj 1978 (*Studoj*, 100 p.)
Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio (48 p.)
Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado (*Studoj*, 226 p.)
Gvidlibro por supera ekzameno (*Historio-Literaturo-Metodiko*, p.)
Baza Literatura Krestomatio (p.)

En preparo:

- V. Benczik: **Libro de romanoj** (C. 150 p.)
Krilov: **111 fabloj** (C. 200 p.)
E. Tóth: **Lappar, la Antikristo** (*Noveloj*, c. 140 p.)
F. Karinthy: **Vojaĝo al Faremido. – Kapilario** (*Du romanetoj*, c.220 p.)

HUNGARA
ESPERANTO-ASOCIO
BUDAPEST 1979